*Holokaŭsto, naciismo kaj ksenofobio en orienta Eŭropo:*

# KIAM EN LA INFERO DE KOVNO FLUIS LA SANGO

## Persekutado kaj amasmurdo de la judoj en Litovio en la jaroj 1941-1944

**kaj la litova kunlaborado en la mortigo de pli ol 200´000 judoj kaj sovetianoj**

kun aparta konsidero de la urbo Kovno (Kaŭno)

*Originale verkita en Esperanto por eviti forgesadon kaj prisilentadon*
*Publikigita okaze de la 70a datreveno de la liberigo de la NS-koncentrejoj en Eŭropo*
*Memore pri Robert Kuwałek (1966-2014), pola historiisto el Lublino*











Se iuj fotoj uzitaj en ĉi tiu verkaĵo kaj pruntitaj el la interreto estas daŭre protektataj de aŭtoraj rajtoj, la aŭtoro petas la posedanton de la aŭtoraj rajtoj anonci sin, alikaze validas la reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

# 1a parto:
# Fundamentaj kondiĉoj por la holokaŭsto en Litovio

## Enkonduko

Sojle de la Dua Mondmilito, kiu eksplodis en Eŭropo en septembro 1939, vivis en Litovio ĉ. 250´000 judoj, t.e. 8 procentoj de la loĝantaro, formante la plej grandan etnan minoritaton de tiu balta lando.[1] Post la invado de la germana armeo la 24an de junio 1941 en Litovion, kiu estos, kune kun Latvio kaj Estonio, submetita al la nove kreita „Regna komisariato Ostland“, komenciĝis la holokaŭsto ankaŭ en tiu mondoparto.[2] Sub germana reĝisorado kaj kun la kunlaborado de lokaj litovaj helpantoj kaj instancoj, kiuj parte agis en propra intereso, ĝis 1944 estis neniigita preskaŭ la tuta judaro de Litovio – tiel pli ol 200´000 judaj viroj, virinoj kaj infanoj perdis sian vivon. La judoj amase mortis ĉu en la getoj de Kovno, Vilno, Šiauliai kaj Švenčionys, ĉu en la diversaj fortikaĵoj de Kovno,[3] ĉu en la amaspafejo de Paneriai (Ponary) apud Vilno, ĉu en sennombraj aliaj lokoj, entute pli ol 200. Sen havi la okazon por sin defendi aŭ organizi internan kaj eksteran helpon, la judoj estis ekstermitaj per neimageblaj senprokrasteco, rapideco, radikaleco, krueleco kaj kompleteco, tiel ke eĉ la germanoj kaj aŭstroj, kiuj aranĝis la tutan amasmurdon kadre de la „fina solvo“, miris kaj estis perpleksaj. Sed kial ĝuste Litovio estis tiu lando, en kiu la judoj estis tiel radikale elsarkitaj kompare kun aliaj okupataj ŝtatoj, restas malklare ĝis hodiaŭ. Ĉu ĉar Litovio estis la unua viktimo de la germana agreso en oriento, en kiu oni devis rapide atingi la militajn celojn, ĉu ĉar en Litovio vivis densa grupo de judoj, kiujn oni volis rapide likvidi, kvazaŭ en modela ekzerco por sekvantaj neniigaj operacoj en aliaj landoj? Ĉu la litovoj kunlaboris kun la germanoj en la neniigo de la judoj, ĉar ili povis profiti la unikan historian okazon por kvazaŭ nerimarkite kaj en la ombro de la tuteŭropa genocido radikale purigi sian landon de la judoj, kiuj amase vivis en Litovio dum jarcentoj, por liberigi sin de ĝena ekonomia konkurenco, kiu malhepis la litovojn konstrui sian etne homogenan nacian ŝtaton?

La fakto estas, ke la judoj estis premataj kaj minacataj de pluraj flankoj: De la nacisocialistoj (nazioj), kiuj egaligis judojn kun marksistoj kaj bolŝevikoj, de la komunistoj, kiuj vidis en la judoj kapitalistojn-ekspluatantojn, klasmalamikojn kaj religiajn mistikulojn, kaj de la litovoj (aŭ litovaj naciistoj), kiuj perceptis la judojn kiel komunistojn kaj ekonomiajn konkurentojn.

Por iel pravigi la persekuton de la judoj, litovaj naciaj historiistoj preferis emfazi la rolon de la „kontraŭ-bolŝevisma naciliberiga batalo“ de la litova popolo kaj precipe la proprajn litovajn viktimojn, kaŭzitajn de la stalinisma reĝimo. Kiel centra argumento por pravigi la eliminadon de la judoj en Litovio servis la hipotezo, ke *la judoj* estis komunistoj kaj do kulpis pri la reokupacio de Litovio fare de la Ruĝa Armeo. Ĉi tiu hipotezo evidentiĝis nekredinda, fakte falsa (kiel sube estos ankoraŭ pli detale montrate). Por senkulpiĝi cirkulis la plej diversaj pretekstaj, aŭ mensogaj asertoj, laŭ kiuj la litovoj estis devigitaj de la germanoj murdi la judojn, ke la litovaj kulpantoj apartenis al la plej malbonaj kaj krimaj elementoj de la litova socio, ke la murdistoj estis poloj portantaj litovajn uniformojn, ke la „monda judaro“ mem elpensis la fantaziaĵon de la holokaŭsto, aŭ ke la veraj friponoj estis litovaj komunistoj. Kvankam tiaj absurdaj asertoj nuntempe ne plu estas laŭte cititaj, ili tamen plu ekzistas en la litova (sub)konscio, almenaŭ ĉe parto de la pli maljuna generacio, kiu lernis tiun ´lernejan lecionon´. Surbaze de supozoj kaj onidiroj ĉi tiu tragika realaĵo de la historio neniam povis esti objektive traktita kaj praktike restis publike tabuigita en Litovio kaj

---

[1] Oni povus diskuti, ĉu en Esperanto sufiĉus la landnoma formo „Litvio“, analoge al „Latvio“, aŭ „Mordvio“. Sed ĉar mi ne volas rompi la lingvouzan tradicion, mi uzos ankaŭ en ĉi tiu teksto la formon „litov-“, kun la argumento, ke la landnomo en la litova lingvo mem estas „Lietuva“, diference de „Latvija“ por Latvio (tamen, ekzemple en la lingvoj rusa, ukraina, pola kaj belorusa la landnomo estas „Litva/Litwa“, sed la adjektivo estas „litovsk-/litewsk/litousk-“). Kiel mi praktikis ankaŭ en pli fruaj artikoloj, mi tamen distingos „Litovujo“ kiel specon de arkaikaĵo por difini la landnomon ĝis 1918, kiam estis fondita la moderna „Litovio“. Kiel konate, ekzistas ankaŭ la formoj „Litvo“, kiu estis uzata en la traduko de la poemo “Sinjoro Tadeo“ de Adam Mickiewicz, kaj „litvako“, esprimo por nomi la litovajn judojn, t.e. la judojn en la Litova Grandprinclando, do trans la limoj de la Pola Reĝlando, kiuj parolis (nordorientan) version de la jida lingvo, kiu iom diferenciĝis de tiu de la polaj judoj.

[2] Por la sama afero estas kutime uzataj la nocioj *holokaŭsto,* kiu signifas ´komplete bruligata´ (laŭ la greka vorto ὁλόκαυστος), kaj *ŝoaho* (laŭ la hebrea), kiu signifas ´katastrofon´. En la jida oni diras *churbn,* kio signifas ´detruon. Kvankam en la pasinteco okazis ankaŭ genocidoj kontraŭ aliaj popoloj, la nocion de la holokaŭsto oni konsideras kutime rezervata por la judoj. La armenoj nomas sian holokaŭston „Aghet“.

[3] Pri kiuj mi detale skribos sube, en la 4a parto. Kovno estas la nomo de la urbo laŭ PIV.

Sovetunio. Eventuale postvivis mitoj kaj legendoj, duonscioj, kiuj manipulis, falsis kaj renversis la rigardon al la faktoj, kaŭzante misinformojn kaj miskomprenon ĉe vastaj tavoloj.

La genocido kontraŭ la judoj en Litovio en 1941-44 longdaŭre malbonigis la rilatojn inter judoj kaj litovoj. Jam en 1946 la kvereloj inter ambaŭ popoloj komenciĝis, kiam en iuj konservemaj naciismaj medioj de la litova ekzilo oni provis senkulpiĝi en la senco, ke la judoj ne estis mortpafitaj, ĉar ili estis judoj, sed ĉar ili estis bolŝevikoj (ĉi tiu vidpunkto servos kaj al la litova ekzilo kaj al la historiografio kaj politiko en Litovio mem kiel bazo por reinterpreti la propran kulpon holokaŭston). La judoj reagis al ĉi tiu provo bagateligi kaj falsadi la faktojn en akra rezolucio de 1947, en kiu ili ĝenerale kulpigis ĉiujn „sociajn tavolojn de la litova popolo“ pri la partopreno de la amasmurdo de la judoj.[4]

Eĉ se la ĉefaj kaj principaj faktoj pri la amasmurdo de la judoj en Litovio oficiale ne estis prisilentitaj kaj la holokaŭsto en si mem ne estis neata de la (litova-)sovetia historiografio, la evento tamen estis krude kaj false reinterpretita laŭ la kompreno de la komunistoj. Pro kontraŭ-cionismaj konsideroj kaj la neekzisto de „juda demando“, la sovetia historiografio ne pretis agnoski la ekskluzivecon aŭ unikecon de la holokaŭsto kiel genocido, kiu koncernis speciale nur la judojn kiel ĉefan viktimgrupon, kiel tio estas la kutimo en Okcidento. Anstataŭ tio ĝi disvastigis la teorion, ke ĉe la judoj temis pri grupo de viktimoj de la faŝisma agreso, kiu estis nur *parto de la amasmurdo de la „sovetia popolo“* kadre de la „Granda Patrolanda Milito“.[5] En tiu senco la publikaj memorialoj pri la dua mondmilito, kie ĉefe judoj estis amase mortigitaj (ekzemple en Paneriaj en Litovio aŭ en Babij Jar en Ukrainio) estis redediĉitaj.

Ne nur la sovetia historiografio havis grandan problemon objektive pritaksi la holokaŭston. Ankaŭ la nekomunisma naciisma litova historiografio traktis ĉi tiun temon laŭ senskrupule malhonesta maniero, kaj en la litova diasporo oni eĉ rifuzis kaj entute neis ian helpan rolon aŭ kulpon de la litovoj dum la holokaŭsto. Iuj ultrapatriotismaj litovoj en la diasporo turnis la lancon kaj eĉ ŝovis la kulpon al la judoj mem, preferante emfazi la tragedion de la litova popolo dum la stalinisma periodo.[6] Tiel aperis la litova teorio pri la „duobla genocido“, per kiu ambaŭ tragedioj estis ne nur intermiksitaj kaj kvazaŭ interkalkulitaj aŭ ´kontraŭkalkulitaj´, sed kiu ankaŭ kaŭzis, ke la sorto de la judoj estis preskaŭ komplete forgesita.[7]

Sendube, la holokaŭsto kaŭzis al Litovio gravan, embarasan heredaĵon, kiu verŝajne okupos la litovojn kaj judojn ankoraŭ sufiĉe longan tempon. Ĝis antaŭ nelonge, la intereso aŭ preteco de la litovoj okupiĝi pri tiu ĉapitro de sia historio estis tre malforta kaj praktike ne ekzistis. Eĉ pli malgranda estis la

---

[4] Tauber: Vergangenheitsbewältigung in Litauen. En: Lehmann u.a. 2012; Kohrs 2003. La rezolucio estis publikigita en: Eidintas, A.: Lietuvos žydų žudynių byla: Dokumentų ir straipsnių rinkinys.Vilnius 2001, p. 340s.

[5] En la „fina raporto“ de la „Speciala ŝtata komisiono por la esplorado de la krimoj de la germanaj faŝistoj kaj ties komplicoj“, kiu estis starigita en Sovetunio post la milito, estis notite, ke „en Litovio la nazioj mortigis 165´000 militkaptitojn kaj 300´000 pacajn loĝantojn“. La litova kunlaborado estis prisilentata. (vd. Eidintas 2003, p. 350). Pri la manipulata prezento de la holokaŭsto en la sovetia historiografio kaj propagando vd. la artikolon de Erich Goldhagen. En: http://www.ifz-muenchen.de/heftarchiv/1980_4.pdf. En sovetia Litovio aperis en 1965/1973 la duvoluma dokumenta verko ´Masinės žudynės Lietuvoje 1941-1944. Dokumentų Rinkinys´ (Amasmurdo de la judoj en Litovio 1941-1944.) Ĉi tiu unika sovetia ´Elekto de dokumentoj´, redaktita de Boleslovas Baranauskas (1902-75) k.a. kaj eldonita en Vilno (vol. 1 1965, vol. II 1973), forlasis la sovetiajn kutimojn rilate la traktadon de la holokaŭsto, t.e. rezignis pri la anonimigo de la judoj kiel ĉefa viktimgrupo, do sufiĉe objektive kaj honeste traktis la genocidon kontraŭ la judoj en Litovio kaj en la esenco nenion prisilentis aŭ reinterpretis, kvankam la rigida sovetia ideologia kadro ĝenerale restis, devis resti konservata. Traktata estis krome la sorto de la ciganoj. (Vd. Tauber 2010, p. 50s.). Kiel alia voĉo de la 70aj jaroj, en 1975 la disidenta verkisto Tomas Venclova, kiu estis devigita forlasi Litovion en 1977 kaj kiu menciis Esperanton en sia libro ´Forms of Hope´, 1976 (vd. Venclova ĉe Levinson 2006, p. 448), notis en sia artikolo „Judoj kaj litovoj“, ke la holokaŭsto estis ne nur granda katastrofo por la judoj sed eĉ pli granda por la litovoj mem. Venclova postulis, ke la litovoj devas paroli pri kio okazis kun la judoj sen interna cenzuro kaj sen propagandismaj tordoj, sen timo. En la postaj jaroj la intereso pri la holokaŭsto en Litovio malkreskis favore al la glorado de la sovetiaj herooj kaj partizanoj. Pri la sovetiaj militkaptitoj necesas aldoni, ke tiu viktimgrupo, kiu estis treege malbone traktata de la nazigermanoj (kaj poste denove de Stalin, kiu sendis multajn el ili en la gulagon), ne ricevis la adekvatan atenton kaj omaĝon en la Okcidento. Fakte nur en 2015 tiu viktimgrupo, kiu estis tiel krude neglektata de la historiografio, ricevis mencion en parolado de la germana prezidento Gauck (6.5.).

[6] L. Donskis: Loyalty, Dissent and Betrayal. In: Tauber, Joachim 2006, p. 116.

[7] Vd. Guesnet/Staliūnas 2013, p. 19. Ŝajnas ke nuntempe almenaŭ la diferencoj inter judaj, germanaj kaj litovaj historiistoj malpliiĝis, kvankam litovaj historiistoj klopodas teni la nombron de pogromoj, en kiujn litovoj estis envolvataj, pli malalta. La fazoj de la okupiĝo, prisilentado kaj reinterpretado en la sovetia kaj litova historiografioj estas prilaborataj de: Kohrs 2003 kaj Truska 2003. Laŭ ĝenerala aŭ kutima difino, la teroro kontraŭ litovoj, latvoj kaj estonoj, t.e. ilia deportado dum la stalinisma tempo, ne estas konsiderata kiel genocido(j), kvankam oni devas agnoski, ke la deportado de popoloj sub Stalin portis sendube genocidajn trajtojn aŭ elementojn. (Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Genocido kaj http://lt.wikipedia.org/wiki/Genocidas#Lietuva. Fakte, UN agnoskas nur kelkajn popolmurdojn kiel genocidjn (vd. http://www.voelkermordkonvention.de kaj http://en.wikipedia.org/wiki/Genocide_Convention). Interese estas, ke en la rusa versio de Vikipedio mencio pri genocidoj en SU komplete mankas inter la ekzemploj. Pri ĉi tiu temo vd. ankaŭ: Holocaust und Völkermorde. Die Reichweite des Vergleichs. Eld. laŭ taskigo de Fritz Bauer Instituts de Sybille Steinbacher Frankfurt a.M. 2012 (http://d-nb.info/1022501429/04).

deziro puni litovajn kulpulojn de la holokaŭsto. **Leo Lewinson**, kiu postvivis la holokaŭston, plendis, ke kvindek jarojn post tiu evento oni provis ´vendi´ tiun epizodon de la historio kiel nacian ribelon de la litovoj kontraŭ la sovetia okupacio kaj deklari la banditojn, kiuj tiam furoris kontraŭ la judoj, kiel naciajn heroojn.[8] Por li temas pri skandalo.

Kvankam la kritika pensdirekto do ankoraŭ ne estas ĉie akceptita en la litova popolo, ĝi tamen fariĝas pli kaj pli akceptebla, kaj oficiala. Aliflanke, ekzistas ankaŭ litovaj medioj, en kiuj ne mankas la tendenco de preskaŭ narcisisma bedaŭro, honto kaj senkulpiĝo por trovi la veron en la propra historio.[9]

Do, ni situas jam plene en la tuta problemaro, kiu estos studata en ĉi tiu verkaĵo.

Pri la aktuala situacio en Litovio hodiaŭ koncerne tiun temaron ni revenos fine de ĉi tiu studo. Sed unue ni iomete okupiĝu pri la historio de la judoj en Litovio antaŭ la holokaŭsto por provi pli bone kompreni la eventojn, kiuj poste okazis en tiu lando.

Ĉi tiu studo baziĝas sur la juda memuara literaturo kaj la faka literaturo pri la holokaŭsto en Litovio, lastatempe aperinta ĉefe en la germana kaj angla lingvo (inkluzive de tradukoj el la litova lingvo).

## 1.1. Historia ekskurso: Judoj en Litovujo(-Pollando) (skizo)

Laŭ iuj fontoj, judoj ektroviĝis en Litovujo de la (frua) mezepoko, sed ne estas tute klare de kie ili vere venis. Dovid Katz fiksis ilian unuan dokumentitan ĉeeston en la jaro 997. Abraham Harkavy opiniis, ke la judoj venis el Babilonio (aŭ Mezopotamio aŭ Asirio) aŭ el la Ĥazara Regno, kaj el Hispanujo. Laŭ Simon Dubnov kaj aliaj historiistoj, la judoj migris Litovujen kadre de la Unua Krucmilitiro fine de la 11a jarcento el germanlingva Eŭropo. En la 13a jarcento judoj estis vokitaj el Mezeŭropo al *Pollando*, kie la lokaj regantoj garantiis al ili protekton kontraŭ persekutado. Ĉu la litova grandprinco Gediminas (+1341) invitis ankaŭ judojn por ĉeesti la fondon de Vilno (en 1323), kiel malnova juda legendo rakontas, ne estas dokumentite. Pli sekura estas la versio, laŭ kiu la litova grandprinco *Vytautas Magnus* (pole: Witold Kiejstutowicz, +1430), kuzo de Jogaila, vokis fakulojn el okcidenta Eŭropo, precipe judajn, kun la intenco engaĝi ilin en la konstruado de la litova ŝtateco, precipe rilate la disvolviĝon de ĝia ekonomio. Tiucele, la judoj de diversaj lokoj (kiel ekzemple Brisk/Brest-Litovsk, Trok/Trakai kaj Harodne/Grodno) ricevis privilegiojn, kiuj estis donitaj laŭ la pola modelo de Kalisz (1264).[10] Tiuj privilegioj permesis al la judoj komercadi en la foiroj, en vendejoj kaj sur la stratoj libere kaj egalrajte kun la ceteraj civitanoj. Krom tio, la judoj rajtis ankaŭ akiri, posedi kaj kultivi la agrikulturan teron kaj enkasigi la propran profiton, se ili pagis imposton al la ŝtato. Samtempe, la judoj estis liberigitaj de la devigo pagi impostojn por tombejoj kaj sinagogoj. La juda historiografio emfazis la nekutimajn bonvolon kaj toleremon, kiujn la judoj ĝuis en Litovujo. Iu litova historiisto rimarkigis la interesan cirkonstancon, ke la litovaj grandprincoj estis aparte interesataj pri la judoj, ĉar ili povis preni interezon kontraŭ monpruntado. Ĝuste tion la eklezio malpermesis al la kristanoj. La privilegion posedi teron tamen sekurigis al si precipe la (litovaj kaj polaj) nobeloj, kiuj tute bone scipovis utiligi la servojn de la judoj, kiuj siaflanke komencis funkcii kiel luantoj de iliaj bienoj kaj kiel vendistoj de alkoholaj trinkaĵoj, alia grava privilegio, donita al la judoj en la „Letero de Grodno“, se ankaŭ por tio ili pagis apartan imposton. Poste la judoj ankaŭ administris la doganajn kaj impostajn aferojn de la reĝo. Tiel, la judoj komencis ludi elstaran rolon en Litovujo kun la rezulto, ke oni ne plu povis rezigni pri la rilatoj kaj kunlaboro kun ili.

Ne malmultaj judoj forfuĝis de la pesto, kiu furoris en printempo 1351 en okcidenta Eŭropo. La judoj estis akuzitaj de la kristanoj pro tio, ke ili kulpas pri la eksplodo de tiu epimedio, en kiu pereis unu triono de la tiama loĝantaro de okcidenta Eŭropo. Krom tiu riproĉo, la judoj estis kulpigataj pri la mortigo de Jesuo Kristo, la venenigo de akvoputoj, la praktikado de ritualmurdoj, la profanigo de hostioj kaj suspektataj, ke ili volas transpreni la gvidadon en la mondo.

Intertempe, Litovujo (aŭ la litovoj), konata(j) kiel la plej lasta paganisma lando aŭ popolo de Eŭropo, formale kristaniĝis post la bapto de Jogaila, kiu adoptis la (polan) nomon Władysław II. Jagiełło kaj edziĝis kun Jadwiga, la heredantino de la pola trono. Ĉi tiu bapta kaj nupta procezo, okazinta

[8] Wiehn/Lewinson 2001, p. 34.
[9] Laŭ Ralph Giordano en Bartusevičius/Tauber/Wette 2003, p. 1-4.
[10] En la erao de Vytautas estis loĝigataj ankaŭ la karaoj (aŭ karaimoj), juda sekto uzanta turkidan lingvon, kiu ne agnoskas la talmudon sed nur la toraon. Ankoraŭ nun kara(im)oj vivas en la ĉirkaŭaĵo de Trakai, kie ankaŭ staras la kastelo de la malnovaj litovaj grandprincoj.

en la jaroj 1384-86, samtempe perfektigis la unuiĝon de Litovujo kun Pollando, pri kiu ankaŭ Vytautas, la kuzo de Jogaila, konsentis.

Dekomence, la eklezio ne ŝatis la privilegiadon de la judoj kaj klopodis apartigi ilin de la kristanoj en propraj kvartaloj. Sed la kristanaj komercistoj kaj precipe iuj metiistaj gildoj, kiuj timis la konkurencon de la judoj, ne tro sukcesis malhelpi ilian komercon. Ofte la judoj malobeis la preskribojn de la gildoj kaj malatentis la bojkoton flanke de la kristanoj. Por solvi siajn problemojn de la socia integriĝo ekzistis ankaŭ kazoj, en kiuj judoj konvertiĝis al la kristanismo kaj eĉ povis fariĝi nobeloj, kio estis tre radikala kaj efika formo de asimiliĝo.

La privilegioj kaŭzis, ke ekde la 15a jarcento la alfluo de judoj al Litovujo konsiderinde kreskis, tiel ke ilia nombro baldaŭ atingis 150´000 homojn inter 2-3 milionoj da loĝantoj en la pol-litova regno. Unu kvarono vivis en la Litova Grandprinclando. La jura statuso de la judoj en Litovujo baldaŭ atingis la nivelon de la statuso de la judoj en Pollando, kie ili ĝuis vastajn avantaĝojn kaj liberecojn jam pli longe.

De tempo al tempo, la situacio de la judoj subite malboniĝis, kio povis havi diversajn kaŭzojn. Ekzemple, la skismo en la romkatolika eklezio, kiu okazis en 1378 kaj daŭris ĝis 1417, negative influis la situacion de la judoj. En alia kazo, la emancipiĝantaj burĝoj en la urboj perceptis la judojn kiel konkurentojn kaj opiniis, ke ili nur ĝenas kaj ne estas bezonataj. Kiam en 1453 Kazimiro II. Jagiełło ankoraŭ povis konfirmi la privilegiojn de la judoj, la jaron poste li jam estis devigata limigi ilin pro la premo flanke de la nobelaro kaj pastraro, kiuj ĉefe incitis la etoson kontraŭ la judoj. En 1495 grandprinco Aleksandro, kiu komence daŭrigis la porjudan politikon de sia patro, subite forpelis la judojn el sia regno. Sed la plano voki germanojn anstataŭ judoj en la landon fiaskis. Ĉiukaze, post la morto de Aleksandro, Sigismundo I. (II.) kaj Sigismundo II. (III), liaj posteuloj en la 16a jarcento, baldaŭ revokis la judojn kaj plene restarigis iliajn malnovajn rajtojn, ĉar la reĝoj venis al la konkludo, ke oni ne povas rezigni pri la judoj. En 1529 la judaj privilegioj estis eĉ fiksitaj en la Litova Statuto (landa konstitucio), kaj la judoj denove estis tolerataj. Laŭ la pola modelo kaj kun la aprobo de la litova grandprinco, la judoj sukcesis iom post iom starigi propran komunuman aŭtonomecon (la t.n. kehilan aŭ kahalan sistemon), kiu ebligis al la judoj libere elekti rabenojn kaj komunumestrojn kaj havi superan tribunalon por tuta Litovujo. Malgraŭ la provoj de la pola nobelaro kaj de la katolika eklezio limigi la rajtojn de la judoj, la judoj fortigis sian potencon. Grandan signifon ili havis aparte en la *kehiloj* aŭ *kahaloj,* la aŭtonomeco de la judaj komunumoj, de Brest-Litovsk, Grodno, Pinsko, Vilno kaj Slucko, urboj troviĝantaj en la litovia parto de la komuna ŝtato. Por la mezo de la 16a jarcento oni estimas ĉirkaŭ 3500 judajn grandkomercistojn, kompare kun 300 kristanaj kaj dekmil ´averaĝaj´ komercistoj en la urboj. Precipe en la regadotempo de Sigismundo II. Aŭgusto (1569-72), la kehiloj firmiĝis en tiu grado, ke ĝi estis konsiderata kiel unika en tiu altnivela formo en Eŭropo, precipe Moravujo kaj Hungarujo. Ekde 1551 la kehiloj povis decidi siajn aferojn laŭ la juda juro. Ankaŭ la subteno kaj helpo flanke de la ŝtato estis rimarkindaj. Kiam en 1568 la juda kvartalo de Brest-Litovsk detruiĝis en incendio, la reĝo ordonis ĝian rekonstruadon per ŝtonaj domoj.


Malgraŭ diversflankaj provoj ĝeni la kunekzistadon de la popoloj tamen ŝajnas, ke la judoj ĝenerale vivis en pacaj rilatoj kun la cetera loĝantaro, nur la eklezio klopodis pentri negativan bildon pri la judoj. Meze de la 16a jarcento oni troviĝis en la tempo de la reformacio,[11] kiu estis aparte agreseme kontraŭbatalata de la romkatolika eklezio. En 1559 papo Paŭlo IV. eldonis novan oficialan indekson de malpermesataj libroj, inter kiuj troviĝis ankaŭ la talmudaj skribaĵoj.[12] Por povi persekuti judojn, la eklezio akcelis la kampanjon surbaze de la akuzoj pro ritualaj murdoj kaj hostiaj profanigoj, kiujn oni riproĉis al la judoj. Post kiam judoj estis mortigataj sur la brulŝtiparo, la reĝo ordonis en dekreto, ke ĉiuj akuzoj kontraŭ judoj pro rituala murdo aŭ hostia profanigo devas esti traktataj en la Sejmo. Malgraŭ tiu ordono, tiaj akuzoj ripetiĝis ankaŭ estonte. Per du aliaj dekretoj la reĝo entute malpermesis tiajn akuzojn. La romkatolika eklezio observis la toleremon al la judoj en Pollando kaj Litovujo kun suspekto. Post la vizito de iu papa sendito, de kardinalo Giovanni Francesco Commendoni, en Pollando en 1565, la kurio en Romo ricevis raporton, en kiu oni skribis kun grandaj miro kaj konsterno pri la „amaso da judoj, kiuj tie [t.e. en Litovujo] ne estas malrespektataj kiel [tio estas observebla] kutime en aliaj landoj“, ke ili „tute ne devas porti specialajn simbolojn, kiuj distingas ilin de siaj kristanaj kuncivitanoj“, kaj ke „ili eĉ rajtas porti armilojn“. Oni notis kun perplekseco, ke judoj povas studi medicinon kaj astronomion. Entute, por la raportinto estis malfacile imageble, ke inter la judoj troviĝas ankaŭ decaj kaj seriozaj homoj. Ŝajnas, ke tiu

[11] Kiel konate, Lutero mem estis furioza antisemito.

[12] En 1564 Papo Pio IV. denove permesis la presadon de la Talmudo, kondiĉe ke ĝi ne uzu tiun vorton kaj ne publikigu kontraŭ-kristanajn blasfemojn. En tiu momento la judoj komencis presi la Talmudon sub la titolo Gemarao.


raporto, plenplena de malicaj antaŭjuĝoj kaj malamo kontraŭ la judoj, tiom incitis la ĉagrenon de la papo, ke li postulis, ke la kanonaj reguloj estu pli rigore praktikataj.




Supre: Litovujo kaj Pollando en la 13-15aj kaj 16a jarcentoj. (Mapo el Vikipedio, aŭtoroj Mathiasrex kaj M.K.)
Sube: Litova Grandduklando en la 17a jc.; loĝzono por la judoj. (Fonto: Vikipedio/Vikimedio).




(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

La Lublina Unio de 1569 havis pozitivajn kaj stabiligajn efikojn por la judaro de Pollando-Litovujo, kies teritorio ampleksis vastajn partojn de Blankrusujo, Ukrainujo, Prusujo kaj Latvujo[13], kaj kiu estis nomata de la judoj (kiuj estis nomataj „litvakoj“[14]) Lita aŭ Lite. Ĉar la polaj magnatoj mem ne emis kultivi la teron

---

[13] Mapon vd. sur http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Irp1569.jpg kaj http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Lithuanian_state_in_13-15th_centuries.png.

[14] Fakte, ankaŭ L.L. Zamenhof apartenis al la grupo de la „litvakoj“. Ĉar Zamenhof nomis „Litovujon“ kiel sian historian patrujon, kaj ĉar portempe li vivis en Litovio kaj liaj edzino kaj bogepatroj originis el Kovno, la litova historiografio/propa-

en tiuj orientaj regionoj, ili ludonis al la judoj kompletajn farmbienojn kaj konfidis ilin kun la tuta inventaro al ili, ĉar ili estis respektataj kiel fakuloj pri imposta, dogana kaj financa administradoj. Ĉio tio kaŭzis, ke la judoj pli kaj pli disvastiĝis en la kamparo kaj tro intimiĝis kun la klaso de la supera nobelaro, tiel ke la kristanaj kamparanoj, kiuj vivis kaj laboris sur la teritorio de tiuj bienoj, sentis sin pli kaj pli dependaj, subpremataj kaj ekspluatataj de la *judoj*, kiuj sentis sin bone en sia nova benata lando. Sed tiel longe ke tiu arenda sistemo funkciis, la judoj ne devis timi problemojn, ekzemple forpeladon aŭ persekutadon de ekstere.

La posteulo de Sigmundo Aŭgusto, Stefano Báthory el Transsilvanio, ankoraŭ montris la saman bonvolon rilate al la judoj. Sub la reĝo Sigmundo III. Vasa, kiu regis de 1587 ĝis 1632, furoris la reakcio de la jezuitoj, kies celo estis restarigi la katolikan kredon en la lando. Oftiĝis juraj procesoj kontraŭ judoj pro ritualaj murdoj, kiuj estis utiligataj kiel efika armilo de la jezuitoj por malhelpi la judojn, kiuj ofte finiĝis sur la brulŝtiparo.[15] Aparte sensacia kazo estis la bruligo de du karaoj (aŭ karaimoj), membroj de juda sekto parolantaj turkidan lingvon, en la jaro 1679, post la akuzo pro rituala murdo.[16] Malgraŭ tiuj incidentoj, la organizaj strukturoj de la judoj en Pollando-Litovujo restis stabilaj almenaŭ ĝis la mezo de la 17a jarcento. Grandan signifon ekhavis la juda parlamento, la Vaado, kiu instituciiĝis kiel „Sinodo de la Kvar Landoj“ (hebr. Vaad arba arazot). Speciale dungita reprezentanto de la Vaado ĉeestis la kunsidojn de la Pola Sejmo kun la tasko prezenti la vidpunktojn de la judoj. Eĉ se depost la dua duono de la 17a jarcento la signifo de la vaadoj iom malkreskis, ili ne ĉesis ekzisti ĝis la finiĝo de la pol-litova regno fine de la 18a jarcento.[17] Krom tio, en tiu tempo estis malfermataj la unuaj judaj altlernejoj (t.n. *jeŝivoj*). Tiel, Litovujo fariĝis ankaŭ unu el la ĉefaj centroj de la klera judismo en Eŭropo, kie agadis elstaraj erudiciuloj kiel Salomon Maimon,[18] Saul Wall, Joel Sirkin, Jehoŝua Herŝel, Aaron Ŝmuel Kaidonover kaj aliaj.[19]

Gravan cezuron por la judoj en Pollando-Litovujo formis alia okazaĵo, kiu ne povas ne esti menciita en tiu ĉi kunteksto: temas pri la ribelo de la rutena (ukraina) kozaka hetmano Bohdan Ĥmelnicki (+1657) en Ukrainujo kaj Blankrusujo kontraŭ la respubliko de la polaj-litovaj nobeloj.[20] Ĉi tiu evento estas ankaŭ rimarkinda pro tio, ĉar ĝi estis ligita kun senprecedencaj pogromoj ne nur kontraŭ poloj, romkatolikoj kaj jezuitoj, sed ankaŭ kontraŭ judoj, kiuj estis persekutataj de la kozakoj, ĉar ili estis luantoj kaj dungitoj de la polaj bienposedantoj. En tio rolis la argumento, ke la poloj vendis la ukrainan nacion aŭ teron al la judoj.[21] Post kiam Ĥmelnickij alianciĝis kun la rusoj, komenciĝis milito kontraŭ Pollando, en kiu la judoj ree estis persekutataj ne malpli kruele ol antaŭe. Tiam ekzemple la juda kvartalo de Vilno estis detruita. En la militoj, kiuj furoris dum la 17a jarcento en tiu parto de Eŭropo, la judoj ne ĉiam ludis pasivan rolon, sed ankaŭ batalis kune kun kristanaj civitanoj ekzemple en la defendado de urboj kiel Vitebsko, kiu estis okupata de moskvaj soldatoj. En aliaj kazoj, judoj kaj kristanoj povis ankaŭ kune agi, se tio utilis al

gando, kiu konsideras Bjalistokon, kie Zamenhof naskiĝis, kiel origine litovan urbon, skribis, ke Zamenhof devenis „el Litovio“ (eĉ Eidintas 2003, p. 94). La polaj esperantistoj (kaj la pola propagando) uzurpis la judon Zamenhof kiel polon (kvankam Zamenhof mem rifuzis sian laŭdiran polecon), kaj iuj rusaj historiistoj klopodis deklari Zamenhofon kiel ruson, ĉar li oficiale nomiĝis Lazar´ Markoviĉ kaj estis, kiel ĉiuj aliaj homoj vivantaj en la Ruslanda Imperio, subulo (ne civitano) de la ruslanda caro. Ĉi tiujn problemojn mi detale traktis en mia Zamenhof-libro (Harrassowitz 2010).

[15] Malgraŭ la malpermeso de ritualmurdaj procesoj sub Stefano Báthory, inter 1547 kaj 1787 en Pollando-Litovujo estis publike ekzekutitaj ĝuste pro la akuzo je rituala murdo inter 200 kaj 300 judoj. Caro Aleksandro I. malpermesis akuzojn pro rituala murdo, sed lia posteulo Nikolao I. nuligis tiun malpermeson. (vd. Richter 2013, p. 229).

[16] Richter 2013, p. 233.

[17] En tiu jarcento en la Vaado de Litovujo estis reprezentataj la judaj komunumoj de Brisk/Brest, Horodne/Grodno, Pinsk, Vilne/Vilnius, Smorgon, Navaredok/Novogródek, Minsk, Vidzeme, Zamet/Ĵemaitio kaj Polock.

[18] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Salomon_Maimon.

[19] Aliajn nomojn de famaj judaj intelektuloj de Litovujo vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Category:Lithuanian_Jews.

[20] La milita aktiveco de la kozakoj sub Bohdan Ĥmelnicki kontraŭ Pollando-Litovujo, kiu fondis kvazaŭ-ŝtatan kozakan „hetmanejon“ kaj kiu petis la rusan caron protekti la „rusojn“ de Ukrainio, kondukis al la fama kunveno de Perejaslavo en januaro 1654, dum kiu la kozakoj ĵuris sian fidelecon al la rusa caro Aleksej Miĥajloviĉ. La Traktato de Perejaslavo devigis la caron proklami la militon al Pollando-Litovujo, kio kondukis al la eksplodo de la Rus-Pola milito de 1654-67, kiu finiĝis sukcese por Ruslando. Dum la ukraina historiografio kontestas la juran legitimecon de la Traktato de Perejaslavo kun la argumentoj, ke la kozakoj estis trompataj de la rusoj kaj ke Ruslando transformis Ukrainion en rusan kolonion, la rusa historiografio perceptas kaj gloras ĝin kiel akton de la „reunuiĝo de Ukrainio kun Ruslando“. Jen unu el multaj devioj en ambaŭ historiografioj, kiuj komplete perturbis la rus-ukainajn rilatojn.

[21] Gunnar Heinsohn, fakulo pri etno/genocidoj estimas, ke tiuj masakroj kaŭzis 34´000-42´500 mortviktimojn, laŭ aliaj fontoj nur 16-19000 (http://uk.wikipedia.org/wiki/Хмельниччина), aŭ eĉ ĉ. 100-125´000 (Haumann) kun 300 detruitaj vilaĝoj. Atamuk citas fontojn, kiuj insistas pri 200´000 viktimoj kun 700 koncernitaj vilaĝoj. La ribelo de Hmelnicki estas traktata en la romano „Fajro kaj Glavo“ de Henryk Sienkiewicz, kaj Isaac Bashevis Singer utiligis la masakrojn kontraŭ la judoj dum tiu ribelo en sia romano „Satano en Goraj“.

iliaj komunaj interesoj. Nu, judoj ne estis nur konkurentoj de la kristanoj, sed judoj esence akceladis kun ili la komercon en Litovujo kaj signife kontribuadis al la konstruado de urboj kaj vilaĝoj. Sed post tiuj ŝokaj spertoj la malnova juda civilizo tamen ne plu estis la sama kiel antaŭe. Kvankam laŭnombre la judoj povis reatingi la iaman kvanton (en 1676 vivis denove 32´000 judoj en Litovujo), ilia civilizo pli kaj pli krizis kaj komencis stagni, degeneri kaj disfali. Multaj judoj, precipe rabenoj, forlasis orientan Eŭropon, kie ili kredis sian vivon ne plu sekura, kaj formigris al Aŭstrujo, Germanujo kaj Holando. Komence de la 18a jarcento miloj da judoj pereis en malsakatastrofoj, epidemioj, incendioj kaj militoj. La judfobio prosperis kaj kaŭzis groteskajn incidentojn: En 1749 oni bruligis la grafon Valentin Potocki sur la brulŝtiparo, ĉar li adoptis la judan kredon. La „Sinodo en Medininkai kaj Varniai", kiu okazis en 1752, eldonis dokumenton kun jena teksto, kiu avertis la kristanojn antaŭ la judoj: „Kristano ne devas vivi kun judoj en unu domo; kristano ne lasu sin kuraci de juda kuracisto; kristano ne laboru ĉe judo; kristano ne ludonu teron aŭ domon al judoj; kristanaj virinoj ne dungu judajn vartistinojn kaj ne donu siajn infanojn al judoj por mamnutri ilin."[22] Ĉi tiu malbela regularo certe servis kiel modelo por kontraŭjudaj kampanjoj de postaj tempoj!

Malgraŭ tiuj malfacilaj cirkonstancoj, la juda popolo tamen ne malkreskis. En 1766 oni nombris ankoraŭ 157´000 judojn en la Litova Grandprinclando, de kiuj 27´000 vivis en la vilna vojevodio, 27´000 en Trakai kaj 16´000 en Ĵemaitio. Okcidentaj vojaĝantoj ne ĉesis miri, kiam ili vidis tiujn judajn amasojn en Litovujo. Kiam ekzemple la brito William Coxe vizitis la landon en la 80aj jaroj de la 18a jarcento, li estis perpleksigita konstati, ke judoj okupas praktike ĉiujn ekonomiajn branĉojn kaj ke ili estas absolute ĉie videblaj, ĉu kiel tradukistoj, ĉu kiel trinkejestroj, ĉu kiel kuĉeroj, ĉu kiel poŝtistoj, ĉu kiel komercistoj kaj perantoj, ĉu kiel kamparanoj. Lia vizito de tiu lando postlasis al li la impreson, ke en Litovujo vivas kvazaŭ nur judoj. Fine de la 18a jarcento en Litovujo do vivis 250´000 judoj.

## 1.2. Litoviaj judoj en Ruslando antaŭ kaj post 1795

En Ruslando ĉiam vivis nur relative malmultaj judoj. En sinsekvaj tempoj ili faris diversajn spertojn kun la ŝtato kaj socio, sed ili ankaŭ komprenis, ke ili ne estas tre bonvenaj en la lando de la caroj kaj de la ortodoksa eklezio, kiu rigore penis kontraŭbatali ĉiajn fremdajn influojn. Fakte, en Ruslando parte ekzistis eĉ pli paranoja imago pri la judoj ol en aliaj landoj, kie vivis kvante multe pli da judoj. En Ruslando oni kutimis identigi judojn kun poloj kaj inverse, same kiel oni kredis vidi judojn en la falsaj caridoj, kiuj volis uzurpi la tronon. Do, en Ruslando la judoj signifis ion negativan kaj ili povis esti certaj, ke tie ili ne estos aparte ŝatataj. Efektive, jam sub la caro Ivan IV. (la Terura) en la 16a jarcento, la (relative malmultaj) judoj estis subpremataj kaj persekutataj kaj ilia komercado malpermesata, ĉar la ortodoksa eklezio timis la judan konkurencon. Sub Petro I. (la Granda) judfobio malpli sentiĝis. Nur post kiam la komercistoj de la urbo Riga plendis pri komercaj malavantaĝoj flanke de la judoj, en 1742 carino Elizabeto respondis, ke ŝi ne deziras, ke la „malamikoj de Kristo" faras „malmoralan profiton" kaj eĉ malpermesis al judoj viziti Ruslandon. Ankaŭ Katarino II. en principo ne sentis malamikecon kontraŭ la judoj, ĉar la klerigantoj de tiu epoko en principo ne konis antaŭjuĝojn kontraŭ judoj, al kiuj ili volis ebligi fariĝi bonaj civitanoj de la ŝtato en kiu ili vivas, je la prezo de la asimiliĝo, kiu, aliflanke, praktike signifis la detruon de la juda kulturo. Laŭ la tiamaj imagoj pri la funkciado de la socio, kiujn Katarino II. havis, la judoj estis traktendaj egalrajte kun la urbaj civitanoj (kvankam multaj judoj loĝis en la kamparo). En ŝia tempo la judoj oficiale estis nomataj „hebreoj" (ruse: evrei), dum la popolo nomis ilin, iom pejorative, „ĵidi", kio estis ligata kun konkretaj etnaj kaj naciaj kliŝoj pri la judoj. Do, kvankam ĝuste sub Katarino II. en Ruslando estis instalita sufiĉe progresema reĝimo koncerne la egalrajtecon, emancipiĝon kaj toleremon de la etnaj minoritatoj, pri kiuj aliaj eŭropaj ŝtatoj povis revi, certe ekzistis ankaŭ leĝoj, kiuj samtempe limigis la rajtojn de la judoj.[23]

La glora tempo por la judoj de Pollando kaj Litovujo ŝajne finiĝis, kiam tiu regno estis dividata inter Ruslando, Pruslando kaj Aŭstrujo fine de la 18a jarcento (1772-95). En la tria divido de 1795 praktike la tuta teritorio de Litovujo estis aneksita de Ruslando. La Viena Kongreso (1815) konfirmis la definitivajn limojn. Sur la kerna teritorio de Litovujo estis establitaj la gubernioj de Vilno kaj Slonim, poste estis kreitaj ankaŭ la gubernioj de Kovno, Suvalki kaj Grodno.

Kiam Ruslando aneksis partojn de Pollando kaj Litovujo, estis ´heredita´ ankaŭ la giganta amaso da judoj en tiuj landoj, kaj la situacio draste ŝanĝiĝis por ambaŭ flankoj. La peterburga ŝtatburokratio nomis la regionon, kiu ampleksis tiujn guberniojn, „Nordokcidenta Lando" por eviti la etnajn toponimojn.

[22] Richter 2013, p. 174s.
[23] Haumann, p. 74-78.

Laŭ dekreto de la 21a de decembro 1791 sur la teritorio de la vojevodioj de la iama pol-litova regno estis starigita speciala loĝzono[24] por judoj, kiujn ili ne rajtis forlasi sen permeso de la aŭtoritatoj. Ĉi tiu rimedo estis prenita evidente post kiam moskvaj komercistoj plendis pri la kreskanta juda konkurenco, kiu laŭdire estis malavantaĝo por ili. Sed ĉu la judoj de Pollando kaj Litovujo vere signifis seriozan konkurencon por la moskvaj komercistoj aŭ ĉu la klarigo servis nur kiel preteksto por povi redukti ilian komercan influon ne estas klare. Kiel ajn, la libereco de la cirkulado de personoj estis draste limigata por la diversaj popolgrupoj de Ruslando, precipe en la kazo de la judoj. Kun 2 milionoj da homoj tiu speciala loĝzono estis unu el la plej dense de judoj loĝata regiono en la tuta mondo. La kondiĉojn por loĝi en tiu zono difinis la „Statuto por la judoj“, kiu estis publikigita en la jaro 1804. Tiu statuto konsideris la judojn, kiuj fariĝis subuloj de la ruslanda caro, en principo kiel „damaĝajn elementojn“. Samtempe, oni celis malfermi al la judoj ankaŭ perspektivon por „pliboniĝi“ kaj fariĝi „utilaj“, kion oni intencis atingi per administraj rimedoj. Artikolo 34 postulis de la judoj, ke ili forlasu la vilaĝojn kun la celo eviti iliajn mizeriĝon kaj malriĉiĝon (sic). La ĉefan kialon de la mizeriĝo de la judoj la aŭtoritatoj vidis en la konsumado de alkoholo, kiun la judaj restoraciestroj vendis. En tiu afabla „zorgado“ pri la judoj oni evitis mencii, ke la kaŭzo de la mizeriĝo de la kamparanoj ne estis la judoj, sed la bienestroj, kiuj posedis la alkohol-fabrikojn. Krom tio, oni ankaŭ ne volis konsideri la fakton, ke por la centmiloj da judoj, kiuj vivis en vilaĝoj, tute ne ekzistis loko en la urboj, kien ili devis translokiĝi. La sama leĝo antaŭvidis ankaŭ diversajn aliajn preskribojn por judoj, ekzemple ke ili devas verki siajn komercajn librojn en nejuda lingvo, ke ili ne plu rajtas vestiĝi laŭ la juda maniero k.s. Malgraŭ tio, la Statuto lasis al la judoj la liberecon komerci kaj marĉandi kun la escepto de la alkohola vendado. Se do unuflanke oni malpermesis al la judoj okupiĝi pri agrikulturo en la malnovaj gubernioj, kiel rekompenco la Statuto proponis al ili koloniigi terpecojn en „Nova Ruslando“, regiono proksima de Odeso kaj Ĥersono apud la Nigra Maro. Kvankam kelkmil judoj, ankaŭ el Litovujo, translokiĝis al tiu „Nova Ruslando“, la projekto fiaskis ĉefe pro la teruraj vivkondiĉoj, kiun ili renkontis surloke.[25] Ĉar sekve la judoj ne plu emis translokiĝi tien, reprezentantoj de la judoj el Litovujo penis konvinki la aŭtoritatojn, ke tiu migrado estas sensenca afero. En 1809 caro Aleksandro I. haltigis tiun translokadon kaj nova komisiono venis al la konkludo, ke ne la judoj kulpas pri la alkohola problemo sed la bienestroj mem.


La milito de 1812 kun Napoleono okazis precipe sur la teritorioj de Litovujo kaj Blankrusujo. La judoj montris sin lojalaj al la rusa armeo. En 1823 aperis nova dekreto pri la forigo de la judoj de la vilaĝoj. La situacio por la judoj malboniĝis precipe sub caro Nikolao I., kiu komencis de 1827 perforte kolekti kaj rekrutigi junajn judajn virojn por la armea servo. Ĝis nun judoj estis liberigitaj de la armea deĵoro. La celo de tiu nova administra „pliboniga“ projekto estis perforte rusigi la judojn kaj atingi ilian religian asimiliĝon, do ke ili rezignu pri sia juda religio. Multaj de tiuj judaj „rekrutoj“ pereis, ĉar la tro kruelaj kondiĉoj por fariĝi soldato ne taŭgis por ili. Kun la sama intenco estis fonditaj specialaj ruslingvaj lernejoj por judoj, dum la aŭtonomeco de iliaj komunumoj estis nuligita. Nova regularo de 1835 por la judoj ankoraŭ pli draste limigis iliajn rajtojn en la loĝzono. Laŭ dekreto de 1843, parto de la judoj de la kovna gubernio, kiuj vivis tro proksime de la limo kun Orienta Prusujo, devis forlasi la regionon. De 1844 la judaj lernantoj estis sendataj nur al ruslingvaj lernejoj; en Vilno kaj Ĵitomir oni tamen konservis po unu rabenan seminariejon, sed la kehiloj (judaj komunumoj) estis likviditaj. En 1850 oni malpermesis al la judoj porti la tradiciajn vestaĵojn kaj kombi la hararon laŭ la tradicia maniero. En 1851 sekvis nova kruela leĝo, kiu klasifikis la judojn laŭ 5 kategorioj, esence laŭ „utilaj“ kaj „malutilaj“ personoj. La judoj de la malutila kategorio, kiuj formis la plimulton de la malriĉuloj, preskaŭ tute perdis siajn rajtojn. Fakte, ĉiuj tiuj rimedoj por „plibonigi“ la judojn fiaskis, ĉar la judoj ne povis kaj ne volis ŝanĝi sian tradician vivmanieron, kiu estis influata esence de religiaj kriterioj, sentoj kaj dogmoj. Kiam Aleksandro II., kiu estis konsiderata kiel liberalisma reform-caro, en 1861 nuligis la servutan sistemon en Ruslando, la situacio de la judoj praktike ne ŝanĝiĝis same kiel ĉe milionoj da iamaj servutuloj, kiuj restis malriĉaj aŭ eĉ pli mizeriĝis, kvankam la registaro ŝajne intencis jure egaligi ilin kun la cetera popolo.

Ene de la cara imperio, Litovujo restis ekonomie periferia regiono.[26] Kiam Aleksandro II. traveturis la urbon Kovno, li konfirmis al la judoj ties rajton ekloĝi en tiu ĉi urbo, kun la rezulto, ke en 1864 vivis 16´540 judoj en Kovno, kiu fariĝis la dua centro de la judoj en Litovujo. Kvankam la kategorioj pri „utilaj“ kaj „malutilaj“ homoj estis abolitaj, 2,5 milionoj da judoj daŭre restis lasataj sen la necesaj rajtoj.

[24] Ruslingve: Ĉerta osedlosti, pole: Strefa osiedlenia, germane: Ansied(e)lungsrayon. Mapon de la koncernataj gubernioj vd. sur http://eo.wikipedia.org/wiki/Setla_zono, http://www.geschichteinchronologie.ch/eu/ukraine/EncJud_juden-auf-der-Krim-ENGL.html.
[25] Laŭ Haumann 1998, p. 80-82.
[26] Richter 2013, p. 388.

Ksenofobio kontraŭ judoj disvastiĝis en Ruslando, kaj la nombro de kontraŭjudisme motivataj pogromoj multiĝis sub la kondiĉoj de la kreskanta rusa (sed ankaŭ pola, litova k.a.) naciismo. Kiam Aleksandro II. estis murdita en 1881 de la revoluciuloj de „Narodnaja volja", la liberalisma epoko finiĝis, kaj lia posteulo, Aleksandro III., kiu suspektis judojn (kaj polojn) kiel partoprenantojn en la atenco kontraŭ sia patro, enkondukis rigoran reakcian politikon kontraŭ la etnaj minoritatoj, kiu jure ankoraŭ pli draste limigis la rajtojn de la judoj (fifamaj ĉi-rilate estis la majaj leĝoj de 1882[27]). Ĉio nerusa, neortodoksa kaj kontraŭ-carisma estis brutale subpremata kaj senkompate persekutata.[28] La kontraŭjuda politiko esence estis daŭrigata ankaŭ sub la caro Nikolao II, kiu sekvis Aleksandron III.[29] Ripetaj kontraŭjudaj pogromoj akrigis la situacion de la 5 milionoj da judoj, kiuj vivis en Ruslando, la plimulto en la loĝzono. Do, por solvi la „judan problemon" oni klopodis perforte asimiladi ilin per (tre dubindaj) administraj metodoj, kiujn la judoj ne pretis adopti. La rezulto de tiu politiko estis, ke la integrado de la judoj ĝenerale fiaskis en Ruslando.

Malgraŭ tiuj malfavoraj politikaj cirkonstancoj, en la litovaj vilaĝoj la rilatoj inter judoj kaj nejudoj ĝenerale estis bonaj, ankaŭ pro tio, ĉar la homoj bezonis unu la aliajn kaj helpis unu al la aliaj, dependante de la judoj, sen kiuj la ĉiutaga vivo simple ne estis imagebla. Judoj parolis inter si la jidan sed kun la litovoj la litovan, kun la poloj la polan kaj kun la blankrusoj la blankrusan lingvojn, do almenaŭ lingve ili iusence adaptis sin, pro praktikaj kialoj.[30] Judoj eĉ diversmaniere subtenis la naciliberigan batalon de la litovoj kaj blankrusoj kontraŭ la poligo kaj rusigo kaj evitis partopreni en kontraŭ-litovaj aktivecoj. La litovaj intelektuloj estis interesataj, ke la judoj ne helpu al la ruslandaj regantoj rusigi aŭ poligi la litovan popolon. Do, tiel ekzistis kaj evoluis diversaj naturaj aliancecoj inter tiuj tri popoloj, kiujn la sorto kunforĝis kaj kiuj ankaŭ poste devis esti partneroj en la sendependa litova ŝtato. Kompare kun la ´ŝtata´ antisemitismo en Ruslando, tiu problemo dume apenaŭ ekzistis en la litova lando, kvankam frue ekzistis ankaŭ iuj agresemaj litovaj aktivuloj kaj ideologoj, kiuj opiniis, ke la judoj estas fremdaj al la litova popolo kaj devas malaperi de la lando.[31] Pli multe pri ĉi tiu problemo estos raportite en sekvantaj ĉapitroj.




Divido de Pollando-Litovujo en 1772-1795 (maldekstre) kaj „Kongresa Pollando" ekde 1815 (dekstre); Litovujo fariĝis parto de la Ruslanda Imperio. (Mapoj el Vikipedio, aŭtoroj: John Nennbach kaj sansculotte@despammed.com).
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

## 1.3. Juda kulturo en la Carisma Imperio

En Pollando, Litovujo kaj Ukrainujo malaperis la vivoĝojo de la judoj, kiuj vivis kvazaŭ en giganta internacia geto, aŭ malliberejo, kontrolata de la caristaj aŭtoritatoj. Ili sentis, ke ili perdis sian sekurecon kaj ne sciis kio okazos kun ili en estonteco. Ili komencis mediti pri la veraj kaŭzoj de la puno de dio, kiu

[27] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Majaj_leĝoj.
[28] Atamuk, p. 32-38.
[29] Pri la carisma politiko rilate al la judoj vd. http://www.uni-heidelberg.de/fakultaeten/philosophie/zegk/sog/loewe_publ_download.html kaj la ĉi-rilatan ampleksan libron de la sama aŭtoro.
[30] Atamuk 2000, p. 51-58, p. 71.
[31] Atamuk, p. 70s.


laŭdire trafis ilin surtere. La mistikuloj predikis, ke oni devas konstante pentadi, rezigni pri la surteraj aferoj kaj strikte respekti ĉiujn judajn leĝojn, regulojn kaj principojn. Aliaj atendadis la mesion, kiu kvazaŭ devis fali de la ĉielo, por elkonduki la judojn el la diasporeco. La judoj komprenis, ke la carisma reĝimo celis forigi ilian nacian kaj religian aŭtonomecon, likvidi iliajn komunumojn kaj akceli ilian rusigon, laŭdire por integri ilin en la ruslandan socion. La rusaj politikistoj, kiuj devis okupiĝi en la nomo de la caro pri la „juda demando", nomiĝis Novosil´cev, Speranskij kaj Prestel´. Flanke de la poloj aparte malfavoran pritakson la judoj trovis ĉe homoj kiel Stanisław Staszic, Kajetan Koźmiański kaj Tadeusz Czacki, kiuj celis limigi iliajn rajtojn. Sed ne ĉiuj politikistoj estis kontraŭ la judoj. Ekzemple princo Adam Kazimierz Czartoryski **(**+1823), kiu estis deputito en la pola Sejmo kaj fondinto de la pola komisiono pri nacia edukado, helpis al judaj studentoj kaj protektis ilin kontraŭ persekutoj kaj pogromoj. Sed kiel kondiĉon por la egalrajtigo de la judoj li postulis ilian asimiliĝon. Ekde la komenco de la 19a jarcento, litovaj judoj povis studi medicinon en la vilna universitato. En tiu universitato estis fondita speciala katedro pri historio de la antikva mondo, kun hebrea lingvo kiel lernofako. En Vilno kaj en la vilna universitato troviĝis ankaŭ la plej riĉa kaj valora juda biblioteko de Pollando-Litovujo, nome la fama Straŝun-biblioteko. Tiel, iom post iom aperis nova tavolo de kleraj judoj, kiuj laboris kiel rabenoj, kuracistoj, sciencistoj kaj komercistoj, kiuj parolis ĉefe la polan, rusan kaj germanan lingvojn (kiel Zamenhof).

Se la socia asimilado de la judoj kun la aliaj etnoj ne sukcesis, sur kultur-spirita kampo evoluis des pli rimarkindaj procezoj. Unuflanke, precipe en Podolio kaj Volhinio (Ukrainujo) ekprosperis la interesa kultura fenomeno de la ĥasidismo, kiu estis tre emocia esprimformo de la praktika juda vivo. Aliflanke, en la litova parto de la regno enradikiĝis la „intelekta judismo" de la gaono de Vilno, kiu ĝuis grandegan prestiĝon en Litovujo. La gaono de Vilno, kiu reale nomiĝis **Elijah Ben Salomon Salman** (+1797), estis altnivela erudicia rabeno, kiu preferis kaj rekomendis studi la toraon kaj la talmudon kaj akre kritikis la ĥasidismon kiel pseŭdojudan movadon. Tiel, Vilno, nomata ankaŭ „Litova Jerusalemo", fariĝis la ĉefurbo de la haskalo, la juda kleriga movado, kiu estis iniciatita de Moses Mendelssohn (+1786). Unu el la plej elstaraj disĉiploj de la gaono estis la rabeno Ĥaim ben Isaak (+1821), kiu daŭrigis lian verkon en Blankrusujo kaj famiĝis kiel fondanto de la jeŝivo en Voloŝin. Aliaj jeŝivoj estis konstruataj en Vilno, Radun, Mir, Kovno, Telŝiai, Panevežys. En Litovujo ekzistis ĉ. 2500 judaj religiaj instruistoj, kiuj estis dungataj paralele al aŭ kontraŭ la nejudaj fakoj kaj sciencoj. La plimulto de la judoj restis konservativaj kaj opiniis, ke ne indas transiri al la nova lerneja sistemo de la ruslanda ŝtato.

Gravaj reprezentantoj de la litovia juda haskalo estis ankaŭ grupo de vilnaj „maskiloj", kiuj esence kontribuis al la kreado de nova juda literatura stilo: Mordeĥai Aron Ginzburg (+1846), Abraham Dov Lebensohn (+1878), Ŝmuel Joseph Finn (+1890), Matatjahu Straŝun (+1885), Ichok Aisik Ben-Jakov (+1868), Cvi Hirŝ Katzenellenbogen (+1868), Aisik Mejer Dick (+1893), Ŝloma Salman Salkind (+1868), Miĥa Joseph Lebensohn (+1852), Kalman Sulman (+1899), Jehud Lejb Gordon (+1892), Jehuda-Leib Lewando (+1888), Uri-Cvi Kovner (+1909), Moŝe Lejb Lilienblum (+1910) kaj Abraham Mapu (+1867). Dum Lilienblum fariĝis unu el la aktivuloj de la cionisma movado Ĥoveve Cion kaj aktivis kiel ideologo de la t.n. „Aŭtoemancipiĝo" de Leon Pinsker, Mapu famiĝis kiel la unua juda nereligia romanverkisto. Aliaj verkistoj estis Jakov Dinesohn (+1919) el Zagare, kiu verkis popularajn sentimentalajn judajn romanojn kaj kiu estis amiko de Ichok Lejbuŝ Peretz, kaj Moris Vinĉevski (+1932) el Jonava, kiu fondis la jidan revolucian laboristan poezion. Ĉi tiuj judaj intelektuloj eldonis librojn kaj gazetojn kaj zorgis pri la aperado de nova eldono de la hebrea biblio. En 1860 ekaperis en Vilno la unua juda gazeto *Hakarmel*. Alia signifa jud-hebrea ĵurnalo, kiun la vilnaj judoj legis, nomiĝis *Haŝaĥar* (kiu estis eldonata en Vieno). En 1904/5 aperis la unuaj judaj taggazetoj *HaSman* kaj *De Weker*. La litvakaj haskalanoj ĉefe verkis en la hebrea lingvo, ĉar la jidan lingvon ili principe abomenis. Sed finfine ili komprenis la neceson, ke ili devas skribi ankaŭ en la lingvo, en kiu pensas la amaso de la judoj, se ili volis atingi la popolon mem. Tiel, tiuj verkistoj fariĝis ankaŭ la fondantoj de la nova jida literaturo. En 1836 nur en Vilno vivis pli ol 20´000 judoj kaj ili fariĝis pli kaj pli multaj. Inter 1829 kaj 1833 en Vilno estis eldonitaj 146 libro-volumoj, en la jardeko post 1847 aperis en Vilno 460 judaj libroj. En 1840 ekzistis 10 judaj presejoj en ĉi tiu urbo, kie estis presataj libroj ankaŭ en la pola, germana kaj litova lingvoj. La situacio estis komplikata, kiam kiel reago al la haskalo Israel Salanter (Lipkin, +1883), ortodokse pensanta rabeno de la kovna jeŝivo, lanĉis la etikan-moralan movadon „Mussar". El Litovujo devenis ankaŭ kelkaj artistoj kiel la pentristo Isaak Levitan (+1900) el Kybartai, la skulptistoj Mark Antakolski (+1902) el Vilno, Boris (Boruĥ) Salman Schatz (+1932) el Varniaj, Il´ja Ginzburg (+1939) el Grodno kaj Benjamin Susskin

(+1952) el Panevežys, konata jidlingva teatra aktoro. Ĉiuj tiuj agantoj helpis al la judoj ankaŭ konservi sian kulturon kaj kontraŭstari la rusigajn planojn de la ruslanda registaro.[32]
Priskribante la loĝzonon, kiu ekzistis en formo de giganta internacia geto, oni ne povas ne mencii la siaspecajn formojn de la vivo, kiuj ĝermis kaj evoluis en tiu zono, kaj al kiu apartenis la specifa urba kulturo de la *ŝtetloj*, kun la tipa socia strukturo, kiu estis tiel karakteriza por la aŝkenazaj *Ostjudoj*.[33] Komence de la 20a jarcento, judoj vivis en pli ol 200 urboj kaj ŝtetloj kaj en 360 vilaĝoj de la posta sendependa Litovio.[34]





Litovio dum la carisma periodo: Gubernioj de Vilno, Kovno kaj Suvalki (fonto: Vikipedio).

(Fontoj:http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Lithuania-1867-1914_DE.svg,
http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Kovno_and_Courland_Governorates.jpg
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Litovujo kaj precipe Vilno fariĝis ne nur la centro de la judismo kaj de la judaj kulturo kaj klerigo, sed ankaŭ la centro de la cionismo kaj de la socialisma juda laborista movadoj. La dua kongreso de Ĥoveve Cion okazis en 1887 en Druskininkai. Post la morto de Herzl en 1904, la nova prezidanto de la cionisma mondorganizaĵo fariĝis David Wolffsohn (+1914), kiu naskiĝis en la litova urbeto Darbėnai. Abraham Idelsson (+1927), kiu originis el Viekšniai, apartenis al la plej signifaj funkciuloj de la cionisma organizaĵo de Ruslando, kiu eldonis la organon *Rassvet*. Alia konata funkciulo de la ruslanda cionisma movado nomiĝis Julius Bruckus (+1951), kiu naskiĝis en Palanga kaj en la tempo de la senpendeco estis deputito de la litova parlamento. La protagonisto de la hebrea lingvo en Israelo (ivrito), Elieser Ben-Jehuda (+1922), same devenis el Litovujo. Krom tio, en la Narodniki-medio diversaj marksismaj, socialdemokratiaj kaj laboristaj cirkloj, fondis, en septembro 1897 en Vilno, la „Ĝeneralan Judan Laboristan Unuiĝon en Ruslando kaj Pollando“. Ĉi tiu Unuiĝo (konata kiel „Bund“-o) estis unu el la socialdemokratiaj organizaĵoj, kiuj fondis en 1898 dum la unua kongreso en Minsko la „Rusan Socialdemokratian Laboristan Partion“ (RSDAP). Judoj partoprenis en konspiraj atencoj kontraŭ reprezentantoj de la ŝtataj aŭtoritatoj. Tiel, en 1902 estis mortigita la ĝenerala guberniestro de Vilno. Antaŭ kaj eĉ post 1917 la plimulto de la Bund-istoj evitis la bolŝevikojn de Lenin kaj preferis aliĝi al la socialismaj cionistoj aŭ al la menŝevikoj. Inter la judaj deputitaj de la ruslanda Dumao troviĝis ankaŭ kelkaj litoviaj judoj kiel Ŝmarjahu Levin el Vilno, Leonti Bramsson el Kovno kaj Naftali Fridmann el Panevežys. Ankaŭ la edzo de Rosa Luxemburg, la konata maldekstrulo Leo Jogiĥes (+1919), devenis el Litovujo. Kaj la longa listo de nomoj de signifaj judoj kun litovia origino aŭ fono ankoraŭ ne estas finita.[35]

[32] Atamuk 2000, p. 39-51.
[33] Bibliografiajn rekomendojn pri la historio de la ŝtetla kulturo oni trovas sub: http://www.hagalil.com/galluth/shtetl/au3.htm.
[34] Atamuk 2000, p. 71.
[35] Atamuk 2000, p. 67-76.

### 1.4. La dinamiko de la 19a jarcento: prospero, mizero, diskriminacio kaj elmigrado

Por kompreni la problemojn de la judoj kaj de la antisemitismo sendube estas grave atentigi pri la historia evoluo antaŭ 1918. Eĉ pli konsiderindaj por kompreni tiun historion estis la demografiaj, socipolitikaj kaj sociekonomiaj procezoj, kiujn la judoj alfrontis en la 19a jarcento en la loĝzono. Lige kun la dinamika disvolviĝo de la kapitalismo ankaŭ en la lando de la orienteŭropaj judoj okazis gravaj ŝanĝiĝoj de la ekonomia situacio. Kvankam la plimulto de la judoj laboris en la kamparo, ankaŭ en la urboj ekestis pli kaj pli da kapitalismaj entreprenoj, kaj eĉ judaj gildoj estis fonditaj – en 1813 ekzistis en Vilno ok judaj gildoj de entute 37 gildoj. Post la abolo de la servuteco en 1861 la juda grandburĝaro kreskis, judaj financistoj engaĝiĝis en la konstruado de la fervojo, kiu veturis ankaŭ tra Litovujo. Judaj entreprenistoj starigis industriajn instalaĵojn kiel ekzemple fabrikon por produkti ledon en Ŝiauliai, aŭ sapon en Kovno (kiel la bopatro de L.L. Zamenhof). Kun tio multobliĝis la nombro de laboristoj. Judoj studis en diversaj universitatoj de la Ruslanda Imperio, sed en 1887 la ŝtato enkondukis kvoton por judoj. Malgraŭ la ekonomiaj dinamiko kaj la prospero, kiuj estis akcelataj sub Aleksandro III. (la alia flanko de lia medalo[36]), la plimulto de la judoj restis mizeraj etkomercistoj. Kiam en 1882 la agrikulturo kaj la alkohola vendado por judoj fariĝis malpermesataj, ilia situacio draste malboniĝis. La ekonomia mizero, la politikaj diskriminacioj kaj la ripetaj pogromoj igis la judojn forlasi la landon. Ili amase elmigris al Usono, Sudafriko kaj aliaj okcidentaj ŝtatoj. Ĝis 1897 forveturis el la litovaj gubernioj 55´000 litovoj kaj 40´000 aliaj homoj, precipe judoj, laŭ alia statistiko inter 1896 kaj 1914 elmigris el Litovujo entute 252´000 personoj, inter ili 80% litovoj kaj 13,4% judoj (33´800). En 1897 en Litovujo loĝis 2,77 milionoj da homoj (laŭ alia statistiko 2,69 mln.), inter ili 1´568 mln. litovoj kaj 350´000 (358´401) judoj. 538´719 judoj loĝis en la urboj (95,5%) kompare kun 61´392 litovoj (3,9%). 63´841 judoj loĝis en Vilno, 25´052 en Kovno. Tio signifis 40% judoj de la enloĝantaro por Vilno, 35,3% por Kovno kaj 43,1% (aŭ 43,4%) por la kovna gubernio, kie estis praktike 212´600 judoj, de kiuj 56% (61´694) loĝis en la urboj. La plimulto de la urbaj komercistoj estis judoj (3853 en 1897), nur tre malmultaj estis litovoj (14). En la kovna gubernio, kie intertempe vivis la plimulto de la litovia judaro, la duono de ĉ. 278 fabrikoj apartenis al judoj. Kiel metiistoj laboris 23´500 judoj. En 1897 oni nombris 1,46 mln. da litovaj kamparanoj (93,4%) kompare kun 11´433 judaj (3,2%). Malgraŭ la malpermeso, en la kovna gubernio 3270 judoj laboris en la agrikulturo, kun relative malvasta terspaco kaj malgranda propraĵo, dum la resto estis luata. Siajn produktojn la judoj vendis en la merkatoj de la litoviaj urboj, en Riga kaj Orienta Prusujo.

Sekve al la revolucio de 1905 la judoj ricevis la voĉdonrajton por la parlamentaj balotoj.

Dum la Unua Mondmilito, kiu eksplodis la 1an de aŭgusto 1914 kaj kiu daŭris kvar jarojn, batalis en la diversaj malamikaj armeoj ankaŭ ne malmultaj judoj. En la germana armeo batalis ĉirkaŭ cent mil judoj kiel ´lojalaj germanoj´, de kiuj 78´000 troviĝis ĉe la fronto. 12´000 judoj pagis sian militdeĵoron per la morto.[37] Por komparo: En la rusa armeo batalis ĉirkaŭ 60´000 judaj soldatoj. La rusa armeo ne nur kulpigis la judojn pri kunlaborado kun la germanoj, sed ili estis ankaŭ suspektataj kiel germanaj kaj aŭstraj spionoj (tia akuzo pri spioneco kaj agenteco havas longon tradicion en Ruslando, kiu ĉiam vidis sin ĉirkaŭata nur de malamikoj, fakte ĝis hodiaŭ). En 1915 ĉirkaŭ duonmiliono da judoj estis evakuataj el la juda loĝzono kaj translokataj al la urboj de centra Ruslando, kiuj estis „liberaj de judoj“.[38] 160´000 judoj estis deportataj el la kovna gubernio al Ukrainio kaj Ruslando, kie multaj pereis, dum 70´000 judoj mem fuĝis orienten. En 1916 en Vilno ekzistis ankoraŭ 60´000 judoj, inter ili 22´000 el Kovno.[39]

La leĝoj de la juda loĝzono estis abolitaj nur post la februara revolucio de 1917, kio signifas, ke tiu zono mem malaperis.

---

[36] Dum tiu plumpa aŭtokrata imperiestro, kiu sub la premo de la konservemaj reakciuloj praktike nuligis la komencatajn liberalajn reformojn de sia mortigita patro Aleksandro II., senkompate persekutigis, subpremigis kaj diskriminaciigis etnajn minoritatojn kaj opoziciulojn en la propra lando, li investis multe da forto kaj mono en la akceladon kaj rekonstruadon de la ekonomio, precipe milita, por fari el Ruslando fortan potencon, kiu povus sukcese sin defendi okaze de atako de ekstere. Ĉar dum lia regadotempo ne okazis militoj kaj li mem celis eviti konfliktojn kun aliaj ŝtatoj, Aleksandro II. estis nomata, eble iom tro fanfarone kaj hipokrite, „caro de la paco“ (nu, iujn meritojn tiu en si mem sensignifa personeco ja devis ricevi). Cetere, kiel ŝatanto de la artoj tiu caro ankaŭ subtenis tiun branĉon kaj fondis novajn muzeojn kaj kulturajn instalaĵojn. La regadotempo de tiu caro do estis karakterizata de multaj kontraŭdiroj kaj paradoksoj.

[37] Laŭ http://www.dhm.de/lemo/html/wk1/innenpolitik/judenzaehlung.

[38] Laŭ http://www.antisemitismus.net/geschichte/weltkrieg.htm.

[39] Atamuk 2000, p. 76s. La ciferojn necesus kontroli ĉe D. Katz.

### 1.5. Litovaj-judaj rilatoj kaj la antisemitismo en la 19-20a jarcentoj

Krom okupiĝi pri la nacia emancipiĝo, la litova naciismo sekvis ankaŭ celojn de la socia emancipiĝo, kio influis ankaŭ la rilatojn kun la judoj. En tiu sociemancipiga procezo la litovaj kamparanoj strebis iom post iom mem transpreni la ekonomiajn funkciojn, poziciojn kaj taskojn, kiujn la judoj tradicie plenumis. Tio ne povis okazi sen konfliktoj kaj kontraŭstaroj, kaj kelkaj litovaj naciistoj misutiligis la situacion por verŝi oleon en la fajron per siaj provokaj vidpunktoj. Ekzemple **Vincas Kudirka,** unu el la plej influaj gvidantoj de la litova nacia movado de la 1890aj jaroj, eĉ opiniis, ke la judoj kiel „ekonomiaj perantoj" estas obstaklo por tiu moderniga procezo de la etne litova socio. Kudirka alvokis la litovojn evoluigi la urbojn kaj la komercon kaj subteni la komercajn profesiojn por litovoj. Litovoj estis instigataj bojkoti judajn vendejojn kaj aĉeti nur ĉe litovoj. En tio oni havis la subtenon de la katolika eklezio, kiu iniciatis la konsum-kooperativan movadon, kiu povas esti konsiderata kiel la unua socia manifestiĝo de la ´moderna´ litova naciismo.[40]

La arkitekturo de la litovaj naciismo kaj antisemitismo estis konstruata en kelkaj litovaj gazetoj de la 19a jarcento, kiuj servis al la naciistoj kaj antisemitoj kiel armilo por disvastigi siajn opiniojn kaj celojn. Tiaj kazoj estis ekzemple la gazeto ***Auszra***, (Aŭroro),[41] kiu esprimis sian abomenon pri la judoj en la litoviaj urboj, kaj precipe la gazeto ***Varpas*** (Sonorilo),[42] en kiu Vincas Kudirka polemikis kontraŭ judaj kuracistoj kaj juristoj.[43] Kudirka, kiu devenis el la gubernio Suvalki, mem fariĝis kuracisto, kaj sub la influo de la pola Endecja de Dmowski,[44] de la rusa gazeto *Novoe Vremja* kaj de la franca kaj germana antisemitismo li komencis persone venĝi sin kontraŭ la judoj, kiuj bojkotis lian kuracistan praktikejon en la ŝtetlo Šakiai. En *Varpas,* kiu estis fondita en 1889, eldonata de la societo „Litovio" kaj presata en Orienta Prusujo (Tilsit, Ragnit), Kudirka publikigis proprajn kolumnojn kaj artikolojn de aliaj radikalaj aŭtoroj, kiuj direktis diversajn akuzojn kontraŭ la judoj, ekzemple ke ili ekspluatas la litovan arbaron por ekonomie profiti kaj redukti la vivospacon de la litovoj, ke ili kunlaboras kun la caristaj instancoj (kiuj mem konsideris la judojn kiel „fremdulojn") aŭ ke ilia alta kvoto de naskiĝoj endanĝerigas la litovan etnon. Kudirka proklamis la judojn ĝenerale kiel „malamikojn" de la litova popolo, kalumniis la ŝtetlon kiel „kriman, koruptan kaj malpuran lokon", kiu funkcias laŭ komplete alia logiko ol la kristana litova vilaĝo, kaj enkondukis la nocion de la antisemitismo (lit. antisemitizmas) en la litovan lingvon. Multaj adeptoj de Kudirka utiligis liajn teoriojn tamen sen apliki aŭ koni la nocion de la antisemitismo kaj sen nomi sin mem eksplicite ´antisemitoj´. Kontraŭjudeco ne estis praktikata en la senco de la moderna (rasisma) antisemitismo de la faŝisma periodo, sed ĝi estis grava elemento de la kompleksa procezo de la „emancipiĝo" de la litovaj kamparanoj kaj signifis „progreseman" sintenon.[45]

Kiam la gazeto *Varpas* tendencis al socialdemokratio kaj liberalismo, kelkaj ĝiaj anoj distanciĝis de ĝi kaj fondis en 1896, ĉirkaŭ **Juozas Tumas**, juna radikala katolika pastro, la periodaĵon ***Tėvynės sargas*** (Gardisto de la patrujo). Kiel ĉefan mision la redakcio de tiu katolika naciisma gazeto konsideris ne la defendon de la katolika kredo sed la retorikan batalon kontraŭ la „malamiko", diru la judoj. La gazeto prezentis al la judoj plej diversajn absurdajn riproĉojn, inter kiuj elstaris la agoj de la politika konspirado, kaj avertis la kristanojn, ke ili ne laboru ĉe judoj; la ŝtetloj estis misfamigataj kiel malpuraj, senmoralaj kaj deliktaj (t.e. pekaj) lokoj, kie malhonestaj trinkejestroj kaj mallaboremaj virinoj celas ĉefe enkasigi la monon de la klientoj. *Tėvynės sargas* predikis la malamon inter litovoj kaj judoj kaj senhonte asertis, ke la juda danĝero estas eĉ pli granda ol la danĝVaniaero flanke de la poloj kaj ciganoj. Por averti la kristanojn antaŭ la judoj, la gazeto referencis al kontraŭjuda dokumento,

[40] Pli detale pri tio vd. Richter 2012 kaj Richter 2013, p. 394.
[41] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Aušra.
[42] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Varpas.
[43] Richter 2012, p. 92.
[44] Dmowski asertis interalie, ke la litovoj ne estas sufiĉe maturaj por esti agnoskita kiel „historia nacio".
[45] Detale vd. Richter 2013, p. 125-164. Pri Kudirka vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Vincas_Kudirka. Fone de la anti-semitisma problemo de Litovio estas fakte nekredeble, ke la portreto de Kudirka aperis sur unu el la litovaj bankbiletoj (eldonata en la jaro 2000, vd. http://www.lb.lt/500_litas_issue_2000). Ankaŭ Simonas Daukantas, kiu aperis sur alia litova bankbileto (http://www.lb.lt/100_2007_en), blasfemis pri la judoj, kiujn li nomis „malica malsano" (Richter 2013, p. 108). Krom tio, Jonas Basanaviĉius, kiu estas montrita sur alia litova bankbileto (http://www.lb.lt/50_2003e), estis la fondinto de la naciisma gazeto *Auszra,* kiu publikigis ankaŭ antisemitismajn artikolojn. Nelaste, Motiejus Valančius estis bildigita sur la iama 2-lida bankbileto. Kvankam la litova katolika episkopo Valančius, ano de la senalkohola (bontempla) movado, ne rekte kondamnis la judojn, li almenaŭ avertis la litovajn kamparanojn antaŭ ilia danĝereco, ĉar li suspektis ke ili estas venĝemaj. (Richter 2013, pp. 99-104, 271). Ĉar komence de 2015 la eŭro estis enkondukita en Litovion, tiu serio de naciaj bankbiletoj kun la bildoj de protagonistoj de la litova antisemitismo feliĉe malaperis.

kiu estis eldonata de la „Sinodo en Medininkai kaj Varniaj“ en la jaro 1752, kies tekston mi redonis pli supre en la ĉapitro pri la 18a jarcento.[46]

Kun la celo malgrandigi la influon de la judoj elpaŝis precipe la pastro **Kazimieras Pakalniškis**, kiu simile kiel la menciitaj kolegoj polemikis en sia gazeto ***Žemaičių ir Lietuvos apžvalga*** (Revuo de Ĵemaitio kaj Litovio), kiu orientiĝis laŭ la pola gazeto *Przegląd Katolicki,* kontraŭ la judoj, kiujn li kulpigis pri la degenero de Litovio. Pakalniškis nomis la judojn „malpura kovitaĵo“, misfamigis ilin kiel homojn, kiuj estas aĉe vestataj kaj malbone odoras kaj pledis por ilia bojkotado kaj ekonomia forpuŝado el Litovio, simile kiel faris tion la *Varpas*-anoj. Por li la judoj signifis parazitojn, kiuj preferas fari sinistran ŝtel-komercadon (li enkondukis la vorton „geszeftas“ aŭ „gežeftas“, pl. „geszeftai“ en la litovan lingvon, de kiu estis formita la termino de la „geszeftsmacherius“ laŭ la germana „Geschäftemacher“), ŝatas vendi alkoholon, trompi kaj ekspluati la litovojn.[47]

Analizante la liberalan kaj katolikan gazetarojn de la tempo ĉirkaŭ la jaro 1900, evidentiĝas, ke la ideo forpeli la judojn, kiujn oni ne hezitis nomi „hirudojn“, el Litovio pro ekonomiaj kaŭzoj fariĝis la komuna deziro kaj de liberalaj naciistoj kaj de la katolika pastraro. Laŭ *Tėvynės sargas,* 1904, „estus bone, se la judoj malaperus el Litovio tuj, tiel ke ni litovoj povus pli forte partopreni en la komerco, (...), povus ĉion aĉeti ĉe niaj homoj, ĉion fari sen judaj komercaj perantoj (…).“ Kaj ***Lietuvių laikraštis*** (Litova gazeto) skribis en 1905 samsence: „Ni ne parolis ĉi tie pri ĉiu unuopa abomeninda aktiveco de la judoj, sed ni rememorigas, ke kun tiu ĉi elemento, kiu venis super ni kun la konduto kaj celaro de hirudoj, ni ne tro amike rilatu. Ni ne ĵaluzu la judojn pro ilia libereco – faru ni, por ke ni mem atingu ĝin! (…) Sed la judoj ne elmigros libervole el nia lando, ili ne rezignos pri sia varma loketo ĉi tie. Pro tio ni evitu ilin kiel eble plej ofte kaj klopodu por akiri la komercon en niajn proprajn manojn.“ Ĉi tiujn liniojn verkis la katolika pastro **Juozas Šnapštys-Margalis**,[48] kiu skribis ankaŭ por *Tėvynės sargas.* Laŭ Šnapštys, „ĉiuj litovoj abomenas la judojn“, ĉar ili ne nur damaĝas la litovojn, sed „signifas danĝeron por ĉiuj popoloj“ kaj li alvokis „forpeli tiujn hirudojn“. Kiel reprezentanto de alia opinio, **Pranas Mašiotas**,[49] instruisto kaj aŭtoro de infanlibroj, protestis kontraŭ tiu rigardo al la „juda demando“ kaj malakceptis la juran diskriminacion de la judoj, kiu okazis laŭ li pro la plua ekzistado de la juda loĝzono, kio venenas la kunvivadon de litovoj kaj judoj. Li opiniis, ke la antisemitismo ne devus ludi rolon en la diskuto pri la ekonomia emancipiĝo kaj avertis, ke verŝajne la kondiĉoj de la judaj komercistoj estas pli bonaj ol tiuj de la litovaj. Krom tio, li pledis por la plilarĝigo aŭ prefere likvido de tiu loĝzono. En siaj furiozaj kontraŭrespondoj, Šnapštys nur daŭrigis sian antisemitisman polemikon, nomante la judojn „palestinaj nobeloj“, kiuj sklavigas la litovojn kaj ripetis sian esperon pri la baldaŭa malapero de la judoj el Litovio. Samtempe en *Lietuvių laikraštis* aperis aliaj antisemitismaj artikoloj, kiuj entenis terurajn tiradojn de malamo, kiuj respegulis tipajn kristanajn kontraŭjudajn stereotipojn. Karakterizaj judaj „sorĉaĵoj“ estis listigataj, la trompa sinteno en la juda komerco estis apostrofita kiel sankta devo de la judoj, la akuzo, ke la judoj infektas la litovojn per la ĥolero, emfazata. *Ūkininkas,* la gazeto de la kamparanoj, riproĉis al *Lietuvių laikraštis* funkcii kiel organo de la t.n. Nigra Centularo, la antisemitisma organizaĵo de la caristoj, kaj ke ĝi propagandas la malamon kontraŭ la judoj de Litovio. Pastro Petras Paulius Bulvičius klopodis en ´ekvilibrita´ artikolo por akcenti la ekonomiajn kriteriojn por la sukcesa kunvivado inter litovoj kaj judoj, alvokante rezigni pri la religiaj argumentoj, sed finfine li ripetis en principo la samajn vidpunktojn de Šnapštys kaj avertis la legantojn „protekti sin kontraŭ la judoj, ĉar ili faras malbonon kaj kutimigas nin al la malbono“, ktp. Samtempe li opiniis, ke la forpelado de la judoj ne povus esti alternativo, ĉar la litovoj ankoraŭ ne estas maturaj por transpreni ĉiujn ekonomiajn funkciojn kaj ke ili tro dependas de la judoj. Male, oni devus lerni de la judoj. Ĉi tiuj artikoloj, kiuj enhavis kontraŭdirajn opiniojn, cetere aperis meze dum la diskutado pri la evoluigo de la kooperativaj strukturoj en Litovio, en kiuj la katolikaj pastroj ludis gravan rolon esence por fortigi la litovajn kamparanojn kontraŭ la ekonomia superpezo de la judoj. La liberalisma intelektularo bone komprenis la danĝerecon de la tro forta influo de la katolikaj pastroj en la kooperativisma movado. La plej ekstremisma kundebatanto ŝajnis esti la litova kristandemokrato **Antanas Staugaitis**,[50] kiu defendis la argumentojn de Šnapštys kontraŭ la kritiko de Mašiotas, perceptante la judojn kiel „dirigentojn en la politika koncerto en preskaŭ ĉiuj nacioj“ kaj kiel kaŭzantojn de la Rus-Japana Milito de 1905, pro kio oni devus konsideri la judojn ne nur kiel malamikojn de la kristanoj sed de ĉiuj nacioj. En 1905 eksplodis perforto kontraŭ la judoj ankaŭ en la ŝtetlo Mosėdis

[46] Richter 2013, p. 172-91. Pri la gazeto *Tėvynės sargas* vd. ankaŭ http://lt.wikipedia.org/wiki/Tėvynės_sargas.
[47] Richter 2013, p. 164-72.
[48] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Juozas_Šnapštys-Margalis.
[49] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Pranas_Mašiotas.
[50] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Antanas_Staugaitis.

(nordoriente de Palanga). Pro sia akra kontraŭjuda polemiko estis konataj ankaŭ la katolikaj gazetoj ***Šaltinis*** (Fonto) kaj ***Vienybė*** (Unueco). Dum la unua gazeto estis intime ligata kun la katolika pastra seminariejo en Sejny/Seinai, la dua estis kontrolata de la „Societo de la Sankta Kazimiro", en kiu membris la plimulto de la litovaj pastroj, kaj redaktata unue en Kovno, poste en Vilno. En 1908 *Šaltinis* riproĉis al la judoj, ke ili misuzas la bonanimecon kaj malklerecon de la litovoj, pro kio oni devus kontraŭbatali la judojn ĉefe kadre de la konsum-kooperativoj. Pastro **Juozas Povilas Grajauskas**[51] skribis ekzemple, ke la judoj estas „popolo, kiu elsuĉas la litovojn ĝis kiam ili estas malplenaj, sed al ni ili nenion volas doni". Laŭ li „la tuta komerco estas en la manoj de popolo, kiu estas al ni fremda aŭ malbonintenca". Li firme kredis, ke la konsum-kooperativa movado „parte solvos la judan demandon" de si mem kaj „faligos la komercon" de la judoj, por ke ĝi „transiru al niaj manoj". Dum pastro **Antanas Maliauskas** (kiu depost Kudirka estis la unua, kiu predikis la „modernan antisemitismon") pledis por tio, ke la konsum-kooperativoj devas esti strikte katolikaj, **Povilas Dogelis**[52] pledis por la akcelado de la popola klerigo kaj de la konkurenc-kapablo, ĉar nur tiel oni povus venki la malican agadon de la judoj. En sia analizo de la diferencoj de la trajtoj, Dogelis devis almenaŭ konfesi, ke la judoj laboras pli efike aŭ profesiece kaj estas pli afablaj kun siaj klientoj kompare kun la diletantaj litovaj, kiuj ŝajne nek laboris bone nek zorgis pri tio, ke la aĉetantoj restu kontentaj. La publicisto **Mečislovas Davainis-Silvestraitis**[53] simple opiniis, ke al la litovoj mankas la „ruzeco" de la judaj komercistoj. La ekzisto de litova konsum-kooperativo ne signifis, ke la litovoj aŭtomate aĉetadis tie. En la ŝtetlo Pandėlys (apud Rokiškis), kie vivis 90% judoj, aŭ en Rozalimas, la litovoj preferis aĉeti ĉe la judaj komercistoj, kvankam tie ekzistis ankaŭ tri litovaj butikoj. Iu gazetkorespondisto raportis, ke en Kretinga (1909) li konstatis, ke ĉe la litovaj vendistoj li ne ricevis pli bonajn kaj pli malmultekostajn varojn ol ĉe la judoj. Ankaŭ en aliaj vilaĝoj la litovaj konsum-kooperativoj havis problemon allogi klientojn, ĉar en ili estis malbonaj vendistoj. Ŝajnas ankaŭ, ke la ekzisto de tiaj konsum-kooperativoj malmulte influis la ekonomian situacion de la judaj komercistoj, kies potenco estis evidenta. Kiam la litovaj konsum-kooperativaj vendejoj komencis pli sukcese ekfunkciadi, tuj aperis riproĉoj kontraŭ la judoj, ke ili kontraŭbatalas ilin per maljustaj rimedoj, kvankam estis evidente, ke la judoj tute ne kulpis pri la malsukceso de la kristanaj konsum-kooperativoj.[54]

La inteligencio kritikis la atakojn de la katolikaj pastroj kontraŭ la judoj. Sed en la medioj de la pastroj ekzistis diverĝaj opinioj, kaj la pozicio rilate al la judoj ne estis unueca aŭ homogena. Sed la malnova kredo, predikata ankoraŭ de **Simonas Daukantas**[55] en la mezo de la 19a jarcento, kiu asertis, ke la judoj altrudis al la litovoj, kies lando estis okupata de poloj, rusoj kaj judoj, la konkurenclukton, ankoraŭ aktualis en la konscio de la popolo. Pro tio laŭ li ne ekzistis alternativo al la forpuŝado de la judoj de la komerco, por ke la litovoj povu restarigi la „naturan ordon".[56]

Kvankam la judoj, kiuj estis altgrade segregata socia grupo, ludis nek danĝeran nek signifan rolon kiel faktoro en la litova naciismo, ekzistis aliflanke ankaŭ kelkaj litovaj intelektuloj, kiuj sentis fortan motivacion kunlabori kun la judoj kaj cionistoj, ĉar ili supozis, ke ili posedas kun la judoj konkretan kontraŭ-polan aliancanon. Pli danĝeran minacon la litovoj vidis flanke de la rusa kaj pola kulturoj, sekve la energio investata en la kontraŭstarado de tiuj influoj estis pli granda. Pro tio, la publico de la litova intelektularo de la tempo ĉirkaŭ la jaro 1900 apenaŭ konas antisemitismajn debatojn, krom en la naciismaj gazetoj, kiel supre montrite.La kunlaboro de cionistoj kun litovaj politikistoj klarigas kial en Litovio la kontraŭjuda perforto estis tre malforta kompare kun aliaj partoj de la iama juda zono de okcidenta Ruslando ĝis la frua 20a jarcento. Depende de la difino de tiu nocio dum la tuta 19a jarcento en Litovio okazis ´nur´ deko da pogromoj,[57] dum en la cetera Ruslanda Imperio okazis centoj da atakoj kontraŭ judoj

[51] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Juozas_Povilas_Grajauskas.
[52] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Povilas_Dogelis.
[53] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Mečislovas_Davainis-Silvestraitis.
[54] Richter 2013, p. 313-57, 359-61.
[55] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Simonas_Daukantas.
[56] Richter 2013, p. 387-96.
[57] Dokumentataj estas kontraŭjudaj pogromoj en suda Litovio en 1881/82 kaj en la nordo de la kovna gubernio en somero 1900, precipe en la vilaĝoj Vaškai kaj Pašvitinys kaj aliaj vilaĝoj en la volosto Linkuva kaj apud Joniškis ĉe la limo kun Kurlando. En Zagare nur kiam la guberniestro kaj la kozakoj (!) malaperis, la lokaj vilaĝanoj komencis batadi la judojn. Laŭ ies tiamaj klarigoj en iu kazo ludis rolon la rituala murdo de iu rusortodoksa knabino, kiu subite malaperis. La streĉatan etoson en norda Litovio incitis ankaŭ sensacia kazo de akuzo pro rituala murdo en Vilno; la proceso, kiun Dubnov nomis „ritualmurda dreyfusiado", vekis atenton en la tuta regno. Cetere, iu litova katolika pastro (Justinas Pranaitis) ludis ankaŭ kuriozon rolon en la murdproceso kontraŭ la judo Menaĥem Mendel Beilis en 1913 en Kievo, kiu vekis grandan atenton en la tiama eŭropa gazetaro. Detalojn vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Beilis-Affäre kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Justinas_Pranaitis. Kiel Kudirka, ankaŭ Pranaitis vizitis la pastran seminariejon en Seinai/Sejny. (Vd. Richter 2013, p. 212-35). Sed okazis ankaŭ inversaj kazoj: Kiam en majo 1900 sur la ponto, liganta la malnovan urbon de Kovno kun la parto Aleksotas, la ponta gardisto avertis la promenantajn judojn,

sole dum la revolucio de 1905. Alia kialo estis la malrapida sociekonomia evoluo en la litovaj regionoj, kiuj estis ĉefe agrikulturaj zonoj, kaj la labor-disdivido, kiu tie tradicie bone funkciis inter la diversaj etnoj, restis netuŝata. Ankaŭ la kontraŭ-carisma sinteno de la litovaj naciistoj reduktis la kapablon de dekstrismaj politikaj grupiĝoj mobilizi la popolon kontraŭ la judoj kiel tio povis pli facile okazi en la rusa parto de la cara imperio. Tiu pragmatisma alianco inter la cionismaj judoj kaj litovoj estis daŭrigata ankaŭ dum la unua mondmilito kaj en la sendependa litova ŝtato, kiu fondiĝis en 1918, ĉar oni opiniis, ke sur tiu vojo povos esti atingata pli multe ol se oni kalkulas je la naciisma opcio. Do, la litovoj duoble esperis, ke la alianco kun la judoj povos rekompenci la ĉeeston de la poloj en Vilno kaj ke la judoj elpaŝos sur la internacia scenejo en la intereso de Litovio kaj de la litova nacio. Nur post la anekso de Vilno fare de Pollando en 1923, kiu estis aprobita de la internacia ŝtataro, la neceso de alianco kun la judoj ŝajne malpliiĝis kaj la juda nacia aŭtonomeco povis esti malkonstruata. Certe, tiu evoluo negative surprizis la litoviajn judojn, kiuj reagis kun rezervita sinteno al la nacia litova ŝtateco. Estas vere, ke la judoj ne montris apartan intereson pri la litova kulturo, kiun ili perceptis kiel kamparanecan kulturon ne aparte allogan por ili, kvankam multaj judoj mem estis kamparanoj. Tio certe kontribuis al la malfido inter ambaŭ etnaj grupoj kaj kaŭzis, ke la iama ekvilibro inter ili frakasiĝis.[58]

En 1903, la jaro de la fifama kiŝinjova pogromo, la rusaj aŭtoritatoj estis aparte nervozaj kaj volis eviti, ke en Litovio ripetiĝu simila pogromo kiel en Besarabio. Unu el la rimedoj por malhelpi la ekscitiĝon de la lokaj homoj estis, ke en aparte riskaj tagoj (precipe ĉirkaŭ pasko, kiu kongruis kun la pesaĥ-festo) la aŭtoritatoj simple malpermesis la vendadon de alkoholaj trinkaĵoj.[59]

Granda problemo en Litovio estis la oftaj incendioj, ĉar la domoj estis ligne konstruataj, kio signifis grandan danĝeron por tutaj vilaĝoj kaj urbetoj. Incendioj estis taŭga motivo aŭ ´armilo´ por kulpigi la judojn. Tiel, la onidiro, ke judoj kaŭzis incendion, ludis rolon ankaŭ en la vilaĝo Dusetos en la distrikto Novoaleksandrovsk en la nordoriento de la kovna gubernio. En tiu kvieta lageca loko, de la judoj nomata Dusiat, kie vivis nur ĉirkaŭ 1500 judoj kaj 150 kristanoj, eksplodis pogromo en aprilo, ĉirkaŭ pasko 1905. Post la katolika diservo kamparanoj de la loka kaj najbara vilaĝoj (ĉirkaŭ mil homoj) kolektiĝis kaj komencis ataki judajn domojn por venĝi sin kontraŭ la judoj, kiuj en sia sinagogo ĵuris, ke ili ne kaŭzis la koncernan incendion. Sed tio ne trankviligis la furiozajn kristanojn. Kelkdek judaj domoj estis damaĝataj, okazis pafado kaj unu judo pereis post la perforto farata kontraŭ li. Kelkaj litovoj ja estis arestitaj kaj eĉ kondamnitaj en proceso. Dum la liberala litova gazeto *Vilniaus žinios* longe prisilentis la proceson, la katolika periodaĵo *Lietuvių laikraštis* verŝis oleon en la fajron kaj skribis siajn artikolojn tiel, ke la legantoj kredu, ke nur la judoj povas kulpi pri la incendio en Dusetos, ĉar ili intencis eviti la „emancipiĝon“ kaj la ekonomian sukceson de la litovoj. Samtempe ekzistis ankaŭ kazoj kiam judoj kaj litovoj solidare helpis unu la aliajn estingi incendiojn kaj disponigi necesajn rimedojn kaj varojn. Dokumentojn, kiuj pruvas etnajn kaŭzojn aŭ iun ligon inter incendioj kaj juda kulpo en Litovio aŭ la kovna gubernio, la historiistoj ne povis trovi.[60]

En la serio de kontraŭjuda perforto estas menciindaj ankoraŭ du kazoj de onidiroj pri rita murdo: Temas pri la incidentoj en la ŝtetloj Buivydžiai en marto 1908 kaj en Šiauliai en 1913, kie la morto de kristanaj infanoj estis klarigata per la fifaroj de judoj. En aliaj kazoj de agresemo kontraŭ judoj ludis signifan rolon la ekscesa konsumado de alkoholaĵo, kiel ĝi estis tipe praktikata ankaŭ en la litovaj gubernioj. La rilato inter alkoholaj ekscesoj kaj kontraŭjuda perforto estas pruvita. En tion ne ĉiam nur kristanaj litovaj kamparanoj estis envolvataj sed ekzemple ankaŭ rusaj policistoj aŭ soldatoj kiel en Barstyčiai en 1909. En tiaj okazoj viktimoj ofte fariĝis ankaŭ judaj virinoj, kiuj estis grave vunditaj, mortpafitaj aŭ seksperfortitaj ekzemple de kuĉeroj kiel en Eišiškės (vilna gubernio, suda Litovio).[61]

Ĉar dum jarcentoj inter etnaj litovoj kaj judoj ĝenerale regis paco, diversaj esploristoj serĉis kialojn por la kontraŭjuda sinteno, kiu ne konsistis en la litoveco/judeco aŭ specifa *raso* de popolgrupo sed en aliaj sociaj aŭ socikulturaj faktoroj kiel ekzemple en la ´venĝo´, en iuj ritaj tradicioj kaj en la ekonomia konkurencolukto, kiu eksplodis kadre de la ĝenerala modernigado de la socio. Laŭ Richter, la celaro de la kontraŭjuda perforto en Litovio en tiu periodo, kiu povis enhavi la intencon restarigi la ordon laŭ kristana imago aŭ volo, la humiligon aŭ priŝteladon de la judoj kaj la sinriĉigon, ne povas esti klasifikata kiel intenca perforto de eksplicite antisemitisma movado, ĉar tiam ĝi (ankoraŭ) ne celis la forpeladon aŭ ekstermadon de la judoj, kiel tio

ke ili ne apogu sin sur la parapeton, eksplodis kverelo, dum kiu amasiĝis 50 judoj, kiuj jetis ŝtonojn kontraŭ la kristanoj. (Richter 2013, p. 246s.).

[58] F. Guesnet, D. Staliūnas 2013, p. 19-24.

[59] Richter 2013, p. 248-51.

[60] Richter 2013, p. 267-97.

[61] Richter 2013, p. 297-305.

okazos en pli malfruaj tempoj kiel dum la dua mondmilito.[62] Kontraŭjudismo estis esprimata ankaŭ en la antagonismoj de la konflikto inter tre diversaj sociaj tavoloj, eĉ civilizoj, unuavice la litovaj kamparanoj, la judaj intelektuloj kaj la katolika pastraro, por nomi la ĉefajn agantojn en tiu periodo, kaj nelaste eble ankaŭ kiel reago de la plimulto kontraŭ la malplimulto.[63] Kiel ajn, en tiuspeca scienca debato atribui antisemitismon al la litovoj nur ĉar ili estas litovoj aŭ al la litova naciismo estus tro simple, do konsiderendaj estas aliaj kaŭzoj, cirkonstancoj, aspektoj, mekanismoj kaj pensstrukturoj. Dum iuj aŭtoroj (kiel Christhard Hoffmann) priskribis la antisemitismon kiel tipan fenomenon de la etburĝa okcidenta socio, la sociologoj Horkheimer kaj Adorno malkovris la centran signifon de la kamparo por la historio de la antisemitismo.[64] En pli modernaj studoj aperas la motivo de la ´fremdeco´ aŭ ´alieco´ kiel motivo por agi kontraŭ tiuj, kiuj ne apartenas al ´ni´.

Cetere, 1903 estis ankaŭ la jaro kiam en Ruslando unuafoje aperis en la rusa dekstremisma gazeto *Znamja*[65] (kaj do en la rusa lingvo) la fifamaj „Protokoloj de la Cionaj Saĝuloj“, kiuj estas konsiderataj kiel kontraŭjuda pamfleto, sed ĝi baziĝis sur falsaĵoj. Traktataj estis esence tri temoj: kritiko kontraŭ la liberalismo kaj demokratio, laŭdiraj planoj de la monda judaro transpreni la regadon en la mondo kaj la estonta monda regno de la judoj. La judoj, kies karaktero estis nomata „diabla“, estis kulpigataj, ke ili intence kaŭzas diversajn internaciajn krizojn en la mondo, precipe ekonomiajn. Diversaj akuzoj el la mezepoko estis ripetataj kaj rekonfirmataj. Finfine, la centra ideo de „La protokoloj de la Cionaj Saĝuloj“ estis la averto, ke la judoj kune kun la framasonoj konspire efektivigos siajn danĝerajn planojn kontraŭ la kristanaro. Post la unua mondmilito la „Protokoloj“ trovis internacian disvastiĝon, tiel ke la teksto esence incitis la antisemitisman debaton en Eŭropo.[66]

Krom en ideologiaj-intelektaj-publicaj (t.e. proto-politikaj), religiaj-ekleziaj kaj ekonomiaj sferoj, kontraŭjudaj tendencoj esprimiĝis en Litovio ankaŭ sur la kampo de la popolkultura kreado. Tre popularaj inter litovoj estis la prezentado de diversaj teatraj spektakloj, kies evidenta celo estis moki kaj ridi pri la judoj kaj misfamigi ilin. Por flegi la teatran kulturon estis fondataj specialaj teatraj societoj. Tiuj teatraj prezentaĵoj efektiviĝis kutime kadre de „Litovaj Vesperoj“, dum kiuj oni legis kaj kantis en la litova lingvo. En tiuj teatraĵoj, kiuj okazis en iamaj (?) grenejoj (fojnejoj aŭ pajlejoj), judoj estis montrataj kiel centraj figuroj, jen kiel ruzaj komercistoj, kiuj dependigis de si la malriĉajn kamparanojn, jen kiel ŝercfiguroj, kiuj malbone parolis la jidan lingvon. La aktoroj kutime estis litovoj, kiuj reprezentis la tradicion de la litova karnavalo, se juĝi laŭ la kostumoj kaj maskoj, kiujn ili portis. La unua tiuspeca litova teatraĵo estis *sekrete* prezentita de la juna katolika pastro Juozas Tumas, kiu estis supre menciita, en Naujikai apud Rokiškis en 1893 kaj traktis la aferojn el katolika perspektivo kun la celo instrui, ke la vizito de gastejoj, kiuj estas gvidataj de judoj, negative influas la kristanan moralon. Precipe la intelektularo bone komprenis la didaktikan signifon de la popola teatro. En 1893 Vincas Kudirka anoncis konkurson, en kiu la plej bona litova teatraĵo ricevu premion. Unu el la senditaj teatraj tekstoj prezentis judojn kiel obscenajn sinjorojn, kiuj regas la dekadencan nobelaron kaj la alkoholeman junularon. En longaj dialogoj du judoj mokaĉis pri la kristanoj. Ĝuste ĉi tiu teatraĵo fariĝis unu el la plej popularaj, ´klasikaj´ kaj ofte ludataj en Litovio, kaj ĝi estis eĉ montrita en Sankt-Peterburgo. Sed la litova inteligentularo ne estis tre feliĉa pri tiu evoluo, kion oni ne hezitis diri en la teatra kritiko. Tamen, la skeptiko ne povis bridi la deziron de litovaj aŭtoroj ´pluevoluigi´ ĉi tiun temon. Ĝuste tion faris la verkistino Marija Pečkauskaitė (nomata Šatrijos Ragana, 1877-1930) en 1902, kiu verŝis aldone oleon en la fajron kaj publikigis la tekston sub la titolo „La sankta Kazimiro“, kiu kritikas la laŭdire morale malbonan konduton de la judo Jankel, kiu ne kapablas kontroli sian familion.[67] Fone de la ĝenerale konata legendo pri la rituala murdo, en kiu ofte junaj litovaj virinoj

---

[62] Richter 2013, p. 308-12.
[63] Richter 2013 p. 11, 25.
[64] Richter 2013 p. 11, 23s.
[65] Ĝia eldonisto Pavel Kruŝevan (1860-1909) estis antisemito, kiu estis proksima de la „Nigraj Centuloj“, kiu en 1903 organizis pogromon en Kiŝinjov. En 1904 la pola antisemito Hipolit Lutostański represis parton de la teksto en la pola lingvo. En 1905 sekvis pliaj rusaj eldonoj en Moskvo kaj SPB. En 1911 aperis iu verkaĵo de Sergej Nilus pri la „antikristo“, kiu entenis ankaŭ la „Protokolojn“.
[66] Ĝis 1917 la „Protokoloj“ estis reeldonataj sub diversaj titoloj kaj presataj entute 15´000-foje. Kvankam la teksto estis en Moskvo publike laŭtlegata, ne estas klare kian veran efikon aŭ influon la „Protokoloj“ finfine havis. Kvankam post 1917 la teksto reaktualiĝis en aliaj kuntekstoj, precipe la onta nazio Alfred Rosenberg (el Reval) portis la tekston al okcidenta Eŭropo. Detale pri la cirkonstancoj de ekesto kaj intencoj de la „Protokoloj“ vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Protokoloj_de_cionaj_saĝuloj.
[67] Por ne estigi falsan impreson pri tiu litova verkistino, Pečkauskaitė apartenis al la liberala spektro de la litova inteligencio kaj plurfoje esprimis sin kontraŭ la antisemitismo en la litova katolika pastraro, kiu cetere ne nur polemikis kontraŭ la judoj, sed kiu malŝatis ankaŭ ĉion alian, kio ne estis severe katolika.

ludis rolon kiel viktimoj, ĉi tiu teatraĵo estis bonvena kaj certe ne maltrafis sian efikon. Dum kiam oni ankoraŭ diskutis pri la demando, ĉu ankaŭ judoj rajtas partopreni tiujn „Litovajn Vesperojn“, ŝajnas, ke parto de la ĉeestanta judaro eĉ mem multe amuziĝis pri tiuj spektakloj, en kiuj oni primokis kaj ridindigis la judojn. Skandalon inter la juda spektantaro tamen provokis en 1910 la prezentado de simila teatra spektaklo sub la titolo „La diablo en la kaptilo“ en la urbeto Jurbarkas. La judo, kiu staris en la centro de la teatraĵo, estis prezentita kiel simbolo de lakeo en la servo de la potenculoj, kiuj logas la kamparanojn al alkohola konsumado, celas akapari litovan teron kaj ekspluati ĝian arbaron, do kiu trompas la kamparanojn, kaŭzante ilian financan ruiniĝon, kaj kiu vivas kiel parazito. Do, la „kondamnita judo“ funkciis kiel la diablo por la litovaj kamparanoj. En la dua akto eksplodis akra kverelo inter la judo kaj la litova familio, kiun la judo volis forpeli el la domo. Ĉe tiu ĉi punkto la humursento de la ĉeestintaj judoj tamen atingis la limon de la tolerebla, tiel ke multaj proteste forlasis la teatron antaŭ ĝia fino. Poste, la incidento estis diskutata en la gazetaro. Iu juda leganto de iu ruslingva gazeto aperinta en Kovno plendis pri la „malpuraj antisemitismaj vortoj kaj blasfemoj“. Alia litova leganto replikis, ke la teatraĵo tute ne estas antisemitisma, sed nur „humuraĵo pri niaj malkleraj homoj“. Tria leganto aldonis sian konfirmon, ke la teatraĵo sendube estas „antisemitisma kaj honto por ĉiuj litovoj“ kaj postulis forigi la spektaklon en la programo de la „Litovaj Vesperoj“. En la naciisma gazeto *Viltis* eksplodis abunda diskuto pri la konkludoj, kiuj estas farendaj el tiu skandalo. Dum iuj legantoj opiniis, ke prefere oni evitu tiajn provokojn kaj alimaniere prezentu la tipon de la judo en la teatraĵoj, la ĉefredakcio tamen kredis, ke la bruo ĉirkaŭ tiu afero estas vana; ĝuste ĉar en la socio ili reale ekzistas, tiaj negativaj figuroj ne devus esti prisilentataj. Fakte, la ĉefa problemo de la prezentado de tiuj teatraj spektakloj estis, ke vidis ilin ankaŭ homoj, kiuj ne devintus ilin vidi, nome la judoj mem.[68]

Krom Marija Pečkauskaitė antaŭ la unua mondmilito ankoraŭ aperis la fenomeno de tute interesa grupo de litovaj aŭtorinoj, kiuj foje pli, foje malpli malaprobis la kontraŭjudajn akuzojn faratajn de la intelektuloj kaj pastroj. La virinoj venis de la malalta nobelaro kaj nomiĝis Gabrielė Petkevičaitė-Bitė (1861-1943),[69] Julija Beniuševičiūtė-Žymantienė (nomate Žemaitė, 1845-1921),[70] la fratinoj Sofija Pšibiliauskienė (1867-1926) kaj Marija Lastauskienė (1872-1957) kaj Sofija Kymantaitė-Čiurlionienė (1886-1958). Sen tro entuziasmiĝi pri la judoj mem, tiuj verkistinoj almenaŭ iom interesiĝis pri la juda kulturo, kio estis raraĵo en la tiamaj litovaj intelektulaj medioj. Kvankam tiuj verkistinoj ĉefe dediĉis sin al la problemo de la socia emancipiĝo de la kamparanoj, ili kritikis ankaŭ la ideologian antisemitismon de la pastroj kaj alvokis la publikon ne ĝenerale konsideri la judojn kiel kulpokaprojn. Do, la karaktero de la verkaro de tiu aŭtorina grupo restas kontraŭdira, ĉar la virinoj utiligis ankaŭ negativajn bildojn pri la judoj en siaj verkaĵoj kaj teatraĵoj.[71]

Ŝajnas, ke tiuj ĉitajoj kaj ekzemploj sufiĉas por ilustri kaj kompreni la pensmanieron de tiuj ideologoj, kiuj jam revis pri la tempo, kiam la judoj malaperos de Litovio. Do, la radikala judfobio, la kontraŭjudismo, la antisemitismo, la ksenofobio en Litovio jam havis siajn antaŭhistorion, tradicion, radikojn en la 19a jarcento. Ĉu do oni devas konsideri la judfobion, la kontraŭjudismon, la antisemitismon kiel integrajn elementojn de la litova filozofio, psikologio aŭ kulturo? Kiel ni montris kaj ankoraŭ montros en ĉi tiu studo, precipe la litovaj naciismaj kaj katolikaj cirkloj flegadis kaj sufiĉe nutris ilin, tiel ke oni povas diri, ke en 1941 la grundo por la ´moderna´ antisemitismo ekzistis kaj povis plene fekundiĝi kaj prosperi, por ke la holokaŭsto kontraŭ la judoj povu efektiviĝi. Sed kiel mi supre intencis klarigi, la antisemitismo ne estas sufiĉa aŭ deviga klarigo por la kontraŭjuda sinteno de parto de la litova popolo (dum la germana okupacio ekde 1941) en si mem, kvankam sendube ekzistas interrilatoj inter antisemitismo, (kamparana) katolikismo kaj litova naciismo.

Al la rapida evoluo de la vivo en Litovio en la 19a jarcento la diversaj etnaj grupoj reagis laŭ diversaj manieroj, kaj iliaj interesoj, ideoj, sintenoj kaj kondutoj ne ĉiam kongruis. Tiel, la interesoj de la judoj estis pli ekonomiaj, dum tiuj de la litovoj pli lingvaj kaj kulturaj, kiel Eidintas klarigis la antagonismon inter la diversaj etnoj. Kaj la kulturaj kutimoj kaj la ´mentaleco´ de judoj kaj litovoj simple estis tro diversaj. Por kristanaj litovoj, la religiaj kaj manĝ-kutimoj de la judoj estis ege strangaj kaj ilia kono de la litova lingvo estis nesufiĉa kaj la prononco ege fuŝa. Laŭ Eidintas (kiu citas Ignas Končius), tiu sinteno ne estis direktata kontraŭ la judoj en si mem. (?)[72] Litovoj nomis la judojn pejorative aŭ moke ´žydelis´ (plurale žydeliai´) anstataŭ ´judėjas´, kaj dum festotagoj malbonigis ilin ankaŭ kiel stultulojn – el

[68] Richter 2012, p. 89-114; Richter 2013, p. 191-207.
[69] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Gabrielė_Petkevičaitė-Bitė.
[70] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Žemaitė.
[71] Richter 2013, p. 191-207.
[72] Vd. http://shtetlshkud.com/wp-content/uploads/2011/09/EidintasSummaryFinal.doc.

tio kreskis plej diversaj amuzaj kaj absurdaj anekdotoj pri judoj, kiuj en iuj kazoj eĉ fariĝis parto de la monda literaturo. Do, la situacion en tiama Litovio oni povus eble resumi tiel, ke litovoj kaj judoj, sed ankaŭ poloj kaj rusoj primokis, abomenis kaj evitis unu la aliajn sed tamen kunlaboris kaj komercadis kune, ĉar ili devis. Władysław Bartoszewski dirus, ke homoj de tiuj etnoj, precipe judoj, litovoj kaj poloj, estis „normalaj partneroj en la vivo“. La ekonomia simbiozo inter litovaj kamparanoj kaj judaj komercistoj estis tiom intima, ke ajna ŝanĝiĝo aŭ eĉ detruo de la ´kontrakto´ inter tiuj du popolgrupoj povis havi seriozajn sekvojn. Tiu estis la kutima kunvivado-modelo en tiu regiono orienteŭropa.

## 1.6. La situacio de la judoj en Litovio en la intermilita tempo

En la unua mondmilito Germanio okupadis la litovajn teritoriojn sub la nomo „Ober Ost“. Kuriozaĵo de tiu tempo estas, ke iuj politikistoj celis restarigi la formalan sendependecon de Litovio kiel satelito de la Germana Regno kaj kun princo Wilhelm von Urach, grafo de Württemberg kaj duko de Urach,[73] kiu devis fariĝi reĝo Mindaugas II. Efektive, von Urach estis elektita de la Taryba, la Litova Konsilio, sed la elekto ne estis konfirmita post kiam la germana registaro cedis la plenan suverenecon al Litovio kaj kiam la sama litova instanco nuligis la elekton de la princo.

La 16an de februaro 1918 la sama Taryba proklamis la sendependecon de Litovio. **Antanas Smetona** (1874-1944)[74] fariĝis prezidento, **Augustinas Voldemaras** (1883-1942)[75] fariĝis unua ĉefministro de Litovio.[76] En aŭtuno la cionismaj organizaĵoj de Litovio aprobis la proponon de Taryba kaj sendis reprezentantojn por partopreni en la aktivigo de la Ŝtata Konsilio kaj de la litova registaro. Sed la burĝa respubliko ricevis ĝenan konkurencon flanke de la komunistoj. Tiel, la 16an de decembro 1918 **Vincas Kapsukas**[77] proklamis la Litovan Sovetan Socialisman Respublikon. Sed kompare kun la Litova Ŝtata Konsilio, ĉi tiu iniciato, kiu fiaskis post unu jaro, apenaŭ ĝuis la subtenon de la litova popolo. Maldekstre orientataj judaj cirkloj aktive partoprenis en la revoluciaj eventoj, kaj en la registaro de Kapsukas sidis du judoj, kiuj estis senditaj el Ruslando (Dimanstein kaj Weinstein).

Vilno fariĝis la nepridisputebla centro de Litovio por ĉiuj loĝantoj de la lando. Tamen, post la milito kaj la unua germana okupacio la ekonomio de Litovio estis ruinigita. Post la ŝanĝiĝanta okupacio de Vilno fare de la sovetia kaj pola armeoj, Vilno estis aneksita de Pollando (1922) kaj Kovno fariĝis la nova provizora ĉefurbo de Litovio.

En decembro 1926 en Litovio efektiviĝis armea puĉo, kiu estis organizita de kolonelo Povilas Plechavičius kontraŭ la reganta parlamenta koalicio sub la preteksto eviti komunisman renverson. Smetona estis instalita kiel „savanto de la nacio“. La popolo restis trankvila kaj pasiva.[78]

La litoviaj judoj, kiujn Smetona respektis kiel parton de la litova nacio, ricevis konsiderindan juran-kulturan aŭtonomecon, nekompareblan kun la situacio en aliaj eŭropaj landoj. Ĉar Smetona ne estis antisemito, la judoj agnoskis lin kiel garantianton de la litovia unueco, eĉ subtenis la Smetona-kulton kaj preĝis por li en la sinagogoj.[79] Kiel ĉiu diktatoro, kiu havas du flankojn de la sama medalo, tamen Smetona avertis la naciajn minoritatojn, ke ili konu la limojn de siaj rajtoj kaj evitu formi ŝtaton en la ŝtato. En tio ankaŭ la judoj devis senti sin koncernataj. La antisemitismo ne estis ĥimero kaj plu ekzistis en Litovio kaj estis nutrata de la faŝisma organizaĵo de la „Fera Lupo“, precipe post 1926.

Laŭ William W. Mishell (1918-94), postvivinto de la holokaŭsto en Litovio kaj aŭtoro de la leginda memuarlibro ´Kaddish for Kovno´ (1988),[80] la plej bonaj jaroj por la judoj en la sendependa Litovio estis la jaroj inter 1919 kaj 1922.[81] En la unua memstara litova respubliko establiĝis tute nova situacio por la judoj. La malnova litvaka kulturo degeneris, la socio moderniĝis. Kvankam la judoj subtenis la litovan ŝtatan sendependecon, iuj litovaj historiistoj asertis, ke la judoj ne povas ŝati la ideon de la litova ŝtateco kaj ke ili preferas aparteni al Ruslando. Sed la judoj ripete kontestis tiun ĉi onidiron kaj nemiskompreneble deklaris sian lojalecon al Litovio, neante ankaŭ la preferon de koalicio kun Germanio

[73] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Karl,_Duke_of_Urach.
[74] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Antanas_Smetona.
[75] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Augustinas_Voldemaras.
[76] La liston de la litovaj ĉefministroj dum la sendependeco vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_Premierminister_Litauens.
[77] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Vincas_Mickevičius-Kapsukas.
[78] Radka 2001, p. 110.
[79] Richter 2010, pp. 129s.
[80] Vd. http://www.highbeam.com/doc/1P2-4254253.html.
[8181] Mishell 1988, p. 5.

aŭ Pollando. Kiam Ligo de Nacioj kaj la okcidentaj potencoj diskutis la t.n. Himann-planon, kiu estis apogata de la kristanaj demokratoj kaj kiu antaŭvidis la unuiĝon de Litovio kun Pollando, la juda frakcio en la litova parlamento esprimis sin kontraŭ tiu plano (la 23an de septembro 1921 la litova parlamento rifuzis ĝin). Ĉar dum jarcentoj ili apartenis al Litovio kiel ties integra parto, la judoj estis konvinkataj, ke ili ĝuos almenaŭ kulturan aŭtonomecon en la suverena ŝtato, kiel tio estis antaŭvidata de la Vilna Konferenco de la Litovoj de septembro 1917. Por montri sian lojalecon, judoj partoprenis en la perarmea defendo kaj en la diplomatia servo de la nova ŝtato. En la nomo de Litovio judaj soldatoj, kiuj partoprenis ankaŭ en la aligo de Klaipėda/Memel al Litovio, mortis sur la batalkampo. Gravajn ŝtatajn postenojn okupis elstaraj judaj aktivuloj de tiu periodo kiel Raĥman Raĥmileviĉ, Max Soloveiĉik, Naftali Friedman, Euser Finkelsten, Simon(as) Rozenbaum(as) kaj Abraham Dover Ŝapiro, la ĉefrabeno de Litovio. Ekzistis ankaŭ ministro pri judaj aferoj (unue Vygodskij, poste Solovejĉik el Kovno). Kiam en 1922 la nova litova konstitucio estis akceptita, estis proklamita la egalrajteco de ĉiuj litoviaj ŝtatanoj kaj la aŭtonomeco de la nacimalplimultoj sur la kampoj de la popola klerigo, bonfarto kaj memhelpo. Ĉi tiuj principoj devis esti efektivigataj surbaze de la decidoj de la Versajla Pactraktato kaj garantiataj de Ligo de Nacioj, kiuj prezentis al la novaj ŝtatoj kondiĉojn kaj faris preskribojn rilate la protekton de la etnaj minoritatoj. En la litova delegacio troviĝis ankaŭ la menciita judo Simonas Rozenbaumas, kiu defendis la interesojn de Litovio kaj poste traktis ankaŭ la aferojn de la aŭtonomeco kun la judoj. Judaj deputitoj en la litova sejmo estis 7 (1920-22), 3 (1922-23), 7 (1923-26) kaj 3 (1926-27). La du ĉefaj judaj partioj estis la cionistoj kaj la populisma Popola Partio (Folkspartei). Do la intermilita Litovio fariĝis iusence ankaŭ la meko de la juda politika naciismo (kiel Eidintas skribis, citante la israelan historiiston Ezra Mendelsohn). Laŭ la leĝo de la 4a de marto 1920 la intertempe restarigataj kehiloj (judaj komunumoj) akiris vastajn rajtojn sur la kampoj de la religio, sociaj kaj aliaj aferoj. Post 300-jara interrompo, per la fondo de la Nacia Konsilio de la litoviaj judoj je la 5a de decembro 1920 ankaŭ estis reinstaligita la Vaad-parlamento. Post la subskribita pactraktato kun Sovetunio je la 12a de junio 1920 revenis al Litovio ĉirkaŭ 100´000 judoj. Okaze de la popolnombrado de 1923 la statistiko kalkulis 157´000 judojn en Litovio (laŭ alia fonto 153´700), tio estis 7,6% de la loĝantaro, kiu ampleksis 2 milionojn 30 mil homojn, inter kiuj 1 miliono 700 mil estis litovoj mem. En la grandaj urboj la judoj ampleksis 32,2%, en la malgrandaj urboj 28,7% de la enloĝantoj.[82] 84´000 judoj laboris, laŭ ekonomiaj sektoroj, jene: 34,6% en la komerco kaj monpruntado, 30% en la servado, 21,6% rilatis al la industrio kaj metio, 6% al la agrikulturo, 5% ampleksis liberajn profesiojn (precipe inĝenierojn, juristojn, kuracistojn kaj pedagogojn), kaj 2,8% de la judoj laboris en la transportado. De tiuj 41´000 estis posedantoj, 16´000 laboristoj kaj 4380 dungitoj. Krom ĉirkaŭ 300 sinagogoj (kun 160 rabenoj en 1928 kaj 220 en 1940) en Litovio ekzistis diversaj judaj teatroj, ne malmultaj muzikistoj kaj aliaj kulturaj aktivuloj estis judoj. La litoviaj judoj aktive partoprenis ankaŭ en la oficialaj festotagoj de Litovio. Iuj politike maldekstre orientataj judoj apogis la malgrandan Komunisman Partion, kiu estis malpermesita. Sed grandparto de la judoj estis piaj religiaj homoj, kiuj ne partoprenis en la moderna socia aŭ politika vivo. Atamuk konkludis la karakteron de la juda ekzistado en Litovio per jenaj frazoj: „Ĝenerale oni devas pozitive pritaksi la judan vivon en la litova respubliko. Sed fone de la historia procezo ĉi tiu vivado ŝajnas esti kontraŭdira kaj ekzistis danĝeraj tendencoj, kiuj komence ankoraŭ estis en la mallumo, sed poste dolore determinis la judan sorton.“[83]

Pri la lingva demando: Fakte, la jida kaj hebrea lingvoj kreis du diversajn judajn kulturojn, kiuj estis antagonismaj, havante en principo malsamajn fontojn aŭ radikojn. Ĉar la litova naciismo baziĝis sur lingva fundamento, la konflikto inter la etnaj litovoj kaj la litoviaj judoj havis esence ankaŭ lingvan komponanton. La lingvo estas la plej forta identigilo de popolo. En la litovaj urboj malgranda tavolo de judoj, plejparte membroj de la litova meza socia tavolo, ja parolis la litovan lingvon. Sed la plej multaj judoj parolis nur la jidan lingvon. Se ili scipovis duan lingvon, tiam ĝi estis la pola aŭ rusa. Sed multaj judoj sufiĉe bone parolis kaj komprenis la litovan por aranĝi sian komercon kun la kamparanoj. Krom religiaj kaj kulturaj, do ĝuste ankaŭ pro lingvaj kialoj en principo ekzistis malmultaj ligoj inter litovaj judoj kaj la anaro, kiu konsistigis la litovan nacion. Tamen, en la intermilita Litovio la nombro de judoj, kiuj scipovis la litovan lingvon, konstante kreskis, precipe inter la junularo, kiuj lernis la litovan lingvon en la lernejo aŭ pere de deviga lingvokurso. Multaj judaj viroj lernis la litovan lingvon ankaŭ dum sia deĵoro en la litova armeo. Krom tio, ekzistis judoj, kiuj estis ardaj litovaj patriotoj (kaj organizataj en aparta asocio).[84]

---

[82] Ukmergė 37%, Panevežys 36%, Kaunas 27%, Šiauliai 25%. En 1937, 42,7% de ĉiuj kuracistoj en Litovio estis judoj. En la vilna universitato judajn studentojn konsistigis en 1923 342, en 1929 1070, en 1932 1209. Poste la nombro de judaj studentoj draste reduktiĝis. En Kovno ekzistis katedro pri semidologio. Pluraj judoj instruis kiel profesoroj.
[83] Atamuk 2000, p. 77-92.
[84] Laŭ MacQueen 1999, p. 18.

Pri la integriĝo de la judoj Eidintas formulis en sia libro la koncernan alineon jene: „Asimiliĝo fariĝis granda problemo por la judoj post la reinstalado de la litova nacia ŝtato. Krom la demando kian lingvon judoj parolu, ĉu la jidan aŭ hebrean, kaj kiu lingvo estu uzata por la instruado en judaj lernejoj, aperis ankaŭ la demando kiun lingvon oni parolu kun ne-judoj. Nu, antaŭ la unua mondmilito la vilnaj judoj povis elekti paroli ĉu pole aŭ litove, aŭ sub la kondiĉoj de la rusa administrado, ruse. Certe, la demando estis pli akademieca, ĉar en la urboj poloj kaj judoj formis la plimulton. Sed se la judoj parolas pole, ĉu tio ne ofendas la litovojn, kaj se ili parolas litove, ĉu tiam la poloj ne sentas sin ofendataj? Nur unu opcio estis klara – la judoj devis lerni la lokan lingvon kiel eble plej bone.“[85]

La oficiala litova reago al tiu nesolvita dilemo sekvis en la jaro 1935. Smetona kvazaŭ perdis la paciencon kun la judoj kaj riproĉis al ili, dum januara kunveno de Tautininkai, per drastaj vortoj, ke ili „ne sufiĉe respektas la nacian lingvon de Litovio“, ke „ili ne sufiĉe lernis ĝin kiel eble plej necese“ kaj ke „ili kutimas uzi la lingvon de unu el niaj najbaroj“, sen eksplicite mencii la polojn, rusojn aŭ germanojn, kaj, fine, ke tiu praktiko signifas „malavantaĝon por la plimulto de la enloĝantoj“. La judoj rifuzis la akuzojn de Smetona, distanciĝis de lia filipiko kaj argumentis, ke la junularo parolas la litovan lingvon flue kaj ke 90% de la litoviaj judoj scipovas paroli ĝin.[86]

Laŭ Eidintas, en la intermilita tempo specialaj konfliktoj inter litovaj kaj judaj intelektuloj aŭ inter homoj de sendependaj profesioj ne estis rimarkeblaj, sed male, ekzistis klopodoj kunigi kolegojn de similaj profesioj kaj personaroj.[87]



Gravaj litovaj politikistoj: Antanas Smetona, Antanas Merkys, Justas Paleckis[88] kaj Vincas Kreve-Mickevičius
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

La agresemo kontraŭ judoj estis speciale sentebla en Kovno, provizora litova ĉefurbo de la intermilita periodo, kiu fariĝos la bastiono de la sovaĝa antisemitismo, senbrida persekutado kaj „fina solvo“ de la litovjaj judoj. En februaro 1923 en Kovno multegaj ŝildoj kun hebreaj literoj estis ŝmirataj per gudro. Komence de aŭgusto 1929 okazis en Kovno la „Slobodkaj ekscesoj“. Dum anoncita manifestacio okaze de la Kontraŭ-milita Tago la kovna polico arestis 81 personojn, inter ili 76 judojn, de kiuj 26 estis denove liberigitaj. Ĉar la polico timis la venĝon de la komunistoj, ĝi kontroladis la urbon kune kun la anoj de la faŝima batalgrupo „Fera Lupo“ (litovlingve Geležinis vilkas), kiu estis fondita en 1927 kiel speco de sekreta unuiĝo.[89] Komence ĝi estis komandata de kolonelo Antanas Gaušas, kiu servis al Voldemaras por

[85] Eidintas 2003, p. 71. Prof. Alfonsas Eidintas (nask. 1952) estas profesia historiisto (1969-93 en la departemento/instituto de historio de LT) kaj de 1993 estas ankaŭ litova diplomato. Lian ampleksan kaj sendube seriozan libron (Vilnius 2003, angla traduko) pri la holokaŭsto en Litovio mi legis post kiam mi tralegis la tutan alian literaturon, kiun mi utiligis por ĉi tiu studo. Por pli forte konsideri la ´litovan vidpunkton´ aŭ sintenon, kies intenco ŝajnas al mi konsisti en la klopodo redukti aŭ relativigi la litovan kulpecon kaj klarigi la konduton de litovoj dum la milito kaj starigi iun ekvilibron inter la diversaj naciaj vidpunktoj, mi abunde referencis al la libro de Eidintas.
[86] Eidintas 2003, p. 89.
[87] Eidintas 2003, p. 94.
[88] Fonto: http://kibirkstis.blogspot.ch/2017/07/justas-paleckis-kalba-lietuvos-liaudies.html.
[89] Pri la origino kaj la legendo vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Iron_Wolf_(character) kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Eiserner_Wolf.

sekurigi lian potencon. Eidintas komparis la „Feran Lupon“ kun la nazigermana SA aŭ SS.[90] Por la radikalaj litovaj naciistoj la „litovigo“ de la lando iris tro malrapide, kaj do estis postulate realigi ĝin ene de kvin jaroj. Finfine Voldemaras, kiu iam prezentis sin kiel amikon de la judoj, estis devigita kondamni la pogromojn kaj postuli la arestadon de la batalantoj de la „Fera Lupo“.[91] En la proceso, kiu okazis kontraŭ la Feraj Lupanoj en majo 1932, la akuzitoj asertis, ke ili ne persekutis judojn sed komunistojn (inter kiuj estis nemalmultaj judoj). Dum kelkaj akuzitoj estis liberigitaj, aliaj ricevis malliberejan punon. La „Slobodkaj ekcesoj“ montris, ke la Feraj Lupanoj kun siaj pogromaj agadoj kontraŭ la judoj povis esperi je la apogo de la litovaj polico, gazetaro kaj justico. Aliflanke, la procezo dokumentas, ke la ŝtataj instancoj ne estis pretaj toleri antisemitisman perforton. Sed la relative mildaj punoj de kelkaj monatoj da arestado en prizono ilustras ankaŭ, ke la simpatioj verŝajne troviĝis en principo ĉe la litovaj perfortuloj anstataŭ ĉe la judaj kuncivitanoj. La litova sinteno estis ambivalenta. Unuflanke, la litovaj aŭtoritatoj ordonis persekuti ĉian kontraŭjudan agreson, aliflanke ili postulis pli forte kontroli judajn organizaĵojn, en kiuj oni supozis komunismajn influojn kaj subfosadon. Smetona en principo ne estis antisemito (same kiel ankaŭ Piłsudski kaj Päts ne estis antisemitoj, aK),[92] kaj li avertis publike pri la malboneco de la rasaj teorioj de la germanaj nacisocialistoj. Jam en 1933 Smetona eksplicite distanciĝis dum la konferenco de sia partio de la „fantastika rasteorio“ de la nacisocialistoj, en kiu li klare vidis la „eksterman politikon“. En 1935 li ripetis sian vidpunkton per jena klarigo: „Ne la unueco sed la diverseco estas la progreso de la kulturo. (…) La rasismo celas elimini ĝin, ĉion gluti kaj anstataŭigi per dresado.“ Ĉiuspecan raspolitikon, eĉ nur subpremadon de naciaj minoritatoj, li strikte rifuzis. Tiel longe ke la minoritatoj montriĝis lojalaj rilate al la ŝtato, li permesis al ili liberan kulturan disvolviĝon kaj ne vidis ilin kiel fremdulojn sed kiel civitanojn de la ŝtato. Ankaŭ kiam lia konservema partio de la Unio de litovaj naciistoj (Tautininkai) montris kontraŭjudajn tendencojn, Smetona kondamnis tiun sintenon.[93] Do, en la 30aj jaroj, dank´al la prezidenteco de Smetona ne ekzistis ŝtata toleremo por antisemitisma amasmovado en Litovio. Kun Voldemaras kiel prezidento, la ŝtata antisemitismo verŝajne estintus pli forta, kompareble kun la situacio en Pollando (post Piłsudski) kaj precipe en Rumanio (Antonescu), Hungario (Horthy), Kroatio (Pavelić) kaj Slovakio (Tiso), kiuj estis regataj de radikalaj antisemitoj.[94] Pro tio la radikalaj dekstruloj ripete kritikis la litovan ŝtatestron pro lia tolerema politiko rilate al la judoj kaj nomis lin „reĝo de la judoj“. Ekzistis antisemitisme motivataj incidentoj en la interna politiko de Litovio, sed entute Litovio de Smetona oficiale ne estis antisemitisma ŝtato, kvankam en la politika praktiko la rajtoj de la etnaj malplimultoj estis lezataj (aŭ ne sufiĉe respektataj). Sub la preteksto de la manko de papero oni fermis diversajn gazetojn de etnaj minoritatoj, ankaŭ de la judoj. Samtempe oni favoris la gazetaron de la germanoj, kvankam en 1940 ili montris sin mallojalaj al Litovio. La judoj postulis la adopton de paragrafo en la konstitucio, laŭ kiu neniu rajtas esti diskriminaciata rilate la religian aŭ etnan apartenecon.

Malgraŭ tiuj principaj rajtoj por etnaj malplimultoj, nur malmultaj judaj oficistoj laboris en ŝtataj instancoj, kvazaŭ ekzistis iu „neskribita leĝo“ pri tio. En 1934 ekzistis nur 477 judoj de 35´200 ŝtataj oficistoj en Litovio, inkluzive de la komunumoj kaj de la 290 instruistoj en judaj lernejoj, do tio estis nur 1,35 procento. En Kovno, kie la judoj konsistigis unu trionon de la loĝantaro kaj pagis la duonon de la impostoj, en 1936 laboris nur 11 judoj kiel urbaj oficistoj de entute 800 postenuloj. En la centraj administraj instancoj de la prezidento, ministraro kaj ŝtata konsilio mem evidente laboris neniu judo. En la ministerio pri defendo laboris entute 9 judoj, el 1800 dungitoj, en la ministerio pri internaj aferoj 5 (de 5600). Sed tiu minora statuso koncernis praktike ĉiujn etnajn minoritatojn: En 1940 oni kalkulis en renkontiĝo de 2545 ŝtataj oficistoj nur 24 judojn, 21 polojn, 9 rusojn, 2 germanojn kaj 5 aliajn de 2545 ŝtataj oficistoj.

Tiel, la ekstrema litova antisemitismo formiĝis kvazaŭ opozicie al la reĝimo de Smetona en la 30aj jaroj, precipe en la tempo de la diktaturo inter 1927 kaj 1940. Sed en tiu periodo la identigo de la judoj kun la t.n. komunismo, kiu okazis nur en 1940/41, ankoraŭ ne ludis centran rolon. Kune kun la fortigo de la litova naciisma propagando estis kaŭzate, ke la liberalaj ideoj, kiuj maturiĝis en la unua tempo de la sendependeco, perdigis pli kaj pli. Smetona, kiu laŭ la juraj tradicioj de Litovio ne distingis etnojn kaj

---

[90] Eidintas 2003, p. 252.
[91] Aparte radikala patriotisma-naciisma grupiĝo kun antisemitismaj tendencoj estis la t.n. Voldemaranoj, vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Voldemarininkai.
[92] Kvankam en la gazeto *Viltis* de la jaro 1911 Smetona, kiu estis proksima de la katolika eklezio, esprimis klare naciisman pozicion, almenaŭ en la demando pri la konsum-kooperativoj. Li opiniis, ke la judaj komerc-*perantoj* damaĝas al la litova nacio, ĉar ili faras la litovajn kamparanojn ekonomie dependaj de si (la judoj „prenas de ni ĉion, kion ili povas, sed ili nenion redonas al ni.“).
[93] Kohrs 2012. pp. 279, 289.
[94] Donskis 1997, p. 23.

rasojn, deklaris la nelitovojn kiel civitanojn. Malgraŭ la proklamita etna toleremo, la diktaturo de Smetona aplikis moralon, kiu ŝajnis klare kontraŭjuda, almenaŭ en la ekonomio. Tial, naciismo kaj antisemtismo formis en tiu periodo la du flankojn de la sama medalo.

Malgraŭ tiu oficiala toleromo, kun la tempopaso evidentiĝis, ke la reĝimo de Smetona aplikis malrapidan forpuŝadon de la judoj el la ekonomio, dum la dekstrismaj radikalaj naciistoj celis akceli la litovigon. En la politiko de Litovio do kunpuŝiĝis ĉiam pli forte kaj ofte la dekstra konservativismo kun la volkisma ekstrem-dekstremismo en ´antagonisma harmonio´. Ĉi tiu politika etoso influis praktike ĉiujn sferojn de la vivo en la lando, ne nur la internan politikon, sed ankaŭ la eksteran politikon kaj la ekonomion kaj preskaŭ krevigis la landon, kiu pli kaj pli perdis la demokratiajn kaj liberalismajn valorojn.[95]

Kiel Mishell ankaŭ memoris, judoj devis subite trapasi ekzamenojn por povi konservi sian legitiman rajton komercadi, kio estis ruza metodo por helpi, ke la judoj perdu tiun rajton. Analogaĵo okazis ĉe la disdono de rajtoj por praktiki la profesion de advokato. Por la medicina ekzameno validis la ´numerus clausus´, kaj en la lernejoj kaj universitatoj ekzistis antisemitismaj profesoroj, kiuj rilatis sufiĉe malafable al la judoj,[96] do tre simile kiel en la Vejmara Respubliko.

Fakte, jam antaŭ la armea puĉo de 1926, kiu firmigis la potencon de Smetona kiel popola aŭ nacia gvidanto (lit. tautos vadas), la rajtoj kaj liberecoj por la nacimalplimultoj, precipe por la judoj, kiuj estis preskribitaj en la konstitucio laŭ la internaciaj devigoj, estis reduktitaj. La monda ekonomia krizo fine de la 20aj jaroj akrigis la ekonomian situacion de la lando, kiu estis malriĉega, kaj speciale de la judoj. La nova ekonomia litova konkurenco strebadis limigi la agadliberecon de la judoj. Pro la ŝtata ekonomia politiko en la 30aj jaroj prosperis precipe la monopolismaj ŝtatkooperativoj kaj akciaj societoj, kiuj posedis la grandparton de la agrikulturaj produktado kaj distribuado. Por la judoj tiuj sektoroj estis nealireblaj, same la vendado de agrikulturaj maŝinoj. La regantaj tavoloj de Litovio estis interesataj prosperigi la pure litovajn komercajn mediojn, al kiuj ili helpis atingi la pintajn poziciojn en la komerco kaj industrio, kun la celo „litovigi“ ankaŭ la urbojn. En tiu senco estis manipulataj kaj influataj la legislativo kaj ekzekutivo, la registaro, la ŝtata banko, la imposta sistemo kaj la ŝtataj subvenciaj programoj. De kreditoj kaj kapital-investoj povis profiti unuavice litovaj komercistoj, kaj la ŝtata financa ekonomio estis aranĝata laŭ protektiismaj metodoj. Tiel, oni povis pli kaj pli forigi la judojn el la ekonomiaj pozicioj, kiuj devis serĉi novajn branĉojn, kiujn ili trovis sur la kampoj de la teksa kaj guma fabrikadoj, de la konstrumaterialoj kaj en la transporta sektoro. En la reformo de la tero la judoj ricevis nur malmultajn pecojn. En iuj antisemitismaj litovaj gazetoj (kiel *Tevu zeme,* Lando de la patroj) oni asertis, ke mankas la fido al judaj entreprenistoj kaj ke voki la judojn en Litovion estis eraro farita de grandprinco Vytautas. La etoso akriĝis, kiam en junio 1936 en Kovno iu juna litova laboristo mortpafis sian judan dunganton. Kiel reago, dum lia enterigo kelkmil homoj protestadis surstrate kontraŭ la registaro, sekvate de plurtaga striko. Antisemitismaj ekscesoj tamen dume ne okazis. Sekve al tiuj okazaĵoj miloj da judoj, kiuj ne plu sentis sin sekuraj, forlasis Litovion kaj forveturis al Sudafriko aŭ Palestino. La ŝtata sekureca servo de Litovio rekomendis „subteni kaj akceli la elmigradon de la judoj.“[97] Adolf Eichmann (kiu en la baltaj landoj ludis nenian rolon) salutas!

La cenzuro, kiu estis enkondukita en 1934, malpermesis ĉiujn politikajn partiojn krom tiu de Smetona, ĉirkaŭ kiu estis praktikata ne malgranda persona kulto.[98] En la litova parlamento de 1936 ne plu ekzistis naciaj malplimultoj, kaj en la nova konstitucio de 1938 forestis paragrafoj pri nacimalplimultoj, sekve mankis ankaŭ la judoj, kies partioj estis malpermesitaj. Prezidento Smetona, kiu formale fariĝis diktatoro, subpremis la opozicion: Jam en 1935 li malpermesis la partiojn de la kristandemokratoj, de la socialdemokratoj kaj de „Laudininkai“, inkluzive de la junularaj organizaĵoj de tiuj partioj. Pluraj politikaj, ekonomiaj kaj juraj skandaloj akrigis la situacion en la ŝtato. Tiel, en Litovio anstataŭ demokratiaj valoroj, kiuj estis diskreditataj kaj atakataj, oni preferis adori la valorojn de la naciismo, dekstremismo, rasismo kaj antisemitismo laŭ la modelo de la politiko en Italio[99] kaj precipe Germanio.[100]

---

[95] Dieckmann 2012, p. 203-10.

[96] Mishell 1988, p. 5s.

[97] Atamuk 2000, p. 94-98.

[98] Pri la evoluo de tiu kulto vd. Richter 2010.

[99] Laŭ Eidintas, la faŝisma ideo mem enpentris en Litovion el Italio. (Vd. Eidintas 2003, p. 80). Li devas scii ĝin, ĉar li verkis dikan libron pri Smetona (kiun mi ne legis, ĉar ĝi estas verkita en la litova lingvo).

[100] Laŭ Dieckmann 2011, p. 125-137. Ankoraŭ la 31an de julio 1941 iu litova gazeto diskreditis la demokration per jenaj klarigoj: „Kio estas demokratio? La demokratio estas la senrespondeca komunumo de ĉiuj riĉaj judoj de la mondo. Kaj nenio alia! La vorto en si mem estas nobla, la ideo belega, sed la tuta malfeliĉo konsistas en tio, ke la monda judaro subjugis ĝin al siaj celoj: Transformi la tutan homaron al sklavoj servantaj al ĝi.“ (Vd. Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 647).

Kiam en 1938 Litovio festis sian 20-jaran jubileon, oni fanfarone laŭdegis sin mem kaj fieris pri la atingoj de la litova ŝtato. Rilate la judojn, la ŝtatestroj montris belan mienon en malbela ludo. En sia jubilea parolado en la parlamento Smetona emfazis la meritojn de la judoj (kaj de aliaj nacimalplimultoj), kiujn ili havis laŭ li por la solvado de la problemoj de la konstruado de la litova ŝtato, kaj certigis al ili respekton kaj protekton ankaŭ en estonteco. Kaj li kritikis la agreseman politikon de Hitler.[101] Ankaŭ la armeestro **Stasys Raštikis**[102] neis ĉian antagonismon inter litovoj kaj judoj kaj laŭdis la fidelecon kaj popularecon de la judaj soldatoj.[103] La ministro pri internaj aferoj, generalo Julius Caplikas, anoncis, ke multaj judoj ricevis altajn distingojn por siaj meritoj por la ŝtato.

Dum unuflanke la ŝtatestroj laŭdis la kontribuon de la judoj en alta tono, la Asocio de litovaj entreprenistoj kaj ĝia organo ***Verslas*** (kiu aperis kun eldonkvanto de dek mil ekzempleroj) daŭrigis siajn parolatakojn kontraŭ la judoj. Sub la slogano „Litovio al la litovoj!“ estis organizataj kampanjoj, kies celo estis forigi la judojn el la ekonomiaj pozicioj kaj alvoki ilin al elmigrado. Precipe la junaj meztavolaj entreprenistoj celis elŝalti la judojn el la litovia ekonomio, ĉar ili konsideris ilin kiel konkurentojn. Laŭ ili, ankaŭ la ekonomio devis esti „litovigata“. La batalo de la radikal-dekstraj aliancanoj de Litovio kontraŭ judoj, poloj kaj komunistoj fariĝis populara movado kaj subtenata de vastaj popolaj tavoloj, precipe de la nova ambicia generacio de litovoj, kiuj celis la radikalan litovigon de la ŝtato, socio kaj kulturo malfavore al la etnaj malplimultoj kaj postulis de la ŝtataj instancoj preni efikajn administrajn rimedojn kontraŭ la judoj. Unu el tiuj rimedoj estis, ke la litova ŝtato fondis siajn proprajn entreprenojn kun la sekvo, ke judoj estis forpuŝataj el la importa kaj eksporta komercoj. Tra la gazeto ***Apžvalga*** (Revuo), kiu aperis en la litova lingvo, la judoj reagis al tiuj faroj kun plendo kaj la argumento, ke ankaŭ ili rajtas vivi kaj labori. Tiel, la kunvivado de litovoj kaj judoj, kiu malgraŭ konkurencado evoluis ĝenerale en relativa paco, ricevis senteblajn perturbojn. **Antanas Merkys**, urbestro de Kovno kaj estonta ĉefministro kaj prezidento de Litovio (1939-40),[104] kaj aliaj ministroj kritikis la antisemitisimajn ideojn prezentatajn de *Verslas*.[105]

Sub la influo de la rasteorio de la germana nacisocialismo iuj litovaj „sciencistoj“ komencis konstrui novan antisemitisman teorion. En la gazeto ***Jaunoji Romuva*** (Juna Romuva) **Antanas Maceina**,[106] influa filozofo, esprimis la vidpunkton, ke la litova ŝtato ne eltenas miksaĵon de diversaj popoloj, ke oni ne devus egale trakti la naciajn malplimultojn kaj ke ilia partopreno en la kultura vivo de Litovio estas nedezirata. **Stanislovas Tarvydas**, alia simila intelektulo, opiniis, ke la nacimalplimultoj estas fremda elemento en la nacia ŝtato, kiuj ne kapablas integriĝi en ĝian organismon kaj konkludis, ke estus pli bone, se tiuj fremduloj formigrus. Certe, tiuj du litovoj, kies opinioj trovis vastan aprobon inter la entreprenistaro kaj en ekstremismaj medioj, celis ataki precipe la judojn, sed ankaŭ la germanojn kaj polojn. Laŭ Atamuk tiuj antisemitismaj kaj ksenofobaj ideologoj tute forgesis, ke kaj litovoj kaj judoj havis komunajn ekonomiajn interesojn. Nur rilate la disdividon de konkretaj ekonomiaj funkcioj iliaj interesoj diverĝis.

Krom la supre menciitaj filozofoj-polemikuloj aparte elstaris **Jonas Noreika**,[107] kiu ludos gravan rolon sub la germana reĝimo. Ankaŭ **Jonas Aleksa**,[108] profesoro pri juro, publikigis kontraŭjudajn pamfletojn kun sufiĉe perfida enhavo. Tiel, danĝera por la judoj do ne estis unuavice la reĝimo de Smetona aŭ li mem, sed la litova meza tavolo, plus iuj ŝtatoficistoj, pli junaj soldatoj, iuj naciismaj scienistoj kaj filozofoj, studentoj kaj memstaraj profesiuloj, ĉe kiuj la antisemitismo radikaliĝis en la 30aj jaroj. Same la katolika eklezio vigle partoprenis la misfamigon de la judoj, utiligante la malnovajn metodojn de sia akuzado pro ritualaj murdoj ĉe infanoj (Eidintas menciis kelkajn kazojn). La katolika eklezio ne hezitis disvastigi antisemitismajn kliŝojn kaj avertis pri la interproksimiĝo de judoj kaj komunistoj, kiun oni konsideris nedezirinda. Unuopaj katolikaj predikantoj elpuŝis verajn antisemitismajn histeriojn. Tiel, la eklezio klopodis rilatigi pornografion, alkoholismon kaj malbonan moralon al judaj aktivecoj kaj postulis

---

[101] Kiel Eidintas 2003, p. 218, klarigas, Smetona dubis pri la bonvolemo de la germanoj koncerne la litovan sendependecon kaj konsideris la ribelon iniciatita de la germanoj. Škirpa klopodis konvinki Smetonan pri la politiko de Hitler, sed Smetona rifuzis ĝin kaj li ankaŭ ne delegis Škirpan kiel ĉefministron de la Provizora Registaro. Fakte, Smetona timis, ke la germanoj intencas fari la saman kun Litovio kiel kun Slovakio, kiu fariĝis germana vasalo.
[102] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Stasys_Raštikis.
[103] En siaj memuaroj Raštikis pretendis, ke li helpis al la judoj en tio, ke li iris al von Pohl kaj petis ĉesigi la agadojn kontraŭ la judoj. (Vd. Atamuk 2000, p. 169).
[104] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Antanas_Merkys.
[105] La ekonomiajn aspektojn de tiu periodo Eidintas 2003 traktis en aparta ĉapitro sur pp. 95-110.
[106] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Antanas_Maceina.
[107] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Jonas_Noreika.
[108] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Jonas_Aleksa.

instali apartajn zonojn por judoj en la banejo de Palanga, por eviti, ke la judoj malpurigu la plaĝon. Sed ekzistis ankaŭ tiaj, kiuj pledis por la harmonia kunvivado inter litovoj kaj la minoritatoj, kiel antaŭ ĉio ekzemple Smetona mem.

Judoj estis kritikataj, ĉar ili ne laboris fizike, praktikadis kreditan uzurpadon kaj malhonestan vendadon, ĉar ili aĉetis varojn malmultekoste kaj vendis ilin kontraŭ multe tro alta prezo. Oni akuzis ilin ne nur pro ritualmurdoj kaj monopolismo sed ankaŭ pro vandalismo. En socio kiel tia estis la litova, plenplena de superstiĉa kaj antaŭjuĝoj, tio certe faciligis la malfavoran taksadon pri tiu homgrupo. Multaj junaj judoj ne plu eltenis tiun maltoleremon kaj elmigris – ekzemple al Meksiko. Post la akaparo de la potenco fare de Hitler en 1933, okazis nova ondo de juda elmigrado el Litovio.[109]

Estas evidente, ke la disvastiĝo de la antisemitisma propagando signife kreskis fine de la 30aj jaroj en Litovio. En diversaj litovaj urboj flugfolioj estis disdonataj interalie fare de la anoj de la unuiĝo „Lietuva" aŭ de la „Unuiĝo de la kristanaj laboristoj", en kiuj oni alvokis batali kontraŭ la judoj kaj postulis ilian forpelon de la lando. En decembro 1938 studentoj de la kovna universitato protestis kun antisemitismaj sloganoj kontraŭ Smetona. Precipe la „Unio de litovaj naciistoj" (Tautininkai) atentigis pri tio, ke laŭ ilia opinio la judoj ĝuas tro grandan toleron flanke de la ŝtato. La adeptoj de Voldemaras eĉ klopodis puĉi kontraŭ Smetona. Kvankam la antisemitismaj agadoj dume ne atingis la nivelon de la kontraŭjudaj pogromoj dum la carisma tempo, la agresemo de la radikalaj dekstruloj estis klare sentebla. Krom la disdonado de flugfolioj oni ankaŭ frakasis la fenestrojn de judaj vendejoj kaj sinagogoj kaj disŝmiris la ŝildojn kun hebreaj literoj, kiel tio okazis en Germanio. Ŝajnas, ke la polico ne aplikis neŭtralan sintenon, sed eĉ postulis la akrigon de la kontraŭjuda politiko. La ŝtato bagateligis la incidentojn. Kiam en junio 1939 en la urbeto Leipalingis estis frakasitaj la fenestroj de 22 judaj domoj kaj de la loka sinagogo, la duonoficiala gazeto ***Lietuvos aidas*** (Litova eĥo) klasifikis tiun ĉi eventon kiel „kverelon kun loka signifo". Dume, la antisemitismaj tendencoj fortiĝis en Kovno. En aŭtuno 1939 naciismemaj studentoj de la kovna universitato, kiuj organizis kontraŭjudajn agadojn jam antaŭe, postulis, ke dum la prelegoj la judoj sidu sur apartaj benkoj. Profesoro **Stasys Salkauskis**, la rektoro, la 1an de novembro 1939 donis gazetaran komunikon, laŭ kiu li emfazis, ke la komplika juda demando signifas specialan defion por la spirita kaj socia edukado. Sed li bedaŭris, ke grupo de studentoj lanĉis agresemajn antisemitismajn aktivecojn. Laŭ lia opinio, la agresema antisemitismo ne estas bona por popolo, en kies nomo ĝi estas realigata. Sekve, la rektoro rifuzis permesi en sia universitato la ekzistadon de apartigitaj benkoj por judaj studentoj kun la argumento, ke tio signifus ne nur humiligon por parto de la studentaro, sed estus ankaŭ damaĝo por la digno kaj honoro de la kovna universitato.[110] Malgraŭ tiuj malbelaj incidentoj okazis ankaŭ komunaj aranĝoj de la litov-juda amikeco, kiuj estis bone vizitataj. La juda gazeto *Apžvalga* esprimis la esperon, ke la tensioj en la litov-judaj rilatoj malaperos. Dum precipe la politikaj partioj konsistis ĉefe el etnaj litovoj, en Litovio ekzistis en 1939 220 judaj organizaĵoj, inter ili 80 asocioj por reciproka helpo, 42 kulturaj, 15 ideologiaj kaj 14 religiaj. Aperis ok judaj taggazetoj, tri semajnaj ĵurnaloj, tri aliaj periodaĵoj kun eldonkvanto de entute 44´000, 7´900 kaj 3´800 ekzempleroj.

Dume, en Eŭropo la politika evoluo fariĝis maltrankvila. En 1938 Hitler aneksis Aŭstrion kaj la Sudetan Landon. Pollando devigis Litovion akcepti diplomatiajn rilatojn kun Varsovio, sen solvi la vilnan demandon. En 1939 Germanio okupadis Ĉeĥo-Slovakion kaj la Memellandon. La kulmino de la serio de maltrankviligaj eventoj estis atingita, kiam Germanio kaj Sovetunio subskribis en aŭgusto 1939 la traktaton pri reciproka neatakado – pri la du aldonaj sekretaj traktatoj la publiko kompreneble eksciis nenion. Ĉiuj tiuj okazaĵoj altgrade emociigis la ´atomiĝintan´ litovan socion, kaj la opoziciaj fortoj aranĝis diversajn patriotismajn manifestaciojn. Laŭ Truska, tiuj kvin eventoj okazintaj fine de la 1930-ja jaroj – kapitulaco antaŭ Pollando en printempo 1928, antaŭ Germanio en printempo 1939, okupacio de la Memellando fare de la germana armeo en marto 1939 kaj de Vilno kaj ties regiono fare de la Ruĝa Armeo en septembro 1939 kaj la permeso al sovetiaj garnizonoj en oktobro, la fuĝo de prezidento Smetona kaj lia anstataŭigo per Merkys kaj Paleckis, kiuj helpis la novajn sovetiajn mastrojn, kaj finfine la perdo de la ŝtata suvereneco kaj duobla okupacio – esence kaŭzis kaj konstruis la miton pri la kulpo de la judoj.[111] Laŭ prof. Römeris, ĉi tiuj kapitulacoj signifis la komencon de la malintegriĝo de la litova nacio, kiu ĵus trapasis periodon de heroismo. La gigantaj humiligo kaj frustracio de la litovoj kaŭze de tiuj sinsekvaj katastrofoj devis esti iel

[109] Eidintas 2003, pp. 82, 87.
[110] Atamuk 2000, p. 104-26.
[111] Truska ĉe Levinson 2006, p. 364.

kanalizataj, kaj la judoj ideale servis al la litovoj unu fojon pli en la historio kiel kulpokapro. Cetere, neniu juda institucio de Litovio tiam esprimis aŭ kontraŭ-litovan aŭ por-sovetian deklaron.[112]

La 1an de septembro 1939 do eksplodis la Dua Mondmilito per la agreso de Germanio kontraŭ Pollando. Ankaŭ Vilno estis okupata de la germanoj. La litova registaro proklamis sian neŭtralecon, sed la sendependeco de Litovio estis en danĝero, ĉar Germanio kaj Sovetunio intencis dividi la baltajn ŝtatojn inter si. Sed unue, en oktobro, Litovio rericevis Vilnon, kio estis kialo por granda festo, en kiu partoprenis ankaŭ judoj, kiuj plene bonvenigis tiun eventon. En 1939 en Vilno loĝis ĉirkaŭ 60´000 judoj, kio egalis al 27,9% de la loĝantaro, kaj en la vilna regiono loĝis eĉ 75´000 judoj (15%). La urboj Vilno, Kovno, Marijampolė kaj Vilkaviškis akceptis judojn, kiuj estis persekutataj en Pollando, kiu jam estis okupata de la germanoj. Post la enmarŝado de la litova armeo en Vilnon estis efektivigata rigora litovigo de la urba vivo, kio estis ligata kun kontraŭjudaj agadoj, kiuj estis apogataj ankaŭ de ŝovinismaj poloj. Sed en Vilno jam atendis ankaŭ la agentoj de la sovetiaj sekretaj servoj. Ankaŭ ili ne hezitis ĉikani la judojn, arestante plurajn signifajn personecojn de la juda vivo, inter ili la aktivulojn de la mondfama YIVO-instituto, krom tio ĵurnalistojn kaj Bund-istojn. Max Weinreich, la YIVO-direktoro, sukcesis fuĝi al Usono. Malgraŭ tiu streĉata situacio, kadre de YIVO tamen povis okazi jubilea konferenco honore al la juda verkisto Jichok Leibuŝ Perec (1852-1915), pro kio speciale vojaĝis el Riga al Vilno Simon Dubnov, kiu estis konsiderata kiel ´patriarko ´de la juda historiografio,. Sed tiu ĉi aranĝo ŝajne signifis la cignan kanton de la instituto, pri kiu oni finfine decidis, ke ĝi plene translokiĝu al Novjorko, pro la malstabila situacio en orienta Eŭropo.

Fine de ĉi tiu ĉapitro ni legu la karakterizon de du litoviaj judoj, kiuj postvivis la holokaŭston.

**Leo Lewinson**, kiu pasigis sian infanaĝon en la ŝtetlo Nemokŝt (lit. Nemakščiai, distrikto Raseiniai), skribis pri la evoluo de la judfobio en Litovio en la tempo inter la militoj jenon: „La epoko, pri kiu ni parolas ĉi tie, estis en Litovio relative trankvila. Ne ekzistis grandaj ekscesoj aŭ pogromoj kontraŭ la judoj. Nu okazis, ke dum foiraj tagoj iu ebria kamparano frakasis vitrojn ĉe juda domo, aŭ dum ordinara labortago iu grupo de senhontaj sovaĝuloj prikraĉis judajn junulojn. Tio estis ĉiutagaj okazaĵoj, kiuj ne provokis grandan eksciton. Nur kiam en Germanio Hitler ricevis la povon kaj kiam komenciĝis la unuaj kontraŭjudaj tumultoj, kreskis ankaŭ la antisemitismo en najbara Pollando, kaj la etoso en Litovio malboniĝis por la judoj. Oni sentis la malamikecon kontraŭ la judoj en ĉiuj okazoj, sed pli grandaj ekscesoj tamen ne okazis, ĉar la registaro sciis, ke Litovio estas politike kaj ekonomie dependa de la grandpotencoj, unuavice de Usono, kaj persekuti la judojn signifus proksimume la samon kiel provoki Usonon mem. Per diversaj metodoj ´de supre´ oni klopodis bremsi la antisemitisman etoson en la litovia socio. Tipa estis la eldiro de la tiama litova prezidento Antanas Smetona: „Se vi donas sur la ĉefa strato de Kovno (…) al iu judo vangofrapon, oni krios en la Fifth Avenue de Novjorko!“ Ekzistis forte antisemitisma etoso, sed oni evitis praktikajn sekvojn de tiu etoso. En judaj komunumoj oni efektive maltrankviliĝis pri tio, sed tio ne tro influis la ĉiutagan vivon. La judoj en Litovio, ĉu en pli grandaj urboj, ĉu en pli malgrandaj lokoj, estis okupataj pri zorgoj pri la entretenado de sia vivo kaj interesataj pri siaj sociaj aferoj. (…)“

Pri la malharmonieco inter la judoj la aŭtoro raportis:

„Preskaŭ la tuta junularo estis cionisme orientata. Cionismajn ideojn enplantis en nin la instruistoj en la lernejoj, sed unueco ne ekzistis. Siatempe oni mokis ne sen kialo: „Kiom da judoj, tiom da cionismaj organizaĵoj, ekzemple ´Poalei-Cion´, ´Dekstruloj´ kaj `Maldekstruloj´, ´Reviziistoj´de Jabotinski kaj de Grossman, ´Ĝeneralaj cionistoj, ´Hasomer Hazair´, ´Misraĥi´ kaj multaj aliaj. Ĉiu organizaĵo predikis siajn ideojn kaj klopodis pruvi, ke ĝia vojo konstrui en ´Erec Israelo´ (en la tiama Palestino) judan hejmon estas la sole prava. Oni renkontiĝis en cionismaj societoj ne nur por kanti kaj danci, sed oni parolis kaj diskutis verve. Sed malofte oni povis konvinki sian politikan kontraŭulon. Unu luktis kontraŭ la alia, la mensoj ekscitiĝis, kaj politika kontraŭulo povis transformiĝi ofte al persona malamiko – ĝis kiam aperis danĝero por la tuta juda popolo. Tiam ĉiuj estis tuj unuanimaj! (…).“[113]

Alia atestanto de la tiama tempo, **Zev Birger**,[114] memoris la judajn-litovajn rilatojn en la intermilita tempo en Kovno per jena atentinda karakterizo pri la antisemitismaj trajtoj de la tiama litova socio:

---

[112] Truska ĉe Levinson 2006, p. 365.

[113] Lewinson, p. 16-18.

[114] Zev Birger, naskita en 1962 en Kovno, kiu ankoraŭ travivis la KC Dachau/Kaufering, fariĝis en Israelo, kien li elmigris post la milito, grava ŝtata funkciulo, unue kiel kunfondanto de la oficejo pri doganoj kaj impostoj. Poste li kunlaboris kun la tiama urbestro de Jeruslaemo, Teddy Kollek, kaj fariĝis direktoro de la internacia jerusalema librofoiro. En siaj memuaroj li rakontis, ke li estis tiel ŝokita kaj naŭzata pri la kontraŭjuda sinteno de la litovoj dum la germana okupacio, tiel ke post la milito li efektive perdis la kapablon paroli en la litova lingvo, kiun li iam regis senakĉente. (vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Zev_Birger,

„La juda komunumo en Kovno tiam estis granda, kaj vigla komunuma vivo markis la urbon. Ekzistis juda malsanulejo, juda banko kaj multaj aliaj judaj instalaĵoj. Multaj judaj civitanoj aktivis ankaŭ en la politiko, sed kompare kun Germanio aŭ Aŭstrio, kie la partopreno en la nacia kulturo de la lando volenevole kondukis al la identiĝo kun la surloka socio, al la asimiliĝo, ĉe ni regis memstara juda vivo; sociaj kontaktoj kun nejudoj ekzistis nur maloftaj. La solaj esceptoj estis la renkontiĝoj de mia patro kun kristanaj inĝenieraj kolegoj kaj niaj feriaj restadoj ĉe litovaj kamparanoj. Havi nejudajn amikinojn aŭ eĉ edziniĝi al nejuda virino estintus por mi nepenseble. Tiel nomataj miksitaj geedziĝoj estis esceptaj en la juda medio kaj ne estis konsiderataj kiel celindaj. Se tio okazis en iu familio, tiam tio estis vera malfeliĉo, kvankam ĝi ne signifis la pereon de la mondo. (…)

Preskaŭ ĉiuj niaj amikoj estis judoj, kaj la plimulto de ili apartenis al la ´inteligencio´, kiu tiam estis maldensa popoltavolo. La litovaj kulturo kaj literaturo estis malriĉaj, ĉar Litovio estis juna ŝtato, kiu ricevis sian liberecon nur post la rusa revolucio, kiu furoris post la unua mondmilito. Post kiam dum jarcentoj oni estis subpremata kaj ekspluatata de la rusaj caroj, oni atingis la sendependecon. Litovio estas kamparana lando, agrara ŝtato, kaj la loĝantaro vivis de butero kaj porkoj kaj de la eksporto de anseroj.

Kvankam en la inteligencio ekzistis multaj litovoj, proporcie al ilia parto en la popolo ekzistis ankaŭ ne malpli multaj judoj. La juda loĝantaro disponis pri tre alta klereco kaj vigla interesiĝo pri arto kaj kulturo. La judaj civitanoj ŝatis la operon, ili ofte iradis spekti baleton, la judaro estis malferma, heterogena socio, al kiu mankis la deziro asimiliĝi. Krom tio, multaj judoj estis politike aktivaj kaj engaĝiĝis pro cionisma konvinkiĝo, ke la judoj finfine devus ricevi sian propran ŝtaton. La plimulto el ili, precipe la juna generacio, volis iri al Palestino kaj tie prilaboradi la teron. Post la malfacilaj tempoj sub la caroj kaj la ofte vane ŝajnantaj emancipiĝaj strebadoj oni esperis vidi pli bonan estontecon kaj ŝanĝis sian interesiĝon for de la emancipiĝo favore al la cionismo kaj al ŝtata memstareco en Palestino. Tiuj strebadoj trovis siajn adeptojn ĉefe en la urboj, precipe en Kovno, kie la juda loĝantaro estis aparte cionismema. La pli malriĉaj judaj tavoloj tendencis adepti ĉe la t.n. socialismo, sed ne pro ideologiaj konsideroj. Ili celis la socian justecon, kaj la sola nejuda opcio, kiu prezentiĝis al ili, estis la t.n. komunismo. Ankaŭ en la inteligencio ekzistis minoritato, kiu estis proksima de la komunismaj ideoj. Ĉi tie ideologiaj miksiĝis kun sociaj konsideroj. Tiel, la juda komunumo respegulis la tendencojn de la litova socio, en kiu ekzistis malplimulto, kiu tendencis adori la t.n. komunismon.

Do, ne estas mirige, ke apenaŭ okazis kontaktoj inter litova kaj juda loĝantaroj pro tio, ke ĉe tiu socio entute temis pri antisemitisma socio. Kvankam ekzistis litovaj intelektuloj, kiuj ne estis infektitaj de la vaste reprezentataj antaŭjuĝoj, en la ĉiutaga vivo tamen regis antisemitismo. Ofte okazis kvereloj inter junaj litovoj, kiuj estis direktataj precipe kontraŭ judaj lernejanoj kaj studentoj. Mia frato kaj mi ofte estis enmiksataj en interbatadoj. Okazis, ke surstrate malantaŭ ni iu subite kriis ´judo, judo´ kaj puŝis nin. En tiu kazo oni havis du eblojn: forkuri aŭ rebati. Ni do ofte trejniĝis kadre de tia ´memdefendo´. (…)

Kompare kun Germanio, kie la antisemitismo estis incitita de la registaro kaj trovis fekundan grundon, en Litovio ne temis pri antisemitismo de la politiko aŭ de la gazetaro, sed pri tia de la strato. En oficialaj litovaj cirkloj oni eĉ ne havis kontraŭjudan sintenon kaj la registaro adoptis sufiĉe liberalan sintenon rilate al la juda minoritato. Sed la normalaj, averaĝaj civitanoj estis tre naciismaj kaj antisemitismaj, precipe en la pli subaj popoltavoloj. Nur malmultaj estis liberalismaj.“[115]

Eidintas aludis por ĉi tiu periodo, ke en la rilatoj inter judoj kaj litovoj en la intermilita tempo okazis kelkaj gravaj miskomprenoj, kiuj kondukis al malfido kaj malamo de litovoj kontraŭ judoj. Interalie, iuj promesoj, kiujn la litova registaro faris rilate la la judoj, ne estis plenumataj. Multaj entreprenoj apartenis al judoj kaj multaj judoj estis pli bone edukataj ol la kamparanecaj litovoj, kio probable vekis ĵaluzon kaj malŝaton ĉe litovoj. Krom tio, multaj judoj ne scipovis la litovan lingvon kaj ne estis adaptataj al la litova kulturo (t.e. ne estis asimiliĝintaj); iuj judaj financistoj kontraŭis la nacian valuton, kio sekvigis la bojkotadon de judaj vendejoj. [116]

---

http://www.boersenblatt.net/446194, http://www.nytimes.com/2011/06/13/world/middleeast/13birger.html?_r=0 kaj http://zevbirger.com).

[115] Birger 2010, p. 25-28.

[116] Vd. http://shtetlshkud.com/wp-content/uploads/2011/09/EidintasSummaryFinal.doc; Eidintas 2003, p. 77s.

## 1.7. La sinteno de la litoviaj judoj rilate al la litova ŝtateco

Ĝis 1918 la litova nacia movado ne ŝajnis esti tre alloga por la judoj. Ili preferis organiziĝi en propraj cionismaj, socialismaj kaj religiaj-jidismaj unuiĝoj, kaj la pli maljunaj judoj havis kontraŭ-komunisman sintenon. Tiel, nur malgranda parto de la judoj sentis la bezonon integriĝi en la litovan nacian movadon.

Ankoraŭ en la carisma Ruslando la esperoj de la judoj orientiĝis pli forte laŭ la opcioj de la emancipiĝo kaj aŭtonomeco de la unuopaj popoloj de Ruslando kun la celo starigi demokratian federacion. Tia perspektivo ŝajnis al multaj ruslandaj judoj pli promesplena ol malgranda naciŝtato. Pro tio, la opcion de etne konceptata litova naciŝtato multaj judoj ne apogis. Sed kiam en 1918 montriĝis la perspektivo de ĝuste tia ŝtato, la judoj atendis por vidi kiel tiu ŝtato funkcios kaj faris sian sintenon dependa de la reguligo de la aŭtonomeco koncernanta ilin. En cionisma kongreso, kiu okazis en 1918 en Vilno, estis akceptita rezolucio, en kiu la judoj bonvenigis la restarigon de Litovio kiel sendependa ŝtato. Judoj kunlaboris en tiu projekto kaj tri judoj eĉ fariĝis ministroj en la nova registaro. Kiam la Ruĝa Armeo okupadis Vilnon en 1919, parto de la judoj bonvenigis ĝin, por aliaj la sovetia okupacio signifis koŝmaron. Post kiam la litova ŝtateco fariĝis realaĵo, la judoj adaptiĝis kaj montris sin lojalaj al la nova ŝtato kaj pledis por la enkadrigo de Vilno en la novan litovan ŝtaton. Sed kiam en aŭtuno 1920 la poloj okupadis Vilnon, multaj (kelkcent) judoj aliĝis al la liberiga batalo kontraŭ Ruslando kaj Pollando. Tiel, la judoj fariĝis lojalaj civitanoj de Litovio, malgraŭ iuj antisemitismaj incidentoj, kiuj ĝenis la judojn de tempo al tempo. La situacio en Vilno, kiu estis okupata de Pollando, estis multe malpli favora, ĉar la poloj montriĝis eĉ pli radikale antisemitismaj ol la litovoj mem. Krom la malmultaj komunistoj inter la judaro ne ekzistis aktiva opozicio de la juda flanko kontraŭ la reĝimo de Smetona. Ĝenerale, la judoj fidis la reĝimon de Smetona kaj kredis, ke nenio malbona okazos al ili tiel longe ke li regas la landon. Kiu ne kontentis, tiu povis forlasi ĝin, ankaŭ ĉefe por eskapi la malriĉecon, kiu estis pli konkreta plago por multaj judoj. Tiel, en la jardeko de 1929 ĝis 1939 pli ol 12´000 judoj forlasis Litovion por vojaĝi ĉefe al Sudafriko, Palestino kaj Usono.

Al la kreskanta antisemitismo iuj litoviaj judoj reagis per protestoj kontraŭ la situacio de la judoj en Germanio, kies varojn ili bojkotis. Sed la litova registaro ne ŝatis tian kampanjon, ĉar ĝi timis interŝtatajn komplikaĵojn kun la potenca germana najbaro. Post la Reiĥtag-incendio okazis protesto antaŭ la germana ambasado en Kovno. Trideko da homoj (laŭdire judoj) estis arestitaj kaj Litovio senkulpiĝis ĉe la germanoj. Krom tio estis fondita la „Unuiĝo de judaj frontbatalantoj“, kiu havis 3000 membrojn en 1939 por defendi sin. En 1939/40 famaj judoj kaj litovoj organizis komunajn manifestaciojn por emfazi la litovan-judan amikecon kaj pledis kontraŭ la antisemitismo en Germanio kaj Litovio. La 6an de junio 1940 la rabenoj de la vilna regiono renkontiĝis en iu sinagogo por preĝi, por ke Sovetunio ne okupu Litovion.

En vintro 1939/40 en Kovno svarmis miloj da rifuĝintoj el Memellando, Aŭstrio, Germanio kaj Ĉeĥoslovakio kaj en Vilno troviĝis sama amaso da rifuĝintoj el Pollando. En Kovno, kiun oni nomis ĉarme ankaŭ „Malgranda Parizo“, do regis altgrada viva vigleco.[117] La litova registaro akceptis la rifuĝintojn kaj donis al ili restadpermesojn, sed ili havis limigatan moveblon kaj ne rajtis esti politike aktivaj. Inter ili troviĝis multaj judoj, kiuj ludis gravan rolon en la rezista movado en Varsovio, Bjalistoko kaj Vilno, ekzemple Mordeĥai Tenenbaum, Ĥajka Grossmann, Abba Kovner, Vitka Kempner, Ruŝa Korĵak, Mordeĥai Anielevič, Nissan Reznik, Helene Holzman kaj Yosif Gar. Ĉar la mizero inter la judaj rifuĝintoj estis grandega, diversaj organizaĵoj kiel la litova Ruĝa Kruco devis sendi helpon. Speciala juda kunordiga konsilio administris la diversajn problemojn kaj rilatojn kun la litovaj instancoj kiel la disdividon de la mono, nutraĵoj kaj vestaĵoj, kiuj estis sendataj el eksterlando.[118]

## 1.8. La situacio de la judoj dum la sovetia okupacio

Kiel bazo por la likvido de la intermilita litova ŝtato servis la Hitler-Stalin-pakto de la 23a de aŭgusto 1939, respektive la german-sovetia traktato pri limo kaj amikeco de la 28a de septembro 1939. En la dua sekreta protokolo de tiu traktato Litovio estis, sub sovetia premo, ŝovita al la sovetia interesa zono, kiel interŝanĝo kun polaj teritorioj. Post ultimato, kiun la litova registaro akceptis, kaj sub la preteksto de la kontraŭ-sovetia konspiro, la 15an de junio 1940 la Ruĝa Armeo enkondukis la okupacion de Litovio (kaj de la du aliaj baltaj respublikoj), sen ajna kontraŭstaro flanke de la litova registaro, tiel ke Moskvo povis aneksi

117 Kruk 1999, p. 37.
118 Dieckmann 2011, p. 137-146.

ĝian teritorion kaj integri ĝin en la sovetian ŝtaton. Generalo Vincas Vitkauskas, ĉefkomandisto de la litova armeo, ordonis afable bonvenigi la sovetian armeon. Sen esti komunistoj, Vitkauskas kaj la aliaj apartenis al tiuj ŝtataj reprezentantoj, kiuj preferis la sovetianojn al la germanoj. Prezidento Smetona fuĝis al Germanio, same multaj aliaj litovaj elituloj, oficiroj kaj soldatoj, du litovaj socialdemokratoj elmigris al Britio. Per tio, la malnova litova elito estis rompata kaj diskreditata. La elmigrintaron en Germanion konsistigis esence du grupoj: la adeptoj de Smetona kaj la adeptoj de Voldemaras, kiuj kunekzistis en antagonisma rivaleco. Ĉar la anoj de Smetona distanciĝis de la germanaj nacisocialistoj, la germanoj malpermesis ilian politikan agadon. Voldemaras kontrolis la „Feran Lupon“ (Geležinis Vilkas), kiu troviĝis pli proksime al la nazia ideologio pro sia radikala antisemitisma sinteno.[119] En Litovio mem ŝajnas, ke la homoj sentis sin senpezigataj post la fino de la reĝimo de Smetona. La 15an de junio la nova ĉefministro Antanas Merkys ekfunkciis kiel provizora prezidento, sed fakte nur ĝis la 17a de junio, kiam la ĵurnalisto **Justas Paleckis**[120] kaj profesoro Vincas **Krėvė**-Mickevičius[121] formis la novan litovan „popolan“ registaron. La 21an de julio la litova parlamento (sejmo) proklamis la „sovetian potencon en Litovio“. Laŭ decido de la Supera Soveto de USSR de la 3a de julio, Litovio fariĝis respubliko de Sovetunio. La nova parlamento konsistis el 67 litovoj, 4 judoj, 3 poloj, 2 blankrusoj, 1 ruso kaj 1 latvo. En la parlamenta delegacio, kiu vojaĝis al Moskvo por ĵuri la fidelecon al Stalin, troviĝis 1 judo (li nomiĝis Itzik Meskup). Dum la judoj silentis (do esprimis nek kontraŭ-litovan nek por-sovetian deklaron), post la fino de la procezo de la aneksado de Litovio fare de USSR, en somero 1940 grupo de *litovaj* verkistoj kvazaŭ en stato de deliro komencis ovaciegi kaj gloradi Stalinon kaj la Ruĝan Armeon, kaj Vytautas Kašuba tuj formis skulptaĵon de Lenin. Kiel Juozas Brazaitis konkludis, dank´al sia oportunismo la litovaj politikistoj facile falis en la manojn de la sovetianoj, sen aktiva aŭ pasiva rezisto. Oni kredis, ke la submetiĝo helpos protekti la nacion kontraŭ reprezalioj, sed kiel oni poste vidis tio estis iluzio kaj erara kredo, ĉar la sovetia realeco estis alia. La sekva totala krizo de la moralo en Litovio do ne estis evitebla. Kulpokapro estis serĉata, kaj oni trovis ĝin – ĉe la judoj.[122]

Zev Birger karakterizis la rusan okupacion laŭ jena maniero:

„Mi bone memoras la tagon de la rusa okupacio de Litovio. Ankoraŭ en la sama tago oni malpermesis niajn cionismajn organizaĵojn. Cionismo estis konsiderata kiel krimo, la okupantoj provis komplete senvivigi la cionismon. Tiam mi estis 14-jara kaj jam en junaj jaroj devis lerni kion signifas vivi sub la reĝimo de okupacio. Iel tio estis groteska, ĉar multaj homoj konsideris la invadon de la rusoj kiel malpli grandan malfeliĉon kompare kun ebla germana okupacio. Ankaŭ miaj gepatroj reagis ambivalente al la okazintaĵoj. Unuflanke ili diris, ´pli bone la sovetianoj ol la germanoj´, do pli bone la t.n. komunismo ol la t.n. nacisocialismo, pli bone ´resti sola´ ol esti aneksita kiel partoj de Pollando aŭ aliaj landoj. Oni estis konsolata per la ideo, ke Ruslando estas grandpotenco, kaj en kazo de bezono ĝi povus kontraŭstari Germanion.

Aliflanke, baldaŭ post la invado komenciĝis la konfiskado de la posedaĵo kaj la rigora persekutado de la litova burĝaro, al kiu apartenis ankaŭ multaj judaj ´kapitalistoj´, kies posedaĵon la komunistoj senkompate ŝtatigis, inkluzive de la juda banka sistemo. La judaj sinagogoj estis fermitaj, la strukturoj de la judaj komunumoj malfonditaj, judaj cionismaj gvidantoj arestitaj kaj forpelataj de la urboj aŭ deportataj al Ruslando (organizite de la litova polico kaj de rusoj).[123] La situacio pli kaj pli akriĝis, kaj la fakto, ke Litovio perdis sian memstarecon, estis pli kaj pli rimarkebla. En la ĉiutaga vivo tio efikis tiel, ke la litovaj komunistoj transprenis la registaron kaj enprizonigis multajn ´ŝtatajn malamikojn´. Aliajn oni arbitre liberigis. La iamaj burĝoj estis la celo de la konservata malamo de la subaj tavoloj, kiuj nun plene malbridis sian koleron. Tiel, kaj riĉaj litovoj kaj riĉaj judoj same suferis sub la nova registaro, burĝoj estis senditaj al Siberio, kaj inter judoj kaj litovoj oni ne faris diferencon. (…) Litovoj ĉagreniĝis pri la judoj pro la fakto, ke judaj komunistoj estis parto de la nova (sovetia) registaro. Post la invado de la germanoj ili venĝis sin pro tio, interalie. Oni asertis, ke ĉiuj judoj estas komunistoj kaj ke ili perfidis Litovion.“[124]
Sed la litovoj ne nur malŝatis judojn sed ankaŭ polojn kaj rusojn – klara rezulto de la tragika historio, kiu evidente ne favoris la litovojn, kiuj estis frue minacataj de malaperigo, kunfandiĝo-asimilado kun aliaj

---

[119] Vd. Stang 1999, p. 74.
[120] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Justas_Paleckis.
[121] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Vincas_Krėvė-Mickevičius.
[122] Truska ĉe Levinson 2006, p. 370s., kie estas menciitaj la nomoj de tiaj Stalin-ovaciemaj poetoj.
[123] Mishell 1988, p. 8.
[124] Berger 2010, p. 41s.

etnoj (ĉefe poloj) kaj de subpremado, ignorado-malhelpado kaj forpuŝado-malpermesado (precipe de la rusa ŝovinismo) ne nur dum kelkaj jaroj sed dum jarcentoj.“

La perdo de la ŝtata sendependeco estis sendube koŝmara sperto por la litovoj, latvoj kaj estonoj. La armea ataŝeo (aŭ ambasadoro) de la ekzilregistaro en Berlino, **Kazys Škirpa**[125] (kiu funkciis kiel parolisto de la Smetona-movado en Germanio kaj estis la posta gvidanto de LAF, vd. sube) histerie ploregis ĉefe pro tio, ke la Germana Regno, kiu evidentiĝis kiel komplico de Stalin, ne protestis kontraŭ la sovetia agreso en Litovio, kiu estis konsiderata de la litovoj kiel ekstreme danĝera. La litovoj sentis sin ne nur atakataj de fremda potenco sed ankaŭ perfidataj de specifa etna minoritato – de *la judoj*. La tradicia kontraŭjuda sinteno, kiu estis disvastigata en diversaj litovaj medioj, estis kompletigata de la imago pri judaj komunistoj, kiuj en junio 1940 perfidis Litovion favore al Sovetunio kaj kiuj povis mem profiti de tiu perfido, akaparante ŝtatajn postenojn kaj subpremante la litovan popolon kiel NKVD-agentoj.[126] La litovoj parolis pri maldanko flanke de la judoj, kiuj laŭ ilia opinio ĝuis en la sendependa Litovio toleremon kaj liberalan politikon. Do, en tiu historia momento la imago pri la laŭdira perfido de *la* judoj, kiujn oni kredis ankaŭ esti vidinta entuziasme bonvenigi la sovetiajn soldatojn per floroj kaj ruĝaj flagoj,[127] dum la litovoj estis ŝokitaj kaj ploris, kiam ilia lando estis okupata de la Ruĝa Armeo, povis maturiĝi kaj fariĝi longtempe integra parto de la litova nacia historia memoro (aŭ konscio aŭ mitologio) kaj validis same forte kaj en la litova ekzilo kaj dum la sovetia tempo en Litovio mem, kvankam temis pri publika kaj politika tabuo. Nur komence de la 1990aj jaroj, post la liberiĝo de la sovetia jugo, la litova historiografio komencis okupiĝi pli kritike rilati al tiu ĉi temo.[128]

En tiuj politikaj procezoj la judoj staris tute flanke. Ili nek estis envolvataj en la politikajn intertraktojn nek partoprenis la koncernajn politikajn decidojn de litovoj, germanoj aŭ rusoj, simple ĉar ili ne estis reprezentataj en la ŝtataj organoj kaj instancoj. Neniu interesiĝis pri la opinio de la judoj. La rapideco, per kiu la novaj regantoj enkondukis la sovetian reĝimon, okazis esence sen la partopreno de judoj. Male, en gravaj komisionoj, ekzemple en la komisiono pri agrikultura reformo, eĉ unu judo ne troviĝis. La komisiono, kiu respondecis pri la manipulitaj parlamentaj „balotoj“, konsistis nur el litovoj. Kaj inter la 78 anoj de la litova Sejmo, kiuj petis Moskvon, ke Sovetunio akceptu Litovion kiel sovetian respublikon, troviĝis nur kvar membroj de juda deveno. Kvankam en la sovetia registaro de Litovio sidis kvazaŭ formale aŭ hazarde kelkaj judoj, ekzemple Leon Kogan, kiu fariĝis ministro pri sano, kaj Ĥaim Alperoviĉ, ministro pri industrio, kaj kvankam kelkaj vicministroj kaj parlamentanoj estis judoj, la juda influo en la politiko de la sovetia reĝimo en Litovio estis tre malgranda, fakte kvazaŭ nula. Judoj ne partoprenis en la politika vivo kaj ankaŭ ne estis komisiitaj de la juda minoritato reprezenti ilin en tiu registaro. La granda plimulto de la novaj funkciuloj estis litovoj, konsistantaj parte el komunistoj, parte el anoj de la demokratia inteligencio, kiu estis ligata kun la liberala partio „Liaudininkai“. Do, la aserto de ´la litovoj´, ke ĉefe temis pri judoj, kiuj amase transprenis la respondecon en la ŝtataj organoj kaj ke per tio ili subfosis la litovan ŝtatecon, estas simple malvera. Inter la judoj, kiuj ĉefe estis entreprenistoj aŭ piaj religiuloj, ne troviĝis multaj adeptoj de la t.n. socialismo aŭ de la sovetia potenco. Inter aliaj faktoj estas vere, ke post la eksplodo de la dua mondmilito la judoj pledis por la neŭtraleco de la litova respubliko. Nature eblas diri, ke la judoj, kiuj konsideris la nacisocialisman Germanion kiel pli grandan danĝeron, preferis la sovetian potencon kaj la registaron de Paleckis, des pli ke ankaŭ li konfirmis la ĝeneralan validecon de la principo de la egalrajteco por ĉiuj etnaj grupoj en la lando. En Vilno kaj Kovno estis fonditaj novaj judaj teatroj, en la verkista asocio stariĝis sekcio de judaj aŭtoroj, kaj la radio komencis disaŭdigi elsendojn en la jida lingvo, aperis novaj lernolibroj por judoj. Ankaŭ la nombro de judaj studentoj konsiderinde kreskis en la unua sovetia tempo. Unuafoje judaj kadetoj atingis la rangon de oficiro. Do, kompare kun la Smetona-reĝimo, kiu ekskludis la judojn, en la sovetia reĝimo judoj denove trovis laboron ankaŭ en la ŝtataj organoj. Sed ne ĉiuj malnovaj oficistoj ŝatis la judojn.

Se unuflanke la sovetia reĝimo almenaŭ teorie ŝajnis rilati respekteme al la rajtoj de la naciecoj, aliflanke oni ne devas ignori, ke la sama reĝimo enkondukis grandegan ideologian militiron kontraŭ la

[125] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Kazys_Škirpa.
[126] Ekzemple Mykolas Biržiška asertis en 1952 en Usono, ke inter la NKVD-pridemandantoj kaj inter tiuj, kiuj kompilis listojn por aresti kaj deportadi litovojn al Siberio, estis kelkaj „kruelaj“ judaj kunlaborantoj. (Truska ĉe Levinson 2006, p. 362.)
[127] Oni devas dubi, ke *ĉiuj* judoj staris surstrate kaj entuziasme bonvenigis la sovetiajn soldatojn. Probable temis en tiuj okazoj pri *nur kelkaj* judoj (a few people), kiujn li vidis rande de la urbo, ĉefe junulojn, kiel iu litova oficiro atestis, kiam li akompanis sovetiajn tankojn en la centron de la urbo Plungė, kaj iu juda atestantino kredis vidi ĉefe litovajn komunistojn, kiuj bonvenigis la sovetiajn soldatojn. (Sužiedėlis 2006, p. 143s.). Sed tiuj kelkaj judoj verŝajne sufiĉis, por ke la mito eniru en la konscion de la litovoj, ke *la* judoj bonvenigis la sovetian armeon. Fakte, ne la judoj sed la litovaj oficiroj mem estis la unuaj, kiuj afable bonvenigis la sovetiajn okupaciantojn (Truska ĉe Levinson 2006, p. 365).
[128] Tauber 2012, p. 166-169.

privata ekonomio, kiu estis ŝtatigita sub la komunistoj. Tio signifis, ke precipe judaj sed kompreneble ankaŭ litovaj entreprenistoj estis trafitaj de tiu bato kontraŭ la privata ekonomio, en kiu ili perdis sian posedon. De la 986 fabrikoj, kiuj estis ŝtatigitaj de la sovetianoj, 57% troviĝis en judaj manoj. Ĉe tiuj entreprenoj, kies jara enspezo estis pli ol 150´000 lidoj, la parto de la judaj posedantoj estis eĉ 83%. Ankaŭ la judaj lernejoj fariĝis ŝtataj, la nombro de judaj gimnazioj estis draste reduktata, la hebrea lingvo kiel instrufako estis abolita (la jida lingvo tamen konserviĝis). Aliflanke, en la ĝenerala ideologia batalo de la komunistoj kontraŭ burĝaj, privataj kaj religiaj strukturoj, diversaj judaj, precipe cionismaj kaj religiaj sociaj-kulturaj organizaĵoj estis deklaritaj de la sovetia reĝimo kiel „kontraŭrevoluciaj", „reakciaj" kaj „nedezirataj" (inter 217 ĉi-rilate likviditaj organizaĵoj troviĝis 79 judaj). Se unuflanke oni do lasis la ekzistorajton de naciaj minoritatoj valida, la homaj rajtoj estis draste lezataj fare de la stalinisma „juro", kiu akre persekutis ĉion nekomunisman.

La sovetiigo de la ŝtato estis antaŭenpuŝata de V. Dekanosov, sovetia vicministro pri eksteraj aferoj. Inter liaj celoj klare estis ankaŭ la reduktado de la nombro de judoj en la ŝtataj instancoj. Tiel, judoj ricevis relative malmultajn gvidajn funkciojn. Sub la formala preteksto de la „ekspluatado" en 1940 estis arestitaj pluraj elstaraj judaj funkciuloj kaj intelektuloj, interalie la ĉefredaktoro de la plej granda juda (cionisma) gazeto, la prezidanto de la Cionisma-Reviziisma Partio, la ĝenerala sekretario de la rabena asocio, la prezidanto de la Asocio de judaj frontbatalantoj k.a. Ankaŭ la instituto YIVO estis iom post iom reorganizata. Kadre de la amasdeportadoj de litovaj civitanoj en junio 1941 estis transportataj ankaŭ nemalmultaj judoj (laŭ iuj historiistoj temis pri kelkmil[129]) al la orientaj regionoj de Sovetunio (Siberio). Ankaŭ aktivuloj de cionismaj organizaĵoj (ekzemple „Beitar") fariĝis viktimoj, kiuj estis akuzitaj esti „agentoj de la internacia imperiismo". Je la fino, la judoj mem estis klasifikitaj kiel „kontraŭrevoluciaj elementoj, kiuj konsideras la sovetian povon kiel nur portempan", kiel Pjotr Gladkov, la popolkomisaro por internaj aferoj (NKVD) en Litovio, konkludis.[130] Surbaze de tiu pritakso estis arestitaj 89 cionistoj kaj Bund-istoj, 99 rabenoj kaj 25 estroj de religiaj organizaĵoj. Aliflanke ekzistas ankaŭ atestoj, laŭ kiuj judoj trovis protekton en Sovetunio kaj tiel evitis la holokaŭston kaj sian neniigon.[131] Menciinda en tiu ĉi kunteksto estas la rimarkinda iniciato, ke en somero 1940 la japana konsulo en Kovno, Sempo Sugihara, havigis al kelkmil judoj, kiuj fuĝis el Pollando al Litovio, vizon, por ke ili povu eskapi tra Sovetunio al la libera mondo.

En printempo 1941 LAF asertis, ke 80-90% de la litova KP ĉiam konsistis el judoj.[132] Surbaze de litovaj esploroj eblas sufiĉe ekzakte prikalkuli la parton de judoj en la vicoj de la Litova Komunisma Partio.[133] En tio necesas ne forgesi, ke tiu partio estis malpermesata dum la tuta intermilita tempo en Litovio kaj ekzistis kvazaŭ kiel ombro kun ne pli ol unu milo da membroj. Ke en 1937 la juda parto en ĝi estis 44,65%, fakte signifis, ke reale nur kelkcent litoviaj judoj apartenis al tiu partio. Fine de 1939 60% de la partiaj membroj estis litov- kaj 31% juddevenaj. Ĝis junio 1940 aliĝis al ĝi ĉefe litovoj (687) kaj judoj (386). Post la oficiala permeso de la komunisma partio la membronombro triobliĝis kaj kreskis ĝis oktobro 1940 al 5300, dum la juda parto kreskis ĝis la fino de julio 1940 de 30,6% al 36% kaj per tio atingis sian kulminon. En Kovno la procentaĵo kreskis de 70 al 76. Jam en oktobro 1940, kiam la litova KP estis enkadrigita en la Tutunian Bolŝevisman KP, la juda parto falis al 16,24%, dum la litova parto ampleksis 68,49% (komence de januaro la ciferoj estis: 63,5% litovoj, 16% rusoj, 16% judoj, 4% aliaj).[134] Per la malalta parto de rusaj membroj de nur 11,9% eblas montri, ke ankaŭ la influo flanke de la rusoj al la Litova Komunista Partio estis malgranda. Eĉ se el la posta purigo de la partio, kiu komenciĝis en oktobro 1940 kaj daŭris ĝis majo 1941, la etna kriterio ne ludis specifan rolon – nur pli malpli la duono de la membraro (kaj litova kaj juda) povis konservi sian karton – multaj membroj, kiuj pli frue kunlaboris kun la cionismo, perdis sian membrecon. De la 2627 membroj, kiujn la partio nombris la 1an de januaro 1941, la parto de la judoj estis 16,6%, t.e. 427 personoj, kaj ĝis la germana okupacio la juda parto ankoraŭ reduktiĝis, ĉar multaj novaj membroj venis el USSR al Litovio, tiel ke tiuj personoj ampleksis preskaŭ 40% de la tuta partia membraro, dum finfine nur 12,6% restis judoj. La partiaj sekretarioj plej ofte estis sovetianoj, do ne

[129] Laŭ Mishell 1988, p. 9, t.e. laŭ litovaj fontoj, temis pri 1,5% de la juda kaj 0,9% de la litova loĝantaro.
[130] Kiel konate, en Sovetunio mem la stalinisma teroro atingis sian kulminon en la jaroj 1936-37, verŝajne kun centmiloj, laŭ aliaj fontoj milionoj da mortviktimoj.
[131] Atamuk 2000, p. 127-45.
[132] Eĉ ankoraŭ 20 jarojn post la fino de la milito, Juozas Ambrazevičius, iama ĉefo de la litova Provizora Registaro, ripetis en siaj memuaroj (´Vienų vieni´) la mensogon de LAF, ke la litova KP plimulte (80-90%) konsistis el judoj (Vd. Levinson 2006, p. 340s.)
[133] La LKP estis fondita en 1917 kaj gvidata esence de litovoj (V. Kapsukas, Z. Angarietis, P. Eidukevičius, K. Giedrys, A. Jakševičius, R. Pileris, R. Raiskas, K. Požėla, J. Greifenbergeris, *A. Sniečkus,* K. Preikšas, K. Sprindys).
[134] Eidintas 2003, p. 148.

eblas paroli pri juda influo sur la nivelo de la ĉefa partia estraro. Aliflanke, ekzistis multaj judoj en la sekcioj kaj komitatoj kiel estroj kaj instruistoj. En la Centra Komitato de LKP la juda parto estis nur 10,64% (5 el 47) kaj en la 11-membra politburoo sidis nur unu judo. En la litova Komsomolo ekzistis nur du judoj kaj en la influriĉaj urbaj kaj regionaj komitatoj laboris nur unu judo, nome en Vilno. Inter la estroj de la 54 komitatoj troviĝis neniu judo. Kelkaj judoj laboris ĉe la agentejo ELTA, ĉe la radio kaj ĉe la partia gazeto *Tiesa* (Vero). Esplorata estis ankaŭ la laŭetna persona konsisteco de la sekurecaj servoj, ĉar aperis la suspekto, ke precize tie troviĝis „multaj" judoj. La ĉi-koncernaj ciferoj montras, ke de la personoj, kiuj estis nove dungitaj de la litova ŝtata sekureca servo VSD ĝis la fino de aŭgusto 1940, 36,2% estis rusoj, 17,3% judoj kaj la resto litovoj. Ĝis la germana invado la rusa parto eĉ konsiderinde kreskis. Inter 138 dungitoj de NKVD mem pli ol la duono estis rusoj, dum litovoj (31,2%) kaj judoj (16,6%) estis minoritataj. De 44 NKVD-sekciestroj kaj ties vicestroj nur unu persono estis judo. En la centralo de la ŝtata sekureca policо (NKGB), kiu estis apartigita de NKVD kiel memstara komisariejo, laboris nur 16,8% judoj. Inter la regionaj estroj de NKGB estis neniu judo, kaj la 519 postrangajn KGB-kunlaborantojn, kiuj estis la efektivigantoj de la stalinisma teroro, konsistigis iom pli ol 10% judoj. Fine, inter la kandidatoj por la NKVD-lernejo en Moskvo estis nur du viroj de juda deveno sed 103 litovoj kaj 9 litoviaj rusoj. De la direktoroj, vicestroj kaj politikaj gvidantoj en la malliberejo de Litova SSR estis nur kvar judoj. Tiuj ciferoj, kiujn litovaj esploristoj pedante serĉadis en la du plej lastaj jardekoj, klare montras, ke juda supereco en tiuj gvidaj ŝtataj institucioj ne ekzistis, do estis malica fabelo por diskrediti la judojn, kvankam ilia procentaĵo en tiuj politikaj instancoj kaj organizaĵoj estis efektive pli alta ol la procentaĵo de la judaro en la tuta loĝantaro de Litovio (nome ĉ. 7% en 1940). Tamen, ene de la ŝtataj administraj instancoj kaj en la sovetiaj organizaĵoj judoj formis la malplimulton, kvankam ne marĝenan, sed ili certe havis neniun politikan influon, kvankam ili ja estis fizike videblaj, precipe en iuj amasaj sociaj organizaĵoj (kiel Komsomolo kaj Revolucia Popola Helpo). La novaj mastroj estis ĉie ĉefe litovoj, litovaj komunistoj, kaj rusoj, kiuj pli malpli kaŝe influis, manipulis kaj stiris la aferojn por sovetiigi kaj rusigi Litovion. Malgraŭ tio, por la unua fojo, sub la sovetia reĝimo judoj ricevis labor-perspektivon ankaŭ en la ŝtata administrado, ĉar por la komunisma ideologio la kategorioj de nacio aŭ raso ŝajnis esti malpli esenca ol en la burĝa naciisma ŝtato. Sub la sovetia reĝimo la judoj ĉesis senti sin duarangaj civitanoj kaj kredis la impreson (aŭ promeson), ke la t.n. socialismo estas pli alloga por ili, ĉar ĝia ideologio implicas malpli grandan riskon por ilia diskriminaciado.

Ankaŭ Eidintas konfirmis, ke multaj litovoj kredis, ke la judoj simpatiis kun la komunistoj, kvankam ili formis nur minoritaton en la partio, ke ili respondecis pri la ´sovetiigo´ de Litovio, ke ili detruis la litovan armeon, ke ili celis separi la katolikan eklezion disde la ŝtato, ktp. Ŝajnas ke la kredo de la litovoj pri la „jud-bolŝevisma konspiro" faciligis la pravigon de la posta amasmurdo de la judoj sub nazia komando.[135] Sed kial la litovoj havis la impreson, kiu poste fariĝis centra mito en la historia konscio de la litova popolo, ke la sovetia respubliko estis regata de la judoj? Pri tio sufiĉas rigardi la ciferojn de Kovno. En ĉi tiu urbo la juda elemento en komunismaj gremioj estis pli forta. La 1an de januaro 1941 la parto de judaj komunistoj en la kovna sekcio de LKP estis 47,87% (en Litovio: 16,6%). Eĉ post la senteblaj efikoj de la rusigo de la LKP, en junio 1941 la juda parto restis ankoraŭ 26%. Do, surbaze de tiuj relative altaj ciferoj iuj litovoj eble pensis aŭ kredis, ke ili trovis la pruvon por la „juda regado" de la lando, ĉar plej multaj politike aktivaj judoj troviĝis en Kovno, la provizora ĉefurbo de Litovio, kie la eventoj kaj aferoj estis aparte forte atentataj, obervataj kaj perceptataj.[136]

Do, sojle de la dua mondmilito la tutan nombron de judoj en Litovio konsistigis jenaj ciferoj: Antaŭ la dua mondmilito vivis en Litovio 150´000 judoj. Post la aligo de la vilna regiono al Litovio en oktobro 1939 aldoniĝis ĉ. 60´000 vilnaj judoj kaj 15´000 judoj el la urboj de la vilna regiono, krom tio 12´000 rifuĝintoj (iamaj polaj civitanoj) kaj ĉ. 10-12´000 judoj, kiuj vivis sur blankrusa teritorio, kiu estis aligita al la Litova Sovetia Respubliko en aŭtuno 1940. Krom tio, troviĝis ĉ. 3000 judaj rifuĝintoj el Germanio, Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio en Vilno kaj Kovno. De tiuj ĉ. 250´000 judoj, kiuj formis 8% de la tuta litovia loĝantaro, inter 6-7000 estis deportitaj en junio 1941 de NKVD al Siberio. Okaze de la militeksplodo en junio 1941 ĉ. 8500 judoj fuĝis en Sovetunion.[137]

Sube sekvas: 2a parto

135 Vd. http://shtetlshkud.com/wp-content/uploads/2011/09/EidintasSummaryFinal.doc.
136 Tauber 2012, p. 170-77. Komparu ankaŭ la ciferojn, kiujn Atamuk 2000 prezentis sur p. 138s.
137 Kibelka 1996, p. 273.

# 2a parto: Situacio kaj ĝeneralaj kondiĉoj por la judoj post la komenco de la dua mondmilito kaj la germana okupacio en Litovio

## 2.1. Enkonduko kaj komenco de la holokaŭsto en Litovio: Prologo

Krom la konsternado pri la sovetiaj deportadoj, sur la juda flanko regis en junio 1941 ankaŭ timo antaŭ eventuala germana atako kontraŭ Sovetunio. Ke la Ruĝa Armeo rapide retiriĝos el Litovio kaj ke anstataŭ tio kadre de german-litova alianceco sekvos grandskala agreso kontraŭ ili, la judoj apenaŭ povis imagi. Ekzistis neniaj planoj por forfuĝi aŭ por defendi sin en organizebla maniero. Tion oni certe ne povas riproĉi, ĉar kio okazis, simple ne estis antaŭvidebla.[138]

Kiel najbaro de Germanio kaj parto de Sovetunio Litovio fariĝis la unua viktimo de la germana militiro, kiu ricevis la nomon „Barbarossa". La unua grandurbo, kiun la germanoj atingis kaj okupadis, estis Kovno, kaj la unua „celpubliko" de la germanaj agreso kaj persekutado sekve estis la judaro en okcidenta Litovio, precipe en Kovno, urbo kaj regiono, kie vivis aparte multaj judoj. La modelo de la persekutado kaj neniigo de la judoj estis ´simpla´, kaj trifaza: 1. Teroro, 2. Koncentrado, 3. Likvido.[139] La teroro komenciĝis en junio 1941 per pogromoj, kiuj baldaŭ estis anstataŭigitaj per organizata murdo. La unuaj mortpafadoj okazis komence de julio en la german-litova limregiono, precipe en la urbetoj Gargždai (Garsden), Tauragė (Tauroggen), Kretinga (Krottingen), Palanga (Polangen) kaj Jurbarkas, kie en la unua ondo ĝis la 11a de julio, estis ekzekutitaj 1542 judoj fare de Gestapo-anoj el la najbara urbo Tilsit kun la partopreno de la germana armeo.[140] Ĉi tiu taĉmento mortigis ĝis oktobro 1941 entute pli ol 5000 judojn. Inter la 4a de julio ĝis la 9a de aŭgusto sekvis la mortigo de pliaj 3770 homoj, ĉefe judoj, en du el la malnovaj fortikaĵoj de Kovno (pli detale pri tiuj fortikaĵoj estos raportite sube). La sama modelo estis aplikata ankaŭ en Vilno kaj aliloke. En la litova kamparo la teroro kontraŭ la judoj estis organizita de la litova polico, kiu ricevis la taskon koncentri la judan loĝantaron en getoj por prepari kaj organizi ĝian likvidon.[141] La tasko serĉadi judojn, kiuj vivis kun falsitaj identigiloj aŭ kaŝiĝis ĉe nejudoj aŭ en la arbaroj, estis transprenita de la litova sekureca servo „Saugumas".

Unu el la atestantinoj de la milito en Litovio, kiun ŝi detale dokumentis en persona taglibro, estis la kuracistino **Elena Kutorgienė-Buivydaitė** (1888-1963).[142] Kvankam ŝi mem evidente tro forte kredis je la sovetia revo, senkritike fidante Stalinon kaj eble ne sufiĉe konsciante pri la jam okazintaj krimegoj de la stalinisma reĝimo (en la 1930aj jaroj), ĉi tiu vere humanisma, kompatema kaj pacisme pensanta litovino, pri kiu ni legos ankoraŭ pli poste, peradis tre personan impreson pri la etoso en Kovno en la unuaj tagoj de la milito. Jen kelkaj eroj el tiu tre emocia raporto, kiu atestas la terurajn malamon kaj perforton, kiujn la judoj de Litovio *subite* trafis en tiuj juniaj tagoj de 1941:[143]

„22.6. Estis klara tago, hela mateno. Ekde la kvara horo matene la aviadiloj rabis nian dormon. Mia kunloĝantino kuris tute ekscitita kaj en la nokta kostumo al mi, dirante: ´Estas milito´! Al mi tio ŝajnis sensenca, tiel ke mi mokis pri ŝi kaj resendis ŝin liten. La stratoj estis trankvilaj kaj malplenaj. Sed en la radio mi aŭdis la paroladon de Hitler, kiu kulpigis la bolŝevikojn, ke ili rompis la traktatojn. Nur kiam Molotov parolis mi kredis ĝin.

23.6. Matene la stratoj estis malplenaj. La homoj iradis kun valizoj. Kien? Ne plu ekzistis ŝtata aŭtoritateco, instrukcioj kaj deklaroj. La situacio de la judoj estis terura. Je la sesa matene estis aŭdeblaj fortaj eksplodoj. Pro la eksplodoj la vitroj de la loĝejoj rompiĝis. Oni eksplodigis la Verdan Ponton. Formiĝis Litova Provizora Registaro, kiu ordonis hisi la nacian flagon kaj promesis starigi sendependan Litovion, kiu estos aligita al la ´Nova Eŭropo´ sub la gvido de la ´granda Hitlero´; la unuaj litovaj ministroj jam estis nomitaj, en la radio estis senĉese ludataj litovaj kantoj. Vespere je la 9a horo estis anoncite, ke la

---

138 Dieckmann 2012, p. 213.
139 Komp. Pohl: Massenmord und schlechtes Gewissen. 2008, p.
140 Eidintas 2003, p. 176; Pri la persekutado de judoj en Palanga fare de litovaj „partizanoj" raportis Beiles 2010.
141 Dieckmann 1998, p. 449s.
142 Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Elena_Kutorgienė. Foton vd. sub http://db.yadvashem.org/righteous/family.html?language=en&itemId=4043723.
143 Reverkita de mi en Esperanto laŭ la germana versio en la „Nigra Libro" de Grossmann/Ehrenburg/Lustiger 1994, ekde p. 621, en la sama senco sed en pli konciza formo kaj en la is-formo.

germanaj ĉefkomandistoj ricevis la ordonon detrui la retiriĝantajn partojn de la Ruĝa Armeo. Krom tio, la litova radio ripete komunikadis, ke la ´ruĝaj banditoj kaj barbaroj´ venenigis la trinkakvon. Kelkaj ruĝarmeanoj defendis sin, ĉar oni pafis kontraŭ ilin tra la fenestroj kaj tegmentoj. Terure, tiu patriotisma sovaĝiĝo. Nun mi vidis la militon per propraj okuloj, aŭdis ĝin per propraj oreloj. Ho, mia dio! Kia sensenca, absurda, abomena afero, kaj de kiuj multaj hazardoj la venko dependas?

24.6. Estis la kvina matene. Ie iu kanono pafis. Mi aŭskultis la radion, kie oni kantis germane ´Rozmarion´. Mi ne komprenis kion tio signifu. La trajnoj estis plenŝtopataj de rifuĝintoj. Nia domo estis forlasita. Ĉiuj judoj forfuĝis. La loĝantino de la teretaĝo, iu rusino, frakasis la fenestron kaj forigis siajn aĵojn tra la truo. La stratoj estis kvazaŭ elmortintaj. La rusoj komencis evakui siajn familiojn kaj la ŝtatajn aŭtoritatulojn. La litova radio konstante aŭdigis litovajn kantojn, marŝmuzikon kaj promesojn. Mi vidis, ke la samtempanoj ne komprenas kio okazas. Ĉio ŝajnis esti dubinda terura premsonĝo. Jam du tagojn mi preskaŭ nenion manĝis kaj povis dormi nur du horojn, ĉar mi estis tre ekscitita. Kiom da turmentoj kaj suferoj ĉirkaŭe. Ene de dek minutoj la homoj lasis sian vivon malantaŭ si kaj forfuĝis de Hitlero kiel de la pesto. Estus interese konstati de kie venis tiu sendube patologia malamo, jam mania malamo de Hitlero kontraŭ la judoj, kiu psikiatro povas klarigi tion? Tiu malamo simple estas tro emocia kaj montras, ke ĝi venas el la subkonscio, ke ĝia kaŭzo do troviĝas en la profundeco kaj eble baziĝas sur ies ofendiĝo aŭ ies infana memoro, ies seksa traŭmato… Plej verŝajne li mem ne povus klarigi ĝin al si. La radio denove disaŭdigis paroladojn pri la ´monda judaro, kiu celas unuigi la anglan plutokration kun la ruĝaj banditoj de la Kremlo´. Kiel absurda, sensenca, simpligita ĉio tio estas. Kiel antaŭ miaj okuloj falis la eŭropaj kulturo kaj moralo, komencante kun la unua mondmilito! Kie restis la aristokratio de la spirito? Ni, la homoj de la pli maljuna generacio, nostalgias pri ĝi, sed en la epoko de la revolucioj, en ĉiam pli banala kaj sovaĝiĝinta mondo ne estas loko por ĝi…

25.6. La kovna radio komunikis je la sesa horo matene en la nomo de la ´partizanoj´, ke ĉiuj ŝtelistoj kaj rabistoj estos senprokraste mortpafitaj, ke ĉiuj iamaj policistoj devas reveni al la deĵorado kaj starigi kontakton kun la Provizora Registaro. La radio konstante disaŭdigis banalan-bombastan aŭ vervan marŝmuzikon, kiu estas interrompata de ĉiuj eblaj hurakrioj, alvokoj kaj ordonoj. Tion mi trovis ne nur abomena, sed tio ankaŭ nervozigis min.

La rusoj detruis 300 tankojn kaj 76 aviadilojn kaj malliberigis 5000 soldatojn. ´Kiam mi aŭdas la vorton kulturo´, diris Goebbels laŭ la rusa radio, ´tiam mi malsekurigas mian revolveron´. (La rado devas esti returnita al la mezepoko´; fakte ĝi jam estis returnita, kiel mi asertis). La radio disvastigis la averton, ke la judoj pafis per mitraloj tra la fenestroj kaj ke por ĉiu vundita germana soldato estos mortpafitaj 100 judoj. Kvankam oni komunikis tra la radio, ke ĉiuj devos entuziasme bonvenigi la enmarŝantan germanan armeon, estis subite ordonite, ke oni fermu kaj malheligu la fenestrojn. Alikaze oni pafos kontraŭ la fenestrojn. Mi mem vidis kiel oni pafis kontraŭ la murojn. Sur la malplenaj stratoj de Kovno vagadis nur litovoj, kiuj pafis seninterrompe... kaj tra la fenestroj oni vidis kiel junaj kaj maljunaj judoj estis forkondukataj.

Nun la germanoj estis en la urbo. La urbo estis riĉe ornamata per naciaj flagoj. Sur la stratoj amasiĝis granda nombro de armataj homoj kun brakrubandoj en la naciaj koloroj. Ĉiuj tiuj homoj estis tre malsimpatiaj kruduloj, kiuj vagadis ekipataj per pafiloj kun surmetitaj bajonetoj. Judoj estis forkondukataj unuope aŭ en grupoj. La publiko ĉirkaŭ la Laisvės-aleo ridaĉis kaj rikanis kun malica ĝojo kiam la judoj preterpasis. Mi estis ŝokita pro tio kion mi vidis. El la provinco alveturis malpura aŭtobuso, kiu elpuŝis 30 judojn kaj kiuj devis iri tra spaliro de armataj homoj, kiuj laŭte kaj malice kriaĉis: `Pli rapide!´ La ĉirkaŭaj homoj malice ĝojis. De kie venis tiu malico, tiu krueleco? Kun kia malica ĝojo tiuj ´partizanoj´, ebriigitaj de sia potenco, forkondukis homojn kaj prezentis siajn pafilojn en pozo de venkintoj.

La germanaj soldatoj estis bone vestataj, bone nutrataj kaj kondutis akurate. Ili postlasis tute alian impreson ol la rusarmeanoj, kiuj aperis ĉi tie la antaŭan jaron – lacaj, malbone vestataj, magraj. La germanaj aŭtomobiloj kaj kamionoj estis pli bone ekipataj, pli stabilaj kaj pli praktikaj, la ĉevaloj grandaj, purrasaj sed maldikaj. La litova loĝantaro bonvenigis ilin decide pli bonkore ol la rusojn en la pasinta jaro kaj transdonis al ili florojn. Okupite, serveme, flateme kaj kompleze la litovaj „partizanoj“ ĉirkaŭkuris la germanojn por demonstri siajn fervoron kaj lojalecon, ĉefe ĉe la ´juda fronto´. Ili asertis, ke la judoj pafis kontraŭ ilin tra la fenestroj, laŭdire eĉ per mitraloj, sed neniu atestanto troviĝis por konfirmi tion.

En la tuta urbo ni forigis la sovetiajn emblemojn, ĉiuj montrofenestroj de la vendejoj estis frakasitaj, precipe tiuj de la librovendejoj. La litova loĝantaro adaptiĝis obeeme sed kaŝe pensis alimaniere. Ĝi memorfiksis sian malamon, kaj ju pli ofte tio okazis kaŝe kaj sekrete, despli krude ĝi eksplodis, ĉar retenema konduto ne plu estis necesa. Hodiaŭ estis vere peza tago… plena de fiagadoj, malamo, stulteco, judaj murdoj, rabado de ilia posedaĵo, pereo, timo, tragikaj homaj sortoj. Kaj la „partizanoj“ (kia stulta kaj

malvera nomigo[144]) mortigis la timigatajn, retiriĝantajn, nearmatajn kaj lacajn ruĝarmeanojn… Nenie, nenie mi vidis eĉ nur iomete da homeco, humaneco. En mia loĝejo la germanoj konfiskis du grandajn apudajn ĉambrojn. La florĝardeno estis senkompate detruita. Tagnokte la motoroj bruis. Mi parolis kun du germanoj, kiuj estis ebriigataj de sia venko, ili estis memplaĉaj, stultaj kaj mokemaj.“[145]

Konkretan noktan murdorgian scenon, kies atestantino la aŭtorino fariĝis la 26an de junio, ŝi priskribis en alia alineo:

„Je la dua horo matene nokte, jam komencis heliĝi, mi aŭdis aŭtomobilan bruon. Mi rigardis tra la fenestro. Ĉe la griza ligna domo, Kanto-strato 13, vidalvide de mia loĝejo (la domestro jam pendigis la nazian flagon), alproksimiĝis kamiono. Kelkaj homoj elsaltis ĝin. Unue ili disbatis la pordon, eniris la domon kaj enŝaltis la lumon en la antaŭĉambro. Post tio estis aŭdeblaj laŭtaj, korŝiraj krioj de iu virino, plenaj de nepriskribebla hororo. Ili sonadis kelkajn minutojn, poste iu vira voĉo komencis jidlingve krii, ion peti kaj haste diri iujn vortojn, ĉiam la samajn. Sekvis pafoj (tri ĝis kvar) kaj subite ĉio silentiĝis… Iu vira voĉo balbute diris en la litova lingvo: ´Sen mia permeso ne pafu´, post tio eksonis lamenta infana plorado, tiel, kvazaŭ estus du infanoj. Denove du pafoj kaj subite ĉio estis trankvila… Tio signifas, ke ili mortpafis kvar senkulpajn homojn. La kamiono longe staris antaŭ la domo, ĝis finfine iu grupo de ses personoj forlasis la domon.“

30.6. „En la gazetoj oni multe raportis pri la deportado de viktimoj – de litovoj, sed mankis vorto pri tio, ke estas deportataj ne malpli da judoj, ke el materia vidpunkto la judoj suferis certe eĉ pli, kaj mankis vorto pri la krueleaĵoj kaj amasmurdoj… Mi ne forgesos la litovan kapitanon, kiu pripafadis nian domon, kaj kiu provis konvinki la germanan SS-oficiron, kiu venis por konfiski la loĝejon de nia najbaro, ĉar tra la fenestroj pafis judoj. Kiam mi nemiskompreneble diris, ke tio ne okazis kaj ke neniu povis pruvi ĝin, la germana SS-ulo respondis al mi, ke la bolŝevikoj kaj judoj estas malamikoj, kiuj devos esti ekstermataj. Lia fera rigoreco kaj malcedemo, kiuj kunsonis en lia voĉo, estis malhomecaj kaj kruelaj.“[146] Kutorgienė-Buivydaitė miris, ke la judoj tiel humile eltenis sian sorton sen ribeli.[147]

La bazon de la milito kontraŭ Sovetunio formis la parolado de Hitler, kiun li prezentis la 30an de marto 1941 antaŭ 200 komandistoj de la germana armeo en la Berlina Regna kancelierejo. Tie li anoncis ankaŭ la rasideologian detru-militon kontraŭ Sovetunio, kulpigante la bolŝevikojn, ke ili rompis la traktatojn.[148] Formala germana militdeklaro kontraŭ Sovetunio ne estis publikigita, same kiel formala ordono por persekuti kaj neniigi la judojn evidente ankaŭ ne ekzistis; sed ĝi ja fariĝis evidenta el la nemiskompreneblaj kontraŭjudaj pozicioj, kiujn Hitler kaj ties ĉefaj kunbatalantoj Goebbels, Göring, Himmler kaj Heydrich lanĉis kaj formulis en siaj diversaj skribaj kaj parolaj elpaŝoj.[149]

---

144 Partizano estas ´tegmenta´ nocio por la litovaj aktivuloj, kiuj batalis unuavice kontraŭ la sovetiaj sed ankaŭ germanaj okupantoj en Litovio. Kiel speco de gerilo la ´klasikaj partizanoj´ agadis en „subtera“ movado, kaj kaŝiĝis en la arbaroj, pro kio oni nomis ilin „Arbaraj Fratoj“. Kun la celo restarigi la ŝtatan sendependecon de Litovio tiuj partizanoj daŭrigis agadi ankaŭ post la fino de la dua mondmilito, kiam la lando estis okupata de la stalinisma Sovetunio kaj kiam montriĝis, ke la Okcidento ne riskos militon por liberigi la baltajn landojn. Laŭ Wette 2012, p. 69, en Litovio ekzistis ĉirkaŭ 400 partizanaj organizaĵoj kun po 40-50 homoj, do entute 16-20´000 partizanoj. Verŝajne kelkmil partizanoj perdis sian vivon. La multfaceta agado de la litova partizana movado ne povas esti detale traktata ĉi tie, despli ke mankas objektiva scienca kritika fakliteraturo en fremdaj lingvoj kaj en Litovio, kiu malvolonte agnoskas kritikon kontraŭ ĝia idealigata historio. (Koncizajn informojn vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Lithuanian_partisans kaj http://www.lituanus.org/ 1988/88_3_01.htm). Retpaĝaron pri la litovaj partizanoj vd. sub http://www.partizanai.org. Juozas Lukša-Daumantas (1921-51), kiu mem estis partizano, verkis memorlibron pri la vivo de la litovaj partizanoj, kiu aperis unaufoje en 1950 en Ĉikago (germana traduko Langenthal 2010). Pri Juozas Lukša-Daumantas vd. pli sube en la ĉapitro pri la masakro en la Lietukis-garaĝo. Laŭ ĉi tiu artikolo http://aka.blogsport.de/2008/09/16/litauen-verfolgt-ehemalige-partisanen el la jaro 2008, la litova prokuratoraro komencis esplori, laŭ postulo de litovaj naciistoj, kazojn de iamaj *judaj* partizanoj, al kiuj estas riproĉite, ke ili faris militkrimojn. Ĉu temas nur pri kampanjo de radikalaj litovaj naciistoj kaj antisemitismaj cirkloj aŭ ĉu la historio estas vera, ne estas konate.

145 Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 621-7.


146 Grossman/Ehrenburg/Lustiger, p. 636.

147 Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, pp. 631, 640.

148 Ĉi tiu parolado estas trovebla en la interreto sub http://www.worldfuturefund.org.

149 Skriba ordono de Hitler por neniigi la judojn fakte neniam estis trovita. Sufiĉe klaraj aludoj, kiuj povas esti konsiderataj kiel rektaj fontoj de la nacisocialisma genocido kontraŭ la judoj, estas troveblaj en la Hitler-verko „Mein Kampf“ (1924-26), en la Hitler-parolado de la 30a de januaro 1939 en la Germana Reiĥtago, kies ĉefaj frazoj estas cititaj ĉi tie, vd. http://www.youtube.com/watch?v=11fl8AykFqo), en iuj cirkuleroj de Heydrich de junio kaj julio 1941 al la Einsatz-grupoj kaj Einsatz-komandoj de la Sekureca Polico (vd. pli sube), dum la Wannsee-konferenco de la 20a de januaro 1942, ĉe la Himmler-parolado en Posen de la 6a de oktobro 1943, vd. http://www.youtube.com/watch?v=Ys01h-4fXAs, en la Goebbels-verkaro kaj aliaj fontoj. La demando kiam la germanoj decidis likvidi la judojn entute estas pridisputata inter historiistoj. Laŭ Gerlach 1998, p. 117-36, tio okazis en decembro 1941, kiam en konferenco de NSDAP-gvidantoj la 12an de tiu monato Hitler konfirmis sian intencon „detrui“ la judaron, kiun li formulis la 30an de januaro 1939 en la Germana tago. La 18an de decembro 1941 sekvis ankoraŭ alia grava eldiro de Hitler, laŭ kiu la judoj „estu elsarkitaj, ĉar ili estas parazitoj“. Diversajn gravajn librojn pri la „fina

En unu el la artikoloj de **Joseph Goebbels**, publikigita la 16an de novembro 1941 en la gazeto *Das Reich* sub la titolo „La judoj estas kulpaj“, oni povis legi jenon: „La historia kulpo de la monda judaro pri la eksplodo kaj daŭrigo de la milito kuŝas tiel klare sur la mano, ke ne indas paroli pri tio. La judoj volis sian militon. Kaj ili ricevis ĝin. Plenumiĝis la antaŭvido de la Gvidanto, kiu proklamis la 30an de januaro 1939 antaŭ la Germana Reiĥtago: ´Kaze ke la internacia financjudaro en kaj ekster Eŭropo sukcesos ankoraŭfoje faligi la popolojn en mondan militon, tiam la rezulto ne estos la bolŝevismigo de la tero kaj per tio la venko de la judaro sed la detruo de la juda raso en Eŭropo´. Ni travivas nuntempe la plenumiĝon de ĉi tiu profetaĵo: La sorto de la judaro plenumiĝos eĉ se ĝi estas dura, sed ĝi estas pli ol meritata.“[150] Fakte, en novembro 1941 Joseph Goebbels, kiu havis same kriplan piedon kiel Josef Stalin, persone vizitis Litovion, kie li diris interalie, ke la litovoj ne estas altkvalita raso kaj ke la germanoj estas tiom progresintaj, ke ili havas la moralan rajton gvidi Eŭropon.[151] La germana ministro pri propagando, kiu persone vidis la vilnan geton, kie li kun sentoj de abomenego perceptis la judojn kiel „laŭsojn de la civilizo“, estis tiel impresata, ke li venis al la konkludo, ke la judoj devas esti elsarkataj, kiel liaj vortoj estis redonitaj de la gazeto *Akiračiai*.



La ĉefaj aŭtoroj, ideologoj kaj instigantoj de la holokaŭsto – kaj novaj mastroj de Litovio: Gvidanto Adolf Hitler, Regna gvidanto SS Heinrich Himmler, RSHA-ĉefo Reinhard Heydrich, propaganda ministro Josef Goebbels.
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

## 2.2. La sinteno de la litova intelektularo rilate al la judoj

Koncerne la rilatojn de ´la litovoj´ al la judoj, Elena Kutorgienė-Buivydaitė observis, ke la plimulto de la litovoj, kun kelkaj malmultaj esceptoj, estis unuanima en sia malamo kontraŭ la judoj; tio speciale validis por la intelektularo, kiu dum la sovetia tempo ne havis la okazon profiti la eblecojn. Male, la litovoj suferis materian malprofiton, kiam iliaj domoj kaj kapitalo estis ŝtatigitaj. Tial, tuj post la malapero de la sovetia reĝimo la litovaj intelektuloj kaj naciistoj sentis la bezonon venĝi sin kontraŭ la judoj por la malavantaĝoj, kiujn ili devis elteni.[152]

Krom la (pli malnova) litova opinio, ke la judoj estas ekonomiaj konkurentoj, ekspluatantoj kaj subpremantoj kaj ke ili estas komunistoj, ke en 1940 ili perfidis Litovion favore al Sovetunio kaj profitis la sovetian okupacion por okupi ŝtatajn postenojn kaj eluzi politikan influon, la judoj devis ankaŭ elteni la riproĉon, ke ili kulpas pri la deportado de litovoj al Siberio. Ekestis grandega komplekso de mitoj pri tiu juda kulpo, kiu estis konstruata jam dum la sovetia okupacio en 1940/41. Post la germana invado precipe la kovna taggazeto ***Į Laisvę*** (Al la libereco) komencis akran antisemitisman retorikan militiron kontraŭ la

---

solvo“ verkis Browning (The Path to Genocide, 1992), Burrin (Hitler und die Juden. Die Entscheidung für den Völkermord. 1993), Breitman (Der Architekt der „Endlösung“. Himmler und die Vernichtung der europäischen Juden. 1996), Hans Mommsen (Die Realisierung des Utopischen. Die „Endlösung“ der Judenfrage im „Dritten Reich“. 1991.), Götz Aly (Endlösung. Völkerverschiebung und der Mord an den europäischen Juden. 1998.), Longerich (Der ungeschriebene Befehl. Hitler und der Weg zur „Endlösung.“ 2001.), Hartog (Der Befehl zum Judenmord. Hitler, Amerika und die Juden. 1997), k.a.

[150] Citita laŭ Elena Kutorgienė-Buivydaitė en Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 667-8.

[151] Laŭ la taglibroj de Goebbels, vd. Eidintas 2003, p. 228.

[152] Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p 629s.

judoj, kies celo estis firmigi en la publika konscio la „veron“ pri la komunisma kaj bolŝevisma identeco de la judoj, kiu laŭdire estas kongrua. En junio 1941 *Į Laisvę* skribis, ke la „bolŝevismo kaj la judoj estas la sama afero“.[153] Jam la unuaj eldonoj de la gazeto reaperigis la ideojn de Hitler.[154] Unu el la plej akraj polemikantoj kontraŭ la jud-bolŝevisma alianco estis **Balys Vitkus**, agrikultura ministro de la Provizora Registaro. La judoj estis nomataj „venena fungo“ en la senco de kancero, kiu estas eltranĉenda en Litovio. La gazeto senskrupule postulis la koncentradon de la judoj en labortaĉmentoj por eviti, ke ili daŭrigos senpage manĝi la panon de la lando. *Į Laisvę* plendis, ke la judoj okupas la plej bonajn poziciojn en la entreprenoj, laboras kiel estroj de la personaro, mokas pri la litovoj, kompilas liston de litovoj, kiuj estas sendotaj al Siberio, ke la judoj ĉie kaj ĉiam protektas kaj asistas la rusojn, ke ili parolas la rusan lingvon en poŝtoficejoj, bankoj kaj en busoj; laŭ tio la judoj praktike fariĝis la malamikoj de la litovoj, kiuj suferis sub ilia ekspluatado, tiel ke oni atendas estontecon sen judoj kaj sen juda komerco.[155] Estis sugestite deporti la judojn al Birobidĵano[156] en orienta Siberio aŭ sendi ilin al iu lublina geto (sic).[157] En sia eldono de la 4a de julio 1941 la vilna taggazeto ***Naujoji Lietuva*** (Nova Litovio) aperte alvokis al la ekstermado de la judoj, kune kun la t.n. komunismo.[158] La loka gazeto de Šiauliai, ***Tėvynė*** (Patrujo), kiu povis esti komparata kun la germana *Stürmer* kaj kiu estis redaktata de la gvida litova antisemito **Simas Miglinas**, polemikis kontraŭ la Talmudo kaj alvokis sian publikon, ke ili „purigu la sanktan teron de Litovio de la perfida kaj sadisma judaro“. Similaj kulpigoj estis ripetataj ankaŭ en aliaj litovaj gazetoj.[159]

Kiel montrite en ĉi tiu ĉapitro, la tensioj inter litovoj kaj judoj kreskis pli kaj pli kaj streĉiĝis en principo ekde la unua tago de la sovetia okupacio. La litova historiisto Zenonas Ivinskis observis, ke la etoso klare, nemiskompreneble kaj rekte direktis sin kontraŭ la judoj, kiuj estis kulpigataj pri tio, ke ili bonvenigis la bolŝevikojn. Samtempe, multaj litovoj esperis, ke Litovio estos savita de la hitlera Germanio.

Sube sekvas: 3a parto

---

153 Levinson 2006, p. 342.
154 Brandišauskas en Levinson 2006, p. 233.
155 Eidintas 2003, p. 232, 248.
156 Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Birobiĝano.
157 Eidintas 2003, p. 234.
158 Eidintas 2003, p. 235.
159 Atamuk 2000, p. 166. Kion *Į Laisvę*, *Naujoji Lietuva* kaj *Tėvynė* ankoraŭ skribaĉis kontraŭ la judoj vd. ĉe Levinson 2006, p. 225-8. Kelkajn informojn pri tiuj gazetoj vd. sub http://lt.wikipedia.org/wiki/Į_laisvę_(dienraštis) kaj http://lt.wikipedia.org/wiki/Naujoji_Lietuva_(Vilnius). Aliaj litovaj gazetoj kiel *Žemaičių žemė* (Telšiai), *Naujoji gadynė* (Marijampolė) kaj *Naujosios Biržų žinios* (Biržai) enhavis kontraŭjudajn atakojn pli malofte aŭ limigis ilin al la „juda bolŝevismo“.

# 3a parto:
# Novaj kontraŭjudaj organizoj kaj german-litova kun-laboro dum la germana okupacio de Litovio en 1941-45

Sekvas kurta karakterizo de la ĉefaj germanaj kaj litovaj organizoj kaj strukturoj, kiuj dum la germana okupacio ludis esencan rolon ĉe la persekutado kaj mortigo de la judoj.

## 3.1. La germana armeo en Litovio

Multaj litovoj senpacience atendis la alvenon de la germanoj en la tago de la 22a de junio 1941, kiun oni vidis kiel esperoplenan momenton. En multaj lokoj la litovoj entuziasme bonvenigis la germanan armeon kun floroj, pano kaj salo, kaj kun larmoj de ĝojo en la okuloj, gratulante unu al la aliaj. Milito – kia grandega ĝojo! Kun la enmarŝado de la germanoj estis ligata la espero, ke Germanio helpos restarigi la litovan ŝtaton. Fakte, la germanoj mem kalkulis pri tio, ke en Litovio ili estos salutataj kiel „liberigantoj de la sovetrusa jugo“. Sed la litovoj ne komprenis, ke la germanoj trompos ilin kaj ke por la germanoj Litovio havas nenian apartan signifon. La ĉefa celaro de la germanoj estis aboli la sovetian reĝimon, longdaŭre okupi Litovion (almenaŭ por mil jaroj!), malhelpi kaj eviti la litovan sendependecon kaj – persekuti kaj neniigi la judojn.

El Kovno la Ruĝa Armeo retiriĝis en la posttagmezo de la 22a de junio kaj estis anstataŭigita per la germana armeo, kiu alvenis en la frua vespero de la 24a de junio. Fakte, la Ruĝa Armeo komencis forlasi la urbon jam kelkajn tagojn pli frue, cedante ĝin sen ajna sindefendo kontraŭ la germanoj. Kune kun la litovaj naciistoj la germanoj alprenis „rimedojn“ por „sekurigi Kovnon de malamikaj restaĵoj“, precipe partizanoj, popolaj ribeluloj, komunistoj kaj judoj.[160]

Post la alveno de la 16a germana armeo en Litovio, generalmajoro **Robert von Pohl** transprenis ĝian komandon kaj fariĝis milita komandisto de Kovno. Kvankam la generaloj de la germana armeo ŝajne rilatis kun distanco aŭ indiferenteco al la mortigo de la judoj en Litovio kaj Sovetunio, pri kiu ili ne sentis sin ĉefe koncernataj aŭ rekte respondecaj, estas tamen tute klare kaj pruvite en multaj kazoj, ke la germana armeo dekomence de sia milito kontraŭ tiuj landoj estis enmiksata ankaŭ en la genocido kontraŭ la judoj. Tio okazis plej ofte kadre de la batalo kontraŭ la partizanoj, bolŝevikoj kaj komunistoj, kiujn oni metis en la saman poton kune kun la judoj. Sed la militaj ordonoj, kiujn la germanaj generaloj en la oriento ricevis el Berlino, estis tute klaraj: kolektive puni kontraŭstarantojn kaj tuj likvidi la partizanojn. Uniformataj virinoj estis tuj mortigotaj. Hermann Hoth, kiu komandis la tankan grupon n-ro 3, kiu okupadis Vilnon, rigore komprenigis al siaj soldatoj, ke ili estos sendataj antaŭ la milita tribunalo, se ili neglektos siajn devojn kaj kompatos komunismajn funkciulojn (inter kiuj oni suspektis ankaŭ judojn). Malpli evidenta estis la sinteno de la Wehrmacht-komandisto **Franz von Roques**,[161] kiu devis kontroli la okupatan teritorion malantaŭ la batalzono (Berück). Kvankam li mem ne konsideris sin fanatika antisemito, havante skrupulojn por esti rekte enplektita en la amasmurdon de la judoj, li nur „modere“ ordonis la efektivigon de la kontraŭ-juda politiko. Tamen li ordonis al la judoj, ke ili devas porti la flavan stelon sur la dekstra brustoflanko kaj anoncis, ke germanajn soldatojn minacos sankcioj, se ili loĝas kune kun judoj; krom tio li ordonis la instaladon de porjudaj getoj. Ankaŭ la kontraŭjuda pozicio de **Friedrich Bayer**, komandisto de la 281a „sekuriga“ divizio, kiu okupadis Kovnon, estis iom malklara. Kvankam li respektis la direktivon, laŭ kiu bolŝevikoj, partizanoj kaj judoj estas same traktendaj, ke ĉiuj „suspektindaj elementoj“ devus esti arestitaj, li obeis la ordonojn, ke judoj devas esti kaptitaj kiel ostaĝoj kaj ke popolaj ribelantoj devas esti likviditaj. Ĝeneralan aprobon por la amasmurdo de la judoj donis nek Bayer nek **Carl von Tiedemann**,[162] la komandisto de la 207a „sekuriga“ divizio, kiu okupadis la urbon Ŝiauliai. Ambaŭ malpermesis mortpafadi la popolon, escepte de la kazo, se temas pri anoj de la komunisma partio aŭ judoj. De la pogromoj Bayer ne sentis sin koncernata. Eksplicite li malpermesis al siaj soldatoj interveni en la „memjustico de la litovaj instancoj“, sed samtempe li ´rekomendis´ ankaŭ ne malhelpi ilin efektivigi siajn kontraŭjudajn agadojn. Tiel, Bayer kaj von Tiedemann celis apliki striktan principan distingon inter militaj

---

[160] Dieckmann 2012, p. 184s.
[161] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_von_Roques_(Offizier).
[162] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Carl_von_Tiedemann.

celoj kaj la „raspolitika“ laboro de SS kaj Sipo. Malgraŭ tio, pogromoj kaj amasmurdoj ne estis eviteblaj, ĉar ili estis „iniciatitaj“ de Heydrich, kiu en la fono tiris la fadenojn kaj lasis fari la malpuran laboron al la diversaj fifamaj „Einsatz-komandoj“,[163] kiuj senkompate devis elsarki ĉiujn judojn, kiujn ili renkontis.

Kiel dirite, la generaloj de la germana armeo ne sentis sin koncernataj, kvankam ili ne povis malhelpi la murdojn, kiuj estis ordonitaj de aliaj nazioj, kiuj estis ´respondecaj´ pri la raspolitika „programo“. Aliaj ekzemploj montras tiun dilemon de kunpuŝiĝoj aŭ koincidoj de kompetencoj, kiuj estis tiel tipaj por la nacisocialismaj regadostrukturoj. Tiel, la adjutanto de general-feldmarŝalo **Wilhelm Ritter von Leeb**,[164] komandisto de la Norda Armea Grupo, plendis ĉe la komandisto de la 16a armeo, general-kolonelo (poste general-feldmarŝalo) **Ernst Busch**,[165] kiu okupadis Kovnon, pri la fifama incidento en la garaĝo de Lietūkis en Kovno (pli detale vd. sube), kie iuj litovoj mortbatis kelkdek judojn per feraj stangoj kaj aliaj mortigiloj, kun la aplaŭdo de ĉeestantoj. Busch respondis, ke li povas fari nenion kontraŭ tiaj „internpolitikaj kvereloj“ (la samon diros la litova katolika eklezio). Kiam von Roques petis al Busch ion fari kontraŭ tiu murdagado, li rifuzis enmiksiĝi, dirante ke li ne rajtas malhelpi la pogromojn (sic). **Wolfgang Freiherr von Plotho**,[166] komandisto de la 285a „sekuriga“ divizio, kiu situis oriente de Kovno, famiĝis pro tio, ke li likvidigis tutan vilaĝon, kie li supozis la malamikon. En la sekvo miloj aŭ dekmiloj da „malamikoj“, do partizanoj, bolŝevikoj kaj judoj estis likviditaj laŭ la ordono de la germanoj en Litovio. En novembro 1941 la rezerva polica bataliono, kiu rezidis en Kovno, mortigis 5900 judojn en la regiono de Minsk-Borisov-Sluck en Blankrusio. Ankaŭ la kazo de Vilno montras, ke la germanaj „respondeculoj“ por Vilno kiel la urb-komandistoj Eberhard von Ostmann, Georg Neymann Wolfgang von Ditfurth kaj Max Zehnpfennig aktive partoprenis kaj efektivigis, en kunlaboro kun litovaj instancoj, la diskriminacian kontraŭjudan politikon. En Vilno, la ĝeneralan tonon diktis generalkolonelo **Adolf Strauss**,[167] ĉefkomandisto de la 9a armeo, kiu nomis sian armeon ne konkeranto sed liberiganto. Tiel, dum en la unuaj semajnoj de la germana okupacio de Litovio en Kovno pereis 7000 judoj, en la regiono de Vilno ĝis la 19a de julio estis ekzekutitaj pli ol 7600 personoj.

En siaj raportoj Ditfurth kutimis fanfaroni pri siaj grandaj sukcesoj en la batalo kontraŭ la judoj, inkluzive la altan nombron de mortpafadoj. Ĉar tiuj agadoj evidente ne tro plaĉis al la simplaj soldatoj, Ditfurth ordonis, ke la mortpafadoj okazu nerimarkite de la soldatoj, kaj kolonelo Rudolf Schmundt, ĉefadjutanto en la Norda Armea Grupo, komunikis la 3an de julio, ke la averaĝa soldato ne okupiĝu pri la problemoj de la etna purigo. En iu statistiko por la nombro de enloĝantoj de Vilno, d-ro Dengel prognozis, ke de la 258´000 homoj, kiuj loĝas en la urbo, restos baldaŭ nur 168´000. Tio signifis, ke la mankantaj enloĝantoj estis judoj.

Fine de julio 1941, la germana armeo komencis transdoni la ekzekutivan povan al la civila administracio, al kiu apartenis ankaŭ Sipo (Sekureca Polico) kaj SD. La armeo sub la komando de generalo (aŭ generalmajoro) **Walter Braemer**[168] koncentriĝis pri la batalo kontraŭ la partizanoj.[169] Dume, en Litovio komencis „labori“ SS-standartgvidanto **Karl Jäger** de la Einsatz-komando 3, kiu alvenis la 2an de julio kaj kiu havis la taskon radikale purigi Litovion de la judoj (pli detale pri la agado de Jäger vd. sube). Post la alveno kaj ekfunkciado de tiu Einsatz-komando 3 la spontanaj pogromoj kontraŭ la judoj dume ĉesis, kio postlasis la impreson, ke la germanoj faris ordon en la urbo antaŭ la engetigo kaj organizata amasmurdo de la judoj, kiuj nur iom poste komencis kompreni, kia danĝero ilin minacos sub la germana regado.

---

[163] Tiuj Einsatz-komandoj estis formitaj en Pretzsch (Saksio) dum la „Grenzpolizeischule“ en somero 1941, kiun la SS-gvidantoj, ankaŭ Jäger, partoprenis. La Einsatz-komando 3, kiu estis destinita por Litovio, ricevis 120 oficistojn. Pliaj SS-gvidantoj kadre de la EK 3 nomiĝis Gustav Grauer (de la kriminala polico), Peter Eisenbarth, Erich Wolff, Gerhard Kortkampf (SD), Joachim Hamann (Gestapo). La origina tasko de la EK-oj estis police sekurigi la teritorion, kiu estis konkerata de la armeo, sed la taskon la EK-oj interpretis tiel, ke oni povos ĉasi la judojn, kiuj estas komunismaj malamikoj kaj signifas riskon por la sekureco. (Wette 2012, p. 46s.)

[164] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_von_Leeb.

[165] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Busch_(Offizier).

[166] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_von_Plotho.

[167] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Strauß.

[168] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Walter_Braemer.

[169] Laŭ Priemel 2003, p. 26-39.







Germanaj armeestroj en Litovio: Wilhelm Ritter von Leeb, Ernst Busch, Franz von Roques, Wolfgang Edler Herr und Freiherr von Plotho[170].
(Foton de Robert von Pohl mi ne povis trovi).
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)


Ankaŭ Gerlach konfirmis la envolviĝon de la germana armeo kaj ĝian respondecon en la holokaŭston en la okupataj landoj. Kvankam ekzistis konkurenco de kompetencoj inter la diversaj ministerioj kaj instancoj de la nazigermana ŝtato, li aparte emfazis la signifon de la kunlaboro inter la milita (aŭ armea) kaj civila administracioj por la organizado kaj efektivigado de la genocido kontraŭ la judoj en la okupataj landoj. Ĝuste tiuj militaj (aŭ armeaj) kaj civilaj administraciaj estis la instancoj, kiuj determinis la bazajn liniojn de la politiko, kiun SS kaj la polico devis realigi kaj apliki. [171]

Kompreneble, la germana armeo estis informita pri la pogromoj kaj amasbuĉoj kontraŭ la judoj, kio estas dokumentita en diversaj militaj taglibroj, ĉar la germana armeo kunlaboris kun la Sekureca Polico. Reprezentantoj de la germana armeo nur intervenis ĉe la Sekureca Polico por atentigi pri la skandala karaktero de la efektivigo de la amasmurdo, sen esprimi sin en principo kontraŭ ĝi. Von Leeb opiniis, ke „laŭ tiu ĉi maniero la juda demando probable ne povas esti solvita kaj plej sekure estus solvi ĝin pere de la steriligo de ĉiuj judaj viroj." Tiel opiniis ankaŭ aliaj. Laŭ propra eldiro de 1947 von Roques diskutis kun Stahlecker pri la pogromoj. La ĉi-lasta respondis, ke „la litovoj propradecide faris tion", sed por von Roques estis tute klare, ke la litovoj realigis la mortpafojn de judoj „laŭ la instigo de la germanaj policaj instancoj".

Kiel Dieckmann konkludis, sen la okupacio de Litovio fare de la germana armeo tia perforto kontraŭ la judoj estintus malebla. Estas do neniu dubo, ke la germana armea administrado, kiu posedis la povon por ordoni, aprobis la murdan politikon de la germana Sekureca Polico. Kiel iu SS-oficiro memorfiksis siajn impresojn, „la kunlaborado de la Sekureca Polico kun la armeo efektiviĝas glate". Ekzistis ankaŭ la klara klopodo flanke de la germanoj ŝovi la respondecon por la unuaj „spontanaj" ekzekutoj de la judoj kaj komunistoj al la litovoj mem kun la celo pruvi, ke la „liberigita loĝantaro mem alprenis la plej akrajn rimedojn kontraŭ la bolŝevismaj kaj judaj kontraŭuloj, sen ke oni povas konstati rektan ordonon flanke de la germanaj instancoj." Per tiu teorio la germanoj provis faciligi kaj pravigi la murdon de la judoj. La litovoj volonte kunlaboris aŭ kaptis la okazon kunlabori kun la germanoj en tiu senco, ke multaj respondeculoj de la litova politiko konsentis kontraŭbatali, sub la germana okupacio, la laŭdirajn malamikojn de la litova naciŝtateco, kiujn oni vidis precipe en la (bolŝevismaj) judoj. Tiel, la germanoj parte sukcesis ankaŭ deflankigi la litovojn de siaj naciŝtataj ambicioj kaj ´kanalizi´ ilin kontraŭ la judoj. Sed nur parte ili sukcesis, ĉar la litovoj insistis pri siaj naciaj sendependeco kaj suvereneco, kaj sub la sovetia regado kaj sub la germana okupacio.[172]

---

170 Fonto: http://alifrafikkhan.blogspot.ch/2010/09/daftar-generalleutnant-heer-letnan.html.
171 Gerlach 1998, pp. 73, 260.
172 Dieckmann 2012, p. 198-200; Wette 2012, p 75-77.




Soldato de la germana armeo en Litovio kun judoj la 24an de junio 1941; Litova Memprotekto arestas judojn en Litovio en julio 1941.
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

### 3.2. La politiko de la germana Sekureca Polico

La nekontestebla aŭtoro de la kontraŭ-judaj kaj kontraŭ-komunistaj likvido-agadoj en Litovio, kiu estas klare identigebla, estis sen ajna dubo **Reinhard Heydrich**,[173] estro de RSHA en Berlino, kiu kvazaŭ ricevis la honoron efektivigi la ideon de Hitler likvidi la judaron en Eŭropo. En la kazo de la germana Sekureca Polico (Sipo) estas dokumentite, ke plej malfrue kvin tagojn antaŭ la komenco de la milito ĝi intencis lanĉi kontraŭ-judajn pogromojn. La 17an de junio 1941, Heydrich tiucele kunvokis la gvidantojn de la Einsatz-grupoj kaj Einsatz-komandoj por klarigi al ili, ke oni ne devas „malhelpi la mempurigajn strebadojn de kontraŭ-komunismaj kaj kontraŭ-judaj cirkloj en la okupotaj teritorioj. Male, ili estas kondukendaj en la ĝusta direkto, kaj oni devas ilin efektivigi kaj intensigi sen postlasi spurojn. Krome, oni devas nepre eviti, ke la lokaj ´memprotektaj organizaĵoj´ poste povos utiligi la germanajn ordonojn aŭ politikajn celojn por senkulpiĝi“. Tion li ankoraŭfoje memorigis en konfirma letero de la 29an de junio, do unu semajnon post la komenco de la milito en Litovio. Kiel oni povis legi en lia mesaĝo, Heydrich deziris, ke la tuta entrepreno de la likvido de la judoj ne postlasu spurojn, do devas okazi sekrete (kial iluzio!). Jäger memoris, ke ankaŭ en Pretzsch Heydrich ripetis la ´ideon´, ke dum la milito kontraŭ Sovetunio la judoj devos esti mortpafitaj. La dua grava dokumento ĉi-rilate estas la letero de Heydrich de la 2a de julio 1941 al la pli altrangaj gvidantoj de SS kaj de la Sekureca Polico en la okupata Sovetunio, en kiu estis difinitaj la viktimaj grupoj. Laŭ tiu letero ekzekutotaj estis ĉiuj funkciuloj de Komintern kaj de la KP, la popolkomisaroj, la judoj okupantaj partiajn kaj ŝtatajn oficojn, krome la sabotistoj, propagandistoj, kaŝpafistoj, atenculoj, provokantoj k.s., se ili ne plu estas bezonataj por la havigo de valoraj informoj. Antaŭ la milito tiu ĉi murdprogramo estis ankaŭ interkonsentita kun la armeo. Dieckmann supozas, ke verŝajne ekzistis ankoraŭ aliaj ordonoj, kiuj estis ĉefe buŝe komunikataj.

[173] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Reinhard_Heydrich.

## 3.3. La Regna komisariato Ostland







Litovio inter la militoj (mapo el Vikipedio, aŭtoro: Halibutt); Regna komisariato Ostland (mapo el Vikipedio, aŭtoro: Xrys).
http://de.wikipedia.org/wiki/Vilnius#/media/File:Rzeczpospolita_Central_Lithuania.png
http://de.wikipedia.org/wiki/Reichskommissariat_Ostland#/media/File:Reichskommissariat_Ostland_Administrative.png
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

La t.n. „Ostlanda Regna komisariato“ (germane: „Reichskommissariat Ostland“), ĉi tiu nova politik-administra kreaĵo de la nacisocialismaj germanoj, estis starigita post la atako de la germana armeo kontraŭ Sovetunio en junio 1941 en la baltaj landoj Estonio, Latvio kaj Litovio plus partoj de Blankrusio. La politikan organizadon de tiu parto de la „Tria Regno“ transprenis, krom la armea adminstracio, funkciuloj de la civila administrado, kiu estis sub la gvido de la Germana Ministerio por la okupataj orientaj teritorioj (Ost-ministerio), kiu estis direktata de la fifama nacisocialisma ideologo **Alfred Rosenberg**. Ĉi tiu altranga nazio mem naskiĝis en Reval/Tallinn ankoraŭ en la cara tempo kiel filo de baltgermana patro kaj estona patrino de franc-hugenota deveno.[174] Siajn akrajn kontraŭjudajn konsiderojn, laŭ kiuj la judoj perdis sian ekzistorajton en Eŭropo kaj Ameriko, li detale prezentis en sia verkaĵo „La protokoloj de la Cionaj Saĝuloj kaj la monda politiko de la judoj“, aperinta en 1923 en munkena eldonejo.[175] La ĉefaj celoj de la ministerio de Rosenberg estis la germanigo de la okupataj landoj kaj la likvido de la juda loĝantaro. La Ostlanda Regna komisariato dividiĝis en kvar ĝeneralaj distriktoj kun certa nombro de subdistriktaj regionoj laŭ germana modelo. La ĝenerala distrikto de Litovio konsistis el ses subdistriktoj: Kovno-urbo, Kovno-kamparo, Panevežys-kamparo, Šiauliai, Vilno-urbo kaj Vilno-kamparo. Kompreneble ĉiuj urboj havis germanlingvajn nomojn (Kauen, Ponewesch, Schaulen kaj Wilna). La rezidejo de la ĝenerala komisaro en Litovio troviĝis en Kovno. Sub la menciita Regna ministro Rosenberg funkciis la Regna komisaro por Ostlando, kiu nomiĝis Hinrich Lohse kaj rezidis en Rigo. Ekde decembro 1944 la provizora Regna komisaro estis Erich Koch. La ĝenerala komisaro por Litovio nomiĝis **Theodor Adrian von Renteln.** Al li estis submetita la litova funkciulo **Petras Kubiliūnas**,[176] kiu oficis kiel estro de la Litova Memadministrado, kiu efike helpis al la germanaj „Herrenmenschen“ neniigi la judajn „Untermenschen“. La distrikta komisaro por Schaulen/Šiauliai nomiĝis **Hans Gewecke**[177] (kiu estis la subdistrikta estro de

[174] Pri Rosenberg vd. Piper 2005 kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Alfred_Rosenberg.
[175] La tekston vd. sub https://archive.org/details/AlfredRosenberg-DieProtokolleDerWeisenVonZionUndDieJuedische.
[176] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Petras_Kubiliūnas.
[177] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Hans_Gewecke.

NSDAP de Lauenburg). Por Wilna/Vilno funkciis en tiu ofico **Hans Christian Hingst**[178] (subdistrikta estro de NSDAP en Neumünster) kaj por Ponewesch/Panevežys oficis SS-Sturmbanngvidanto **Walter Neum**. La anstataŭanto de Hingst en la vilna geto estis la aŭstro **Franz Murer,**[179] kiu estis menciita (en la tagblibro de Mascha Rolnikaitė[180]) kiel „buĉisto de Vilno“, same kiel SS-Oberschargvidanto **Bruno Kittel**, kiu estis la posteulo de Franz Murer kaj kiu ricevis la ´honoron´ likvidi la vilnan geton.[181] En la armea administrado respondecis pri Litovio **Lucian Wysocki**, kiu estis SS- kaj policestro. En somero 1941, **Walter Braemer** ekoficis en Riga kiel komandisto de la germana armeo (Wehrmacht) en la Regna komisariato Ostland. Ekde aŭtuno 1941 **Franz Walter Stahlecker**[182] estis la komandisto de la Sekureca Polico kaj de SD en la Ostlanda Regna komisariato kaj respondeca pri la konstruado de koncentrejoj.[183] La amasmurdo de la judoj en Ostlando fariĝis esenca kaj prioritata tasko por la germanoj, ĉar ili timis la influon de la portantoj de la bolŝevisma ideo, kiuj ekzistis aparte multnombre en Ostlando kompare kun la Ĝenerala Gubernio (Pollando). Por eviti estontajn danĝerojn de sabotado, teroraktoj kaj ribeloj oni do devis radikale purigi kaj elsarki la potenciale riskajn elementojn, ĉar efektive multaj judoj estis fakte komunismaj aktivuloj.[184] D-ro **Georg Leibbrandt**,[185] alia fifama gravulo de la Ost-ministerio (kiu partoprenis en la Wannsee-konferenco de la 20a de januaro 1942), fakte instigis en siaj „politikaj direktivoj por la propagando“ la lokan loĝantaron, ke la juda demando povas esti solvita, se oni lasas al la popolo la ´liberecon´ venĝi la „bolŝevisman-judan subpremanton“. La Regna komisariato Ostland ĉesis ekzisti en printempo 1945.[186]



Germanaj „Herrenmenschen“: La gvidantoj de „Ostlando“ Alfred Rosenberg, Hinrich Lohse, Theodor Adrian von Renteln, ĝenerala komisaro de Litovio, Lucian Wysocki, Hans Cramer, SA-brigadestro en la kovna distriko; Hans Gewecke, NSDAP distriktestro, komisaro en Šiauliai (Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

## 3.4. La „Litova Aktivista Fronto“ (LAF) kaj la litova ribelo de junio 1941

Kiel reago al la sovetia okupacio kaj kun la celo prepari nacian ribelon kaj restarigi la ŝtatan sendependecon de Litovio estis fondita, la 17an de novembro 1940, en Berlino, la „Litova Aktivista Fronto“ (*Lietuvos Aktyvistų Frontas*), mallonge LAF. Kiel fondinto kaj ĉefo de LAF estas konsiderata **Kazys Škirpa**,[187] kiu oficis kiel plej lasta litova armea ataŝeo en Germanio. Dum en Berlino LAF konsistis precipe el elmigrintoj kaj iamaj litovaj diplomatoj plus el Voldemaranoj kaj aliaj litovaj dekstremuloj, en Litovio, precipe en Vilno kaj Kovno, formiĝis lokaj grupoj, kiuj havis ankaŭ funkciojn de spionado. Inter la membroj troviĝis ankaŭ reprezentantoj de la litovaj partizanoj kiel ekzemple **Juozas Lukša-Daumantas**, al kiu ni ankoraŭ revenos pli poste. Kvankam LAF mem ne rilatis proksime kun NSDAP, ĝi tamen havis kontaktojn kun la

---

[178] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Hans_Hingst.
[179] Pri Murer kaj Kittel vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Murer.
[180] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Mascha_Rolnikaitė. Pri la pervertata traktado de la judoj en la vilna geto far tiu aŭtorino sub la kondiĉoj de la sovetia cenzura premo atentigis Erich Goldhagen. En: http://www.ifz-muenchen.de/heftarchiv/1980_4.pdf.
[181] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Murer.
[182] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Walter_Stahlecker kaj http://www.zeichen-der-erinnerung.org/n5_2_stahlecker.htm.
[183] Detale pri Ostlando vd. Lehmann/Bohn/Danker 2012; Pohl 2008; Hasenclever 2010.
Mapoj: http://www.arbeit-und-leben-hochtaunus.de/Baltikum.Reichskommissariat_Ostland.pdf.
[184] Dieckmann 2012, p. 194.
[185] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Georg_Leibbrandt.
[186] Dieckmann 2012, p. 191-5. Pri Heydrich vd. Gerwarth 2011/2013.
[187] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Kazys_Škirpa.

germana ministerio pri eksteraj aferoj kaj kun Wilhelm Canaris,[188] la ĉefo de la germana spiona organizaĵo „Abwehr“. Entute la responsuloj de LAF esperis, ke Germanio atakos Sovetunion kaj helpos al la litovoj efektivigi ties planon por restarigi la sendependecon de Litovio.[189]

En la organizaĵo, kiu estis fondita por reunuigi ĉiujn nekomunismajn patriotismajn politikajn fortojn de la malnova litova respubliko, kiuj havas la intencon kontraŭbatali la sovetian okupacion kaj organizi ribelon, la ideologoj de la „Litova Nacia Unio“ kaj la kristandemokratoj estis plej influaj.[190] Sub la impreso de la germana nacisocialismo en la organizaĵo regis forta simpatio al dekstremismaj kaj volkismaj[191] tendencoj. Sed ne ĉiuj membroj de LAF subtenis la faŝismon kaj antisemitismon. Laŭ juda pritakso sed ankaŭ laŭ la opinio de la historiisto Eidintas, LAF estis aŭ fariĝis nura marioneto de la nazioj, dum prezidinto Smetona kredis, ke LAF estis iniciatita aŭ inspirata de la germanoj mem kun la celo transformi ĉi tiun organizaĵon en kvinan kolonon de la nacisocialistoj. Lige kun la esplorado de la karaktero de LAF necesus ankaŭ esplori la demandon pri la kvanto de sinceraj simpatiantoj de la t.n. nacisocialismo en Litovo antaŭ la dua mondmilito.[192]

La plej fanatika ĉefideologo de LAF nomiĝis **Bronys Raila.[193]** La „demokratiismon“ li primokis kiel sistemon, kiu predikas „la egalecon de ĉiuj enloĝantoj kaj rasoj“, kion li trovis neakceptebla, ĉar tion li konsideris „kontraŭ-nacia“. Raila sugestis al la litovoj, ke ili unuiĝu kun siaj najbaraj fratoj, la latvoj, kaj kreu kun ili „unuiĝintan idealon“ de la „Aestianoj“ (mitologiaj praepokaj loĝantoj de la baltaj landoj). Malgraŭ la malfacilaj rilatoj kun la teŭtonoj, li rekomendis al la litovoj apliki por-germanan sintenon. Kompreneble, la ideologio de Raila, kiu ankaŭ reprezentis la teorion de la duobla genocido, estis ankaŭ nete antisemitisma. Laŭ Raila, krom la germanoj, rusoj kaj poloj, la plej grandan damaĝon al Litovio kaŭzis la judoj. La rusan imperiismon li kondamnis kiel miksaĵon de „kaŭkaza stalinismo kaj azi-juda komunismo“. Se Litovio kapitulacos sub la kondiĉoj de la t.n. komunismo, ĝi simple fortranĉos sin mem de la okcidenta kulturo, kio kompreneble estas evitenda. Laŭ Raila, sub Smetona Litovio fariĝis unu el la plej „judaj ŝtatoj en Eŭropo“. Sed la estonta litova ŝtato evoluos fruktodone nur se ĝi estos etne kaj rase homogena kaj purigita de la „judaj parazitoj kaj perfiduloj“, de tiu „vagabonda nacio, kiu sole serĉas parazitan vivon“. Pro tio Raila postulis „separi la judojn disde la litova ŝtato kaj nacia korpo kaj iom post iom elimini la judojn de la litova lando“. Krom tio, li postulis, ke la judoj redonu la tutan judan havaĵon al la litovoj. Nur tiel Litovio povos re-aliĝi al la okcidenteŭropa kulturo (kiun la nacisocialistoj, kiel konate, celis defendi kontraŭ la „azia bolŝevismo“). Ŝajnas, ke la vizio de Raila estis iom troigata eĉ por Kazys Škirpa.[194]

La 22an de junio 1941 la ribelo de LAF en Litovio efektive eksplodis. La postan tagon, la rajtigita delegito de LAF, **Leonas Prapuolenis**,[195] proklamis tra la radio la restarigon de la sendependa litova ŝtato, kies Provizora Registara devis komenci sian laboron la 24an de tiu monato. Praktike, ĉi tiu registaro estis formita precipe de la vilna kaj kovna sekcioj de LAF.

La gvidaj fortoj en LAF kredis, ke la klopodo integri la diversajn etnajn grupojn en la litovan ŝtaton fiaskis. Sekve, oni postulis la devigan asimiliĝon de la malplimultoj en la nova ŝtato, kiu estu prefere volkisma. Samtempe estis lanĉita laŭta propagando kontraŭ fremduloj kaj homoj kun aliaj religiaj konfesoj. Estis tute klare, ke LAF celis per siaj kampanjoj unuavice la judojn. La LAF-anoj esperis, ke la judoj estos devigataj forlasi la landon kune kun la Ruĝa Armeo. Ju pli multaj judoj forveturos, des pli facile estos apartigi Litovion disde la judoj, kiel oni kredis.

Dum la ribelo estis diskonigita ankaŭ la proklamaĵo, kiu alvokis finkalkuladi kun la judoj: „Litovio devas esti liberigita ne nur de la azia bolŝevisma sklaveco sed ankaŭ de la juda jugo“, estis skribite. Tiel, LAF simbole nuligis „plene kaj definitive“ la privilegiojn por la judoj, kiujn ili ricevis de grandprinco Vytautas en la 15a jarcento, kaj formulis la finon de la „juda regado“ por la eterneco. Kvankam LAF en siaj flugfolioj ne rekte alvokis mortigi la judojn, ilia mesaĝo, ke la judoj malaperu el Litovio, estis nemiskomprenebla kaj implicis la perforton kontraŭ ili.

---

[188] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Canaris.

[189] http://en.wikipedia.org/wiki/Lithuanian_Activist_Front#cite_note-4.

[190] Kiuj ´subjektoj´ subskribis la fondan protokolon de LAF kaj kiuj komisionanoj ekfunkciis en ĝi vd. sub http://lt.wikipedia.org/wiki/Lietuvių_aktyvistų_frontas#Susik.C5.ABrimas.

[191] Volkisma: faka neologismo kongrue kun la germana termino ´völkisch´, apoge al la senco de la nacisocialisma ideologio.

[192] Aleksandravičius 2006, p. 184.

[193] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Bronys_Raila. En 1944 Raila elmigris al Francio kaj en 1948 al Usono, kie li redaktis iun revuon en Bruklino. De 1975 li komentis litovajn aktualaĵojn por Libera Radio Eŭropa.

[194] Sužiedėlis 2006, p. 149s.

[195] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Leonas_Prapuolenis.

En la ribelo partoprenis 16-20´000 batalantoj. La centro de la ribelo estis en Kovno, kie troviĝis ĉirkaŭ 4000 militemuloj. Ĉirkaŭ 600 ribeluloj pereis en tiu kontraŭstaro. Mankis armiloj kaj batalsperto. Kunordigi tutlandan ribelon estis malfacile, do restis ĉefe la entuziasmo. La provizora litova registaro alvokis rezigni pri venĝoj. Aliflanke, la litova armea komandisto en Kovno minace avertis, ke judoj estos centope mortpafitaj, se ili atakos la germanojn. Pli kaj pli da litovoj kun aŭ sen uniformoj vagadis tra la urbo kaj arbitre arestadis judojn surstrate aŭ en ties loĝejoj, virojn, virinojn kaj junulojn. Ne estas konate kiom da judoj estis mortigitaj en tiu ribelo, en kiu ankaŭ kelkaj judoj partoprenis. Ekzistas pruvoj, ke anoj de LAF kondukis judojn al ties ekzekuto.[196] Al la judoj oni ne nur riproĉis, ke ili kunlaboris kun la komunistoj dum la sovetia okupacio sed asertis, ke la tuta komunisma socia ordo baziĝas sur judaj radikoj. Do, ankaŭ LAF perfekte priservis la diabligon de la judoj kiel kulpokaproj.[197] Oni rakontis pri kazoj, en kiuj en la kontraŭ-bolŝevisma ribelo judoj pafis tra la fenestroj kaj mortigis litovojn kaj germanojn. Elena Kutorgienė, kiun Eidintas citis kiel ekzemplon de aŭtoro kun „maldekstraj vidpunktoj", skribis en sia taglibro, ke neniu vidis tion kaj ke ŝi mem ne kredas ĝin, do ke temas pri stulta kaj sensenca aserto. Tamen, en alia loko de sia taglibro ŝi konfirmas similajn incidentojn.[198] Kvankam Eidintas konfesis, ke inter la litovaj ribeluloj de LAF estis iuj, kiuj organizis kontraŭjudan pogromon, ĉar ili estis instigataj de la germanaj nazioj, li firme rifuzis la aserton, ke la partizanoj-ribeluloj estis ĝenerale kontraŭ la judoj, kvankam en la LAF-aktivulaj grupoj la sinteno rilate al la judoj ne estis favora. Ekzemple Jonas Deksnys diris, ke oni ne ŝatis la judojn.[199] Konkludo de Eidintas: „Ne estis nur judoj, kiuj suferis," kaj li menciis la nomojn de litovoj, kiuj perdis sian vivon dum la ribelo. Arestitaj estis sovetiaj aktivuloj de ĉiuj etnoj – litovoj, rusoj, judoj (kio signifas, ke judoj estis arestitaj, ĉar ili estis sovetiaj aktivuloj).[200] Cetere ŝajnas, kiel la kovna urbestro plendis, ke ekzistis kazoj, en kiuj iuj „partizanoj" portis falsitajn LAF-brakrubandojn. Pri la grupoj de aktivuloj de LAF Eidintas trovis jenan formulon: „Patriotoj-idealistoj estis inter la partizanoj, tiuj armataj ribeluloj kun la blankaj brakrubandoj, kiuj agadis en la kontraŭ-sovetia ribelo. Ilia celo estis restarigi la sendependecon. Ili ne estis distingeblaj laŭ por- aŭ kontraŭ-judaj agadoj. Kiam la germanoj alvenis, ili konsideris sian mision finita kaj reiris studi kaj labori (ĉar la plimulto venis el studentaj kaj kamparanaj medioj). Alia grupo kun blankaj brakrubandoj agis kontraŭ judoj kaj estis antisemitoj. Kaj tria grupo kun tiaj rubandoj estis rekte instruataj de la nazioj por forigi la judojn kadre de la Einsatz-komandoj; kelkaj el ili agis kiel germanaj agentoj ankoraŭ antaŭ la milito kaj aliaj tiel nomataj partizanoj partoprenis en amasmurdoj."[201]



Litovaj naciistoj: LAF-fondinto Kazys Škirpa, LAF-ideologo Antanas Maceina, fama partizano kaj libroaŭtoro Juozas Lukša Daumantas (origino de la foto nekonata), estro de la Litova Memmadministrado Petras Kubiliūnas. (Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

---

[196] Foton vd. sub http://bpkgate.picturemaxx.com/preview.php?WGSESSID=79567db2b3174d2bb4d12e608a57a188&UURL=b8d052f69b0368a3e05bd081251f2120&IMGID=30002680
[197] Tauber 2012, p. 177-184.
[198] Eidintas 2003, p. 197s. surbaze de citita eseo de Mykola Krupavičius el la jaro 1946, kvankam Eidintas konfesas, ke estas malfacile konfirmi tiujn incidentojn, precipe kial judoj mortigis germanojn, des pli, ke, laŭ William Mishell en „Kaddish for Kovno" (1988), judoj ne posedis armilojn. Do, pri ĉi tiu epizodo kelkaj demandoj restas malfermaj, interalie ankaŭ tiujn, ĉu litovoj atakis judojn jam antaŭ ol la germanoj invadis Litovion, ĉu judoj estis mistraktataj, ĉar ili estis judoj, kaj ĉu temis pri naciismaj atakoj aŭ ´simplaj´ krimaj agoj (Eidintas traktis tiun ĉi demandon sur p. 202).
[199] Eidintas 2003, p. 210.
[200] Eidintas 2003, pp. 200, 206, 207s. Ŝajnas, ke Eidintas volonte citas la italan aŭtoron Sergio Romano, kiu esprimis sin kontraŭ la „kanonizado" de la holokaŭsto kaj simile (pri la ĉi-rilata sinteno de Romano vd. ekzemple http://www.nzz.ch/aktuell/startseite/wenn-ressentiments-sich-bahn-brechen-1.601355).
[201] Eidintas 2003, p. 213.

LAF fidis al la germanoj nur ĝis certa grado, kvankam la litovoj kredis, ke nur la germanoj kapablos forpeli la Ruĝan Armeon, pro kio estas utile kunlabori kun ili por atingi tiun celon. Koncerne la diversspecan apogon donatan al la germana armeo la litovoj spekulativis pri tio, ke iam poste la germanoj agnoskos la rajtojn de la litovoj havi propran ŝtaton. Sed tio ne estis certa. Por apogi tiun esperon aŭ kredon, kiu finfine montriĝis iluzia, la urĝe farita proklamo de la litova sendependeco de la 23a de junio 1941 antaŭ la alveno de la germanoj celis meti ilin antaŭ politikaj faktoj.

Sed la germanoj ne pretis longe toleri la ludon de la litovoj kun la propra sendependeco. La 21an de septembro la nazioj okupis la oficejojn de LAF, arestis la LAF-funkculojn. Prapuolenis kaj aliaj LAF-gvidantoj estis senditaj en la koncentrejon de Dachau apud Munkeno. La LAF-aktivuloj devis subskribi memorandon kaj promesi, ke ili rezignas pri sia politika aktiveco. La 22an de septembro LAF estis fermita de la germanaj okupantoj kaj ĝia monhavaĵo konfiskita. La plimultaj LAF-membroj malaperis en la subtera movado kaj komencis kontraŭnazian agadon, akceptis postenojn en la civila mondo aŭ transiris al unu el la germanaj Einsatz-komandoj (2, 3, 9). Iuj rekolektiĝis en sindikatoj aŭ en la socialdemokratia partio, dum alia parto de la LAF-membroj formis la litovan helppolicon ekzemple por servi kiel gardistoj de la VIIa fortikaĵo en Kovno, kiu funkciis kiel koncentrejo por judoj, kaj iuj oficiroj aliĝis al la sekreta litova naciliberiga armeo.

Unu semajnon antaŭ la komenco de la milito, 32 membroj de la **„Fera Lupo“** (Geležinis Vilkas), kiu estis la subtera ĉelo de la subpremataj Voldemaranoj, fondis la „Litovan Naciisman Partion“, kiu volis kunlabori ankoraŭ pli intime kun la germanoj. Multaj litovaj armeanoj kaj policistoj aliĝis al la „Fera Lupo“, kiu jam antaŭ 1940 kolektis spertojn pri kontraŭjudaj pogromoj. Heydrich kaj lia RSHA esperis trovi inter la anoj de la „Fera Lupo“ la necesajn litovajn kunlaborantojn por efektivigi la sisteman amasmurdon de la juda popolo de Litovio.

### 3.5. La Provizora Litova Registaro

Kiel menciite, post la ribelo de la litovaj naciistoj en la mateno de la 23a de junio la rajtigita delegito de LAF, **Leonas Prapuolenis**, proklamis tra la radio la restarigon de la sendependa litova ŝtato kaj la formadon de Provizora Registaro, kies unua kunsido okazis la 24an de junio.[202] Kazys Škirpa mem estis elektita kiel ĉefministro, sed li ne povis reale enoficiĝi, ĉar li estis retenita en Berlino, kie li troviĝis en hejma arestado. Pliaj membroj estis arestitaj de la sovetiaj aŭtoritatoj. Pro tio **Juozas Ambrazevičius**[203] estis nomita kiel ĉefministro. La ministraro, konsistanta ĉefe el kristandemokratoj, estis formita de la juna generacio de naciistoj, kiuj distanciĝis de Smetona kaj ne postlasis dubojn en siaj unuaj publikaj deklaroj, ke la litova ŝtato „entuziasme partoprenos“ en la rekonstruado de Eŭropo „sur nova fundamento“ flanke de NS-Germanio.

Kiel Ambrazevičius, kiu estis katolika pastro-docento, klarigis, lia registaro havis tri ĉefajn taskojn: a) montri al la germanoj per faktoj, ke Litovio estas sendependa ŝtato, b) liberigi la landon de sovetiaj spuroj kaj c) montri sociale orientatan politikon. Koncerne la judojn montriĝis, ke la Provizora Registaro adoptis antisemitisman politikon. Tiel, en sia unua elpaŝo en Radio Kovno okaze de la germana invado de Litovio, Ambrazevičius komencis sian paroladon per la vortoj „Litovio dankas la liberiganton de Eŭropo, Adolf Hitler… koncerne la judojn, ĉi tiu subjekto finiĝos“. Kune kun episkopo Brizgys li alvokis la litovan popolon kunlabori kun la germanoj, kiuj „venis en nian landon por liberigi ĝin de la sovetia jugo“. (Pri la sinteno de la litova eklezio vd. pli sube).

Kiel montris poste trovita protokolo de la registara kunsido de la 30a de junio 1941, ĝi efektive intencis apliki realan kontraŭjudan politikon. Nome estis aprobita konsento pri la starigo de koncentrejo por la judoj (precipe en Kovno). La taskon okupiĝi pri la starigo de tia koncentrejo ricevis **Jurgis**

[202] Ĝian konsistecon vd. sub http://lt.wikipedia.org/wiki/Lietuvos_laikinoji_Vyriausybė. Ŝajnas, ke la litovoj en la germana ekzilo kalkulis pri la germana okupacio de Litovio jam en printempo 1941 (Welle, Karl Jäger, p. 68).
[203] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Juozas_Ambrazevičius-Brazaitis. En Usono li nomis sin Brazaitis.

**Bobelis**,[204] la komandisto de Kovno, kiu mem ne konsideris sin antisemito.[205] La ordonon subskribis krom Ambrazevičius ankaŭ J. Švelnikas, la estro de la ministra oficejo.

Ambrazevičius kaj Švelnikas subskribis ankaŭ la sekvantajn proklamaĵojn. La 22an de julio kaj 2an de aŭgusto estis akceptitaj rezolucioj, kiuj antaŭvidis malbonigojn por la posedaĵo de judoj: interalie la judoj ne devis ricevi la posedaĵon (entreprenojn kaj monon), kiu estis ŝtatigita dum la sovetia tempo. Tiu posedaĵo restis la propraĵo de la litova ŝtato[206] kaj koncernis la agrikulturon (por surfaco de pli ol 60 hektaroj), industrion, komercon, senmoveblaĵojn kaj terpecojn. Ĉi tiuj rezolucioj havis deklaran karakteron, sed oni ĉiukaze efektivigis ilin. Krom tio, la judoj estis klasifikitaj laŭ du kategorioj: la unua kategorio koncernis la judojn, kiuj estis membroj de komunismaj organizaĵoj kaj kiuj engaĝiĝis en bolŝevismaj agadoj. Ili devis kalkuli pri jura proceso kaj tribunala juĝo. La alia kategorio de judoj ampleksis ĉiujn aliajn judojn, kiuj ne estis antaŭviditaj de la unua kategorio. Tiuj judoj devis esti separitaj de la cetera litova loĝantaro, loĝi en aparta loko (geto) kaj porti specialajn signojn (la emblemon J por judo), t.e. la flavan stelon. Ili ne rajtis posedi elektronikajn aparatojn, aŭtomobilojn, motorciklojn kaj biciklojn, grandajn pianojn, fotilojn, multobligilojn. Se judo ne respektis tiujn regulojn, li aŭ ŝi riskis severan punon. En la mallonga  tempo de la Provizora Registaro, kiu funkciis nur inter la 24a de junio kaj 5a de aŭgusto 1941, estis forigitaj ĉiuj judoj kaj ĉiuj personoj, kiuj estis membroj de la komunisma partio. La popolo estis de nove registrita kaj pasportojn ricevis nur etnaj litovoj. Ruĝarmeanoj estis konsiderataj kiel militkaptitoj kaj devigataj al puna laboro. Judaj teatroj estis fermitaj. Al tiuj diskriminacioj servis nova leĝo pri „Reguloj pri la situacio de la judoj" („Juda Statuto", lit. Žydų padėties nuostatus) de la 1a de aŭgusto. Per la aprobo de la Provizora Registaro, la VIIa fortikaĵo, unu el la fortikaĵoj, kiu formis parton de la malnova defendosistemo konstruata en carismaj tempoj kontraŭ la germanaj atakantoj en Kovno, estis transformita al koncentrejo por judoj. Komence de julio, tie estis retenataj 1860 judoj, 214 litovoj, 134 rusoj, 1 latvo kaj 16 poloj.[207] Kolonelo **Jonas Šlepetys**, ministro pri internaj aferoj, subtenis la ideon de la engetigo de ĉiuj litoviaj judoj. Laŭ Dieckmann do ekzistas nenia dubo, ke la pintaj respondeculoj de la tiama litova ŝtato preparis kaj partoprenis la murdon de la judoj kaj portas parton de la respondeco por la genocido. Kaj li konkludis, ke se la provizora litova registaro estus daŭriginta sian ekzistadon, ĝi certe estus rigore efektiviginta la regulojn de la „Juda Statuto".[208] Ĉiuj ministroj, kiuj apartenis al la Provizora Registaro kaj kiuj elmigris en Usonon, poste neis la validecon de tiuj rezolucioj.[209]

Kvankam la Provizora Registaro evidente praktikis drastan kontraŭjudan politikon, la germanoj tamen rifuzis politike agnoski la decidojn de la provizora litova registaro kaj ĝin mem, ĉar ĝi ne estis nomumita de la germanoj. Samtempe ili ankaŭ rezignis pri ĝia senprokrasta totala malfondo, ĉar la germanoj sentis sin dependaj de la litovaj fortoj. La germanoj malpermesis kunlabori kun litovaj armeanoj kaj nur permesis aktivecojn kun policaj funkcioj. La membroj de la provizora litova registaro kun la subteno de generalo Raštikis unue sukcese kontraŭstaris la premon flanke de la germanoj, kiuj malfidis la provizoran litovan registaron kaj kiun ili celis anstataŭigi per propra civila administra instanco. Laŭ Eidintas, la anoj de la Provizora Registaro estis „naivuloj, kiuj estis misuzataj de la germanoj, por ke ili povu efektivigi siajn militajn celojn".

La „ĝenerala popolo", kiu havis neniujn informojn en la unuaj tagoj pri kio okazas krom onidiroj, precipe en vilaĝoj kaj urbetoj, fariĝis iusence „pasiva". Multaj litovoj kredis, ke nur judaj komunistoj estas koncernataj de la persekutoj kaj ke la juda popolo kiel tuto ne estos tuŝata. La germanojn oni subtenis por „restarigi la ordon".


Kiam iuj judoj klopodis interveni ĉe la litovaj instancoj por plendi kontraŭ la masakroj, la litovoj rilatis nur indiferente. La Provizora Registaro rifuzis akcepti judajn delegaciojn kun la senkulpiĝo, ke oni ne povas helpi. La litovaj politikistoj bagateligis la eventojn kaj rekomendis al la judoj turni sin al la germanoj.[210] Tiel, ekzemple **Jonas Matulionis**,[211] la financministro de la Provizora Registaro, ŝokis la

---

[204] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Jurgis_Bobelis, https://www.lzinios.lt/lzinios/istorija/pulkininkas-jurgis-bobelis-karininkas-ir-humanistas/224814.
[205] Atamuk 2000, p. 167.
[206] La tekston en la angla lingvo vd. en: Levinson 2006, p. 180.
[207] Eidintas 2003, p. 221.
[208] Pli detale pri la kontraŭjuda sinteno de tiu Provizora Registaro vd. Dieckmann 2011, p. 424-436.
[209] Eidintas 2003, p. 224s. La anglan tradukon vd. en: Levinson 2006, p. 182.
[210] En 2001 aperis la libro kun la protokoloj de la Provizora Registaro: Lietuvos laikinoji vyriausybė: posėdžių protokolai.
[211] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Jonas_Matulionis_(1898) kaj http://www3.lrs.lt/pls/inter/w5_show?p_r=483&p_d=27174&p_k=1; 1958-61 Matulionis estis prezidanto de la Litova Monda Komunumo, la tegmenta organizaĵo unuiganta la litovojn vivantajn en eksterlando (http://en.wikipedia.org/wiki/Lithuanian_World_Community).

judon Jakob Goldberg, kiam tiu ĉi diskutis la 8an de julio 1941 kun li pri la murdagado kontraŭ la judoj. Laŭ la interparolo, kiun **Avraham Tory** redonis en sia taglibro, Matulionis prezentis tri opciojn kiel solvi la „judan demandon“ en Litovio: Laŭ la plej radikala opcio la judoj de Litovio devus esti ekstermitaj. Iom pli modera alternativo antaŭvidis la starigon de koncentrejoj por la judoj, kie ili povos „penti per sango kaj ŝvito siajn krimojn kontraŭ la litova popolo“ (ilia „krimo“ konsistis en tio, ke ili kunlaboris kun la sovetia reĝimo). Laŭ la tria opcio, kiun la konfesanta katoliko Matulionis ŝajnis apogi, la judoj kaj litovoj devos esti separitaj unu de la aliaj, ju pli rapide des pli bone, ĉar „ni ne havis kaj neniam havos komunan vojon kun la judoj“. Pro tio la geto estas necesa. Tiel la judoj ne ĝenos la litovojn pli longe. Laŭ Matulionis tio estis „kristana pozicio“. Kiam Goldberg demandis lin pri la ĉesigo de la masakroj kontraŭ la judoj, Matulionis respondis, ke „la kolero de la homoj estas tre granda kaj ne ekzistas rimedo por bridi ĝin.“ Kaj: „Kiam la judoj estos forlasintaj la urbon kaj vivos en geto, nur tiam regos trankvilo.“ Ĉar la ministro ne menciis la premon de la germanoj, li ŝajnigis per tio, ke li esprimas la pozicion de la litova popolo.[212] En siaj propraj memuaroj (´Neramios dienos´), aperintaj en 1975 en Toronto, Matulionis prisilentis sian antisemitisman sintenon sed emfazis, ke „la judoj estis la plej potenca fortikaĵo de la t.n. komunismo kaj rusa bolŝevismo.“[213] Matulionis estis ankaŭ tiu, kiu nete ŝovis la kulpon al la germanoj, kiuj devigis la litovojn efektivigi la murdon de la judoj. „Se la litovoj ne obeas la ordonojn de la germanoj, ili mem suferos. Nia tasko estas protekti la litovojn kontraŭ la kirlo de la milito kaj sekurigi ilin, ke ili suferas kiel eble plej malmulte“, li skribis, kaj li estis konvinkita, ke „la germanoj trudis la pafadon de la judoj al la litovoj.“[214]

Aliflanke, la iama prezidento de Litovio, **Kazys Grinius**,[215] kaj la tiama ministro pri agrikulturo, pastro Krupavičius, kaj profesoro Jonas Aleksa, direktis memorandon al la ĝenerala komisaro de Ostlando, von Renteln, en kiu la aŭtoroj emfazis, ke la litova popolo ne aprobas la murdagadon kontraŭ la judoj. Pro tio Krupačivius kaj Aleksa estis arestitaj kaj malliberigitaj en iu germana koncentrejo, dum Grinius povis eviti sian arestadon, fuĝante al Okcidento kaj elmigrante Ameriken. Ĉiuj tiaj bonintencaj elpaŝoj restis finfine sensignifaj epizodoj kaj ĝenerale ne povis helpi la judojn esti savitaj.[216] La murdo de la judoj en Litovio estis decidita afero kaj nenio povis malhelpi tiun planon.



Antisemitismaj litovaj politikistoj de la tempo de la Provizora Registaro (1941): Leonas Prapuolenis (origino de la foto nekonata), Juozas Ambrazevičius-Brazaitis, Stasys Raštikis, Jonas Šlepetys, Stasys Žakevičius-Žymantas,[217] Jonas Matulionis[218].
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

### 3.6. La litova Civitana Komitato

Sufiĉe rigoran kontraŭjudan sintenon adoptis ankaŭ la litova Civitana Komitato sub la gvido de **Stasys Žakevičius-Žymantas**,[219] docento de la vilna universitato, kiu malafable traktis la judojn en Vilno kaj la vilna regiono. Ĉi tiu Komitato estis fondita surbaze de iniciato de LAF por reguligi la aferojn de la vivo de la civila loĝantaro, ekzemple la distribuadon de nutraĵoj, la altecon de la prezoj kaj salajroj kaj la

[212] Tory 1990, p. 13; Atamuk, p. 168.
[213] Atamuk 2000, p. 169; Eidintas 2003, p. 226.
[214] Eidintas 2003, p. 272s.
[215] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Kazys_Grinius.
[216] Atamuk 2000, p. 170.
[217] Fonto: http://www.xxiamzius.lt/numeriai/2006/01/11/kryz_01.html.
[218] Fonto: http://www.plbe.org/PLBistorija/pirmininkai.htm
[219] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Stasys_Žymantas.

organizadon de la laboro kaj por nodi kontaktojn kun la germana milita administracio. Ĉi tiu Komitato ekzistis pli longe ol la Provizora Registaro mem, nome ĝis la 15a de septembro 1941. Unu el la principoj de la Komitato estis, ke ĝi metis judojn kaj komunistojn en la saman poton kaj obstine komencis fiagadi kontraŭ tiuj grupoj. Inter la dekretoj de la Komitato troviĝis ankaŭ decidoj pri forigo de la judoj el la publika vivo, do el la administrado sed ankaŭ el la entreprenoj, ekzemple el bierfarejoj, frizistaj salonoj kaj muzikaj lernejoj, el la ŝtata filharmonio, el la Akademio de Sciencoj, el la ŝtata banko kaj el la centra ŝtata arkivo. Al la judoj estis ordonitaj porti la flavan stelon aŭ la signon "J" kaj malaperi de la stratoj inter la 18a kaj 6a horoj. Ĉar samtempe oni persekutis ankaŭ komunistojn, viktimoj de la forpelado de homoj el publikaj institucioj kurioze kaj paradokse fariĝis ankaŭ litovoj, kiuj laboris en la katedro pri marksismo-leninismo de la vilna universitato, kiu estis malfondita. Pro politikaj kaŭzoj ankaŭ poloj perdis sian laborlokon. Dum la nemovebla posedaĵo de la judoj ne estis tuŝata, la Civitana Komitato decidis redistribui ilian moveblan posedaĵon. Tiel, surbaze de ĉi-koncerna decido de la Komitato, la bibliotekojn de la judoj ricevis (aŭ devis ricevi) la Akademio de Scienco de Litovio, la Artmuzeo la artajn valoraĵojn, la sekvestrejoj diversajn aliajn valorobjektojn, la Oficejo por artaj aferoj muzikinstrumentojn kaj la Sekcio por sanprotektado transprenis la praktikejojn de la judaj kuracistoj. Objektoj el muzeoj kaj la libraro de la fama Juda Instituto YIVO estis translokitaj al litovaj muzeoj (ekzemple en unu muzeon en Kovno) aŭ al Germanio. La mebloj de la judoj, kiuj devis forlasi siajn loĝejojn por iri en la geton, devis esti transdonitaj al ŝtataj instancoj kaj muzeoj aŭ al privataj personoj por la „provizora utiligo". La mono, kiu estis rikoltata el la vendo de tiuj objektoj, devis esti enpagita en la kason de la distrikta komisaro de Vilno. Post pagado la nova posedanto ricevis la ´aĉetitajn´ varojn. Ankaŭ lernejoj kaj ĝardenistoj ricevis ŝrankojn, tablojn, seĝojn, litojn ktp. Ne estas mirinde, ke diversajn judajn objektojn kaj meblojn oni retrovis en la oficejoj de politikistoj, policaj direktoroj kaj urbestroj en la litova provinco, kiel montras ekzemple la kazo de Šiauliai.[220]

### 3.7. La litova Sekureca Polico

Post la enmarŝado de la germanoj en Litovion estis restarigita ankaŭ la litova Sekureca Polico (Saugumo policija SP), kiu funkcios kiel ŝlosila elemento de la kovna reĝimo. Kiam en junio 1940 Litovio estis okupata de la sovetianoj, iuj funkciuloj de SP forfuĝis al Germanio por parte reveni kun la germanaj okupaciantoj kun la celo efektivigi specialajn taskojn.

En Kovno SP estis reorganizata de **Jonas Dainauskas**, kiu estis iama kunlaboranto de la litova SP. La 25an de junio li renkontiĝis kun Stahlecker, komandisto de la Sekureca Polico kaj de SD en la Regna komisariato Ostland, por pridiskuti la atendojn de la germanoj rilate al la efektivigo de la nacisocialisma raspolitiko. En Vilno iu iama oficiro de la kriminala polico gvidis la rekonstruadon de la litova SP, kiu konsistis el miksaĵo de policistoj, soldatoj kaj studentoj. En tio, la litova SP ricevis de la germanaj okupantoj tutan faskon de taskoj kaj respondecoj, kiuj estis plenumendaj de la SP, tiel ke realiĝis unika kunlaborado inter la germanaj nacisocialistoj kaj la litova SP. Iom poste ankaŭ parto de la litovaj partizanoj estis integrataj en la litovan SP en formo de policaj batalionoj, kiuj fariĝis konataj kiel „protekta personaro" (Schutzmannschaften). En aŭgusto 1941 el Germanio revenis en Litovion ankaŭ la iama vicestro de la SP en Vilno, **Aleksandras Lileikis**,[221] kiu estis nomita ĉefo de la SP en Vilno. Krom kvardeko da Gestapo- kaj SD-oficistoj, en aŭtuno 1941 ĉe la SP en Vilno laboris 130 litovoj.

---

[220] Pli detale vd. Brandišauskas 2003, p. 51-60.

[221] La Oficejo por Speciala Esplorado de la usona justic-departemento („Investigative Research in the United States Department of Justices´s Office of Special Investigation (OSI)") en Vaŝingtono DC indikis, ke post la dua mondmilito kelkdek litovoj eniris Usonon kaŝe. (Vd. Sutton 2008, p. 204). Michael MacQueen, estro de la Oficejo, plendis, ke eĉ ne unu el tiuj litovaj krimuloj, kiuj aktive kaj gvide partoprenis en la holokaŭsto kontraŭ la judoj estis en la malliberejo por penti siajn krimojn dum la germana okupacio de Litovio. (Vd. Sutton 2008, p. 209). Unu el ili estis Lileikis, la plej fama litova militkrimulo. Antaŭ ol Lileikis povis eniri Usonon, li devis servi dum kvar jaroj kiel agento de CIA, kiu volis eviti lian elpelon el Usono en 1994. En majo 1996 li estis ekscivitanigita en Massachusetts kaj revenis libervole al Litovio. La juĝo kontraŭ Lileikis estis publikigita. Pliajn informojn vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Aleksandras_Lileikis. Artikolojn pri la Lileikis-proceso vd. sub http://articles.latimes.com/keyword/ aleksandras-lileikis, http://www.nytimes.com/2014/10/27/us/in-cold-war-us-spy-agencies-used-1000-nazis.html?hp&action=click&pgtype=Homepage&version=HpSumSmallMediaHigh&module=second-column-region&region=top-news&WT.nav=top-news&_r=3 kaj http://de.ria.ru/zeitungen/20141028/269889158.html). En novembro 2014 aperis jena nova libro, kiu traktas la temon de nazioj, kiuj kaŝiĝis en Usono kaj estis utiligataj de CIA: Erich Lichtblau: The Nazis Next Door. How America Became a Safe Haven for Hitler's Men (parto de la libro troveblas en Google Books).

Nova direktoro de la litova sekcio de la komandejo de la SP kaj Kriminala Polico de SD fariĝis **Stasys Čenkus** (1901-82), kiu estis agento de la kontraŭ-spionada servo (Abwehr). Lia anstataŭanto estis Kazys Matulis kaj lia sekretario Vytenis Stasiškis. La estro de la litova Kriminala Polico nomiĝis Petras Pamataitis. Praktike, SP estis reorganizata laŭ la modelo de la germana Gestapo, interalie kun jenaj sekcioj: sekcio pri komunistoj kaj judoj, sekcio pri poloj (aŭ polaj teroristoj), sekcio pri minoritatoj (rusoj, blankrusoj, tataroj, karaimoj[222] k.a.), sekcio pri informantoj kaj agentoj. En la raporto de Stahlecker estis notite, ke SP estas utila kaj necesa por kompletigi la efektivigon de la sekurecpolicaj taskoj, al kiuj apartenis la serĉado, arestado kaj esplorado de homoj, ĉar la germanoj ne povas fari ĉion per propraj fortoj. En la kompetenco de la litova SP estis la traktado de la kazoj de la komenco ĝis la fino, krom se temis pri politike signifaj kazoj, kiujn nur la germanoj mem povis trakti. La germanoj devis esti informataj pri la aktuala situacio pere de germanlingvaj raportoj, kiuj estis ĉiutage verkendaj en la centra rezidejo de la litova SP en Kovno. Detalojn pri la agado de la litova SP kaj pri arestadoj, malliberigoj kaj punadoj de diversaj personoj sciigas la aktoj de la Lukiškės-prizono en Vilno, kiu estis plenplena de judoj kaj komunistoj. Kiel kialoj por la arestado de judoj estis indikitaj „danĝero por la publika ordo“, „judo kun komunisma agado“, „judo suspektata pro konspira agado kontraŭ la ŝtato“ k.s. Kvankam la litova SP ne estis ekskluziva instanco pri judaj aferoj, ĝi tamen funkciis kiel maŝino por reprezalioj kaj murdoj. La litova SP arestis arbitre ne nur judojn sed ĉikanis ankaŭ polojn. Ĉar parto de la aktoj forbrulis post la rekonkero de Litovio fare de la sovetianoj, estas malfacile pritaksi ĝis kiu grado la litova SP estis enplektita en la holokaŭston en Litovio.

La sekcio, kiu konkrete okupiĝis pri la amasmurdoj kaj aranĝis ilin en la nomo de la litova SP kaj SD/Sipo, estis la Speciala Komando **„Ypatingasis būrys“** (germanl. „Sonderkommando“), kiu rezidis en la sama konstruaĵo en Vilno, kie la litova SP havis sian sidejon. YB estis submetita al la Einsatz-komando 9, poste integrita en SD kaj Sipo. Konstante kunlaboris kun YB ĉirkaŭ 40-60, eble pli da „libervolaj“ aktivuloj (Arūnas Bubnys identigis entute 108 homojn). Ĉar ili aranĝis la masakrojn en Ponary (Paneriai), la kunlaborantoj de YB estis nomataj ankaŭ „pafistoj de Ponary“. Post la 23a de julio 1941 la komandisto de YB estis **Juozas Šidlauskas**. En novembro de tiu jaro ĝia nova komandisto fariĝis leŭtenanto **Balys Norvaiša**, kiu havis anstataŭanton en la persono de leŭtenanto Balys Lukošius. Sub la komando de YB dekmiloj da homoj estis mortigitaj, ĉefe judoj krom en Paneriai ankaŭ en Nemenčinė, Naujoji Vilnia, Varėna, Jašiūnai, Eišiškės, Trakai, Semeliškės, Švenčionys. Sed YB gardadis ankaŭ la Gestapon en Litovio, la Lukiškės-prizonon en Vilno kaj la „bazejon“ en Paneriai. De aŭgusto 1943 YB estis reorganizata kadre de la 11a Bataliono de la Latvia (!) Legiono. En julio 1944 YB estis translokita al la IXa fortikaĵo en Kovno, kies malliberejon ĝi gardis, daŭrigante la murdadon de homoj.[223] Fine YB estis sendita al Stutthof, de kie ĝi eskortis judojn al Toruń. Tie ĝi restis ĝis ĝi ricevis la ordonon deportadi judojn al Bydgoszcz. Kelkaj membroj de YB fuĝis, ĉu al Germanio, ĉu al la zono kontrolata de la Ruĝa Armeo. Dek YB-anoj povis esti kaptitaj de la sovetianoj kaj estis ekzekutitaj en 1945 post mortpuna verdikto.[224] Entute 20 YB-anoj estis kondamnitaj al la mortpuno de polaj kaj sovetiaj aŭtoritatoj, kvar el ili ankoraŭ en la 70aj jaroj.[225]

Post la amasmurdo la rolo de la litova SP limiĝis al la postĉasado de judoj, kiuj kaŝiĝis ekster la getoj. Krom tio, post 1941 la litova SP engaĝiĝis en la disbatado de la kontraŭ-germana rezistado precipe flanke de la pola subtera movado „Armia Krajowa“ kaj de la sovetiaj partizanoj, kiuj atakis la germanan komunikan infrastrukturon. Ĝi ankaŭ devis organizi la disponigon de laboristoj, precipe poloj kaj aliaj slavoj, por la germana militindustrio kun la intenco iusence povi atingi iun etnan purigon. Krom tio, la litova SP devis raporti al la germanoj pri la aktiveco de diversaj politikaj, religiaj kaj sociaj movadoj, ekzemple de kristanaj kaj nekristanaj sektoj kaj de la framasonoj. Esploritaj estis ankaŭ la ekzisto de miksitaj geedziĝoj inter judoj kaj kristanoj. En novembro 1942 la litova SP komencis persekuti la ciganojn. Sub la impreso de la baldaŭa militperdo kaj de la sovetia premo la signifo de la litova SP malfortiĝis. Multaj SP-funkciuloj, kiuj ludis gravan rolon en la likvido de la judoj en Litovio, fuĝis en Okcidenton.[226]

---

[222] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Karaimoj.
[223] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Ninth_Fort.
[224] La nomoj de tiuj litovoj estas Jonas Oželis-Kazlauskas, Juozas Macys, Stasys Ukrinas, Mikas Bogotkevičius, Povilas Vaitulionis, Jonas Dvilainis, Vladas Mandeika, Borisas Baltūsis, Juozas Augustas, Jonas Norkevičius.
[225] Laŭ http://en.wikipedia.org/wiki/Ypatingasis_būrys, MacQueen 1999, p. 15-34.
[226] Vd. MacQueen 1999, p. 31 kaj MacQueen 2003, p. 103-116. Stasys Čenkus, kiu estis suspektata, ke li subtenas la litovian sendependecon, estis arestita de la germanoj en decembro 1942 (Stang, p. 187). Li forpasis en 1982 en Usono. Pliajn indikojn pri li mi ne povis trovi (krom http://www.jta.org/1980/05/29/archive/special-to-the-jta-n-y-resident-called-one-of-the-top-five-alleged-war-criminals-in-u-s). En Vikipedio mankas litovlingva versio de la artikolo pri la Litova Sekureca Polico (http://en.wikipedia.org/wiki/Lithuanian_Security_Police).



Aleksandras Lileikis (https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust_in_Litauen#/media/File:Alexandras_Lileikis.jpg)
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

### 3.8. La „rulkomando Hamann“ kaj la litovaj policaj batalionoj

Krom la komando „Ypatingasis būrys“, kies rolo estis ĵus prezentita, la du aliaj esencaj kontraŭjudaj murdkomandoj, kiuj ekfunkciis sub germana reĝisorado dum la holokaŭsto en Litovio, estis la **„Rulkomando Hamann“** kaj la **litova polica bataliono TDA**. En la litova memorliteraturo la agado de tiuj organizaĵoj, kiuj estis rekte envolvataj en la amasmurdon de la litoviaj judoj, do kiuj faris la konkretan ´malpuran laboron´ en la nomo de la germanaj nazioj, estis prisilentata. Pro tio la atenta dediĉo al tiu ĉi longe neglektata ĉapitro de la historio estas aparte grava kaj signifa. Al la esplorado de tiu ĉi temo kontribuis esence du historiistoj: Dum Knut Stang esploris la kunlaboradon de la litova helppolico kontraŭ la judoj fare de la „rulkomando Hamann“,[227] al la klopodoj de la litova historiisto Arūnas Bubnys,[228] kiu faris valorajn esplorojn en litovaj arkivoj, oni dankas konkretajn konojn pri la agado de la kompanioj de la litova TDA-bataliono dum la holokaŭsto. La rezultoj de la esploroj estas altgrade ŝokaj: Deko da kompanioj de la litova TDA-bataliono, al kiu apartenis kelkmil anoj,[229] t.e. soldatoj, „partizanoj“ kaj civiluloj, mortigis dum la dua mondmilito kelkdekmil judojn kaj aliajn homojn en Litovio kaj aliaj landoj.

Unue pri la **„Rulkomando Hamann“**: La „Rulkomando Hamann“ (germ. Rollkommando Hamann, lit. Hamanno skrajojantis būrys) estis ´mobila´ (moviĝanta, movebla) trupo, kiu en la monatoj de julio ĝis oktobro 1941 efektivigis la murdadon de judoj en la litova provinco/kamparo. La esenca kerno de la grupo konsistis el 8-10 germanoj de la Einsatz-komando 3, kies konsisto ŝanĝiĝis spontane (ad hoc). Dieckmann kaj Stang listigis la nomojn de la germanoj kaj litovoj, kiuj estis respondecaj pri la masakroj de la rulkomando Hamann. Flanke de la germanoj komandis ĝin **Joachim Hamann**, kriminala komisaro el Kiel.[230] Al la komando apartenis la germanaj policistoj Rauca, Planert, Porst, Salzmann, Stütz, Mack kaj Mett. Komandistoj de la litova flanko estis **Bronius Norkus**,[231] **Juozas Barzda** kaj **Anatolius Dagys**. En la grupo kutime estis kelkdek litovoj de la 3a TDA-kompanio, kiu estis komandita de Bronius Norkus. Hamann mem persone apenaŭ partoprenis en la murdoj sed preferis lasi tiun ´laboron´ al aliaj. La raporto de Jäger (vd. sube) listigis 54 lokojn, kie tiaj murdoj okazis, kiuj estis efektivigitaj de tiu komando (laŭ alia fonto temis pri 62 masakroj). La „rulkomando Hamann“ kutime aperis post kiam la judoj estis kolektataj kaj alportataj en la arbaron aŭ sur apertan kampon, kie ili estis mortpafitaj de germanaj soldatoj kaj litovaj „partizanoj“. En tio bone funkciis la kunlaborado kun la litovaj civilaj instancoj, precipe kun la lokaj policoj. Litovaj instancoj ankaŭ mem kontribuis al la instigo de la murdoj per tio, ke ili plendis ĉe **Vytautas Reivytis**,[232] la gvidanto de la litova departemento por la Ordopolico, ke ekzistas tro da judoj, ke oni devas nutri ilin, ke ili signifas riskon el la vidpunktoj de la sekureco kaj sano, ktp. Reivytis pludonis la

---

[227] Kritikan recenzon pri lia libro vd. sub http://annaberger-annalen.de/jahrbuch/1997/Annaberg%20Nr.5%20Kap15.pdf.
[228] http://en.wikipedia.org/wiki/Ar%C5%ABnas_Bubnys.
[229] Inter 1941 kaj 1944 en tiuj batalionoj servis ĉ. 20´000 anoj, inter kiuj ĉ. 8000 servis samtempe (vd. Sutton 2008, p. 132).
[230] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Hamann
[231] Biografiajn indikojn vd. ĉe Stang 1999, p. 175s. En 1942 Norkus devis servis ĉe la orienta fronto. La kialo de la suicido de Norkus, kiu estis alkoholulo, estas malklara.
[232] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Vytautas_Reivytis.

plendon al Hamann, petante lin „solvi“ la problemon laŭ la „kutima maniero“. Surloke la litova polico kunlaboris ankaŭ en la ekzekutado de la judoj per ilia koncentrado en certaj lokoj, en la elektado de la ekzekutotaj personoj kaj preparado de la ekzekutado mem. Litovaj „partizanoj“ aŭ „helppolicistoj“ gardis la judojn, rekolekts fuĝintojn, akompanis ilin al la ekzekutejo kaj ordigis iliajn vestaĵojn. Antaŭ la ekzekutado en la kamparo germanoj aŭ/kaj litovoj ankaŭ seksperfortis judinojn. La lokoj, kie la judoj estis mortpafitaj, estis enkadrigataj, la tomboj kovrataj per kalko kaj tero. Antaŭ, dum kaj post la ekzekutado la „rulkomandoj“ kutimis abunde konsumi alkoholon, tiel ke en ebria stato eblis eĉ pli bone plenumi la filaboron. Post la farita „laboro“ tiuj „rulkomandoj“ revenis al Kovno, kie ili laŭte fanfaronis kaj fieris pri la nombro de mortpafitaj judoj.[233] En iuj lokoj litovaj posedantoj de restoracioj aranĝis abundan festenon por glori la fifarojn de la murdistoj.[234] Laŭ persona pritakso de Hamann la rulkomandoj mortpafis ĉirkaŭ 77´000 judojn. Post la preskaŭ kompleta likvido de la judoj en la provinco la rulkomando Hamann estis malfondita komence de oktobro. La judoj, kiuj ankoraŭ ne estis mortigitaj, estis utiligataj kiel „laborjudoj“[235]. En 1942 la SS komencis malfermi la tombojn por bruligi la kadavrojn, kiuj estis mortigitaj de tiuj german-litovaj komandoj.

La litova **„Bataliono por la protekto de la naciaj atingoj“** (lit. **Tautinio Darbo Apsaugas Batalionas TDA**) estis fondita de la Provizora Registaro la 28an de junio 1941 en Kovno. La 1a (poste 13a) TDA-bataliono estis fondita surbaze de ordono de la germana Feldkomandisto de Kovno, generalmajoro von Pohl, kaj de la litova milita komandisto de Kovno, kolonelo Bobelis. La 4an de julio 724 suboficiroj kaj soldatoj, plejparte litovaj soldatoj kaj partizanoj, kiuj partoprenis en la junia ribelo, komencis servi en tiu bataliono, kies unua komandisto fariĝis **Andrius Butkūnas**. Kadre de la ideologia radikaliĝo de la TDA-bataliono la malpli radikalaj Smetona-proksimaj komandistoj (kiel Bobelis kaj Butkūnas) estis anstataŭigitaj per pli radikalaj Voldemaras-proksimaj reprezentantoj (**Stasys Kviečinskas** kaj **Kazys Šimkus**).[236] Fine de julio ekzistis sep kompanioj. Ĝis oktobro 1941 en Vilno estis formitaj kvin kompanioj kun 1932 membroj. Ĝis novembro en Kovno estis formitaj aliaj kvin kompanioj, en kiuj servis 3470 homoj. Aliaj tiaj kompanioj estis formitaj en Šiauliai kaj Panevežys.[237]

La originaj taskoj de la TDA-bataliono estis gardi pontojn kaj protekti la fervojon, kontroli sovetiajn militkaptitojn kaj teni la ordon en Kovno. La bataliono rekrutigis sian ´personaron´ el ĉiuspecaj elementoj, de naciistoj (de Smetona kaj Voldemaras) ĝis oficiroj, dizertiĝintoj de la (29a teritoria Pafista Korpuso de la) Ruĝa Armeo (en kiu troviĝis ĉirkaŭ 8000 litovaj soldatoj), el anoj de la sport-pafista organizaĵo „Šaulių Sąjunga“ (Pafista Unuiĝo[238]) sed ankaŭ el hazardaj aventuristoj kaj memdeklaritaj herooj. Kiam la TDA-bataliono estis formita, „Šaulių Sąjunga“ eniris ĝin kiel 1an, 2an kaj 3an kompaniojn kaj la anoj de la „Fera Lupo“ sub Šimkus kaj Bronius Norkus aliĝis al ĝi kiel 3a kaj 4a kompanioj. La Provizora Registaro iel klopodis kunigi tiun heterogenan anaron, kiu devis ne nur restarigi la ordon en la urbo sed ĉefe ankaŭ evolui kiel ĝermo de la onta litova nacia armeo.[239] Laŭjure, tra Butkūnas, la 3a kaj 4a kompanioj estis submetitaj al Bobelis kaj per tio finfine al la Provizora Registaro, kiu pagis la anojn de la TDA-bataliono. Praktike, la bataliono devis obei la ordonojn de la germana Sekureca Polico, kiu estis reprezentita de **Erich Ehrlinger**[240] kaj de la Speciala Komando (Sonderkommando) 1b.[241] Ehrlinger havis la taskon „sekurigi“ la urbon Kovno, tio signifis nemiskompreneble, ke li devis liberigi ĝin de komunistoj kaj proksimaj elementoj plus engetigi la judan loĝantaron kaj likvidi judajn virojn de certaj aĝogrupoj. Jen kiel la germanaj kaj litovaj organizoj estis interplektataj kaj interdependaj.


Dum la oficiala nomo de la bataliono estis TDA, la germanoj nomis ĝin nur „Polica helpbataliono de Kovno“ por ne doni tro da siginfo al la litovaj naciaj strukturoj, des pli ke ne estis tute klare kiajn

---

[233] Stang 1999, pp. 80-85, 128, 161-170.
[234] Eidintas 2003, p. 265.
[235] Laŭ la germana vorto „Arbeitsjude(n)“.
[236] Stang 1996, p. 131s.
[237] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Tautinio_Darbo_Apsaugos_Batalionas.
[238] Laŭ la modelo de la „Fera Lupo“ la „Pafista Unuiĝo“ formadis para-armeajn grupiĝojn, kiuj mem nomis sin „partizanoj“. Kvankam en la militaj aktivecoj ili mem ne enmiksiĝis, ili tamen helpis al la germana armeo, ĉasadis komunistojn kaj kunlaborantojn de la sovetia reĝimo sed persekutis ankaŭ judajn rifuĝantojn kaj funkciis kiel helppolicistoj. Tio ne ekskludis, ke la membraro de „Šaulių Sąjunga“ konsistis el elektantoj de demokratiaj partioj, kiel en Kovno. Kelkajn informojn vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Lithuanian_Riflemen%27s_Union. La nuntempa organizaĵo estas prezentita sub http://www.sauliusajunga.lt.
[239] TDA ne iĝis la ĝermo por la nacia armeo. La litova nacia armeo estis malfondita en majo 1944, post kiam la soldatoj rifuzis doni la ĵuron al Hitler kaj submetiĝi al SS.
[240] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Ehrlinger.
[241] Stang 1999, p. 75-78.

funkciojn tiu litova bataliono entute havu. Sed la germanoj samtempe ankaŭ tre bone konsciis, ke ili dependas de la litovaj policaj fortoj kaj ne povas rezigni pri ilia kunlaborado, se li volas atingi la militajn celojn.

Ŝajnas, ke la litova polica bataliono (TDA) estis sufiĉe populara en Kovno. Kiel Stang klarigis, la loĝantaro de Kovno aktive subtenis ĝin per konstanta kompletigo per nutraĵoj al la soldatoj, kiuj estis tiel abundaj, ke tri specialaj oficiroj estis okupataj per la ĉiutaga administrado de la „donacoj“.[242]



Persekutis kaj organizis la murdon kontraŭ la judoj, civiluloj kaj sovetiaj militkaptitoj: Bronius Norkus[243], Juozas Barzda, Kazys Šimkus[244], Jurgis Bobelis[245].
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Kvankam kiel dirite la TDA-bataliono origine havis la taskon gardi kaj sekurigi gravajn militajn objektojn, ĝi tamen estis baldaŭ destinata ankaŭ por la amasmurdo de la judoj. En la mortigoj okazintaj en la VIIa fortikaĵo de Kovno partoprenis precipe la 1a kaj 3a kompanioj, la ĉi-lasta sub la gvido de la menciitaj Norkus, Barzda kaj Dagys. Parto de la soldatoj ne eltenis la premon kaj la murdojn kaj klopodis liberiĝi de la armea servo kaj baldaŭ forlasis la batalionon.[246] Ekzemple Bronius Kirkyla dizertis kaj faris suicidon,[247] la gvidanto de la 1a kompanio (ĉu la sama?) mortpafis sin, kaj lia anstataŭanto, Paulauskas, kaj du aliaj estis liberigitaj de la servo. Tiel, jam inter la 5a kaj 11a de julio 117 soldatoj eksiĝis el tiu bataliono. Tamen, multaj viroj restis. Tiel, la 2an de aŭgusto 1941 209 judoj estis mortigitaj de tiu bataliono. Sub la gvido de leŭtenantoj Barzda kaj Skarzinskas la anoj de la bataliono devis preni la viktimojn el la Mickevičiaus-prizono kaj alporti ilin al la IVa fortikaĵo. Sub la komando de Barzda kelkdek litovoj kaj germanoj mortpafis tiujn homojn, kaj la aliaj anoj de la bataliano gardis la murdejon. La mortpafado daŭris ĉirkaŭ 2 horoj. Ankaŭ poste la 3a kompanio partoprenis en ĉiuj ceteraj murdoj en la IVa kaj IXa fortikaĵoj, inter kiuj tiu de la 29a de oktobro 1941 estis la plej granda: 9200 personoj trovis la morton. Ankaŭ en la murdo de judoj, kiuj estis transportitaj el la Germana Regno al Kovno, partoprenis anoj de la 1a kompanio de la TDA-bataliono. Resume: Inter la 7a de julio kaj la 11a de decembro 1941 la 1a TDA-bataliono murdis kune kun germanaj SS-anoj en la fortikaĵoj de Kovno proksimume 26´000 homojn, ĉefe judojn el Litovio, Germanio, Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio.

Krome, anoj de la 3a kompanio de la 1a TDA-bataliono helpis al la germanoj ankaŭ murdi judojn en la provinco, aŭ kamparo, kie furoris la Einsatz-grupo A de Karl Jäger kaj la „rulkomando“ de Joachim Hamann. Tiel, minimume 11´598 personoj estis mortigitaj de la 3a kompanio almenaŭ en 15 lokoj de la provinco. Tio signifas, ke la 1a TDA-bataliono mortigis kune kun la germanoj kaj litovaj „partizanoj“ entute ĉirkaŭ 39´000 personoj, ĉefe judojn kaj verŝajne ankaŭ civilulojn kaj sovetiajn militkaptitojn. Se aliaj partoprenoj de la 1a TDA-bataliono, kiuj estas menciitaj en la raporto de Jäger, estos pruveblaj, tiu murdorgio eventuale kaŭzis eĉ 60´000 viktimojn. En la jaroj 1942-45 la 1a (13a) bataliono ne plu efektivigis murdojn de la judoj.

[242] Stang 1999, p. 145.
[243] Fonto: http://www.gedenkorte-europa.eu/de_de/article-bronius-norkus-1914-ndash-1942.html.
[244] Fonto: http://www.plienosparnai.lt/page.php?510.
[245] Fonto: http://suduvis.lt/2014/04/22/balandzio-23-diena-delcia.
[246] Stang 1999, p. 147s.
[247] Dieckmann 2011, p. 313-337.

*Aliaj litovaj batalionoj:* Per la enoficigo de majoro **Antanas Impulevičius**[248] kiel komandisto komenciĝis la 7an de aŭgusto 1941 la starigo de la 2a TDA-bataliono (de februaro 1942 ĝi funkciis kiel 12a bataliono). La dua komandisto de tiu bataliono post Impulevičius estis **Juozas Krikštaponis**.[249] Ĉi tiu bataliono, en kiu servis 23 oficiroj kaj 464 suboficiroj kaj soldatoj, estis sendita al Minsko, dum en Kovno restadis 41 anoj. En Belorusio ĉi tiu bataliono mortigis kune kun la germanoj 46´000 homojn, ĉefe judajn civilulojn kaj sovetiajn militkaptitojn, krom tio oni pendigis 12 sovetiajn partizanojn. Poste Krikštaponis estis translokita al Lublino kadre de la 252a polica bataliono.




Antanas Impulevičius, Antanas Baltūsis-Žvejys[250], Juozas Krikštaponis[251]
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

En aŭgusto 1941 estis starigita la *3a (11a) TDA-bataliono* sub la komando de kapitano Švilpa. Krom la gardo de militaj objektoj ĉi tiu bataliono devis gardi la kovnan geton. La tasko estis eviti, ke judoj eskapu ĝin. Ne eblis pruvi, ke tiu bataliono partoprenis en amasmurdoj, sed verŝajne ĝi tamen partoprenis ilin, ĉar kiel 11a bataliono en aprilo 1942 ĝiaj anoj estis senditaj al Ukrainio, kie la taĉmento mortigis partizanojn kaj ties komplicojn. En 1944 la bataliono revenis al Kovno kaj estis malfondita.

La *4a (7a) TDA-bataliono* estis starigita en aŭgusto/septembro 1941. Ĝi servis en la Šančiai-kazerno de Kovno kaj gardis armeajn tendarojn kaj pontojn. Post sia transformado al la *7a bataliono* en aprilo 1942 ĝiaj anoj estis senditaj al Ukrainio, kie ili gardis sovetiajn militkaptitojn en la regiono de Vinnica. Kune kun germanoj kaj ukrainaj policistoj litovaj anoj de la bataliono mortigis ĉirkaŭ 300 judojn.

La *1a litova polica bataliono de Vilno* sekurigis en 1941 pontojn, armeajn instalaĵojn kaj koncentrejojn por militkaptitoj en Vilno sed ankaŭ helpis forigi la judojn el siaj loĝejoj en Vilno kaj Trakai por peli ilin en la geton. En printempo kaj somero 1943 ĝi partoprenis ankaŭ en la murdado de judoj de la vilna geto kaj aliaj koncentrejoj en Litovio. En aprilo anoj de la bataliono partoprenis en la ekzekutado de judoj en Paneriai. La nombro de murditaj judoj estas ĉirkaŭ 5000. Krom tio, anoj de tiu ĉi bataliono gardis la labortendarojn de la vilna geto en Rieše, Kena kaj Bezdonys, kie kelkcent judoj laboris en torfejoj. La komandisto de la ´tendaro´ de Bezdonys nomiĝis **Borisas Baltutis**. La 9an de julio 1943 tie aperis SS-Oberschargvidanto Bruno Kittel por mortigi la judojn. La ´tendaro´ de Kena estis komandita de **Juozas Mačys**.[252] En julio oni mortigis la judojn ankaŭ tie. La litovaj soldatoj akompanis la judojn ĝis la pafejo, kie pereis 240-300 homoj. Kiam la ´loĝantoj ´ de la ´tendaro´ en Rieše eksciis, ke la judoj de la du aliaj tendaroj estis mortigitaj, ili fuĝis. Ĉar la loka komandisto **Jonas Narkevičius** ne sukcesis eviti tion, li postulis helpon el Vilno. La judoj, kiuj postvivis, estis transportataj en la vilnan geton. La bataliono estis malfondita en somero 1944.

La *2a litova polica bataliono de Vilno* estis komandata de subkolonelo **Petras Vertelis**. En tiu ĉi bataliono servis 18 oficiroj kaj 450 policistoj. Ekzistas informoj, ke tiu ĉi bataliono partoprenis en la

[248] Vd. sub http://lt.wikipedia.org/wiki/Antanas_Impulevičius.
[249] Vd. http://lt.wikipedia.org/wiki/Juozas_Krikštaponis.
[250] Fonto: http://www.xxiamzius.lt/archyvas/xxiamzius/20030312/atmi_04.html.
[251] Fonto: http://www.llks.lt/Varpo%20straipsniai/Ceponis%20apie%20Krikstaponi.html.
[252] La 19an de januaro 1945 okazis en Litovio jurproceso kontraŭ Baltutis kaj Mačys, en kiu ambaŭ ricevis la mortpunon (vd. http://forum.axishistory.com/viewtopic.php?f=6&p=1748530).

forpelado de judoj el ties loĝejoj kaj en la enprizonigo de judoj en la malliberejon de Lukiškės. Sub la gvido de leŭtenanto Sakalas de la 2a kompanio ĉirkaŭ 500 el tiuj judoj estis senditaj al Paneriai kaj mortigitaj tie. Laŭ sovetiaj fontoj fine de septembro 1941 anoj de tiu ĉi bataliono kondukis proksimume 2000 judojn al Paneriai, kie ili gardis ilin dum la murdado. Laŭ la raporto de Jäger, la 2an de septembro 1941 en Vilno estis likviditaj 3700 judoj, la 4an de oktobro 1941 kromaj 1983 judoj. La rekta partopreno de tiu ĉi bataliono en pliaj mortigoj de judoj dume ne estas pruvebla. En novembro de la sama jaro la bataliono estis translokita al Lublino (Pollando), kie ĝi reformiĝis kiel *252a polica bataliono* kaj devis gardi la koncentrejon de Majdanek. La litovaj policistoj patroladis inter la turoj de la ekstera dratbarilaro. Krom tio ili gardis la transportojn inter la stacidomo kaj la koncentrejo, kondukis la kaptitojn al diversaj laborejoj ekster la koncentrejo kaj kontrolis ilin dum la laboro. La ĉefo de unu el la kompanioj nomiĝis **Antanas Baltūsis-Žvejys**.[253] En novembro 1942 la bataliono forlasis Lublinon kaj revenis al Kovno. La fina sorto de tiu ĉi bataliono estis tragika, aŭ almenaŭ surpriza: Servante en 1943/44 en la kontraŭbatado de partizanoj, ĝi estis trafita apud Marijampolė de la sovetia artilerio; multaj batalionanoj pereis, dum iuj sukcesis fuĝi aŭ povis atingi Germanion, kie ili estis disdividataj laŭ diversaj germanaj armeaj taĉmentoj.

En la *3a litova polica bataliono de Vilno* servis 24 oficiroj kaj 607 policistoj. Per tio ĝi estis kvante la plej granda litova polica bataliono. Ankaŭ ĉi tiu bataliono partoprenis en la murdado de judoj en Paneriai antaŭ ol ĝi estis translokita al Minsko en Belorusio. Ambaŭfoje estis mortigitaj 500-600 judoj. Post la likvido de la judoj la murdistoj ŝtelis ilian posedaĵon. Post sia aktiveco en Belorusio, pri kio dume nenio estas konata, la bataliono retiriĝis en 1944 tra Litovio al Germanio, kie ĝi estis malfondita.

En Panevežys funkciis la *10a litova polica bataliono*, kiu ampleksis 280-300 membrojn. Krom pri la engetigo kaj gardado de judoj, anoj de ĉi tiu bataliono partoprenis ankaŭ la organizadon de murdoj de la judoj. La plej signifaj likvidoj de judoj okazis en aŭgusto 1941 en la arbaroj de Žalioji kaj Pajuostė, kie pereis 7523 judoj - 1312 viroj, 4602 virinoj kaj 1609 infanoj. En januaro 1943 ĉi tiu bataliono estis malfondita.

La diversaj kompanioj de la *14a litova polica bataliono*, konsistanta el 332 anoj, servis en Šiauliai, Telšiai kaj Plungė. La 1a kompanio (55 homoj) partoprenis en oktobro 1941 en la neniigo de la geto en Žagarė kaj en la mortigo de ties judaj enloĝantoj; tiel pereis 2236 personoj (633 viroj, 1107 virinoj kaj 496 infanoj). La judoj estis mortpafitaj de gestapanoj el Linkuva kaj de anoj de la 14a bataliono, kiu estis malfondita en somero 1944 en Germanio.

Post la malfondo de la litovaj helppolicaj batalionoj okazis ilia reorganizado en formo de „Schutzmannschaft“-batalionoj. Tiuj „Schuma“-batalionoj daŭrigis la murdadon en Belorusio, precipe kontraŭ sovetiaj militkaptitoj.[254] Nur kiam Germanio kapitulacis, la murdado ĉesis.


Eblas konkludi, ke pli malpli ĉiuj litovaj policaj batalionoj en tiu aŭ alia maniero partoprenis rekte aŭ malrekte en la murdado de judoj. Precipe la 1a kaj 2a batalionoj pervertiĝis al fanatikaj mortigaj komandoj, kiuj neniigis dekmilojn da homoj en Litovio kaj Belorusio. Al la scienco restas interalie esplori la devenon kaj motivacion de la litovaj batalionanoj kial ili partoprenis en la genocido kontraŭ la judoj.[255] Kvankam en tiuj batalionoj sendube ekzistis ankaŭ radikalaj judfobiaj kaj antisemitismaj elementoj, laŭ Knut Stang la profesia karierismo kaj la persona profiliĝo antaŭ la germanoj ludis iun rolon. Laŭ Eidintas ´nur´ ĉirkaŭ 200 aktivuloj, apartenantaj ĉefe al la Sekureca Polico kaj SD, funkciis kiel pafistoj kaj murdistoj, kvankam li konfesis, ke la nombro de kunlaborintoj devis esti pli granda. Iu alia historiisto indikis, ke ĉ. 15´000 litovoj estis rekte envolvataj en la holokaŭston en Litovio.

Ankaŭ Eidintas okupiĝis pri la eblaj motivacioj de la murdistoj kaj venis al la konkludo, ke malpli la antisemitismaj sed pli forte la ekonomiaj kriterioj ludis rolon. La litovoj celis elimini la judojn, ĉar ili ĝenis ilin kiel ekonomiajn konkurentojn. Iuj membroj de la murdbatalionoj estis iamaj kunlaborantoj de la sovetia reĝimo, kiuj sidis en la malliberejo kaj sub premo pli malpli devige aŭ libervole aliĝis al la policaj batalionoj pro timo esti rearestitaj. Aliaj simple celis pliriĉiĝi per prirabado de la judoj, kiuj posedis aĵojn, kiujn litovoj ne havis. Pluraj ekzemploj de tiaj murdistoj estas analizitaj por montri ke temas pri ´la plej malbonaj elementoj de la litova nacio´. En sia klopodo iel senkulpigi la litovajn batalionanojn (kiel oni ricevas la impreson) sed sen intenco defendi la krimulojn (kiel li skribis), Eidintas aldonis la argumenton,

[253] Vd. sub http://lt.wikipedia.org/wiki/Antanas_Baltūsis-Žvejys kaj http://www.anarchija.lt/component/content/article/81-istorija/32771-trys-naciams-tarnave-lietuvos-laisves-armijos-lla-pulkininkai.
[254] Pli detale vd. Stang 1999, p. 181-191, kaj Gerlach 1998, p. 30-56.
[255] Laŭ Bubnys 2003, p. 117-131. La ĉi-koncerna anglalingva teksto estas elŝutebla sub http://www.komisija.lt/Files/www.komisija.lt/File/Tyrimu_baze/Naciu%20okupacija/Instituciju,%20asmenu%20vaidmuo/Bubnys.%20Batalionai/ENG/Research%20by%20A.Bubnys%20(english).pdf.

ke la barbareco direktata kontraŭ la judoj pli koincidis kun la sovetia ´mentaleco´ kaj ke krom tio estis finfine la naziaj germanoj, kiuj organizis la grandskalajn murdon kaj ŝtel-kolektadon kontraŭ la judoj.[256] Oni povas subkompreni, ke la litovoj estis nuraj viktimoj de sovetianoj kaj germanoj kaj ke ilia motivacio pli fontis en la kontraŭ-komunisma ideologio kaj malpli en la antisemitismo, kiel Eidintas celas kredigi. Povas esti. Laŭ tiu logiko, la amasmurdo de la judoj okazis en Litovio unuavice en la kunteksto de la kontraŭ-bolŝevismaj propagando kaj -batalo.[257] Tia interpreto tamen povas konduki al miskomprenoj pri la vera karaktero de la historia antisemitismo kaj la kialoj de la radikala holokaŭsto en Litovio. Kiel montrite supre en ĉi tiu studo, la kontraŭ-juda ´alergio´ de litovoj havas pli longan historion.

Post la milito, la litova justico povis kapti kaj akuzi antaŭ la tribunalo nur malmultajn murdistojn. Inter ili estis kvin membroj de la rulkomando de Hamann, nome la sinjoroj kun la nomoj Kriščiūnas, Lekavičius, Pačkauskas, Siročenko kaj Taparauskas, laŭ alia listo Stoskus, Jauneika, Steponkavičius, Gedivilas, Sutkus, Karalius, Grigas, Sniukas, Malinauskas, Kriukas, Lasas, Vamas, Strumskis, Augustas, Bogotkevičius, Divilaitis, Mandeika, Oželis, Kozlovskij, Ukrinas, Vaitulionis, Račkauskas, Zianonas Kiamzura (komandisto de la 1a kompanio de la litova polica bataliono), Juozas Usialis (aŭ eble Ūselis, komandisto de la 3a kompanio de la litova polica bataliono), Batutis kaj Mačys kiel supre menciite.[258] Impulevičius estis mort-kondamnita in absentia; li forpasis komence de la 70aj jaroj en Usono, kie oni rifuzis lian transdonon al la sovetiaj instancoj. Klimaitis (vd. sube) vivis ĝismorte en Hamburgo. Kontraŭ aliaj anoj de la Hamann-rulkomandoj neniam estis lanĉita jura proceso, eĉ ne kontraŭ la germanaj membroj mem. Hamann mortigis sin en julio 1945 por eviti sian arestadon.

Supre: La juda komunumo de Jurbarkas estis aparte kruele trafita de la antisemitismo dum la dua mondmilito. Kun la esenca partopreno de litovoj, la valora sinagogo, en 1790 konstruita majstroverko de la ligna konstruarto, estis detruita en 1941 kaj la judoj en tiu urbo estis neniigitaj kune kun siaj religiaj tradicioj kaj havaĵoj (vd. Atamuk 2000, p. 164). Dum la litovoj ´organizis´ la ´laboron´, la germanoj fotis la barbaran agadon. En Litovio estis bruligataj ne nur sinagogoj sed ankaŭ judaj libroj, ekzemple en Utena, Šiauliai kaj Jurbarkas.[259]
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

### 3.9. La katolika eklezio en Litovio kaj ĝia sinteno dum la holokaŭsto

Kiel montrite en la unua parto de ĉi tiu historia studo, en antaŭaj jarcentoj la katolika eklezio de Litovio ludis gravan kaj influan opinian rolon rilate al la judoj. Kiam la nazioj akaparis la povon en 1933 en Germanio, la simpatio por la hitlerismo estis sentebla ankaŭ en katolikaj medioj de Litovio. Ke naciismaj litovaj organizaĵoj ricevis la atenton de ekleziaj medioj, estis do nur logika sekvo. Fakte, LAF kaj la

256 Eidintas 2003, p. 253-72.
257 Eidintas 2003, p. 315.
258 Vd. http://forum.axishistory.com/viewtopic.php?f=6&p=1748530. Eble ne ĉiuj nomoj estas ortografie ĝuste skribitaj.
259 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_zerstörten_Synagogen_in_den_vom_Deutschen_Reich_1938_bis_1945_besetzten_Gebieten.

Provizora Registaro estis subfosataj kaj influataj de katolikaj pastroj (kiel ĉefministro Juozas Ambrazevičius, Pranas Dialinikeitis, Pranas Petraitis), kaj pluraj aktivaj katolikoj (Jonas Matulionis, Leonas Prapulionis, Petras Karveis, Antanas Maceina) faris sian kontribuon al la kontraŭjuda politiko. Same la Kristan-Demokratia Partio estis subfosata de katolikaj antisemitoj. La absoluta plimulto de litovoj konsistis el kredantaj katolikoj.

Laŭ la disponeblaj fontoj oni venas al la konkludo, ke ankaŭ la katolika eklezio de Litovio portas sufiĉe grandan *moralan* respondecon por la kruela sorto de la judoj dum la dua mondmilto en tiu lando. Multaj katolikaj ekleziuloj ne nur teorie montriĝis sinceraj apogantoj de la hitlerismo kaj t.n. nacisocialismo, kiu inkluzivis ksenofobion, antisemitismon kaj rasismon, sed ili ankaŭ subtenis la genocidon kontraŭ la judoj aŭ eĉ aktive partoprenis en ĝi. Do, eĉ se neniu jura instanco konfirmis ĝin, katolikaj ekleziuloj klare kunkulpis pri krimoj farataj kontraŭ la judoj por helpi al la germanoj kaj litovaj politikistoj efektivigi siajn celojn.

Flanke de la litova katolika eklezio la pintaj personecoj tiam estis ĉefepiskopo-metropolito **Juozapas Jonas Skvireckas**,[260] ĉefepiskopo **Mečislovas Reinys**[261] kaj episkopo **Vincentas Brizgys**.[262] Precipe la ĉi-lasta, kiu funkciis kiel praktika ĉefo de la litova eklezio, aparte senhonte malkaŝis siajn antisemitismajn sentojn. Laŭ iu raporto de la germana SD, Brizgys plene subtenis la rimedojn, kiujn la germanoj prenis kontraŭ la judoj, kio inkluzivis lian striktan malpermeson por la ekleziularo interveni favore al la judoj. Aliaj gvidaj litovaj ekleziuloj nomiĝis prelato **Mikolas Krupavičius**,[263] **Saulis Ramanauskas** kaj **Borisevičius**, kiuj same bonvenigis la militajn planojn de Hitlero kaj dividis liajn rasismajn antaŭjuĝojn. Ankaŭ ĉefepiskopo Juozapas Skvireckas mem evidente estis impresata de la hitleraj ideoj kaj nacisocialisma terminologio, kiun li fidele ripetis en sia taglibro.[264] La litovaj episkopoj ne nur ne kritikis la kontraŭjudajn pogromojn kaj la antisemitismajn leĝojn de la Provizora Registaro, ekzemple ke la judoj devas porti la flavan stelon, sed ili plene subtenis la kontraŭjudan politikon de la Provizora Registaro. Krom tio, la litovaj episkopoj eksplicite kaj nemiskompreneble esprimis al la germanoj siajn bondezirojn tra la gazetaro, radio kaj per telegramoj. Tiel, la episkopoj publikigis proklamaĵon, en kiu ili dankis al Hitler, ke li „liberigis Eŭropon“. La episkopoj Brizygs kaj Skvireckas ankaŭ subskribis la gratulan telegramon de eksprezidento Kazys Grinius (de la 7a de julio), kiun diversaj litovaj gvidantoj sendis al Hitlero okaze de la okupacio de Litovio por danki „pro la liberigo de Litovio de la bolŝevikoj“.[265] Tio estis stranga (sed certe oportunisma) sinteno, ĉar, kiel konate, la hitlerisma reĝimo ja ne estis amika al la katolika eklezio. Tamen ŝajnas, ke en tiu ideala ´malsankta alianco´ inter t.n. nacisocialismo kaj katolika eklezio probable eblis kontraŭbatali la samajn malamikojn, la komunistojn kaj la judojn. Ekzemple episkopo Krupavičius, kiu estis ankaŭ LAF-membro, benis la germanajn oficirojn, ĉeestis la mortigon de judoj kaj ordonis purigi la landon de la judoj. Dum la tuta milito Krupavičius kunlaboris kun la germanoj kaj la policaj batalionoj kaj pravigis ilian murdadon de judoj en Litovio, Pollando kaj Belorusio. En preskaŭ ĉiuj policaj batalionoj almenaŭ unu katolika pastro kontentigis la religiajn bezonojn de la murdistoj, benis ilin kaj subtenis ilian agadon „por Dio kaj la litova nacio“. La pastroj vojaĝis kun la batalionoj al la loko de ilia ´laboro´ kaj ĉeestis kune kun ili la amasmurdojn de la judoj, kies posedaĵojn ili ankaŭ rabis. Dum siaj predikoj katolikaj pastroj ´rekrutigis´ la junularon por aligi ĝin al tiuj policaj batalionoj. Unu el tiuj pastroj nomiĝis Ignatavičius. Fuĝinte kun la germanoj, li atingis Vatikanon kaj laboris tie kiel bibliotekisto kaj librotenisto dum multaj jaroj. Alia litova katolika pastro, **Lianginas Jankauskas**, naskita en 1912, el Skuodas apud Kretinga, organizis murdkomandon eĉ antaŭ la komenco de la milito, provizante ĝin per armiloj kaj partoprenante en Skuodas en la murdo de judoj, kiam la germanoj alvenis. Ĉi tiu pastro estis ankaŭ amiko de la fifama litova murdisto de judoj **Pranas Yakis**, kies grupo mortigis en Kretinga 7495 homojn, ĉefe judojn. Ankaŭ Jankauskas sukcesis fuĝi kun la germanoj kaj elmigris al Usono. Alia litova katolika pastro, **Jozepas Laukeitis**, naskita en 1873, gvidis la eklezion en la urbo Serejai. Antaŭ la milito li estis membro de la litova parlamento kaj publikigis la katolikan-antisemitisman novaĵleteron *Saltinelis* (Malgranda fonto). Dum la milito li aktive partoprenis en la murdo de la judoj de Serejai kaj aliaj lokoj, precipe virinoj kaj infanoj. La pastro **Justinas Lelesius**, kiu estis konata sadisto, partoprenis en la murdado de judoj kadre de la batalionoj, precipe en Kovno, lige kun la likvido de eksterlandaj judoj en la IXa fortikaĵo. Lelesius ´deĵoris´ ankaŭ en Lublino, kie unu el la litovaj batalionoj helpis gardi la koncentrejon

[260] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Juozapas_Skvireckas.
[261] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Mečislovas_Reinys.
[262] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Vincentas_Brizgys.
[263] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Mykolas_Krupavičius.
[264] Brandišauskas en Levinson 2006, p. 233.
[265] Tory 1990, p. 317; Levinson 2006, p. 235.

de Majdanek. Post la milito Lelesius malaperis inter la „partizanoj“ en la arbaroj, kie li fifamiĝis kiel aparte kruela ulo kontraŭ sovetiaj kaptitoj. Konataj estas ankaŭ la nomoj de aliaj litovaj katolikaj pastroj, kiuj estis envolvataj en la amasmurdon de la judoj: Ekzemple la pastro **Antanas Ilius**, naskita en 1909, el Marijampolė, kiu estis amiko de Lelesius kaj aktivulo de LAF; pastro **Panava**, ano de la katolika seminariejo de Kovno, kiu partoprenis en la murdoj de judoj en la IXa fortikaĵo; pastro **Kasimir Broskas**, pastro **Santara** el Uzventis apud Šiauliai; pastro kaj LAF-membro **Ilya Stasys** el Kovno; **Leonas Sapka** kaj **Valentinas Jadversis**, pastroj en Telšiai, kiuj partoprenis en la mortigo de la judoj en sia urbo;[266] pastro **Konstantinas Siksnius** el Kiela; krome **Jonas Plankis** el Betygala, **Juozas Susnys** el Balninkai, iu **Kacanas** el Giedraičiai, **Petras Janušaitis** el Kretinga, **Venclovas Zakarauskas** kaj aliaj. **Jonas Kipas** servis kiel asistento de episkopo Brizgys. Ĉi tiuj ekzemploj estas nur malmultaj kaj reprezentas ĉirkaŭ 100 kazojn de litovaj katolikaj pastroj, kiuj estis aktive envolvataj en la genocidon kontraŭ la judoj. Kompare kun tiuj pastroj ekzistis nur malmultaj, kiuj eksplicite rifuzis partopreni en la mortigo de la judoj aŭ pretis helpi ilin (kelkaj nomoj estas konataj). La episkopoj Brizgys kaj Krupavičius fuĝis kun la germanoj kaj migris al Usono, kie ili vivis ĝis la morto. Ankaŭ la ĉefepiskopo Skvireckas fuĝis kun la germanoj kaj vivis en Aŭstrio. En sia taglibro li postlasis aron da esprimoj de admirado por Hitlero, kiun li konsideris „vera pensulo“. Episkopo Reinys, kiu dum la milito vojaĝis tra tuta Litovio por instigi la homojn kontraŭ la judoj, ne sukcesis fuĝi kun la germanoj sed estis arestita de la litov-sovetia sekureco, kondamnita al punaresto en malliberejo kaj mortis en la prizono de Vladimir en Ruslando.[267]

Meze en la tempo, kiam la judoj estis ĉasataj de germanaj nazioj kaj litovaj „partizanoj“ kaj pelataj en la geton de Kovno, la 6an aŭgusto 1941 okazis renkontiĝo de la litovaj episkopoj unuafoje post la germana okupacio, kiel unu el entute ses dummilitaj konferencoj de la litova eklezio. En la protokolo de la kunsido troviĝas, kun unu escepto, neniu noto pri la kontraŭjuda politiko, sed nur la anonco, ke oni volos helpi al tiuj judoj, kiuj baptiĝis antaŭ la 22a de junio 1941 por eviti, ke ili devos iri en la geton.[268] En oktobro okazis dua konferenco, en kiu la episkopoj mallonge traktis la temon de la judoj.[269]

Katolikaj ekleziuloj kiel la episkopo Vincentas Brizgys trovis nur cinikan respondon, kiam la judoj direktis sin al li por peti helpon. Kiam Jakob Goldberg, membro de la Juda Konsilio de la kovna geto, vizitis lin kun la demando kial la eklezio silentas, ĉi tiu episkopo senkulpiĝis per embarasaj, neniondiraj kaj ekskuzaj vortoj, ke „Mi povas nur plori kaj preĝi, sed la eklezio ne povas helpi vin.“[270] Dum renkontiĝo en junio 1941 Brizgys klarigis al rabeno Snieg, Goldberg kaj Garfunkel, ke li ne povas influi la decidon de la germanoj rilate la starigon de la geto.[271] Kiel Atamuk menciis, en oktobro 1941 Brizgys tamen direktis sin en la nomo de la episkopa konferenco al generalo Petras Kubiliūnas kun la peto ĉesigi la neniigon de la judoj. En alia kunveno kun rabeno Snieg, kiu okazis la 3an de aprilo 1943 kaj kiun Tory detale protokolis, Brizgys diris al Snieg, ke li kredas, ke estus pli bone kaŝi judajn infanojn en vilaĝaj kabanoj anstataŭ en monaĥejoj.[272] Similan negativan sperton rakontis Helene Holzman post la likvido de la infanoj en la kovna geto („Kinder“-operaco, vd. pli sube) en marto 1944: „La okazintaĵoj en la geto klare montris al ni ĉiuj ekstere, ke la tuta detruo estis planata. Ni devis fari ankoraŭ pli grandajn penojn, ankoraŭ pli multe riski por povi helpi almenaŭ al kelkaj malmultaj. Mi vizitis la jezuitan monaĥejon kaj parolis kun pastro Fulst, pri kiu oni diris, ke li havas intimajn rilatojn kun la Gestapo. Mi pensis, ke eble ĝuste pro tio li povus fari ion pli facile. La ekscelenco atente aŭskultis ĉion sed bedaŭris, ke li povas fari tute nenion.“ Ĉe multaj tiaj homoj Holzman estis same rifuzita.[273]

La trovitaj taglibraj notoj de ĉefepiskopo Skvireckas rivelis ŝokajn, kvazaŭ sensaciajn malkovrojn pri lia pensmaniero pri la judoj kaj la tiamaj okazaĵoj kontraŭ la judoj, kiujn li memorfiksis kvazaŭ kiel rekta atestanto de la eventoj, sed nur laŭ onidiroj (en la unuaj tagoj de la milito Skvireckas ne estis en Kovno sed en Linkuva, kiu nuntempe estas parto de Kovno). En la unua noto de la 24a de junio 1941 la ĉefepiskopo konfirmis, ke li estis informita pertelefone, ke en Kovno „okazas pafado inter litovaj pafistoj kaj ĉiuspecaj bolŝevikoj kaj judoj.“ Kelkajn tagojn poste li revenis al la temo kaj skribis, ke „en Kovno tre multaj judoj estas laŭdire arestitaj“ kaj ke oni „arestas precipe iujn judojn, kiuj servis sub la bolŝevikoj en

---

[266] Pri la amasmurdo en Telšiai vd. Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 674-6.
[267] Ĉi tiu ĉapitro baziĝas sur:
http://www.lithuanianjews.org.il/HTMLs/article_list4.aspx?C2014=14065&BSP=14055&BSS6=13971;
http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-5-415-01902-1_01.pdf; Vd. Brandišauskas 2006.
[268] Dieckmann 2011, p. 936.
[269] Levinson 1006, p. 235s.
[270] Atamuk 2000, p. 168.
[271] Tory 1990, p. 317.
[272] Tory 1990, p. 315.
[273] Kaiser/Holzman 2011, p. 254.

litoviaj institucioj“. La 25an de junio li notis, ke „oni daŭrigas kapti kaj aresti la judojn“, ke „ilia sorto ne estas klara“ kaj ke „multaj homoj pensas, ke almenaŭ kelkaj el ili estos mortpafitaj“; li eksciis, ke „en la radio estas anoncite, ke por unu mortigita germano estos mortpafitaj cent judoj“. Poste oni povas legi: „Novaĵoj venas el Kovno laŭ kiuj okazas reala batalo inter judoj kaj litovoj kaj germanoj“. Kaj: „La judoj freneze atakas kaj pafas tra la domoj, provante mortigi kiel eble plej multajn. Certa nombro de litovaj partizanoj, kiuj batalas kontraŭ la judoj, jam pereis. Hodiaŭ, sesdek personoj estis entombigitaj en ĉerkoj en komuna tombejo. Multaj judoj estis arestitaj kaj grupe mortpafitaj. Antaŭ ol esti mortpafitaj, ili estis devigitaj elfosi sian propran tombon.“ Kelkajn tagojn poste Skvireckis notis en sia taglibro, ke „la batalo kontraŭ la judoj estas daŭrigata“ kaj ke „la judoj ne ĉesigis siajn atakojn“, ke „ĉiuj domoj estis traserĉataj kaj grupoj de krimuloj mortpafitaj.“ Krome, li rakontis la epizodon, ke „medicina flegistino estis mortpafita kiam ŝi promenis kun paperujo (aŭ monujo)“ [en la manoj]. „La ujo estis traesplorata, kaj en ĝi estis trovitaj kugloj kaj grenadoj.“ Li ankaŭ notis, ke „la ekzekutoj estas tre doloraj“, ke „la partizanoj apenaŭ povas elteni ilin“, ke „estas mortpafitaj familioj komplete, junuloj kaj maljunuloj“. Inter ĉiuj tiuj observoj li opiniis, ke „la krimoj estas nehomecaj“ kaj ke „ekzistas listoj de litovoj, kiuj estas mortpafendaj aŭ mortigendaj en alia maniero“ [evidente fare de judoj]. Ĉiukaze li konkludis, ke la apliko de „sadismo estas tute kutima ĉe la judoj“.

Oni miras ne nur pri la ambivalentaj sentoj, kiuj devis konduki la episkopon, sed ankaŭ pri la speco de informoj, per kiuj li estis provizata kaj laŭ kiu maniero li klopodis kompreni kaj kredi ilin. Apartan atenton vekas la ofte emfazataj vortoj, ke la judoj estas arestitaj kaj mortpafitaj. Kiel ajn aspektas aŭ sonas liaj notoj, Skvireckas estis informita pri la mortiga ´kampanjo´, kiu estis lanĉita kontraŭ la judoj, tiel ke neniu povas aserti, ke li nenion sciis pri kio okazis kun la judoj. Kiel montras aliaj notoj, ankaŭ la stereotipo ´judo = komunisto´ (finfine: = krimulo = malamiko de la litova popolo) ne estis fremda al li. Ŝajnas ke Skvireckas estis adepto de la ´juda kulpo´, se li skribis en sia taglibro, ke „ne ĉiuj judoj estas kulpaj, sed la kulpaj provokis la malamon de la litova socio kontraŭ ĉiuj judoj ĝenerale“. Aliflanke, la komandanton de Kovno, Bobelis, Skvireckas trovis „terura“. Lian ambivalentan sintenon Skvireckas esprimis ankaŭ en manuskripto kun komentoj pri la „juda afero“, en kiu la litova ekleziulo timis, ke la germanoj ŝovos la tutan kulpon al la litovoj, kvankam „la litovaj partizanoj estas tiel koleraj kontraŭ la judoj, ke ili libervole mortpafas ilin“. Aliflanke, ŝajnas ke li trovis malbone, ke la „mortpafoj okazis sen tribunalo, laŭ ordonoj de kiu ajn“, kaj: „Kiam la milito estos finita kaj la britoj venkos, al la litovoj povos esti prezentita granda fakturo por tiuj masakroj“, Skvireckas timis, tiel ke „protesto devus esti subskribita de la plej eminentaj homoj en Litovio, kiel de la prezidinto d-ro Grinius kaj de mi kiel ĉefepiskopo de Kovno…“. Ĉi tiuj frazoj estas mirigaj pro pluraj kaŭzoj, kaj precipe la fino estas neatendita de katolika ´humanisto´, kiu evidente ne intencis defendi la judojn pro homecaj kialoj, sed kiu celis defendi ĉefe la honoron de la litovoj, pri kiuj li evidente timis, ke postmilite trafos ilin terura verdikto, aŭ sorto, nome la totala kulpigo de la litovoj.

La alia episkopo, Brizgys, aperis ĝis nun kiel radikala reprezentanto de la eklezio rilate la judan demandon, pro kio liaj sekvantaj konsideroj titolitaj per „Faktoj pri la judoj en Litovio“ sekvas iom surprize: „Kompreneble, la litovoj koleriĝis pri la judoj pro ilia publike demonstrata entuziasmo por la okupantoj de Litovio. Kiel ajn, estus nekorekte kaj maljuste diri, ke ĉiuj judoj de Litovio partoprenis en tia manifestacio de ĝojo. Multaj judoj ne kaŝis sian klaran indignon pri tia entuziasmo. La judoj de Litovio preferis vivi en libera kaj neokupata Litovio. Tiel ke ni ne povas diri, ke ĉiuj litovoj estas respondecaj pri tio kion la bolŝevikoj faris kontraŭ Litovio, same ni ne povas diri ke ĉiuj judoj estas respondecaj pri tio, kion la bolŝevikoj faris. Estis kaj litovoj kaj judoj, kiuj forvendis Litovion al la rusaj komunistoj, sed ilia nombro estis malgranda.“[274]

Ankoraŭ dum la milito inter litovaj ekleziuloj cirkulis iuj konsideroj pri la posedaĵo, kiun la judoj perdis kaj pri la demando kiu ricevu la rabitajn posedajojn de la judoj. Estis eldirita la opinio, ke tiu demando estas malfacile decidebla kaj ke tiu rabita juda posedaĵo ne apartenas al la soldatoj, ĉar ili ricevas salajron por sia militservo, kaj ke la soldatoj devus esti kontentaj pri tio (sic). Pro tio estus pli oportune por la litovoj, se la germanoj enkasigus tiujn posedaĵojn, ĉar finfine la germanoj portas la respondecon por tiuj agadoj. Ŝajnas ke la eklezio spekulativis, ke ĝi povus ricevi parton de tiu rabita juda havaĵo en formo de donacoj flanke de la popolo, se „malriĉuloj“ ne povis esti trovitaj, kiuj povus utiligi tiujn aĵojn. Tiu naŭza diskuto vere ne bezonas esti komentata![275]

---

[274] Levinson 2006, p. 328. La fonto ne indikis la jaron de la apero de tiu artikolo, sed ĝi estis publikigita en ´Jarlibro de la Litova Katolika Akademio de Sciencoj, vol. 14, 1999, p. 320. (Mia esperantigo el la angla traduko).
[275] Brandišauskas en: Levinson 2006, p. 238-41.



Faris nenion (efikan) por helpi al la judoj: episkopoj Juozapas Jonas Skvireckas, Mečislovas Reinys[276], Vincentas Brizgys[277], papo Pio XII, Mikolas Krupavičius. (Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Dum la milito Vatikano estis regata papo Pio XII (Eugenio Pacelli), kiu estis, laŭ Daniel Goldhagen, granda admiranto de Germanio kaj fervora malamiko de komunistoj/ateistoj *kaj judoj*.[278] Lian pasivan politikon

[276] Fonto: http://www.enciklopedija.lt/mecislovas-reinys.

[277] La bildo aperas sur diversaj retpaĝoj.

[278] Vd. Goldhagen 2002, kiu estas konvinkita, ke en la holokaŭsto malpli da judoj estus pereintaj, se la katolika kaj luterana eklezioj kaj precipe se la roma papo mem estus rigore kaj aktive protestintaj kontraŭ la persekutado kaj mortigado de la judoj en Eŭropo (ekzemple laŭ la modelo de la francaj katolikaj episkopoj, la danaj kaj norvegaj luteranaj episkopoj kaj la bulgara ortodoksa eklezio). Sed ĉar laŭ Goldhagen papoj Pio XI kaj Pio XII mem estis „apolegetoj de la antisemitisma demonologio“, tio ne povis okazi (kompare kun tiu pritakso vd. la pli pozitivan opinion de Michael Hesemann: Der Papst, der Hitler trotzte. Die Wahrheit über Pius XII. Augsburg 2008). Ekzistas disputo pri tio, ĉu la encikliko „Mit brennender Sorge“ de Pio XI, kiu estis sekrete distribuata en Germanio, estis aŭ ne estis direktata kontraŭ la nacisocialismo en si mem aŭ nur kontraŭ la lezado de la konkordato de 1933 kaj kontraŭ la mistraktado de la katolika eklezio en Germanio fare de la nacisocialistoj. La ĝusta kompreno dependas de ĝia interpretado kaj de la legado ´inter la linioj´. Ĉiukaze, la judoj aŭ iliaj diskriminacio kaj persekutado ne estis menciitaj en la encikliko (kvankam kontraŭjudaj leĝoj jam ekzistis, la amasaj pogromoj kontraŭ ili komenciĝis nur post 1937). En marto 1937 Pio XI aperigis la enciklikon „Divini redemptoris“ (Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Divini_redemptoris), kiu ĉefe kondamnis la ateisman komunismon (precipe en Ruslando, Meksiko kaj Hispanio). La vortoj ´judo´ aŭ ´nacisocialismo´ komplete mankis. Fakte, estis planata la verkado de nova encikliko, en kiu la nacisocialisma rasideologio devintus esti kondamnita; ĝi neniam aperis, ĉar la papo, kiu en septembro 1938 ankoraŭ trovis larmajn vortojn kontraŭ la antisemitismo, forpasis en februaro 1939. Ĉar ĝuste pri tiu ĉi temo la vatikanaj arkivoj daŭre estas fermataj, la demando ne estas definitive solvita. Post la milito en la romkatolika eklezio komenciĝis sensacia revizia procezo koncerne la rilatojn kun la judoj. Ne eblas trakti ĉi tie ĉiujn ĉi-temajn detalojn kaj komunikojn de la romkatolika eklezio (Vatikano), sed sufiĉas citi kelkajn gravajn referencojn. La procezon inaŭguris la fundamenta proklamo „Nostra Aetate“ de la 28a de oktobro 1965 (vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Nostra_Aetate); kvankam en ĝi la romkatolika eklezio (kadre de la Dua Vatikana Koncilio sub Johano XXIII, kiu dum la dua mondmilito servis kiel diplomato al Vatikano kaj klopodis helpi al judoj) ne kuraĝis kondamni la holokaŭston aŭ la ŝoahon (termino uzata de la eklezio), ĝi almenaŭ priplendis antisemitismon kaj rifuzis diskriminacion kontraŭ homoj pro rasaj kaŭzoj, celante precipe la judojn, kaj emfazis la komunan heredaĵon kun la judoj, kiujn oni parte absolvis de la riproĉo esti la mortigintoj de Jesuo Kristo. La rondletero „Ecclesiam Suam“ de papo Paŭlo VI de la jaro 1964 substrekis la gravecon de la dialogo kun aliaj homoj (kaj religioj) kaj inaŭguris procezon, sur kiu baziĝis ĉio sekvanta. En oktobro 1974 papo Paŭlo VI establis la Vatikanan Komisionon pri rilatoj kun la judoj. Ĉi tiu komisiono, tiam prezidata de kardinalo J. Willebrands, publikigis la 1an de decembro 1974 la „Gvidliniojn kaj sugestojn por la efektivigado de la koncilia deklaraĵo ´Nostra Aetate´“. Al tiu efektivigado apartenas: dialogo inter kristanoj kaj judoj, malkovrado de liturgiaj komunaĵoj, instruado, edukado, informado kaj kunlaborado. En 1979 la nova papo Johano Paŭlo II (Karol Wojtyła) preĝis en Aŭŝvico. Okaze de sia vizito en la roma sinagogo la 13an de aprilo 1986, la pola papo konfirmis sian abomenon pri la kontraŭjuda genocido dum la dua mondmilito kaj ripetis la principojn fiksitajn en la deklaraĵo „Nostra Aetate“, nomante la judojn „(preferataj, pli maljunaj) fratoj“, tamen kun la atentigo, ke la diferencoj inter judoj kaj kristanoj ankoraŭ ne estas forviŝitaj kaj ke oni staras nur ĉe la komenco de tiu vojo (vd. la tekston sub http://www.vatican.va/ holy_father/john_paul_ii/ speeches/1986/april/documents /hf_jpii_spe_19860413_sinagoga-roma_ge.html). En la „apostola letero“ „Sescentesima anniversario“ okaze de la 600-jariĝo de la „baptado“ de Litovio, publikigita en 1987, en kiu la litova historia mitologio estis remaĉata kaj garnata per romkatolikaj ideologiaĵoj, la judoj ricevis neniun lokon (nu kial ili devus ricevi ĝin?). En 1988 Johano Paŭlo II kondamnis antisemitismon kaj rasismon en Strasburgo, En siaj predikoj kaj paroladoj direktataj al diversaj celpublikoj en Litovio, kiun Johano Paŭlo II vizitis en 1993 (la ĉi-rilataj tekstoj estas alireblaj en la interreto sub http://www.vatican.va/ holy_father/john_paul_ii/travels/ sub_index1993/ trav_lituania_ge.htm), la pola papo dufoje menciis la dummilitan litovan episkopon Mečislovas Reinys, kiu fariĝis konata kiel aktiva antisemito, kiel viktimon de la komunismo; la nacisocialismon kaj la holokaŭston la papo kurte aludis nur unufoje lige kun sia kondamno de la marksismo, ateismo kaj de la totalismaj sistemoj, kiujn la 20a jarcento produktis, dum renkontiĝo kun intelektuloj en la vilna universitato, kie li (mis)uzis la nocion de la holokaŭsto ankaŭ en la sencoj de ekologia kaj nuklea katastrofoj (poste eĉ lige kun la aborto). En alia parolado (monto de la krucoj apud Šiauliai, kie troviĝis terura juda geto) li menciis la etnajn minoritatojn de Litovio, sed la judoj mankis. Ne estas konate (al mi), ĉu tiu papo renkontis litoviajn judojn aŭ direktis saluton al ili; sed estas konate, ke la sama papo varme salutis la kubajn judojn (!) okaze de sia vizito de Havano en januaro 1998. La 16an de marto 1998 la Komisiono aperigis la dokumenton

rilate la sorton de la eŭropaj judoj certe sekvis ankaŭ la litovaj episkopoj, kiuj agis laŭ la modelo de la plimulto de la katolikaj episkopoj en aliaj *katolikaj landoj* kiel Germanio, Aŭstrio, Italio, Slovakio, Kroatio, Pollando kaj Hungario, kie fanatikaj antisemitoj kaj ekleziuloj, kiuj simpatiis kun la NS, apogis la deportadon de judoj en koncentrejojn. Kvankam la katolika eklezio estis subpremata de la nacisocialistoj, la kontraŭjuda kaj antisemitisma sinteno en la menciitaj landoj kontribuis al tio, ke la katolikoj funkciis kiel aktivaj komplicoj kaj kunlaborantoj de la nacisocialistoj en la klopodo neniigi la internacian judaron. Ekzistas sufiĉaj pruvoj.

Krom tiuj krudaj ekzemploj de litovaj katolikaj pastroj, kiuj montris praktike neniun kompaton por la persekutataj judoj, ekzistis ankaŭ kelkaj kazoj, en kiuj katolikaj pastroj efektive klopodis helpi la judojn. En la arkivo de la juda muzeo en Vilno troviĝas dokumentoj pri 143 (stato 1996) ekleziuloj en Litovio (litovoj, poloj, rusoj kaj blankrusoj), kiuj rekte aŭ malrekte partoprenis la savadon de judoj. Ne ĉiam ekleziuloj mem kaŝis judojn, sed ili alvokis siajn komunumanojn fari tion aŭ subtenis ilin. Al kelkaj judoj oni helpis per baptado, sed ne ĉiam, se oni konstatis, ke ili celas baptiĝi nur por plu vivi. En iu kazo iu pastro havigis segilon por tranĉi la ferajn stangojn de iu prizona fenestro, tra kiu 24 mortkondamnitaj judoj povis forfuĝi. En 1941 17 judoj trovis portempan ŝirmon en la dominikana monaĥejo de Paviliniai, interalie kelkaj membroj de la organizaĵo Hasomer Hacair. Sed ĉefepiskopo Romuald Jalbrzikowski permesis tion nur, se la monaĥejo mem transprenis la respondecon. Pli poste la estrino de la monaĥejo, Bertranda (Ana Borkovska), estis arestita kaj enprizonigita. En la katolika infan- kaj fleghejmo de Vaiguva, kiun gvidis Marija Rustelkaitė, 15 judoj el la getoj de Kovno kaj Šiauliai trovis ŝirmon.[279] Atamuk menciis la pastron **Juozas Stakauskas**, kiu savis 12 judojn, kaj Jehuda Beiles rakontis pri la pastro **Stanislovas Jakubauskis** (mort. 1947), kiu helpis al li. Certe ekzistas aliaj tiaj ekzemploj (vd. la pli suban ĉapitron ´Fuĝado kaj savado de judoj´). Eidintas menciis la verkiston Marius Katiliškis, kiu savis en Pasvalys 200 judojn.[280]

Kiel ajn, la ĉefa demando, kiun oni devas starigi en la ĉapitro pri la eklezio estas, ĉu la sorto de la litoviaj judoj ne estus ricevinta alian direkton, se la litovia eklezio ne estus kondutinta konformisme, sed ´civil-kuraĝe´, ne pragmate sed idealisme, favore al la judoj, per rigora protestado. Bedaŭrinde, tio ne okazis kaj al ĉi tiu demando ne ekzistas respondo.[281]

En januaro 2000 la katolika eklezio de Litovio laŭtlegigis en ĉiuj preĝejoj oficialan proklamaĵon de la litova Episkopa Konferenco, en kiu la eklezio senkulpiĝis pri la eraroj farataj inter 1940 kaj 1990.[282] Sed tiu senkulpiĝo koncernis ĉefe la erarojn de eklezianoj kaj katolikoj, kiuj staris en la servo de KGB. La elektita formulo certe implicis la krimojn kontraŭ la judoj, sed la proklamaĵo evitis eksplicite mencii la sorton de la judoj kaj la holokaŭston.[283]

---

„Meditado pri la ŝoaho“ (la angla teksto troviĝas en la interreto sub la titolo „We Remember: A Reflection on the Shoa“, vd. http://www.vatican.va/roman_curia/pontifical_councils/chrstuni/documents/rc_pc_chrstuni_doc_16031998_shoah_en.html ), en kiu la eraroj de la „filoj kaj filinoj de la eklezio“ estis „profunde bedaŭrataj“. Referencante al pli fruaj ĉi-temaj dokumentoj de la romkatolika eklezio, la teksto, kiu estis subskribita de la komisiona prezidanto, kuria kardinalo Cassidy el Aŭstralio, de la vicprezidanto, episkopo Duprey, kaj de la sekretario, Remi Hoeckmann, pravigis la farojn de Pio XII, kiu laŭdire „savis centojn aŭ milojn da judaj vivoj“ dum la holokaŭsto. Ne nur Ignatz Bubis, prezidanto de la Centra Konsilio de la judoj en Germanio, pritaksis la dokumenton „nekontentiga“, eĉ „mizera“ (germane: armselig); ankaŭ la Diskutrondo „judoj kaj kristanoj“ ĉe la ĝenerala sekretariejo de la Centra Komitato de la germanaj kristanoj kritikis la tekston kiel „nekonvinkan“ kaj ĝiajn eldirojn kiel „nesufiĉajn, erarigajn kaj ambivalentajn“ (vd. http://www.stjosef.at/ dokumente/shoah-reflexion.htm), ĉar la eklezio skribis i.a., ke „la ŝoaho estis la verko de tipe moderna novpaganisma reĝimo“ kaj „ke ĝia antisemitismo havis siajn radikojn ekster la kristanismo“. En la „sankta“ jaro 2000 la pola papo publike prononcis en Vatikano sian ´jarmilan´ senkulpiĝon antaŭ pilgrimoj rilate la perforton, kiun ´iuj kristanoj´ efektivigis en la pasinteco (vd. http://www.mopo.de/news/ entschuldigung-fuer-die-gewalt-der-kirche---doch-kein-wort-zum-holocaust-der-papst-im-buessergewand--oberhirte-sagt--mea-culpa--,5066732,6454272.html) kaj vizitis la memorejon Jad Vaŝem en Jerusalemo, kie li priploris la holokaŭston (vd. la anglan tekston sub http://www.vaticaen.va/holy_father/ john_paul_ii/travels/ documents/hf_jp-ii_spe_20000323_yad-vashem-mausoleum_en.html). Kiel kulmino de la tuta bedaŭro- kaj pentoprocezo en la romkatolika eklezio la akto mem de la pardonpeto antaŭ la judoj sekvis en kurta preĝo ĉe la Okcidenta Muro (Muro de Lamentadoj) en Jerusalemo (vd. la anglan tekston sub http://www.vatican.va/holy_father/john_paul_ii/travels/documents/ hf_jp-ii_spe_20000326_jerusalem-prayer_en.html). (Bilancon pri ĉi tiu temo vd. ĉe G.B. Ginzel, G. Fessler: Die Kirchen und die Juden. Versuch einer Bilanz. Gerlangen 1999).

[279] Kibelka 1996, p. 289.

[280] Eidintas, p. 207, aliajn kazojn vd. p. 326s. Ŝajnas, ke Eidintas tendencas defendi la eklezion, vd. pp. 315-19, dum pri la vigla entuziasmo de la litova eklezio por bonvenigi la hitleran eraon oni legas nenion ĉe li. Laŭ tio, en la savadon de judoj estis envolvataj ĉ. 140 pastroj kaj kelkdek monaĥinoj, kaj ankaŭ Skvireckas Brizgys, Reinys, Borisevičius kontribuis.

[281] Brandišauskas en Levinson Levinson 2006, p. 231-7.

[282] La teksto estis publikigita en *Bažnyčios žinios*, n-ro 8 (104)/2000. La anglalingva traduko estas trovebla en: Levinson 2006, p. 424s. La proklamo estis subskribita de ĉefepiskopo Sigutas Tamkevičius kaj episkopo Jonas Boruta SJ, ĝenerala sekretario de la Litova Konferenco de Episkopoj.

[283] Tauber: Vergangenheitsbewältigung in Litauen. En: Lehmann u.a. 2012, p. 343.

# 4a parto:
# Pogromoj, geto, amasbuĉado kaj koncentrejo en Kovno inter 1941 kaj 1944

### 4.1. Unuaj pogromoj en Kovno kaj la komenco de la amasa mortigado de la kovnaj judoj

Post la konkero de Kovno, kiu estis ne nur la unua kaj sola litova grandurbo sed ankaŭ la provizora ĉefurbo de la lando mem (ĉar Vilno estis okupata de la poloj), fare de la germana armeo kadre de la militiro „Barbarossa", tuj eklanĉiĝis la agresoj de litovaj bandoj kontraŭ la judoj. En la urbo eksplodis paniko inter la judoj. En unua ondo de la noktoj de la 23-27aj de junio 1941 tiuj bandoj mortigis 3800 personojn, ĉefe judojn. Dum 2-3 tagoj en tiu vakua tempospaco inter la foriro de la rusa kaj alveno de la germana armeo praktike regis anarkio en Kovno, tiel ke litovaj bandoj povis facile persekuti homojn. La sorto de la judoj esence dependis de la domestroj, kiuj povis decidi pri morto aŭ vivo, ĉar la judoj riskis esti denuncitaj. Sub la cirkonstancoj de kompleta manko de normala jura ordo la litovoj ne devis timi, ke ili estos punitaj. Ankaŭ kiam la novaj germanaj mastroj komencis intertrakti kun la diversaj litovaj organizaĵoj kaj instancoj la pluan agadon kontraŭ la judoj, litovaj bandoj ĉasadis la viktimojn surstrate. Jena kazo estas konata, ke sur la Jonava-strato proksime de la ponto super la rivero Vilija litovoj devigis 25-30 judojn danci antaŭ ili, kanti judajn preĝojn kaj rusajn kantojn. Post tio ili devis surgenui kaj estis mortpafitaj. La rabeno de Vilijampolė, Salomon(as) Ossovski(s), estis senkapigita,[284] la kranioj de judaj infanoj frakasitaj, al multaj judoj estis fortranĉitaj la lango aŭ elpikitaj la okuloj.[285] Mortigitaj estis antaŭe kaj poste ankaŭ aliaj rabenoj (Gerŝon, Jona, Hurwitz, k.a.). Kune kun ili oni ekstermis ankaŭ iliajn familiojn. Estis malpermesite enterigi la mortintojn dum unu semajno. Kune kun ili oni ekstermis ankaŭ iliajn familiojn. Malfacilas diri en la konkretaj kazoj ĉu germanoj aŭ litovoj faris tion. La litova kuracistino Elena Kutorgienė observis, ke litovaj fortoj estis envolvitaj en tiujn kruelajn pogromojn.[286] Ŝajnas, ke tiu pogromo same kiel aliaj pogromoj en Vilijampolė, en kiuj pereis inter 800 kaj 1500 judoj, estis efektivigitaj de adeptoj de la litova partizana gvidanto **Algirdas Klimaitis**,[287] kiu luktis jam kontraŭ la sovetiaj okupantoj. Ŝajnas ankaŭ, ke la radikala trupo de Klimaitis, kiu ampleksis ĉirkaŭ 600 anojn, agis sendepende de LAF aŭ de la Provizora Registaro, kiuj distanciĝis de la bando de Klimaitis. Laŭ la koncerna artikolo en la *Nigra Libro pri la holokaŭsto*, kiu baziĝas je la fina raporto de la Einsatz-grupo A pri la 15a de oktobro 1941, en la nokto de la 25/26aj de julio 1941, en Viljampolė estis murditaj ĉirkaŭ 1000 judoj, bruligataj la sinagogoj kaj 60 judaj domoj en la kvartalo. Laŭ la sama fonto, en la venontaj noktoj estis mortigitaj aldonaj 2300 judoj, eventuale pli.[288]

Kiel la „duonjudino" **Helene Holzman-Czapski** (1891-1968),[289] kiu kuris tra la urbo por serĉi sian german-judan edzon Max kaj sian filinon Marie, kiuj estis kaptitaj de litovaj ribeluloj, notis en siaj memuaroj,[290] ke en Kovno en junio 1941 okazis teruraj scenoj. Kelkaj ĉeestantoj kriis „Honto por Litovio!", sed ili estis tuj silentigitaj. Laŭ **Jehoŝua Rosenfeld**, inter la unuaj viktimoj troviĝis kelkcent judoj, kiuj loĝis en la kvartalo inter la Laisvės-strato kaj la stacidomo. Li memoris, ke la litova urba komandisto Jurgis Bobelis atentigis pri la ´fakto´, ke judoj pafis kontraŭ germanaj soldatoj (probable temas pri mensogo) kaj ke li avertis, ke oni mortigos po mil judojn por ĉiu mortigita germana soldato.[291]

---

[284] Laŭ Eidintas 2003, p. 179., kiu baziĝas sur la sciigoj de rabeno E. Oŝry, estis germanoj, kiuj enpenetris en la domon de Ossovski, kiu sidis en seĝo. Ili metis lian kapon sur la talmudon, fortranĉis ĝin kaj metis ĝin sur la kornicon de la fenestro. Poste ili mortigis ankaŭ lian patrinon. Nur la 5-jara nepino, kiu kaŝiĝis sub la lito, postvivis tiun atencon. Mishell 1988, p., 21, ne konfirmis, ke Ossovski estis senkapigita, sed ke lia korpo estis treege kripligita, kio eble signifas la samon.

[285] Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 582.

[286] Atamuk 2000, p. 159.

[287] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Algirdas_Klimaitis. Foton de Klimaitis kiel litova partizano en 1950 vd. sub http://vouloir.hautetfort.com/archive/2010/02/16/pb.html.

[288] Tiaj ciferoj estas verŝajne proksimumaj kaj tiuj menciitaj de Stahlecker eventuale troigitaj

[289] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Helene_Holzman. Foton vd. sub http://jena.otz.de/web/lokal/kultur/detail/-/specific/In-Jena-ist-ein-Kinderbuch-zu-sehen-das-nie-erschien-242615060.

[290] Holzman 2000, p. 24s.

[291] Rosenfeld 1999, p. 133.

**Joheved Inčiūrienė-Čartokaitė**, kiu postvivis la geton kaj koncentrejon de Kovno, raportis pri la fiagado de la t.n. litovaj „baltaraisčiai“, kiuj portis blankajn rubandojn kaj kiuj mem nomis sin partizanoj, sed kiuj evidentiĝis kiel lojalaj – kaj aparte sovaĝaj kaj brutalaj – murdkomplicoj de la germanaj nazioj. Tiuj „partizanoj“ ĉasis judojn sur la stratoj, kaj ilia specialaĵo estis kolekti judajn knabinojn, kiujn ili kaptis kaj fortransportis al nekonataj lokoj, verŝajne al unu el la malnovaj kovnaj fortikaĵoj aŭ prizonoj. Multaj de tiuj virinoj estis seksperfortitaj kaj neniam reaperis, kio signifas, ke ili verŝajne estis mortigitaj.[292] Krom la alkoholismo la seksperfortemo estis granda problemo[293] sed fakte nenio escepta en la kazo de sovaĝaj soldatoj, kiuj okupadas fremdan teritorion kaj persekutas la lokan popolon por atingi demografian purigon.

Laŭ Markas Zingeris en la unuaj tagoj de la germana okupacio okazis pli ol 40 pogromoj.[294] Multaj judoj are forfuĝis el la urbo Kovno laŭ diversaj direktoj, sed survoje ili estis brutale atakataj de germanaj aviadiloj,[295] kaj la sovetia limo fermiĝis por rifuĝintoj. Al judoj, kiuj forlasis la urbon, la armea komandanto kaj la urbestro de Kovno malpermesis reveni, kaj domposedantoj ne rajtis akcepti revenintajn rifuĝintojn.[296] Tamen, multaj fuĝintaj judoj revenis al la urbo por reokupi siajn loĝejojn, sed ili devis konstati ŝokitaj, ke iliaj hejmoj estis aŭ prirabataj aŭ okupataj de litovoj.[297] Post la publikigo de tiu dekreto centoj da litovoj aperis en la urbo kun siaj ĉevaloj kaj ĉaroj por ´helpi´ al la judoj, kiuj bezonis ilin por translokiĝi al la geto, do tiu momento estis ankaŭ bonvena okazo por multekoste vendi aŭ ´ludoni´ siajn ĉarojn al la judoj. Kiu ne havis la necesan monon por pagi la ĉarojn, tiu devis postlasi sian posedaĵon en sia iama loĝejo.[298]

Alia fifama incidento en Kovno en tiu periodo okazis la 26an de junio 1941 en la korto de la **Lietūkis-aŭtogaraĝo**, proksime de la Vytauto-bulvardo. Temis pri la garaĝo de la Agrikultura Kooperativa Societo. La fono de tiu ĉi masakro, dum kiu oni mortbatis 50-70 (oficiale 68) homojn, precipe judojn, neniam povis esti vere esplorita kaj definitive klarigita, kvankam ekzistas tuta serio de raportoj de atestantoj, kaj fotoj, kiuj estis faritaj de germanoj,[299] kvankam fotistoj estis malhelpataj dokumenti la krimon, sed kelkaj bildoj tamen konserviĝis. Sur tiuj fotoj oni rekonas interalie dekon da civiluloj kun blankaj brakrubandoj kaj pafiloj. Sur unu foto oni rekonas junan viron, kiu pozas antaŭ la fotisto; li fariĝis konata kiel la „heroa murdisto de la Lietūkis-garaĝo“, kaj ŝajnas, ke li povis esti identigita en 1951.[300] Diversaj atestantoj rakontis,[301] ke la judoj estis devigitaj unue purigi la korton de ĉevala koto kaj poste per tuboj purigi la placon. Post tio unu post la alia estis turmentata, mortbatita per stangoj, lignaj bastonoj aŭ sufokita per akvotubo. Unu el tiuj krimuloj evidente ludis akordeonon kaj aŭdigis la litovan nacian himnon. Inter la scivolemaj spektantoj troviĝis grupo de germanaj soldatoj kaj litovaj civiluloj, kiuj aplaŭdis la murdorgion kun la aserto, ke ĉe la mortigitoj temis pri perfiduloj kaj kunlaborantoj de la komunistoj, de la sovetiaj okupantoj, de NKVD aŭ pri trompantoj de litovaj komercistoj, kiuj ricevis sian justan punon. Krom tio, ŝajnas, ke inter la spektantoj ĉeestis ankaŭ virinoj kun ties infanoj. Ĉu vere temis pri liberigitaj prizonuloj, kiuj mortbatis la viktimojn unu post la alia en la nomo de la litova nacio aŭ kiel persona venĝo, ne estas klare. Unu el la junuloj, kiu partoprenis la mortigon de la judoj, ŝajne venĝis sin pro la mortigo de siaj gepatroj, kiuj estis suspektataj kiel naciistoj. Fine, la placo, kiu estis plena de sango, devis esti purigita de la judoj mem, kiuj ankoraŭ vivis. La viktimojn oni enterigis en malnova tombejo. Inter la mortbatitoj troviĝis judaj laboristoj de iu sapfabriko, unu muzikisto, iuj komercistoj kaj lernantoj – iliaj nomoj estas konataj.

Ke ĉi tiu evento okazis estis konfirmite de la ĉefepiskopo de Litovio, Juozapas Skvireckas (!). Lin vizitis, la 28an de junio, kolonelo Balys Matulionis kaj pastro Simonas Morkūnas, kiuj eksciis tra aliaj konatoj pri la kruelaĵo en la garaĝo kaj petis la episkopon protesti ĉe la polico aŭ interveni kaj paroli kun la urba komandanto Bobelis aŭ kun la partizanoj. Sed anstataŭ Skvireckas tion devis fari lia asistento

---

292 Inčiūrienė 2003, p. 202.
293 Stang, p. 114. Dum la milito okazas ankaŭ, ke germanaj soldatoj sekspertis rusajn virinojn kaj sovetiaj soldatoj seksperfortigis germanajn virinojn.
294 Kibelka 1996, p. 273.
295 Solly Ganor detale rakontis la draman fuĝon de sia familio al Jonava en ĉap. 3 de sia libro.
296 Laŭ dekreto de la 10a de julio 1941, teksto publikigita ĉe Tory, p. 17, ĉe Levinson 2006, p. 196, kaj ĉe Mishell 1988, p. 48.
297 Mishell 1988, p. 51s.
298 Mishell 1988, p. 54.
299 Fotoj sur http://www.doew.at/erinnern/fotos-und-dokumente/1938-1945/pogrome-in-kowno-kaunas-kauen-juni-1941. La raportoj de kelkaj hazardaj atestantoj estas memorfiksitaj en: Klee/Dressen/Riess 1988, p. 35-42.
300 Vd. sub http://forum.axishistory.com/viewtopic.php?f=6&t=75091&start=15.
301 Diversaj atestantoj rakontis sur http://www.lithuanianjews.org.il/HTMLs/article_list4.aspx?C2014=14311&BSP=14307&BSS59=13971.

Kazimieras Šaulys. Kiel Skvireckas klarigis poste, „interveni koncerne la masakron kontraŭ la judoj ŝajne ne trovis grandan apogon, sed ni faris kion la homeco postulas“.[302] Ankaŭ ministro Vytautas Zemkalnis-Landsbergis[303] rimarkis la kruelan masakron en la Lietūkis-garaĝo kaj rakontis pri ĝi al sia ministraro, kiu distanciĝis de tiu krimo kaj notis en la protokolo, ke tiaj publikaj ekzekutoj estu evitendaj. Armea generalo Busch, kiu estis informita pri la okazaĵo, respondis, ke temas pri problemo de la litova interna politiko, ke li povas fari nenion kaj ke oni malpermesis al li interveni en tiu afero. Ĝis hodiaŭ ŝajne neklaras la demando, ĉu la masakro en la Lietūkis-garaĝo estis inspirita sole de la litovoj aŭ ĉu ĝi okazis en rekta kunlaborado kun la germanoj.[304]

Kiel unu el la partoprenantoj en la tiamaj masakroj en Kovno estis rekonita kaj identigita **Juozas Lukša**. Laŭ atestantoj li estis tiu, kiu fortranĉis la kapon de rabeno Salman(as) Ossovski(s)[305] kaj kiu (plej verŝajne) partoprenis ankaŭ en la masakro en la Lietūkis-garaĝo. Parencoj de Lukša neis lian partoprenon en tiuj masakroj kaj klopodis jure plendi kontraŭ la „Asocio de litoviaj judoj en Israelo“ pro misfamigo de Lukša. Litovaj fontoj konfirmis, ke Lukša partoprenis en kontraŭ-germanaj agadoj dum la germana okupacio en 1941. Post la milito Lukša engaĝiĝis en la kontraŭ-sovetia rezisto flanke de la litovaj subteraj partizanoj kaj pereis post kiam li estis arestita kaj mortigita de agentoj de la sovetia MGB (sekreta servo). Krom kiel kuraĝa partizano Lukša fariĝis konata kiel libroaŭtoro, interalie de la verko „Partizanoj“, kiu aperis en 1950 en Ĉikago.[306] Pro tiuj ´meritoj´ en hodiaŭa Litovio Lukša estas konsiderata kiel nacia heroo. En 1997 li ricevis postmorte altan ŝtatan ordenon, kaj en 2008 la loko de lia pereo estis proklamita kiel „kultura monumento“. Gimnazio en Garliava, kie li estis arestita de MGB en 1951, ricevis lian nomon, kaj pri la vivo de Lukša estis produktitaj ankaŭ iuj filmoj.[307]





[302] Brandišauskas en Levinson 2006, p. 232.

[303] Li estis la patro de la fama litova politikisto Vytautas Landsbergis, kiu ludis elstaran rolon dum la sendependiĝo de Litovio fine de la 1980aj jaroj. La 8an de majo 1990 V. Landsbergis subskribis deklaracion de la Supera Konsilio de la Litova Respubliko, en kiu oni kondamnis senrezerve la genocidon (sic) kontraŭ la juda nacio (litove: žydų tauta) dum la hitlerisma okupacio, notante ke inter la murdistoj troviĝis ankaŭ litovaj civitanoj. Estis anoncita la rekomendo restarigi la plej favorajn kondiĉojn por la judoj kaj aliaj litoviaj minoritatoj por reestabli kaj disvolvi iliajn kulturajn, edukajn, religiajn kaj aliajn instituciojn. Krome, estis emfazita la intenco, ke la litova ŝtato adekvate memoros pri la genocido kontraŭ la juda nacio. La fina frazo enhavis la averton, ke la litova respubliko ne toleros ajnajn esprimojn de antisemitismo. (La dokumento estas faksimile publikigita ĉe Levinson 2006, p. 25s. en la litova kaj angla lingvoj).

[304] Ankaŭ Eidintas 2003, p. 185-92, ne povis trovi respondon pri la kulpantoj de la masakro en la Lietūkis-garaĝo. Baziĝante sur (ekzil-)litovaj fontoj, li tendencas vidi germanajn naziojn kiel aŭtorojn de tiu masakro kaj evitis ekplicite kulpigi litovojn, ĉar oficiala kulpigo ne ekzistas. Krom tio li bedaŭras, ke la demando de la litovaj viktimoj ne estas traktataj en la juda memuara literaturo (p. 207). Pliajn indikojn pri la masakro en la Lietūkis-garaĝo vd. diverslingve sub http://en.wikipedia.org/wiki/Kaunas_pogrom.

[305] Laŭ Eidintas 2003, p. 179, germanoj mortigis lin.

[306] En 2010 aperis germanlingva traduko ĉe http://www.baltart.ch/buecher.php. En la parto pri la jaroj 1944-45 oni nenion legas pri la sorto de la judoj de Kovno kaj Litovio ĝenerale dum la dua mondmilito. Male: Pere de kelkaj ekzemploj de ´malbonaj´ judoj estis firmigata la mito pri la negativeco de la judoj. Tiel, sur p. 79s. estas menciita iu „esplorjuĝisto“ (en sovetiaj koncentrejoj) J., kiu estis de juda deveno kaj identigita de Roduner kiel Nachmanas Dušanskis (1919-2008), kiu laŭ Lukša „apartenis al la aparato, kiu detruis nian popolon“ (t.e. la litovan) kaj kiu kiel NKVD-kunlaboranto estis kunrespondeca pri arestadoj kaj deportadoj de litovoj kaj partoprenis en la likvido de la litova partizana movado. Post kiam li okupis gvidajn funkciojn en la sovetia KGB, en 1989 li elmigris al Israelo. En 1996 la litova prokuroraro akuzis lin pro la partopreno en la „genocido kaj en krimoj kontraŭ la homeco“. Sed Israelo (kie li mortis) rifuzis transdoni lin al la litova justico. Sur p. 90 estas menciita alia ekzemplo de ´negativa´ judo, fakte NKGB-ano, kiu estis kaptita de litovaj partizanoj en la vilaĝo Dūmiškės kaj kiu „kondamnis siajn kaptitajn kamaradojn kaj konfesis sian propran malkulpon“. Sur p. 93 estas ankaŭ menciite, ke la familio de la onklo de Lukša kaŝis judojn dum la milito kaj ke unu el tiuj judoj poste helpis al tiu onklo.

[307] Vd. http://ru.wikipedia.org/wiki/Лукша,_Юозас. En la Esperanto-versio oni rezignis mencii lian eventualan rolon en la kontraŭjuda genocido en Kovno de la jaro 1941.

Supraj bildoj: La nekonata mortigisto de judoj de Kovno (https://en.wikipedia.org/wiki/Kaunas_pogrom); Homoj spektas en la garaĝo de Lietukis la mortigitajn viktimojn (https://lt.wikipedia.org/wiki/Lietūkio_garažo_žudynės, https://en.wikipedia.org/wiki/Kovno_Ghetto). (Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Pliajn fotojn de masakroj kontraŭ judoj en Kovno vidu ĉi tie:

https://www.doew.at/erinnern/fotos-und-dokumente/1938-1945/pogrome-in-kowno-kaunas-kauen-juni-1941

https://www.alles-ueber-litauen.de/litauen-geschichte/lietukis-massaker-1941.html

https://www.google.de/search?q=Judenpogrome+Kaunas&tbm=isch&tbo=u&source=univ&sa=X&ved=0ahUKEwior7rQ-YnZAhUI7RQKHShRCgwQsAQITA&biw=1366&bih=595

https://www.google.de/search?biw=1366&bih=595&tbm=isch&sa=1&ei=Ms11WrWOJIq3UfaauvAJ&q=Pogroms+Kowno&oq=Pogroms+Kowno&gs_l=psy-ab.3...1819340.1823097.0.1823404.13.13.0.0.0.0.221.1626.4j7j2.13.0....0...1c.1.64.psy-ab..0.8.1167...0j0i67k1j0i19k1j0i30i19k1.0.WCyBpo4Z6eU

http://www.audiatur-online.ch/2017/04/21/die-unsrigen-enthuellungen-ueber-den-holocaust-litauen/

Por „fari ordon“ kaj „doni strukturon“ al la likvido de la judoj, la masakroj estis daŭrigataj en ´pli bone organizata maniero´ pli kaj pli ofte en la VIIa fortikaĵo, kie pereis la plimulto de la judoj en la unuaj semajnoj de la germana okupacio. Ĉirkaŭ Kovno ekzistis sistemo de 9 malnovaj fortikaĵoj,[308] kiuj funkciis kiel malliberejoj kaj loĝejoj por soldatoj. Fakte, jam al la diktaturo de Smetona tiuj fortikaĵoj servis kiel malliberejoj por politikaj kontraŭuloj. Multaj judoj estis malliberigataj en la centra kovna prizono ĉe la Mickevičius-strato. Sed baldaŭ, t.e. jam fine de junio 1941, tiu prizono estis plenplena, tiel ke la germanoj devis enprizonigi la judojn kaj aliajn homojn en la VIIa fortikaĵo. Ĉar la VIIa fortikaĵo estis sub la komuna german-litova kontrolo (t.a. de TDA kaj Ehrlinger, Šimkus kaj Norkus), pri ĝia administrado respondecis ankaŭ membroj de la Provizora Registaro, kiuj planis transformi la VIIan fortikaĵon al koncentrejo por judoj. Ĝis la 6a de julio en la VIIa fortikaĵo estis mortpafitaj de TDA ĉirkaŭ 5000 personoj, ĉefe judoj. La nomoj de tiuj litovoj, kiuj apartenis al la koncernaj kompanioj de tiu bataliono, estas konataj;[309] esence temas pri la homoj de la taĉmento de Norkus, kiu gvidis la 4an kompanion. Post la masakro de la 6a de julio en la VIIa fortikaĵo Stahlecker, cetere la ĉefo de Jäger, revenis „ŝokita“ al Kovno kaj senkulpiĝis (!) ĉe la germana armeo kun la klarigo, ke „temis pri agresoj de la nervoziĝintaj litovoj“. Kia ciniko! Laŭ tiama observo, ankaŭ Jäger, kiu alvenis kun sia adjutanto Joachim Hamann la 29an de junio en Kovno por transpreni la komandon de Ehrlinger kaj la sekurecpolicajn respondecojn, estis „terure kolera“. Post la milito Jäger, kiu ne estis malpli kruela tipo ol la aliaj germanaj SS-oficiroj, diris, ke la litovoj tiam mortpafis la judojn sen havi ordonon de la germanoj. Supozeble li celis ŝovi la kulpon al la litovoj, kiuj eventuale agis propradecide por finkalkuli kun la judoj. Sed ŝajnas, ke tiuj „ŝokitaj“ germanaj oficiroj estis pli maltrankviligataj pro la danĝero, ke epidemioj povus eksplodi.

Kiel la *Nigra Libro pri la holokaŭsto* raportas, al la VIIa fortikaĵo estis alportataj ankaŭ judaj rifuĝintoj, kiuj klopodis esti evakuataj sed kiuj estis survoje kaptataj de la germana armeo. Tiel, ene de kelkaj tagoj oni pelis dekmilon da judoj en tiun fortikaĵon. La virinojn kaj infanojn oni enprizonigis en ĝiajn kazematojn sen doni nutraĵojn kaj akvon. Anstataŭ tio oni donis al ili salitan fiŝaĵon por manĝi, kio nekredeble akrigis ilian sojfemon, kaj unusola akvoborelo devis sufiĉi por 5000 homoj. La higienaj kondiĉoj estis mizeregaj kaj la mortintoj ne rajtis esti enterigataj. La viroj kaj junuloj estis tenataj malliberaj en profunda fosaĵo, kiu estis separita de la kazematoj kaj kontrolataj de ĉirkaŭaj gardistoj, kiuj priŝtelis la kaptitojn, forprenante iliajn horloĝojn, monon, ringojn. Post la ŝtelado de bonaj vestaĵoj oni kondukis ilin en la arbaron, kie ili devis senvestiĝi kaj estis mortpafitaj. Komence de julio en Kovno okazis „sporta“

[308] Informojn vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Kaunas_Fortress. Mapon vd. pli sube.
[309] Liston vd. sub http://www.lithuanianjews.org.il/HTMLs/article_list4.aspx?C2014=14436&BSP=14430&BSS59=13971, krome ĉe Stang 1999.

aranĝo, dum kiu la venkintoj gajnis jenan premion: ili rajtis elekti 25 malliberulojn de la VIIa fortikaĵo kaj persone mortpafi ilin, kion ili ankaŭ faris. Ĉu temis pri litovoj aŭ germanoj ne estas menciite en la koncerna raporto de la *Nigra Libro pri la holokaŭsto*. La 7an de julio ĉiuj knaboj sub 15-jaraj estis translokitaj de la VIIa al la IXa fortikaĵo, kune kun la virinoj, infanoj kaj beboj. La virinoj, kiuj ne eltenis tiun translokadon, estis mortpafitaj survoje apud la rivero. Ankaŭ la resto de la viroj de la VIIa fortikaĵo estis mortigitaj ankoraŭ en la sama tago.[310] La 12an de julio en la VIIa fortikaĵo estis likvidita tuta grupo de judoj, kiuj fuĝis en orienta direkto, sed kiuj ne sukcesis forlasis la landon kaj kiuj estis kaptitaj. Tie la viroj estis mortpafitaj, dum la virinoj estis portitaj al la IXa fortikaĵo, kie ili estis mortigitaj.[311]

La VIa fortikaĵo en Kovno-Petrašiūnai fifamas pro tio, ke en ĝi estis mortigitaj 35´000 sovetiaj militkaptitoj. En ĝi estis malkovritaj entute 67 tombejoj. Sed en la sama fortikaĵo pereis ankaŭ multaj loĝantoj de Kovno. Konata fariĝis la iom speciala kaj tre kortuŝa kazo de la judo Blumenthal, kiu estis, kiel li kredis, svisa civitano kaj havis belgan kristanan edzinon. La avo de tiu Blumenthal naskiĝis en Svislando kaj jam posedis la svisan civitanecon. Sekve, ankaŭ lia filo, kiu naskiĝis en Kovno, kaj lia nepo, tiu kun la belga edzino, pretendis posedi la svisan civitanecon, kiun ili heredis de sia praparenco. Post la engetigo de la kovnaj judoj, la familio de Blumenthal kalkulis je tio, ke iliaj svisaj pasportoj savos ilin kaj ke ili povos translokiĝi al Svislando. Krome ili esperis, ke la kristana kredo de s-ino Blumenthal helpos al ili eskapi la geton. Sed tiuj esperoj montriĝis tute vanaj. Kiel kutime en tiaj kazoj de miksitaj geedziĝoj, la nazioj ´sugestis´ al tiaj virinoj forlasi sian judan edzon. Evidente, la edzino de la juna Blumenthal rifuzis la rekomendon kaj ĉiukaze preferis resti kun sia edzo, kaj tial la sorto de la paro finiĝis tragike. Kvankam la paro decidis sendi leteron al la svisa konsulo en Berlino tra iu litova konato por peti helpon ĉe la translokado al Svislando, ŝajnas, ke respondon ili neniam ricevis, ĉar la nazioj, kiuj eksciis la aferon, klopodis ĝeni kaj malhelpi la efektivigon de la plano. Finfine montriĝis, ke la svisa civitaneco de la edzo kaj la kristana kredo de la belga edzino neniel helpis al la paro por liberiĝi. Iuj cirkonstancoj ankoraŭ kaŭzis, ke la Blumenthal-anoj ne estis tuj mortigitaj. SS-Oberschargvidanto **Ernst Stütz** (ĉe Tory: Schtitz), kiu pro sia nekutima brutaleco estis konsiderata kaj timata de la getanoj kiel „timiga fantomo“, persone okupiĝis pri la Blumenthal-anoj. Li retenis la svisajn pasportojn, kiujn ili, konservante dumvive, transdonis al Stütz, kiu havigis al ili dokumentojn de la geto. En certa momento Stütz bruligis la pasportojn antaŭ la okuloj de la Blumenthal-anoj. Poste, la belga edzino subite ricevis la certigon de la germanoj, ke la familio povos forflugi de Kovno al Berlino. Sed la Blumenthal-anoj neniam alvenis en Berlino aŭ Svislando. La germanoj elpensis aparte perfidan traktadon por ili. En la tago de ilia planita forflugo, unue, la gepatroj de la paro Blumenhal ne aperis (la germanoj klarigis, ke ilia flugo okazos kelkajn tagojn poste). La aŭtomobilo kun Stütz, iu alia gestapano kaj la ŝoforo, kiu devintus veturi kun la juna paro al la flughaveno, veturis en la direkto de la IVa fortikaĵo, kie la paro estis petita forlasi la aŭton por esti mortpafita per maŝina fusilo. La gepatroj de Blumenthal dume restis en la geto por kelkajn tagojn poste esti same likviditaj.[312]

La IXa fortikaĵo estis la plej terura el ĉiuj lokoj en Kovno, kiuj estis destinataj por la judoj, kiuj nomis ĝin la „fortikaĵo de la morto“, dum la germanoj cinike donis al ĝi la oficialan titolon de „Vernichtungsstelle Kauen“. Komence de la gernana okupacio la IXa fortikaĵo servis al la germanoj kiel „Aussenstelle“ de la centraj prizonoj de Kovno, en kiu ili mortpafis judajn kaj litovajn aktivulojn. Sed tie la morton trovis interalie ankaŭ po unu deputito de la Supera Soveto de USSR kaj de la Litova Sovetia Respubliko.[313]

En Vilno, la germanoj kaj litovoj ne sukcesis aranĝi tiel ampleksajn kaj sensaciajn pogromojn kiel en Kovno, kvankam ankaŭ tie ĉi pereis ĉirkaŭ 5000 judoj ĝis julio 1941. Ĉar ne por ĉiuj regionoj disponeblas fidindaj ciferoj, oni supozas, ke en tiu periodo en Litovio mortis, laŭ proksimumaj kalkuloj, 15-20´000 personoj, ĉefe judoj. Pli ol mil viktimoj pereis en pogromoj, dum la resto estis rekte mortpafita.[314]


Laŭ la decido de Reinhard Heydrich, la ĉefo de RSHA, kiu donis la ´kadran ordonon´ por efektivigi la masakrojn, estis murditaj ankaŭ sennombraj judoj en la najbaraj vilaĝoj. Interesa estas la konstato, ke en tiuj masakroj ankaŭ nejudoj estis mortigotaj, kun kiuj oni evidente celis finkalkuli pro ilia kunlaborado dum la sovetia tempo. La motivacio por la murdo estis krom antisemitismo ĉefe la deziro ŝteli la havaĵon de la judoj, do prirabi la judojn. Se por la germanoj 300 judoj signifis 300 malamikojn de la homaro, por

[310] Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 583s.
[311] Bildojn de la VII kaj IX fortikaĵoj vd. sub http://www.holocaustresearchproject.org/einsatz/ninthseventhfort.html.
[312] Detala raporto ĉe Tory, p. 394-9 (26a de junio 1943); menciita ĉe Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 586.
[313] Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 587.
[314] Dieckmann 2012, p. 186-90.

la litovoj ili signifis 300 parojn da pantalonoj aŭ 300 parojn da ŝuoj – kiel notis iu sarkasma pola atestanto en sia taglibro, kiu loĝis en vilaĝo apud Paneriai.

En la historiografio – ankaŭ Eidintas menciis ĝin – eksplodis la debato pri la demandoj, ĉu la litovaj „partizanoj“ komandis pogromojn kaj mortpafadojn kontraŭ judoj jam antaŭ la alveno de la germanoj, ĉu la litovoj iniciatis proprakalkule pogromojn, ĉu ili estis direktataj kontraŭ judoj, ĉar ili estis judoj aŭ unuavice ĉar oni riproĉis al ili, ke ili kunlaboris kun la komunistoj dum la sovetia periodo, kaj ĉu tiuj litovaj „partizanoj“ agis en la nomo de la litova naciismo aŭ ĉu ili agis sub la premo de la germanaj nazioj. Finfine temas pri la demando, ĉu tiuj litovaj murdistoj estis simple krimuloj aŭ ĉu ili agis politike. Pri tiuj altgrade embarasaj kaj konfuzaj demandoj, al kiuj oni verŝajne neniam plu trovos la ĝustajn kaj definitivajn respondojn, aperis ĉe diversaj germanaj kaj litovaj fakaŭtoroj iom nebulaj kaj tro malprecizaj klarigoj, kiuj postlasas al la leganto la impreson, unuflanke, kvazaŭ oni iel celas ŝovi la tutan respondecon al la litovoj, aŭ, aliflanke, oni intencas senŝarĝi la litovojn de ties respondeco kaj kulpo. Iusence, tiuj demandoj estas rajtigataj aŭ pravigataj, kvankam ŝajnas, ke ili estas harfendaj kaj cinikaj kaj ke ili kontribuis al la formiĝo de mitoj, kiel Eidintas avertis. Kialoj por malklareco estiĝis ankaŭ rilate la ekzaktan nombron de la viktimoj. Mi ne intencas reprodukti ĉi tiun diskuton ĉi tie sed nur citas la eldiron de la israela historiisto Dov Levin,[315] laŭ kiu armataj litovoj mortpafis judojn propainiciate jam antaŭ la alveno de la germanoj,[316] kio verŝajne estas kredinda aserto, kvankam ekzistas duboj kaj kontestoj. Sed en ĉi tiu kazo temis evidente pri litova venĝemo kontraŭ judoj pro ilia kunlaboro kun la komunistoj. La celo de la litovaj ´teroristoj´ unuavice verŝajne estis forpeli la judojn, malpli iliaj mortigo kaj likvido, kompare kun la germana politiko, kiu dekomence klare celis la neniigon de la judaro.[317]

Fakte, flanke de litovaj personecoj de la publika vivo indignitaj reagoj ne mankis post la murdado de homoj en la VII fortikaĵo. Tiel, jam komence de julio 1941 diversaj gravuloj kiel profesoro A. Purenas, rektoro de la kovna universitato, profesoro S. Kolupaila, dekano de la fakultato pri konstruado, la kuracistoj d-roj E. Kutorgienė, J. Staugaitis, V. Kairiūkštis kaj aliaj direktis al la germanoj peton ĉesigi la murdadon de la judoj. La aroganta respondo de la germanoj estis, ke ankaŭ la litovoj devos enkalkuli la saman sorton kiel la judoj mem.[318]




La 9 iamaj fortikaĵoj kaj aliaj militaj instalaĵoj en Kovno, Litovio.[319] En la IVa, VIIa kaj IXa fortikaĵoj pli ol 37´000 homoj, precipe judoj, estis mortpafitaj de germanaj nazioj kaj litovaj helpantoj. (Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Kaunas_Fortress)
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

[315] Laŭ Eidintas estas malfacile konfirmi tiajn asertojn de Dov Levin, ke litovoj mortigis per propraj manoj dekmilon da judoj dum la unuaj semajnoj. Efektive, ĉi tiu nombro estas tro alta. Pri Dov Levin, kiu naskiĝis en Kovno kaj estis membro de la subtera rezista movado de la kovna geto kaj de unu el la partizanaj grupoj, kiuj agadis en la apudvilnaj arbaroj, vd. http://www.jewishgen.org/yizkor/dovlevin/levincv.html kaj https://ru.wikipedia.org/wiki/Левин,_Дов_(историк).
[316] Levinson 2006, p. 343.
[317] Dieckmann2006, p. 134.
[318] Atamuk 2000, p. 199.
[319] Fonto: http://bats-in-towns.blogspot.ch/p/important-habitats-of-bats-in-towns.html.

Tiel, en somero 1941 en 226 urbetoj kaj komunumoj de Litovio okazis kontraŭjudaj pogromoj.[320] Laŭ la raporto de la Einsatz-komando 3, ĝis la mezo de septembro 1941 la komando de SS-standartgvidanto Karl Jäger likvidis en Litovio 76´355 personojn, ĝis la komenco de decembro 137´346 kaj ĝis februaro 1942 138´272 personojn, ĉefe judojn. Per la rapida likvido de tiu popolgrupo Jäger strebis al la celo anonci en Berlino, ke Litovio estas „libera de judoj" (pri la ´laboro´ de Jäger vd. la apartan ĉapitron pli sube).[321] En ampleksa raporto de la 1a de oktobro 1941 SS-brigadestro Franz Walter Stahlecker raportis al Berlino, ke en la okupata Litovio estis ekzekutitaj 80´311 judoj, sole en Kovno (urbo kaj provinco) 31´914, plus 763 komunistoj.[322] En sia raporto pri la „kontraŭbatalado de la judaro" Stahlecker notis, ke „sole per pogromoj la juda problemo ne povos esti solvita", pro kio „per specialaj komandoj en la urboj kaj en la ebena kamparo estis efektivigataj ampeksaj ekzekutoj". Li konkludis, ke tiu tuta agado „disvolvigis glate". Kiel interesajn krominformojn oni povas konsideri jenan noton: „Dum la organizado de la litovaj kaj latvaj fortoj ĉe la ekzekutaj komandoj estis elektataj aparte tiaj viroj, kies familiaj membroj kaj proksimuloj estis mortigitaj aŭ deportitaj de la rusoj." Stahlecker daŭrigis raporti jene: „En Litovio oni devis apliki aparte akrajn kaj ampleksajn rimedojn. Precipe en Kovno, la judoj parte estis ekipataj per armiloj, aktive partoprenis en la snajpera milito kaj aranĝis incendiojn. Krom tio, en Litovio la judoj aparte aktive kunlaboris kun la sovetianoj."

Feliĉe, jam en marto 1942 ĉi tiu nazigermana monstro mem estis mortigita de „partizanoj". Dum la flugo al Prago Stahlecker forpasis.

### 4.2. La geto kaj posta koncentrejo de Kovno kaj la amasbuĉado de la judoj laŭ pluraj fazoj

Kovno estas la sensacia ekzemplo kaj tragika simbolo por tio kiel rapide, efike kaj senskrupule oni povas mortigi en minimuma tempo maksimuman kvanton da homoj. Ĝuste kiel tia kazo Kovno estas plej ofte menciata en la faka literaturo pri la historio de la nacisocialisma okupacio en orienta Eŭropo ĝenerale kaj en Litovio kaj Sovetunio aparte. Kovno staras precipe kiel simbola nocio se temas pri la transiro al la genocido kiel ĝi estis efektivigita kontraŭ la judoj dum la dua mondmilito. En Kovno la judoj estis eĉ pli rapide mortigitaj ol ie ajn aliloke en orienta Eŭropo, kie la nacisocialistoj furoris. Pro tio Kovno okupas unikan lokon en la historio de la holokaŭsto. Sed en kaj ekster Litovio la konscio pri la amasmurdo de la litoviaj kaj alilandaj judoj estis/as malgranda. Esence nur relative malmultaj interesitoj kaj fakuloj konas la detalojn de la historio de la holokaŭsto en Kovno, la urbo kie vivis la bogepatroj de L.L. Zamenhof (1895-1917) kaj kie la kreinto de Esperanto trovis sian edzinon kaj sentis sin hejme inter judoj.[323] Ĉi tiu studo celas kontribui al la diskonigo de scioj pri la holokaŭsto en Litovio inter homoj scipovantaj Esperanton.

Unue iom da aldonaj sciigoj pri la pli frua historio de la judaro en Kovno.[324]

La unuaj judaj komercistoj (el Pollando kaj Ukrainio) atingis Kovnon dum la regadotempo de Vytautas en la 15a jarcento. Kiam en 1440 en Kovno estis malfermita kontoro de la Hanso, ankaŭ judoj aktive partoprenis en ĝia laboro. Dum en aliaj litoviaj urboj la judoj ne havis grandajn problemojn, en Kovno ili evidente ne estis bonvenaj kaj evitataj de la kristanaj litovoj kaj poloj, tial ke kutime ili ankaŭ estis rifuzataj de la lokaj aŭtoritatoj. En 1472 la litova grandprinco Aleksandro malpermesis al la judoj eniri Kovnon. Malgraŭ tio, la judoj aperis en Kovno sed devis enkalkuli esti forpelataj. La kovnaj komercistoj ege malbone rilatis al la judoj sed ankaŭ al ĉiuj aliaj fremdaj komercistoj, kiuj konkurencis ilin. En 1682 la pola reĝo Jan III Sobieski eĉ malpermesis al la judoj loĝi kaj komercadi en Kovno. Nur komence de la 18a jarcento la kovnanoj subskribis traktaton kun la judoj, laŭ kiu la judoj ricevis la rajton vivi kaj komercadi en Kovno, se ili pagas certan onon de la urbaj impostoj. Ekde 1753 la judoj loĝis precipe en la antaŭurbo Slobodka (Vilijampolė). En 1761 la judoj estis forpelataj el tiuj urbaj kvartaloj, kie ili rajtis

---

[320] Kibelka 1996, p. 273.
[321] Matthäus 1999, p. 97.
[322] En tuta Sovetunio, okupata de la germanoj, estis mortigitaj ĝis tiu dato laŭ la raporto de Stahlecker 379´829 personoj (t.e. judoj kaj komunistoj sed ankaŭ partizanoj kaj menshandikapuloj, alia prioritata ´celpubliko´ de la nazia eksterma politiko). La plenan raporton de Stahlecker de la 1a de oktobro 1941 oni trovas kiel aldonaĵon al la libro de Eidintas 2003.
[323] La domon de Zilbernik en Kovno post la renoviĝo (1993) vd. sur http://collections.yadvashem.org/photosarchive/en-us/3763815.html kaj http://mokslolietuva.lt/wp-content/uploads/2014/01/7_Esperantininku-bustine_GS.jpg. La domo funkcias kiel sidejo de Litova Esperanto-Asocio. La aŭtoro de ĉi tiu artikolo plurfoje vizitis Kovnon, unuafoje en decembro 1988.
[324] Vd. http://www.eleven.co.il/article/12010.

vivi. Kiam la judoj reaperis en Kovno eksplodis pogromoj kiel en la jaro 1761. Judaj domoj estis bruligataj kaj judoj estis forpelataj en la kvartalon Slobodka. Tiel, en 1766 la nombro de la judoj atingis en Kovno nur ĉirkaŭ mil personojn. Nur en 1782/83 la rajtoj kaj privilegioj de la judoj de Kovno estis restarigitaj, kaj ili povis denove loĝi en Kovno sed nur en kelkaj stratoj. Sed la kristanoj de Kovno, kiuj ĉiam malamike rilatis al la judoj, ripete postulis de la aŭtoritatoj, ke ili forpelu la judojn. Ekde 1795 Kovno estis parto de la Ruslanda Imperio. En 1797 la kristanaj loĝantoj de Kovno sendis al caro Paŭlo I peticion kun la postulo, ke oni forpelu ĉiujn judojn el la urbo kaj konfisku ilian posedaĵon. En 1797 la caro ordonis, ke la judoj estu lasataj en paco, povu daŭre havi siajn posedaĵojn kaj senobstakle produkti kaj komerci. Novaj limigoj estis enkondukitaj por la judoj sub Nikolao II. Sub la „liberalisma" caro" Aleksandro II. en 1858 la limigoj por la judoj en Kovno estis plene eliminitaj. Komenciĝis rapida kresko de la juda komunumo. En 1864 en Kovno loĝis 16´540 judoj, ekzistis unu sinagogo kaj 19 preĝejoj, multaj ĥederoj, lernejoj kaj bibliotekoj. Tiel, en la dua duono de la 19a jarcento Kovno fariĝis la kultura kaj religia centro en Litovio. Aparte konata fariĝis precipe la jeŝivo de Slobodka, kiu estis fondita en 1863. Fine de la 19a jarcento la nombro de judoj rapide kreskis en Kovno. En 1897 en Kovno loĝis 25´441 kaj en 1908 en tiu ĉi urbo 32´628 judoj estis registritaj, kiuj konsistigis 41,2% de la ĝenerala loĝantaro. Funkciis 1439 judaj entreprenoj. La kovnaj judoj L. Bramson kaj A.G. estis deputitoj en la Ŝtata Dumao. Dum la unua mondmilito (la 5an de majo 1915) la rusa milita komandistaro perforte forigis (aŭ evakuis) la judan loĝantaron el la kovna gmilianoj de frontsoldatoj. Sed post la „revolucio" en 1917 multaj el tiuj evakuitoj revenis al Kovno. Krom Vilno, kiu estis okupata de Pollando, Kovno, mem ekstreme litovisma, fariĝis ĉefa centro de la juda kulturo en Litovio. Komence de la 20aj jaroj en Kovno instaliĝis la centraj institucioj de la kulturaŭtonomio de la judoj en Litovio. La 4an de januaro 1920 okazis la unua kongreso de la juda komunumo, en kiu partoprenis 139 delegitoj kaj dum kiu estis elektita la Nacia Juda Konsilio de Litovio, kiu ricevis sian sidejon en Kovno. Laŭ la censo de 1923 en Kovno loĝis 25´000 judoj, kiuj formis 25% de la loĝantaro. Post kiam en 1925 parto de la instruistoj de la jeŝivo en Slobodka kun rabeno N.C. Finkel translokiĝis al Israelo, la jeŝivo daŭrigis sian funkciadon sub la gvido de rabeno A. Grodzenskij. Komence de la 30aj jaroj en Kovno aperis kvin judaj taggazetoj, ekzistis reto de judaj infanĝardenoj, bazaj kaj mezaj lernejoj kaj porinstruistaj seminariejoj, kie la hebrea (ivrito) kaj la jida lingvoj estis instruataj. En 1933 en Kovno jam loĝis 38´000 (30% de la loĝantaro). Ĉe ĉirkaŭ 70´000 enloĝantoj la judoj formis en Kovno la plej grandan etnan minoritaton. Malgraŭ la daŭra kreskado de la etne litova popolo post la unua mondmilito la urbo konservis sian judan karakteron. Kiel jam menciite, okaze de la unua sovetia okupacio en 1940 la judaj institucioj en Kovno estis fermitaj, multaj kovnaj judoj (sed ankaŭ litovoj k.a.) estis deportataj al foraj regionoj de Sovetunio. En la momento de la germana okupacio de Kovno, en tiu ĉi urbo vivis ĉirkaŭ 37-40´000 judoj.[325] Laŭ la memorando de la Juda Konsilio de la 10a de julio 1941 al la urba municipo de Kovno[326] loĝis 25´000 judoj ene de la urbaj limoj kaj 5´000 en Slobodka. En alia dokumento de la 5a de aŭgusto estis menciita la nombro de 22´000 judoj plus ĉirkaŭ 5000 en Vilijampolė. Dum la dua mondmilito multaj judoj forfuĝis de Pollando, kie ili estis persekutataj, tra Vilno al Kovno, kaj de tie nur malmultaj judoj sukcesis eskapi en aliajn landojn, kiuj estis pli sekuraj. Pri la sekvo de la sorto de la kovnaj judoj rakontos la sekvantaj ĉapitroj de ĉi tiu studo.[327]

### 4.2.1. Translokiĝo de la kovnaj judoj en la geton de Slobodka

La historio de la instalado de la kovna geto havas jenan komencon: Kiam kelkaj judoj alvokis per petleteroj al Karl Jäger, ke la germanoj liberigu familiajn membrojn de la mallibereco, la 7an de julio komisiono de kvin reprezentantoj de la juda loĝantaro estis ordonita aperi ĉe la germana Sekureca Polico. Tie d-ro Walter Stahlecker, la fifama gvidanto de la Einsatz-grupo A, kaj Karl Jäger, estro de la Einsatz-komando 3, anoncis, ke oni liberigos la 3000 (!) arestitajn judojn, ĉefe virinojn kaj infanojn, nur kondiĉe ke la kovnaj judoj translokiĝos en geton destinitan por ili ene de unu monato. Kiel limdato estis ´proponita´ la 15a de aŭgusto. Stahlecker aldonis, ke tio estas la sola vojo por restarigi la „trankvilon kaj ordon" en la urbo kaj

[325] Dieckmann 1998, p. 437; 37´000 laŭ Johansen en Kruk 1999, 40´000 laŭ Kruk, pli ol 35´000 laŭ Birger 2010. En Vilno troviĝis en tiu tempo 57´000 judoj. Post la likvido de unua parto de vilnaj judoj, en septembro 1941 troviĝis 40´000 judoj en la vilna geto, de tiuj 11´000 en la malgranda kaj 29´000 en la granda geto. (Kibelka 10996, p. 274).
[326] Publikigita ĉe Tory, p. 14s.
[327] Ĉapitro verkita laŭ: http://www.eleven.co.il/print.php?id=12010, Battenberg, vol. 1. 2/2000, p. 214-33; Atamuk: Juden in Litauen 2000, p. 15-32; Niendorf 2005, p. 105-113; Haumann 1998; Atamuk 2000; Dubnow 1971; Katz 2010; Dov Levin 2000; Sutton 2008, p. 27.

por protekti la judojn kontraŭ la kolero kaj malamo de la litovoj (sic). En la espero, ke la buĉado ĉesos, la judaj komisionanoj konsentis pri la ´propono´ de la germanoj, kiu fakte estis nemiskomprenebla ordono, kaj minaco, ĉar, kompreneble, la germanoj neniel celis protekti la judojn sed koncentri kaj kontroli ilin en unu loko, kiu similis al malliberejo, fortranĉi ilin de la kontakto kun la ekstera mondo kaj, finfine, prepari ilin por la organizata likvido, kiel montros la sekva historio. D-ro **Elĥanan Elkes** (pli multe pri li vd. sube), la ĉefreprezentanto de la judoj en Kovno, alvokis la germanojn repripensi sian decidon; li sugestis la deziron instali la geton en la malnova urbo, anstataŭ en Vilijampolė, kie la vivkondiĉoj estis malbonaj. Nature, ĉi tiu ideo estis rifuzita de la germanoj. La 10an de julio 1941 la litova urbestro **Kazys Palčiauskas**[328] subskribis la ordonon pri la translokado de la judoj al la geto, kiu devis esti finita ĝis la 15a de aŭgusto. La 31an de julio – intertempe la germanoj transprenis la civilan administradon de Kovno – SA-brigadestro **Hans (Friedrich Eberhard Walter) Cramer**, la ĉefo de la civila administrado de Kovno (kiun la germanoj nomis Kauen), ripetis ĉi tiun ordonon. Samtempe, por la judoj estis enkondukitaj tuta serio de malpermesoj kaj ordonoj. Inter aliaj ordonoj, en la urbo Kovno al la judoj estis malpermesite promeni sur la trotuaroj, uzi publikajn trafikilojn kaj viziti publikajn konstruaĵojn, parkojn kaj instalaĵojn, ekzemple municipajn oficejojn, aŭ sidi sur publikaj benkoj. Judoj rajtis promeni nur dekstre de la strato, unu malantaŭ la alia. Krom tio, la judoj devis porti flavan Davidan insignon. Judoj ankaŭ ne rajtis aperi en publikaj vendofoiroj, promenadi laŭlonge de la bordo de la rivero Vilija kaj kaŝi siajn manojn en siaj poŝoj, promenante surstrate. Pliaj malpermesoj sekvis en postaj monatoj.[329] La 14an de novembro 1942 la urbestro malpermesis al la judoj promeni laŭ la Laisvės-bulvardo.[330] Kaj la 21an de decembro 1942 Cramer eldonis ordonon, laŭ kiu al la judoj estis malpermesite fumi cigaredojn ekster la geto. Kompreneble, ĉi tiuj reguloj validis ankaŭ por eksterlandaj judoj kaj por infanoj el miksitaj geedziĝoj.

Sekve, la komplete ŝokita juda loĝantaro, temis do pri kelkdekmil homoj, obeis kaj translokiĝis en la geton en Vilijampolė, aliflanke de la rivero Neris. Ĉi tiun urboparton la judoj nomis Slobodka (jide: Slabodka, Slabotka, Slabodke). Slobodka estis grava centro de la litovia judismo, en Slobodka troviĝis signifa jeŝivo (juda altlernejo) kaj aliaj gravaj judaj institucioj.[331] Tie ĉi, sur surfaco de ĉirkaŭ 70-75´000 kvadratmetroj, antaŭe vivis krom kelkmil litovoj ankaŭ jam pluraj miloj da judoj, do sume eble 12´000 homoj, ĉefe en malgrandaj lignaj dometoj. Por unu judo ne estis pli ol po ses kvadratmetroj je dispono. La translokitaj homoj povis kunporti nur kelkajn malmultajn personajn havaĵojn, kiujn ili transportis per ĉaroj tirataj de ĉevaloj kaj de ili mem. **Solly Ganor**, kiu observis la translokiĝon de la judoj al la geto, vidis kiel ambaŭflanke de la strato litovoj silente spektis la spektaklon. Kelkaj junuloj pelis la judojn kaj mokis pri ili, kaj multaj homoj atakis la ĉarojn kaj prenis laŭplaĉe kion utilan ili trovis. La familio de Ganor mem devis ´interŝanĝi´ sian loĝejon kun iu litovo Munkaitis, kies domo en la juda geto troviĝis en ekstreme malbona stato; ĝia mastro portis lipharojn laŭ la maniero de Hitlero kaj estis konstante ebria same kiel multaj aliaj litovoj, pri kiuj Ganor donis sufiĉe negativan karakterizon koncerne ties konduton rilate al la judoj.[332] La urba administracio de Kovno tute ne bonvolis konformi al la petoj de la juda transloka komitato[333] organizi la translokadon de la judoj pli civilizite kaj elteneble kaj garantii minimuman protekton.[334] Tiel, la transiro de la kovnaj judoj en la geton okazis tute kaose kaj en granda konfuzo. Laŭ la ordono de la aŭtoritatoj la „plano de la evakuado“ de la judoj devis okazi laŭ jena sinsekvo de kvartaloj, laŭ kiu la judoj devis forlasi la urbon: Laisvės-bulvardo kaj stacidoma kvartalo, Jonavos-strato, Verda Monteto, Malnova Urbo, Panemunė, Šančiai, Aleksotas.[335]

Tiel, 90% de la judoj translokiĝis en la geton jam ĝis la 1a de aŭgusto. Multaj judoj preferis translokiĝi eĉ pli frue en la geton, ĉar tie ili trovis protekton kontraŭ la furiozaj litovaj taĉmentoj, kiuj aranĝis pogromojn kontraŭ la judoj. Post kiam la germanoj forpelis la judojn el siaj loĝejoj, litovoj okupis iliajn hejmojn, dum la germanoj elektis la plej belajn inter ili.[336]

---


[328] Palčiauskas, nask. en 1907, fuĝis en 1949 al Usono, kie li forpasis en 1992 (laŭ *Orlando Sentinel*). Liaj vicestroj en Kovno estis Jonas Pikčilingas kaj Jonas Pečkaitis.
[329] La anglalingva traduko de la koncernaj dokumentoj estas publikigitaj ĉe Tory.
[330] Tory 1990, p. 153.
[331] Pri la jeŝivo de Slobodka vd. Greenbaum 1995, p. 101s. La lokon, kie iam staris la jeŝivo de Slobodka, montras http://collections.yadvashem.org/photosarchive/en-us/3763871.html, http://collections.yadvashem.org/photosarchive/en-us/3763874.html
[332] Ganor 2011, p. 59.
[333] Kiu konsistis el la sinjoroj Goldberg, Garfunkel, Gemelitzki,Wolf, rab. Snieg, M. Kopelman, Rabinovitz, rab. Ŝmukler.
[334] Dieckmann 1998, p, 442.
[335] La tutan tekston de tiu dokumento vidu ĉe Tory, p. 20.
[336] Laŭ Elena Kutorgienė-Buivydaitė en Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 666.

Unu tagon antaŭ la 15a de aŭgusto, germanaj SS-anoj ankoraŭ sovaĝe veturis tra Kovno kaj arbitre kolektis judajn virojn, kiujn ili unue alportis en la „Flavan Malliberejon“ kaj poste mortpafis en la VIIa fortikaĵo, kiu funkciis kiel koncentrejo por judoj kaj troviĝis sub la administrado de la urba komandejo de Kovno, estrata de Bobelis kaj Švipas.

La 15an de aŭgusto, je la 16a horo, la geto estis hermetike fermata per du metrojn alta dratbarilo, kiun la judoj devis mem konstrui. Tra laŭtparoliloj la germanoj elpuŝis minacojn kontraŭ la judoj kaj ordonis al ili antaŭenmoviĝi pli rapide. Neniu judo kuraĝis malfermi la buŝon por plendi, protesti aŭ starigi simplan demandon. En ĉiu ajn momento oni povis esti mortpafita, kiel **Trudi Birger**, kies familio fuĝis el Memel al Kovno, notis en siaj memuaroj.[337] Post tiu ĉi dato neniu judo rajtis loĝi plu en la malnova urbo aŭ en la antaŭurboj de Kovno. Palčiauskas strikte rifuzis akcepti judojn por diskuti kun ili pri la kondiĉoj en la geto, kiujn ĝiaj anoj celis almenaŭ iomete plibonigi.

SA-brigadestro Hans Kramer (aŭ Cramer), ĉefo de la civila administrado de Kovno, respondecis ankaŭ pri la kovna geto. Ĉi tiu fifama SA-oficiro jam kolektis multajn spertojn pri la persekutado de „malamikoj“ de la ŝtato.[338] Kiel la eksa SA-sturmgvidanto Gustav Hörmann raportis dum la proceso en Landsberg en 1946, Cramer en si mem ne estis interesita pri la likvido de la judoj sed multe pli pri ilia plena engetigo en Kovno kaj ilia ekspluatado kiel laboristoj, produktistoj kaj metiistoj, kiuj priservu ankaŭ liajn personajn interesojn. La rekta respondeculo por la kovna geto estis SA-ĉefsturmgvidanto[339] **Fritz (Friedrich) Jordan**, kiu laŭ origino estis germano el Litovio kaj kiu estis priskribita de Hörmann kiel sadisto. Ankaŭ Helene Holzman atestis la altgradan kruelecon de tiu SA-ulo. Dum la Juda Polico[340] kontrolis la internon de la geto, la eksteron gardis alterne (sinsekve) germanaj kaj litovaj policistoj, kiuj sekurigis la ĉirkaŭaĵon de la geto. La ĉefo de la Juda Polico interne de la geto nomiĝis **Moŝe Kopelman**. La Juda Polico ne havis armilojn sed nur malhele bluan ĉapon kun blanka rubando kun la blua surskribo „Juda geto-polico“. Ĉe la Juda Polico funkciis ankaŭ aparta sekcio, kiu reguligis plendojn kaj punojn. Kaj se la geto ne jam estis en si mem grandega malliberejo, ĝi havis ankaŭ sian propran internan malliberejon (!), kiu estis instalata iom poste.[341]

Sen prezenti legitimilon nur jenaj personoj rajtis eniri la geton: von Renteln, ĝenerala guberniestro, Cramer, civila ĉefo de Kovno, kaj Nabersberg, konstanta reprezentanto de NSDAP en Kovno.



La germanaj respondeculoj: Hans Cramer (1941), Franz Stahlecker (2x), Karl Jäger, Erich Ehrlinger.
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

### 4.2.2. Strukturo de la kovna geto kaj ĝiaj vivkondiĉoj

La kovna geto en Vilijampolė-Slobodka estis dividita laŭ du partoj: la „granda“ geto (kun 26´000judoj) kaj „malgranda“ geto (kun 3000 judoj). La geto havis du oficialajn ĉefenirejojn fine de la stratoj Kriščiukaičio kaj Varnių. La du partojn dividis la Panerių-strato. Se ili volis, la germanoj povis izoli ambaŭ partojn kaj interrompi la kontakton. En la norda parto de la granda geto troviĝis pluretaĝaj loĝblokoj, kiujn

[337] Birger, Trudi 1990, p. 53.
[338] Antaŭ la milito Cramer estis urbestro de Dachau, kaj en Włocławek (Leslau) li konstruis la geton kaj organizis la deportadon de la judoj.
[339] Neoficiala traduko de „Hauptsturmführer“. Mi provis esperantigi kelkajn de tiuj rangaj titoloj.
[340] Jehoŝua Rosenfeld, kiu verkis raporton pri la kovna geto, estis unu el la anoj de la Juda Polico; kune kun aliaj anoj de tiu polico li atestis la krimojn de la germanoj kaj ties litovaj helpantoj.
[341] Foton pri tiu geta malliberejo publikigis Kruk 1999, p. 131.

la rusoj konstruis por la laboristoj de la industria zono de Slobodka kaj kiuj ankoraŭ ne estis tute finkonstruitaj kiam la milito eksplodis. La domoj estis organizataj laŭ blokoj A, B kaj C. 30 mil judoj devis okupi loĝunuojn, kiuj estis antaŭvidataj por mil personoj, dum 5000 litovoj povis elekti inter 8000 loĝejoj. Do, ene de la getoj ne ekzistis sufiĉe multaj domoj kaj loĝejoj, tiel ke pluraj familioj devis loĝi kune. La tegolaj domoj en la malgranda geto estis iom pli bone ekipataj ol tiuj en la granda geto, kie krom la ´modernaj´ loĝblokoj staris ĉefe mizeraj lignaj dometoj kaj kie eĉ akvo-kanalizado ne ekzistis.[342] Do, kiel oni povas imagi, la higienaj kondiĉoj estis teruraj. Ĉar iuj litovaj oficialuloj trovis, ke la limoj de la geto estas tro vastaj, la teritorio de la juda geto estis reduktita al 70% de sia origine planata grandeco.[343] Jam la 16an de aŭgusto oni fortranĉis de la geto kvar stratojn, tiel ke la geto malgrandiĝis kaj la homoj havis ankoraŭ malpli da spaco je sia dispono por loĝi. Fine de aŭgusto estis oficiale registritaj 29´761 judoj por ambaŭ getoj.

La vivkondiĉoj en la geto do estis, kiel oni povas imagi, ekstreme malfacilaj. Nutraĵoj malabundis, ilia distribuado estis arbitra aŭ okazis laŭ certaj kriterioj kaj surbaze de speciala kupona reĝimo. Regis malsato kaj sojfo, malpureco, senespero kaj mortotimo. Ekzistis kuracistoj sed mankis medikamentoj. La nigra merkato prosperis kun la ekstera mondo, kvankam ekstere aĉeti nutraĵojn kaj alporti ilin en la geton estis malpermesite. La 25an de aŭgusto Cramer publikigis ordonon, laŭ kiu estis permesata kiel baza provizado nur po 700 gr da pano, 125 gr da viando, 112,5 gr da faruno, 75 gr da cetera nutraĵo kaj 50gr da salo por persono kaj semajno. La Juda Konsilio mem ne rajtis entreteni propran provizan ekonomion, nek transpagi monon al la geto aŭ enkasigi impostojn.[344] La germanoj fakte abolis la monekonomion en la geto por paralizi la komercajn rilatojn kun la urbo.[345] La mankohava provizado de la geto per nutraĵoj estis speciale aranĝata de iu germana funkciulo, kiu nomiĝis d-ro Friedrich Obst.

Ekzistis malgrandaj terpecoj, sur kiuj la judoj kultivis terpomojn aŭ karotojn. La semojn la judoj aĉetis sur la nigra merkato, kvankam ili ne rajtis posedi monon. Ankaŭ 8 bovinoj troviĝis en la geto (la melkita lakto devis esti transdonita al la germanaj gardistoj de la geto[346]). Ruzaj litovaj komercistoj senskrupule misuzis siajn kontaktojn kun la germanoj por akiri judajn varojn kaj posedaĵojn kaj ne interesiĝis pri tio, ĉu homoj estas mortpafitaj, se oni kaptis la judan „komercan partneron“. Hörmann rakontis la kazon de la litova policisto Sailis, kiu kolektis la monon de la judoj. Se li enkasigis de ili 1000-1500 markojn, li transdonis al la gardistoj nur 2-300 markojn, dum la reston de la mono li konservis por si mem. Komercado okazis ankaŭ trans la getaj limoj; tra la pordego de la geto penetris ne nur pano kaj terpomoj sed ankaŭ tabako kaj alkoholaĵoj. Aĉetantoj ne mankis.[347]

Kiel Tory notis komence de februaro kaj fine de junio 1943, la litovaj gardistoj estis „brutalaj, krudaj kaj traktis la judajn laboristojn kruele“. Inter ili elstaris precipe Ratnikas, litova gardisto ĉe la ĉefa enirejo de la geto, kiun eĉ la germanoj kaj litovoj mem abomenis. La ĉikanaj metodoj de Ratnikas, kiu kutimis severe kontroladi kaj traserĉadi la judojn, estis fifamaj kaj ege timataj. Ratnikas, kiu konsideris ĉiujn judojn mensogantoj, senkompate traktis ĉiujn getanojn, kiuj preterpasis lin. Lia ĉefo, Smailis, ne kondutis pli bone.[348]


En septembro 1941 la germanoj ordonis al la judoj, ke ili devas transdoni al ili ĉiujn valoraĵojn, kiujn ili posedas, do oron, arĝenton kaj monon, eĉ personajn poŝtmark-kolektojn sed ankaŭ ŝtofojn, bruton, elektrikajn aparatojn kaj transportilojn. Lige kun tio, la judoj ne rajtis vendi, interŝanĝi aŭ detrui siajn moveblajn kaj nemoveblajn havaĵojn. Nature, nur parto de la valorhavaĵoj estis fordonitaj, dum la resto estis kaŝata por povi disponi pri ĝi iam poste. La germana kaj litova policoj traesploris la tutan geton, irante de loĝejo al loĝejo, por trovi ĉiuspecajn valoraĵojn. Se la germanoj trovis kaŝitajn valorpecojn, la posedanto riskis esti mortpafita. Kiel Gustav Hörmann raportis en 1946, la germanaj nazioj alproprigis al si persone la plej bonajn pecojn de tiuj rabitaj kaj ŝtelitaj judaj valoraĵoj.

En la geto la nazioj kutimis ĉiutage arbitre pafadi kontraŭ judoj kaj tiel kaŭzis sennombrajn viktimojn, vunditojn kaj mortantojn.[349] En tio precipe virinoj fariĝis oftaj viktimoj; se virino kontraŭstaris senvestiĝi, ŝi riskis esti tuj mortpafita. Ekzemple al la patrino de Jehuda Beiles oni forhakis la fingron, kiam ŝi ne tuj sukcesis demeti sian oran ringon. Kion la germanoj ne prenis por si mem ili deponis en la

[342] Kruk 1999, pp. 106 kaj 114; Dieckmann 1998, p. 443.
[343] Mishell 1988, p. 53.
[344] Tory 1990, p. 127s.
[345] Tory 1990, p. 243.
[346] Tory 1990, p. 150.
[347] Wiehn/Smoliakovas 1992, p. 38.
[348] Tory 1990, p. 406.
[349] Birger, Trudi 1990, p. 58s.

sinagogoj de la urbo. „Orda junkro“ Wiedmann, estro de la sekcio HA IV (ekonomio), administris la rabitaĵojn. La Juda Konsilio ´pagis´ 12´000 RM, sed samtempe ĝi kaŝis tiom da oro kaj valoraĵoj por iam ajn poste havi ilin je sia dispono.

La judoj estis konstante terorigataj per amaso da germanaj ordonoj. Ĝis 1942 la Juda Konsilio ricevis entute 2500 ordonojn. Inter ili troviĝis la malpermeso de la gravediĝo kaj nasko de infanoj (julio 1942). Oficiale, al la loĝantoj de la geto estis malpermesite kontakti la eksteran mondon. La mortpuno minacis la homojn, se ili aŭskultis radion, legis gazetojn aŭ telefonis. Malgraŭ tio, la getanoj informiĝis pri la eventoj en la ekstera mondo, en Litovio, en Kovno. La komunikoj, novaĵoj kaj onidiroj fulmrapide atingis la geton laŭ plej mirindaj vojoj. Neniam oni sciis kiu alportis la mesaĝojn kaj el kiuj fontoj ili devenis.[350] Groteska estis la ordono, laŭ kiu al la judoj en la geto estis malpermesite teni hundojn sen konduki ilin ĉe la rimeno, aŭ lasi katojn sur la straton. En certa momento la judoj de la geto devis alporti ĉiujn hundojn kaj katojn al la malgranda sinagogo en la Veliuonos-strato, kie tiuj kompatindaj bestoj estis mortpafitaj.




Mapo de la situo de la kovna geto en Vilijampolė-Slobodka, 1914-44[351] (Fakte, Vilijampolė estis suburbo de Kovno kaj Slobodka estis sub-kvartalo de Vilijampolė). La sidejo de la Juda Konsilio troviĝis ĉe la dua punkto de maldekstre en la Varnių-strato
Similajn mapojn vd. sub http://www.gutstein.net/kaunas/kaunas-maps1.htm
http://www.gutstein.net/kaunas/apopup-exp-kau.html?images/ghetto/map-kovnoghetto-english.jpg
(Mapojn de la kovna geto publikigis ankaŭ Mishell 1988 vd. sub http://vilnews.com/2012-12-18271 kaj ĉe Tory 1990).
Vilijampolė-Slobodka sur Google Mondo: https://www.google.ch/maps/@54.9117422,23.8956653,2087m/data=!3m1!1e3.
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Kiel la judoj sentis sin post sia engetigo Trudi Birger skribis per jenaj vortoj: „Ni fariĝis malliberuloj, al kiuj estis malpermesite forlasi la geton, ni estis puŝataj en loĝejojn, kiuj ne sufiĉis por tiel multaj homoj. Ni estis tute fortranĉataj de la ekstera mondo, ni estis malligataj de aliaj judaj komunumoj kaj ni estis tute senprotektaj. Senpartia tribunalo ne ekzistis, same ne ekzistis ia registaro, al kiu ni povintus direkti nin. Eĉ la plej malgrandan politikan influon ni ne havis, kaj ni havis ankaŭ nenian aliron al la gazetaro. Ni

[350] Lewinson, p. 49s.
[351] Vidaĵojn pri Vilijampolė kaj aliaj urbopartoj de Kovno nuntempe vd. sub:
http://www.grazitumano.lt/w/images/b/be/Vilijampol%C4%97._Fotogr._V._Stanaitis._2010_m._818.jpg;
http://www.grazitumano.lt/wiki/index.php/KAUNAS_I%C5%A0_PADANGI%C5%B2;
http://www.orangesmile.com/common/img_city_maps/kaunas-map-0.jpg.

estis ĉirkaŭataj de germanaj soldatoj kaj de la litova popolo, kiuj pruvis, ke ili sentas murdeman malamikecon rilate al la judoj.“ Post la forpelado el la hejmo, la familio de Trudi Birger ricevis en la geto unusolan ĉambron kun kvar litoj kaj unu ŝranko. Sur la muro gluis homa sango. En la koridoro troviĝis malgranda kuirejo kaj banĉambro. La tuta familia juvela trezoro, kiun oni kunportis, servis kiel garantio de la sekureco, por interŝanĝi valoraĵojn kontraŭ nutraĵoj.[352]

La judoj do tute ne imagis la koŝmaron, kiu atendis ilin; la sento esti ĉirkaŭata nur de malamikoj, suferi nepriskribeblajn malsaton, persekutojn, pogromojn, amasmurdojn. Oni ankaŭ ne imagis, ke najbaroj, al kiuj oni pruntedonis panon kaj salon, de unu tago al la alia povis fariĝi malamikoj, kiuj misuzis la judajn najbarojn, ekspluatis ilin kaj riĉiĝis, eĉ pere de mortigo. Por ne provoki la germanojn, la judoj decidis konformi al iliaj deziroj kaj obeis. Ne povante antaŭsciii, kio vere okazos, la judoj ĝenerale fiksiĝis en la kredo, ke la milito ne povos daŭri tro longe, ke la judoj estos savitaj kaj ke ĉio ne estas tiel terura kiel ĝi aspektas en la momento, kaj ke en la geto ili estos pli sekuraj. Kompreneble, tiu kredo estis giganta fatala iluzio, ĉar la germanoj efektive urĝis por fari ´kurtan proceson´ kun la judoj. Tion neniu en la mondo povis antaŭvidi nek imagi, kaj tion neniu atendis de la germanoj, kiu estis konsiderata de la judoj kiel „kultura nacio“, kiu ne kapablos neniigi la judojn.

Fotoj de la kovna geto:

https://www.google.de/search?biw=1366&bih=595&tbm=isch&sa=1&ei=1MZ1Wv6uN4buUrbXr_gJ&q=Ghetto+Kaunas&oq=Ghetto+Kaunas&gs_l=psy-ab.3..0i8i30k1j0i24k1.162894.165597.0.165883.8.7.1.0.0.0.217.873.5j1j1.7.0....0...1c.1.64.psy-ab..0.8.886...0i7i30k1j0i8i7i30k1j0i8i13i30k1.0.gRUzJyIRSOU

La 15an de septembro 1941 Jordan komencis disdoni 5000 legitimilojn al judaj metiistoj. La nericevo de tia legitimilo, ĉar ies nomo mankis sur la koncernaj listoj, signifis la riskon esti mortigita. Pro tio okazis ankaŭ perforta rabado de tiaj t.n. „Jordan-legitimiloj“, kiuj troviĝis en la domo de la Juda Konsilio, kiu nur ŝpareme praktikis la disdonadon de tiuj dokumentoj.[353]

La oficialaj judaj laboristoj de la geto estis utiligataj unue en la internaj laborejoj kaj metiejoj de la geto mem, poste ankaŭ ekster la geto, precipe por la konstruado de la flughaveno en Aleksotas, kien ĉiutage estis sendataj miloj da laborkapablaj judoj. Ĉar dumtage multaj plenkreskuloj laboris ekster la geto, ĉefe maljunuloj restis en la geto kaj infanoj estis videblaj sur la stratoj. La 8an de septembro la armea administracio de Kovno ricevis la ordonon konstrui, ene de kvin semajnoj, 60´000 kvadratmetrojn da ŝoseo por la flughaveno, 32´000 km da stratoj, 21 flughavenajn konstruaĵojn kaj 30 barakojn. Por la konstruado de ĉio tio oni antaŭvidis la engaĝon de 7000 laboristoj, inter ili de 4000 sovetiaj militkaptitoj. Sed pro la ĝeneralaj malsatego kaj malsanado nur malgranda parto de tiu kapacito povis esti reale utiligata. Ĉiutage forpasis nemalmultaj el tiuj sovetiaj militkaptitoj. Kiu estis maltaŭga por labori, tiu estis likvidita. Por replenigi la mankojn oni devigis la judojn labori. Dum la Juda Polico devis akompani tiujn laboristojn, la litova polico gardis ilin surloke en la flughaveno, kie oni laboris tagnokte laŭ skipoj. Pro la mizeraj laborkondiĉoj reale funkciis nur la duono de la antaŭvidata kapacito de judaj laboristoj, kiuj devis plenumi pezan laboron kontraŭ ridindaj 50 pfenigoj kiel ĉiutaga ´salajro´ (en principo, la getaj judaj laboristoj ne rajtis posedi monon kaj la trovo de mono estis severe punata[354]). La urbestra oficejo de Kovno ricevis po tri markoj por ĉiu vira juda laboristo kaj po 2,5 markoj por juda virino. Kiel Holzman raportis, ĉiutage frumatene la „laborjudoj“ marŝis grupe trans la pontoj de la riveroj Vilija (Neris) kaj Nemunas kaj tra la malnova urbo de Kovno ĝis la flughaveno. La urbaj preterpasantoj, kiuj renkontis tiujn homojn, ŝajne alkutimiĝis al tiu procesio; neniu protestis kontraŭ tiu giganta maljusteco, kiu evidente lasis la homojn indiferenta. En majo 1943 laboris en Kovno 7000 judoj por la germanoj, kio signifis enspezon de entute 400´000 markoj.[355] (Pri la koncentrejo en Aleksotas vd. ankoraŭ pli sube).


---

[352] Birger, Trudi 1990, p. 53s.
[353] Kruk 1999, p. 111.
[354] Tory 1990, p. 410.
[355] Tory 1990, S. 350.

Por kvazaŭ fari iun komplezon al la judoj, en somero 1942 la germanoj permesis al la judoj por du monatoj, ke ili povas bani sin en la rivero, kiu preterfluis la geton.[356] Same estis organizita, en la halo de la iama jeŝivo de Slobodka, koncerto de la simfonia orkestro, kadre de iu porinfana festaranĝo.[357]

Kiel oni povas legi en la taglibro de Tory, de tempo al tempo aperis delegacio de inspektistoj, kiuj kontrolis la kondiĉojn en la geto: tiel ekzemple alvenis delegacio de la (litova) Labor-oficejo aŭ de kuracistoj de la Litova San-Estraro por formale kontroli la higienajn kondiĉojn, ktp. Okaze de tia vizito la doktoroj rimarkis, ke 29 personoj estis infektitaj de la tifo.[358] Ankaŭ reprezentantoj de la litova registaro vizitis la geton, kaj kun la litova direktoro de la Ruĝa Kruco okazis interparoloj, sen praktikaj rezultoj.[359] La 7an de decembro 1942 la germana ministro pri sano persone vizitis la geton por informiĝi pri la sanitara stato de la geto. Povas esti, ke tiuj vizitoj spontane iom helpis al la judoj plibonigi sian ĉiutagan vivon, kvankam ŝanĝi ilian ĝeneralan situacion tiuj inspektadoj verŝajne ne povis.

Senhelpeco, senkuraĝeco, pasiveco, letargio regis la amasojn de la getaj loĝantoj. Kiel Leo Lewinson klarigis, oni kvazaŭ rigidiĝis, ŝtoniĝis, degeneris. La apatio atingis tiel altan gradon, ke la homoj ne plu vere interesiĝis pri kio okazos kun ili morgaú, post unu horo aŭ unu minuto. Plej grave estis havi pecon de seka pano, kuiritan terpomon aŭ karoton, eĉ se nur duonputran.[360] Kiel ankaŭ **Grigorijus Smoliakovas** konfirmis, la plej grandan valoron ne havis la vivo en si mem, kiu entute neniom valoris, sed peco da pano aŭ unu terpomo.[361] Laŭ Lewinson tiu apatio estis antaŭvidata de la germanoj, eĉ antaŭplanata kaj inscenigata. La ĉeftaktiko de la germanoj rilate al la judoj konsistis en tio, ke la judoj devis fari pezan devigan laboron, havi nepriskribeblan malsaton kaj morttimon. Laŭ la ideo de la nazioj, la judoj devis esti neniigitaj per laboro. La germanoj sukcesis ne nur peli milojn da homoj malantaŭ dratbarilojn de specialaj porjudaj getoj, sed ankaŭ morttimigi ilin pere de sporadaj likvidaj operacoj, pri kiuj temas en la sekva parto. Tiujn intencojn karakterizis ankaŭ Trudi Birger per jenaj vortoj: „La nazioj aranĝis nian ĉiutagan ekzistadon konsistantan el malsato, timo, sklava laboro kaj arbitraj murdoj intence tiel, por detrui nian homecon, por meti nin ĝis nulo. En la mondo, en kiu ili devigis nin vivi, nenio, kion ni entreprenis, povis doni sencon al nia ekzistado. Nia laboro eble tenis nin vivantaj, sed ĝi servis al la bono de la plej terura malamiko, vidalvide de kiu la judoj staris.“[362]




Solly Ganor en 1945[363] (vd. https://collections.ushmm.org/search/catalog/pa1072016, http://www.easaul.com/biography.html) kaj la raportoj de Solly Ganor, Jehuda Beiles, Leo Lewinson kaj la Taglibro de Avraham Tory.

[356] Tory 1990, p. 132.

[357] Tory 1990, p. 136. Tory notis la 25an de novembro 1942, ke la konstruaĵo de la jeŝivo de Slobodka estis renovigita kaj adaptita kiel koncertejo por la polica orkestro, malgraŭ rigoraj protestoj flanke de religiaj reprezentantoj.

[358] Tory 1990, p. 142, en unika dupaĝa raporto de Jack Brauns, filo de d-ro Moses Brauns, ano de la Juda Konsilio, kiu postvivis kun sia patro la militon kaj verkis ĝin en 1988.

[359] Tory 1990, p. 149.

[360] Lewinson, p. 35.

[361] Wiehn/Smoliakovas 1992, p. 40.

[362] Birger, Trudi 1990, p. 84.

[363] Solly Ganor rakontas sub http://www.das-andere-leben.de/ganor.html (germane) kaj http://www.youtube.com/watch?v=AIzGcDtVkQc (angle). Aliajn fotojn de Solly Ganor vd. sub Gogle images.




Memuaroj de Helene Holzman, Zev Birger kaj Trudi Birger, libro de Wolfram Wette pri Karl Jäger kaj du gravaj sciencaj libroj pri la temo.

### 4.2.2. La Juda Konsilio kaj judaj eminentuloj de la kovna geto

La supera juda instanco de la geto estis la Juda Konsilio de Kovno,[364] kiu estis starigita en aŭgusto 1941 de judaj reprezentantoj, kiuj rilatis kun la germanaj instancoj. Kiel prezidanto oficis d-ro **Elĥanan Elkes**, eksa kuracisto, kiu estis elektita la 5an de aŭgusto de kvindeko da judaj konsilantoj por tiu honora ofico, kiun li unue rifuzis sed tamen akceptis post kiam rabeno Jakobo Ŝmukler povis konvinki lin. Elkes, kiu naskiĝis en Kalvarija, do en Litovio mem, studis medicinon en Königsberg, unue laboris en Belorusio kaj poste servis al litovaj politikistoj kaj al la germana ambasado.[365] Pro sia daŭra kaj kuraĝa engaĝiĝo por solvi la problemojn de siaj engetigitaj komunumanoj, Elkes ĝuis altan reputacion kaj estis komparebla kun siaj pli famaj ´kolegoj´ Jakub Gens (Vilno), Adam Czerniaków (Varsovio) kaj Ĥaim Rumkowski (Lodzo/Lizmannstadt). Sed dum Elkes, kiu vundiĝis en oktobro 1941 post kiam iu litova policisto batis lin per sia pafilo, tiel ke li falis senkonscia sur la teron, mem kuŝis en la lito, klopodis protekti kaj savi la judojn, li estis senhonte misuzata de la germanaj nazioj, kiuj celis subpremadi kaj neniigi la judojn. Dum Elkes apartenis al la „ĝeneralaj cionistoj“, lia anstataŭanto, advokato **Leib Garfunkel**, iama juda deputito en la litova parlamento, estis unu el la gvidantoj de la cionismaj socialistoj. Al la Juda Konsilio de la kovna geto apartenis ankaŭ **Jakob Goldberg**, iama oficiro de la litova armeo kaj estro de la asocio de la judaj frontbatalantoj; ambaŭ disponis pri bonaj rilatoj kun la litova polica kaj armea elitoj kaj sidis en sovetiaj malliberejoj; aliaj membroj estis d-ro **Efraim Rabinoviĉ** kaj d-ro **Israel Bernŝtejn** (sekretario), kiun anstataŭis **Abraham Golub** (alias Tory), kiu verkis unikan kronikon pri la geto.[366] Kiel kromaj membroj de la konsilio menciindas la du rabenoj **Ŝmuel Abba Snieg** kaj Jakob **Moŝe Ŝmukler** el Ŝančiai. Al la ĉefaj taskoj de la Juda Konsilio apartenis la plenumado de la germanaj ordonoj, t.e. kalkuli la nombron de engetigitaj judoj, liberigi loĝejojn kaj transdoni ilin al la germanoj, disponigi judajn laboristojn, konfiski judajn valoraĵojn k.a. Aliflanke, la Juda Konsilio klopodis ankaŭ por helpi al la judoj per ĉiuj eblaj rimedoj, ekzemple organizi la distribuadon de nutraĵoj, funkciigi la helpon por malsanuloj, maljunuloj kaj orfoj, starigi lernejojn kaj kulturajn instalaĵojn. Krom tio oni provis ruze gajni tempon por prokrasti la likvidon de la judoj aŭ malfruigi la solvon de iuj demandoj, kiuj estis traktendaj kun la germanoj. Nature aperis ankaŭ iuj konfliktoj inter la getaj loĝantoj kaj la Juda Konsilio, kiun iuj konsideris aŭ tro severa aŭ tro pasiva. Sed la Juda Konsilio faris kion ĝi povis por solvi nesolveblajn problemojn kaj plenumi neplenumeblajn atendojn.[367] En aŭgusto 1942 la germana urba administracio forprenis al la Juda Konsilio ties ĝisnunajn kompetencojn pri la nutraĵoj; samtempe la germanoj konfiskis la monon de la Juda Konsilio – entute 31´000 RMarkojn, ĉiuj publikaj institucioj de la Juda Konsilio estis submetataj al la kontrolo de la germana administracio, kiu ankaŭ malpermesis la lernejan, precipe la religian instruadon.[368] La anoj de la Juda Konsilio mem estis arestitaj la 4an de aprilo 1944, kaj la konsilio malfondita. Elĥanan Elkes, kiu estis nomata „supera judo“, perdis sian influon.

---

[364] En la germana lingvo oficiale nomita „Ältestenrat der jüdischen Ghetto-Gemeinde Kauen“.
[365] Biografiajn indikojn vd. sub http://www.jewishvirtuallibrary.org/jsource/judaica/ejud_0002_0006_0_05870.html kaj http://www.yadvashem.org/odot_pdf/Microsoft%20Word%20-%206292.pdf.
[366] Pli detale pri Tory vd. sub http://fr.wikipedia.org/wiki/Avraham_Tory. Parto de la taglibro estas alirebla en Google Books.
[367] La Juda Konsilio devis fari ankaŭ tre malfacilajn kaj kontesteblajn decidojn: Jehuda Beiles rakontis la kazon, kiam la konsilio decidis interŝanĝi iun judan kuraciston, kiun la germanoj volis mortigi kaj kiun la konsilio volis savi, kontraŭ iu alia judo, kiu perdis sian honoron.
[368] Dieckmann 198, p. 452.



Elĥanan Elkes (Vikipedia). Juda Konsilio de Kovno, de maldekstre dekstren (supre): Avraham Tory, Leib Garfunkel, d-ro Elĥanan Elkes (prezidanto), Yakov (Jakob) Goldberg, Cvi Levin (en 1942 ankaŭ d-roj Zaĥarin, Berman, Berstein kaj Moses Brauns). (Vikipedia). Dekstre: Jakub (Jacob, Jakobas, Jakovas) Gens, la prezidanto de la Juda Konsilio de la vilna geto kaj membroj de la Juda Polico en Vilno.[369] (Foto: Yad Vashem?)

Lige kun la eminentuloj de la kovna geto menciindas ankoraŭ kelkaj aliaj nomoj:

**Avraham Dov-Ber (Duber) Kahana Ŝapiro** (nask. 1870): Li estis la plej lasta ĉefrabeno de Kovno kaj Litovio. Ŝajnas, ke li libervole translokiĝis en la geton por agi kvazaŭ kiel la kapitano, kiu kiel plej lasta forlasas la sinkantan ŝipon. Laŭ Tory, kiu verkis en sia taglibro specon de mallonga nekrologo, lia morto, kiu okazis la 27an de februaro 1943 en la geto, finis gravan eraon en la historio de la litovia judaro. Multnombre la getanoj partoprenis la funebran ceremonion, kaj la Juda Polico tenis la ordon dum la procesio.[370] La kadiŝo estis laŭtlegita de lia filo, d-ro **Naĥman Ŝapiro** (nask. 1895), kaj rabeno Ŝmukler (kiu forpasis la 20an de aprilo 1943) recitis lirikon el „El male raĥamim“. Naĥman Ŝapiro estis fakulo pri semidaj lingvoj kaj hebrea literaturo kaj antaŭ la milito instruis en la kovna universitato. Kvankam la germanoj unue anoncis, ke la familio de Ŝapiro ricevis vizojn por Svislando, okazis, ke tiu familio, t.e. Naĥman Ŝapiro, liaj edzino kaj fileto, estis kondukitaj en la IXan fortikaĵon, kie ili estis mortigitaj la 8an de decembro.[371]

Pli bonŝanca estis **Israel Kaplan**, centra figuro de la kultura kaj eduka vivo en la kovna geto. En aprilo 1943 li estis deportita al la geto en Riga. Post la liberiĝo li eldonis en 1948 la faman jidlingvan periodaĵon *Fun Letstn Ĥurbn* (Pri la plej lasta ekstermado, aŭ: pri la holokaŭsto), kiu estis publikigita en Munkeno kaj kiu enhavis fruajn dokumentojn pri la holokaŭsto kun gravaj raportoj de atestantoj pri la historio de la kovna geto.[372]

En la kovna geto ekzistis ankoraŭ aliaj elstaraj rabenoj kiel **Ephraim Oŝry** (1914-2003), kiu postmilite elmigris al Usono, kie li servis kiel rabeno en Brooklyn kaj verkis plurajn librojn.[373] Dum Oŝry postvivis la militon, la rabenoj **Moŝe Skaruta** kaj **Avraham Grodzenski** (laŭ Tory sed fakte li nomiĝis **Grodzinski**), kiu estis la ĉefo de la jeŝivo ´Knesset Yisrael´ en Slobodka, pereis kiam la geto/koncentrejo estis likvidita en julio 1944.[374]

Tory notis ankoraŭ alian nomon de la kovna geto kun aparta sorto: Temas pri **Michael Burstin** (pole: Michał Bursztyn, jide: Mikhoel Burshtin), iom konata pola verkisto, kiu skribis jidlingve en la intermilita tempo. En septembro 1939 li fuĝis de Pollando al Litovio, kie li kaptiĝis en la kovna geto, en

[369] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Jacob_Gens, http://www.yivoencyclopedia.org/article.aspx/Gens_Jakub, http://www.holocaustresearchproject.org/ghettos/gens.html, http://www.yadvashem.org/yv/en/exhibitions/vilna/during/gens_and_fpo.asp.
[370] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Avraham_Duber_Kahana_Shapiro.
[371] Tory 1990, p. 245-7; Biografajn indikojn vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Avraham_Duber_Kahana_Shapiro kaj http://ru.wikipedia.org/wiki/Шапиро,_Хаим_Нахман.
[372] Tory 1990, p. 280; vd. https://www.zotero.org/groups/funletstnkhurbn/items/itemKey/M55GNP8I kaj http://www.fishburnbooks.com/catalogs/ShearetHaPletahSeptember2014.pdf; pri la familio de Israel Kaplan vd. http://digitalassets.ushmm.org/photoarchives/detail.aspx?id=1173892. Foton de Israel Kaplan vd. sub http://digitalassets.ushmm.org/photoarchives/detail.aspx?id=1173895.
[373] Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Ephraim_Oshry.
[374] Tory 1990, p. 371; Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Avraham_Grodzinski, http://en.wikipedia.org/wiki/Yeshivas_Knesses_Yisrael_(Slabodka), http://de.wikipedia.org/wiki/Jeschiwa_Vilijampolė.

kiu li populariĝis kiel verkisto, kolektanto kaj kultura aganto. Post la deportado en 1944 li forpasis en Dachau, dum lia filo sukcesis postvivi la holokaŭston kaj translokiĝi al Israelo.[375]

Kaj plej laste en ĉi tiu listo ankaŭ jena nomo ne devas esti forgesata kiel simbolo por alia tragika sorto en la kovna geto, nome tiu de la muzikisto **Edwin Geist**, kiu estis mortpafita la 10an de decembro 1942 post kiam oni alportis lin al la IXa fortikaĵo.[376]

### 4.2.3. Kulmino de la holokaŭsto en Kovno: Neniiga procezo laŭ sinsekvaj amasmurdaj operacoj

Kiel ni montris supre, la brutalaj pogromoj kaj masakroj kontraŭ la judoj komenciĝis ankoraŭ antaŭ ilia amasa engetigo. Jam du tagojn post la alveno de la bando de Karl Jäger en Kovno kelkmil judoj fariĝis viktimoj de liaj ordonoj. Kiel ´enkonduko´ estis mortpafitaj en diversaj tagoj dum la monato julio entute 3034 judoj plus 7 komunistoj, kiel Jäger notis en sia fifamiĝinta raporto[377], laŭ kiu li mem ordonis la ekzekutojn, kiuj okazis en la VIIa fortikaĵo. Post la milito Jäger konfirmis, ke li mem vizitis la lokon de la amasmurdo, kie li vidis 3000 kadavrojn kaj estis ŝokita (sic). Malgraŭ tio, la amasmurdo tamen estis daŭrigata. La 2an de aŭgusto en la IVa fortikaĵo sekvis la ekzekuto de 205 judoj kaj 4 litovaj komunistoj, la 9an de aŭgusto mortis 534 judoj en la sama loko. En tiu periodo oni likvidis precipe judajn virojn, kiujn oni timis kiel eventualajn ribelantojn.

La unua ´sovaĝa fazo´ de la kontraŭjudaj pogromoj finiĝis la 7an de aŭgusto 1941, kiam minimume 1200 judoj estis kaptitaj en la urbo Kovno kaj baldaŭ poste mortpafitaj en la IVa fortikaĵo. Ĉi tiu tago, kiu samtempe enkondukis la organizatan neniigan procezon laŭ pluraj fazoj, eniris la memoron kiel la „tago de la nigra ĵaŭdo“.[378] La antaŭan tagon, litovaj partizanoj arbitre arestadis judojn sur la stratoj.[379] Aldone al tio, la 8an de aŭgusto la Juda Konsilio notis, ke 26 judoj estis mortigitaj, ĉar ili provis akiri nutraĵojn. Estas vere malfacile konservi la superrigardon pri datoj kaj nombroj de la kontraŭjuda genocido en Litovio.

Sed la famaj „operacoj“, germane nomataj „Aktionen“, pri kiuj temos en la sekvo, komenciĝis nur nun kaj okazis laŭ jena maniero:

La 14-15ajn de aŭgusto en la VIIa fortikaĵo estis mortigitaj 1200 judoj kaj 1 polino. Ĉi tiu agado estis nomita **„Operaco kontraŭ la milo“** (germ. **„Aktion der Tausend“**).[380]

La 18an de aŭgusto, do jam post la fermo de la kovna geto, okazis la fifama **„Operaco kontraŭ la inteligentularo“** (germ. **„Intelligenz-Aktion“**), kiu celis la likvidon de la judaj intelektuloj (aŭ inteligentuloj) de Kovno. El NS-vidpunkto, la „jud-bolŝevisma intelektularo“, kiu estis difinita kiel „rezervejo de la bolŝevismo“, estis aparte konsiderata de la nazioj kiel eliminenda celgrupo en la milito kontraŭ Sovetunio; do, surbaze de tiu ideo la germanoj kaj litovoj povis pravigi la mortigon de miloj da judaj viroj, inter kiuj troviĝis ankaŭ kelkaj komunistoj.[381] Ĉi tiu kruela operaco efektiviĝis laŭ jena maniero: La 17an Mikas Kaminskas, la peranto inter Jordan kaj la Juda Konsilio, anoncis, ke estas serĉataj libervoluloj, kiuj povos labori en la arkivoj de litovaj ministerioj por fari ordon en ili. Laŭ la raporto de la atestanto David Ben-Dor, la juda kunlaboranto de Jäger, Josef Kaspi-Serebrowicz, kiu estis kontraŭkomunisma ĵurnalisto, devis kompili la liston de la elektotaj judaj intelektuloj – temis pri kuracistoj, inĝenieroj, juristoj, instruistoj, studentoj kaj aliaj personecoj de la kultura vivo. Kaspi-Serebrowicz kompilis la liston kun d-ro David Haber, kiu funkciis kiel tradukisto. Haber verkis memorandon, en kiu la lojaleco de la judaj intelektuloj rilate al la germanoj estis emfazita. La venontan tagon aperis 300 judaj intelektuloj kaj 234 aliaj hazarde kaptitaj personoj, tiel ke finfine estis kolektitaj 534 homoj, kiuj ankoraŭ ne povis imagi kia kruela sorto atendos ilin. Tiuj homoj komplete malaperis, kaj dum certa tempo oni ne sciis kio okazis kun ili. Finfine, la vero povis esti trovita: Anstataŭ iri en la arkivojn, la viktimoj estis piede deportitaj en la IVan fortikaĵon, kiu situis rande de la urbo en Panemunė, kie oni mortpafis ilin, tre verŝajne

375 Tory 1990, p. 311; detalan biografion vd. sub http://www.yivoencyclopedia.org/article.aspx/Burshtin_Mikhoel.
376 Pli multe pri Geist vd. ĉe Holzman 2001.
377 La detalojn en la „Raporto de Jäger“ vd. sur http://archive.is/odwj.
au http://web.archive.org/web/20110724012630/http://www.einsatzgruppenarchives.com/jagerimages.html
(skanaĵoj de la originalo).
378 Dieckmann 1998, p. 445.
379 Mishell 1988, p. 59.
380 Por la germana vorto ´Aktion´ en nia rilato necesis trovi taŭgan Eo-vorton. Ĉar ´akcio´, kiu estas antaŭ ĉio uzata rilate al financo, kaj ekzemple ´agado´ estus tro ĝenerala nocio, do ne taŭgus, mi decidis elekti la vorton ´operaco´ (ne ´operacio´, kiu havas alian signifon), kvankam ĝi estas, laŭ PIV, unuavice uzata lige kun armeaj kaj militaj aferoj. La amasmurdaj operacoj kontraŭ la judoj en Litovio kaj aliaj landoj ja ankaŭ havis iusence militan karakteron.
381 Dieckmann 1998, p. 446.

kun la partopreno de litova taĉmento, kiu estis komandata de iu Klimavičius. Certecon pri la murdo de tiuj viroj oni ricevis, kiam iuj laboristoj el la geto, kiuj laboris en la kazernoj situantaj apud la IVan fortikaĵo, malkovris en la subtegmentejo la vestaĵojn kaj legitimilojn de la viroj el la grupo de tiuj 534 personoj. La litovo Paulavičius, kiu loĝis en la proksimeco de la fortikaĵo, observis la koncernan eventon kaj postlasis raporton. Interalie, li vidis forfuĝi duonnudan judon kaj kiel li estis mortpafita antaŭ la okuloj de la pretepasantoj. La nomoj de kelkaj judaj intelektuloj, kiuj pereis en tiu operaco, estas konataj: ekzemple Ari Glazman, verkisto, Mark Volfovič, ĵurnalisto, J. Stender, koncertestro de la Ŝtata Litova Opero kaj violonisto, A. Kaplan, pentristo.[382] Jäger, kiu restis nevidebla dum tiu operaco, notis en sia raporto, ke en tiu ĉi tago estis likviditaj 711 personoj, kiel „reprezalio pro sabota agado“ kiel oficiala pravigo.[383]

La 17an de septembro je la sesa horo matene, la „malgranda geto“ estis ĉirkaŭata de litovaj fortoj per fusiloj, kiuj krude enpenetris la domojn kaj ordonis al la judoj kolektiĝi sur la Sąjungos-placo. Neniu el la ĉ. 3000 loĝantoj rajtis resti en la loĝejoj, malsanulojn oni forportis. La judoj apenaŭ havis la okazon vestiĝi. Sur la placo la germanoj kaj litovoj grupigis la homojn laŭ tiuj, kiuj posedis la Jordan-legitimilon kaj laŭ tiuj, kiuj ne havis ĝin. Parto de la homoj, inter ili fizikistoj kaj teknikistoj de la hospitalo, jam komencis esti pelataj al la IXa fortikaĵo, kie rusaj militkaptitoj jam elfosis grandajn amastombejojn. Neatendite, je la 10a horo matene, post kvarhora atendado kaj starado, alveturis aŭtomobilo kun pli altranga oficiro, kiu havis papereton en la manoj kaj diskutis la aferon kun SS-Obersturmgvidanto **Alfred Thornbaum**, la gvidanto de la selektado. Post tio la oficiro direktiĝis al la judoj por ´solene´ komuniki al ili, ke la operaco estas haltigita,[384] ke ĉiuj homoj povos reiri en siajn loĝejojn sed ke la judoj estu dankemaj al la germana armeo, kiu donacis al ili la vivon (sic).[385] La scenoj estis filmitaj de la surlokaj nazioj. Post tiu evento, kiu poste estis nomata la **„Prov-operaco“** (germ. **„Probe-Aktion“**), Jordan certigis al la judoj, ke simila operaco ne plu okazos, kion multaj judoj naive kredis. Sed fakte ankaŭ post la sekvantaj operacoj la sama Jordan ree promesis al la judoj, ke ĝi estis la plej lasta. Laŭ Joheved Inčiūrienė-Čartokaitė, kiu ĉeestis tiun ĉi incidenton sur la Sąjungos-placo kaj postlasis taglibrajn notojn, la nazioj volis testi la logistikon de la organizado de la kolektiva amasmurdo.[386] Ĉar en tiu ĉi tago neniu estis mortigita, Jäger povis fari nenian mencion en sia raporto.

La 19a de septembro, Thornbaum, Iltmann kaj ĉefgardisto Blaszke kolektis 600 judojn, ĉefe virinojn kaj infanojn. Kvankam oni diris al tiu grupo de viktimoj, ke oni veturigos ilin al Aŭŝvico, ili estis kondukitaj al la IXa fortikaĵo, kie ili estis mortpafitaj.[387] Ŝajnas, ke ĉi tiu operaco restis en la memoro de la samtempanoj sen speciala nomo.

La venonta dato, kiun la Jäger-raporto entenas, estas la 26a de septembro 1941. En tiu ĉi tago la Sekureca Polico komunikis, ke iu nekonato pafis kontraŭ Willi Koslowski, estro de la geta gardistaro. Reage, la germanoj fermis kaj malplenigis tutan loĝkvartalon de la geto kaj selektis ĉiujn, kiujn ne posedis laboratestilon, precipe maljunulojn, virinojn kaj infanojn. Ankoraŭ en la sama tago oni pelis ilin en la IXan fortikaĵon, kie oni mortigis ilin, entute 1608 personoj estis koncernitaj, t.e. 412 viroj, 615 virinoj kaj 581 infanoj, kiel Jäger notis en sia raporto, kaj ke tiu operaco okazis kiel venĝo pro la pafado kontraŭ Koslowski. La ekzekuton gvidis Alfred Thornbaum (kiu estis SS-Obersturmgvidanto, kio egalis al ĉefleŭtenanto aŭ kapitano) kaj leŭtenanto Iltmann de la 3a kompanio de la Polica Bataliono 11. La resto de la loĝantoj de la „malgranda geto“, kiuj posedis la legitimilon de Jordan, estis translokita al la granda geto. Ankaŭ ĉi tiu tragika operaco ne havas apartan nomon, sed oni povus nomi ĝin la Kozlowski-operaco.[388]

La venonta murdoperaco en la kovna geto, la t.n. **„Klein-Ghetto-Aktion“ („Operaco kontraŭ la malgranda geto“)**, en kiu estis likviditaj 1845 judoj (315 viroj, 712 virinoj, 818 infanoj), estis protokolita la 4an de oktobro. Inter la viktimoj troviĝis ankaŭ ĉ. 150 infanoj de la orfejo. La operacon gvidis Alfred Thornbaum kaj la litova aviadila majoro **Kazys Šimkus**. Post la elpelo de tiuj judoj, la germanoj kaj la

[382] Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 585.
[383] Holzman 2001, p. 64; Neumann 2003, p. 149; Rosenfeld 1999, p. 135; Tory 1990, p. 33.
[384] Laŭ H. Holzman, li uzis la germanan vorton „abgeblasen“, kiun ne ĉiuj judoj tuj komprenis, ĉar tia vorto ne ekzistas en la jida lingvo; Tory, p. 37s.
[385] Dieckmann 1998, p. 447, supozas, ke la haltigo de tiu operaco havis konkretan kaŭzon. Ĉar en la flughaveno de Aleksotas amase mortis sovetiaj militkaptitoj pro la tifa malsano, la germanoj devis anstataŭigi ilin per novaj laboristoj, kiujn ili trovis ĝuste inter la judoj de la kovna geto.
[386] Wette 2012, p. 114.
[387] Rosenfeld, p. 136, kiu nomis tiun agadon „I.-Aktion“.
[388] La masakro kontraŭ la kievaj judoj (33´771) en Babij Jar okazis tuj poste la 29/30ajn de septembro 1941, vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Babij_Jar. Kaj en la sama monato, la 13-15ajn de septembro 1941, okazis en Sovetunio ankaŭ la deportado de 400´000 volgiaj germanoj laŭ ordono de Stalin.

litovoj, verŝante benzinon ĉirkaŭ la konstruaĵon, bruligis la malsanulejon de la „malgranda“ geto, en kiu pereis ĉiuj malsanuloj. La flegista personaro inkluzive de la kuracisto d-ro Davidoviĉ mem estis mortigita dum sia klopodo savi la malsanulojn. La homoj, kiuj provis salti tra la fenestroj, estis mortpafitaj de policistoj. Tiel pereis 45 homoj. Kio tiam vere okazis oni eksciis nur poste. Fajrobrigado ne rajtis estingi la incendion, kies fumon oni povis vidi dum du tagoj. Cramer pravigis la bruligon de la hospitalo per „higienaj“ argumentoj por eviti la disvastiĝon de la lepro (kvankam tiu malsano ne ekzistis). Kune kun la homoj forbrulis ankaŭ valoraj medicinaj aparatoj, kiuj ne estis anstataŭigitaj.[389] Post tiu incidento la etoso en la geto estis deprimata, kaj rabenon Ŝmukler oni vidis tute konfuzite vagadi tra la geto.[390] Anstataŭ judoj, en la malplena „malgranda“ geto, kiu ankoraŭ estis prirabata de la ekstera civilularo, estis loĝigataj sovetiaj oficistoj kaj oficiroj kun iliaj familioj, kiuj ne sukcesis fuĝi ĝustatempe kiam la germanoj alvenis.

La kruela kulmino de la mortigo de la kovnaj judoj komenciĝis la 23an kaj finiĝis la 28an de oktobro 1941. La 23an de oktobro **Albert Helmut Rauca**,[391] Stütz kaj Jordan aperis ĉe la Juda Konsilio kaj postulis de ĝi prezenti liston de 8000 judoj, kiuj laŭdire estis destinitaj por la translokado al Lublino. Per tio estis enkondukita la **„Groyse aktsie“**, kiel la judoj nomis la **„Grandan operacon“**, kiu estis la plej ampleksa unuopa murdagado en Kovno. Laŭ la klarigo de Jäger, la geto devis esti „purigita de superfluaj judoj“. Kiam la Juda Konsilio rifuzis la kompiladon de tia listo, Jordan sola vizitis d-ron Elkes kaj transdonis al li la ordonon, ke la tuta loĝantaro de la kovna geto, do ĉirkaŭ 28´000 personoj (laŭ Holzman), devos kolektiĝi sur la Demokratų-placo. En la geto eksplodis paniko. La 28an de oktobro miloj da judoj fakte aperis sur tiu placo laŭ kolonoj kaj vicoj, ordigitaj laŭ familioj. Solly Ganor priskribis la frumatenan etoson tiel: „Centoj da homoj eliris el la domoj. En la duonmallumo de la frua mateno ili aspektis kiel fantomoj. Iuj tenis kandelojn en la manoj, kiuj ĵetis timigan lumon sur iliajn vizaĝojn. Multaj portis malgrandajn infanojn sur siaj brakoj, aliaj ŝovis infanĉarojn tra la sablecaj stratoj. Iuj tenis siajn maljunajn gepatrojn, aliaj trenis malsanulojn sur brankardoj. Neniu volis esti kaptita en sia domo kaj esti mortpafita. Baldaŭ mi aŭdis strangan zumadon. Kiam mi aŭskultis pli proksime mi komprenis: estis zumataj psalmoj.“ La judoj kutimis voki „ŝema Israel!“ – audŭ nin, Israelo!



La organizantoj de la murdoperacoj: Albert Helmut Rauca[392], Joachim Hamann (ĉiuj Kovno), Franz Murer[393], Bruno Kittel[394] (ambaŭ Vilno). (Originaj fontoj nekonataj)

La 28an de oktobro, sur la Demokratų-placo SS- ĉefschargvidanto **Helmut Rauca**, kiu estis asistata de sia helpanto Jordan, „selektis“ la homojn per sia fifama vipeto. La „laborkapablaj“ devis iri dekstren, sur la „bonan flankon“, la aliaj maldekstren, sur la „malbonan flankon“. Minimume 9200 personoj, inter ili preskaŭ 4300 infanoj, atingis la „malbonan flankon“. Neĝis, estis malvarme, infanoj kriis, homoj zumis psalmojn. Kiam la selektado finiĝis, Blaszke traesploris kun siaj anoj la domojn por trovi kaŝitojn. Ankaŭ SS-standartgvidanto Karl Jäger, SS- ĉefsturmgvidanto[395] Ernst Stütz, Gestapo-komandisto **Heinrich Schmitz** (posteulo de Jäger post lia foriro el Kovno), polica komandisto Thornbaum kaj la urba

[389] Fotojn de la personaro kaj interna aspekto de tiu malsanulejo antaŭ la incendio publikigis Kruk 1999, pp. 113 kaj 117.
[390] Pri tiu evento raportis Tory, Holzman, p. 87, kaj Ganor.
[391] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Helmut_Rauca. La totala ciniko de Rauca estis fifama. Laŭ taglibra noto de Tory de la 23a de junio 1942, Rauca ´mendis´ ĉe la juda skulptistino Gehrscheim la figuron de nuda virino.
[392] Fonto: http://www.annefrankguide.net/en-CA/bronnenbank.asp?aid=291546.
[393] Fonto: http://www.gedenkorte-europa.eu/de_de/article-franz-murer-1912-ndash-1994.html.
[394] Fonto: http://www.executedtoday.com/tag/otto-kittel.
[395] Neoficiala esperantigo de „Standartenführer“ kaj „Hauptsturmführer“.

komandisto **Cramer** ĉeestis, plus la unua litova „protekta bataliono".[396] La juda getopolicisto Rosenfeld parte fariĝis atestanto de la okazaĵoj.[397] Li rakontis, ke Jäger parte mem ĉeestis por kontroli la selektadon. La selekta proceduro, kiu komenciĝis je la 9a aŭ 10a horo matene, daŭris dum multaj horoj. Tagmeze, pli ol 28´000 judoj staris sur la placo. Germanoj kaj litovoj poziciigis siajn mitralojn.[398] La selektitojn oni rekolektigis unue sur la teritorio de la „malgranda" geto, kie ili devis pasigi la nokton. La venontan tagon la Sekureca Polico kondukis tiujn pli ol 9200 homojn en la IXan fortikaĵon, kie 200 sovetiaj militkaptitoj jam fosis grandajn tertruojn por enterigi la mortpafotojn, kiuj devis aperi senvestigitaj antaŭ la pafkomando. Kiel Tory notis, apudaj vilaĝanoj povis vidi la ´mort-procesion´ de la distanco. Post la alveno en la fortikaĵo, la litovaj murdistoj tuj forrabis al la judoj ties valoraĵojn – orajn ringojn, orelajn ringojn kaj braceletojn, devigis ilin senvestiĝi kaj puŝis ilin en la fosojn kaj buĉis la judojn, senĉese pafante per siaj mitraloj en la foson, kiu fariĝis giganta amastombo por miloj da homoj. En tiu tago do pereis krom miloj da viroj 2920 judinoj kaj 4273 judaj infanoj. La litova suboficiro **Lazys Pagalis** fanfaronis pri sia grandega murd-sukceso kaj ke li nun posedas multe da mono (kiun li evidente rabis de la judoj). Ĉar la kugloj de la maŝinfusiloj ne ĉiam trafis ĉiujn, kelkaj homoj, kiuj estis pelitaj kune kun siaj familianoj al la IXa fortikaĵo, sukcesis eskapi la mortorgion, revenis vivaj de la ekzekutejo kaj rakontis pri la hororaj scenoj, kiujn ili travivis surloke. Tiaj kazoj estis **Jitzhak Bloch** (tiam 10-jara),[399] **Jehuda Beiles** (14-jara)[400] kaj **Kuki Kopelman** (13-jara),[401] kiuj rakontis siajn nekredeblajn travivaĵojn. Sian historion Kuki Kopelman rakontis al Solly Ganor laŭ jena impresa kaj kortuŝa versio:

„La strato al la fortikaĵo iris senŝese supren. La suprenirado estis pena. (…) Malgraŭ la malvarmeco mi baldaŭ ŝvitegis. Antaŭ ni senfina vico de homoj moviĝis al la montosupro. Komence ni iris kvarope aŭ kvinope en la vico, sed ĉiu estis tiel laca kaj malforta pro malsato, ke la vicoj baldaŭ maldensiĝis. (…) Fuĝi estis neeble, sed mi volis prokrasti la morton kiel eble plej longe. (…) Konstante mi ricevis batojn sur la dorson, sed mi ne plu sentis ilin. Ambaŭflanke de la strato staris gardistoj, ĉiuj estis armataj. De tempo al tempo ni aŭdis pafojn. Post tio kamiono alveturis por kolekti la kadavrojn. Mi ĉirkaŭrigardis por vidi konatajn vizaĝojn, sed tie estis nur fremduloj. Neniu parolis. Eĉ la infanoj silentis. Ĉie estis odoro de timo kaj morto. Subite mi tamen malkovris iun konaton. Estis Jablonsky, mia malnova instruisto por matematiko. Li magriĝis ĝis skeleto. ´Donu al mi vian manon, Kuki´, li diris, ´mi timas ke mia fino alvenis´. Estis preskaŭ vespero, kiam ni atingis la fortikaĵon. La muroj estis malnovaj kaj dikaj. Ili havis malgrandajn baritajn fenestrojn. Mi klopodis preĝi. Mi estis ekscitita. La plej profunda, esenca kaj forta instinkto en ni estas la instinkto por plu vivi. Forgesu, kion la poetoj diras. Kiam oni troviĝas antaŭ la morto, nenio plu valoras. ´Ne ploru, infano´, mi aŭdis diri Jablonsky, ´ne lasu doni al ili tiun kontentiĝon. Lasu nin morti kun levataj kapoj´. Germanaj kaj litovaj gardistoj staris ĉe la enirejo kun hundoj, kiuj tiris la rimenon, graŭlis kaj sovaĝe bojis. Oni pelis nin tra la pordegoj. En la korto staris kamionoj kun enŝaltitaj motoroj. Kelkfoje ili malbone funkciis kaj tio sonis kiel pafado. Juna germana oficiro alparolis nin: ´Oni portos vin al laborkampoj en la oriento. Sed unue vi duŝos vin kaj poste vi ricevos laborvestaĵojn. Senvestiĝu kaj demetu viajn vestaĵojn ĉi tie´. Li parolis en tono de civilulo, kaj malgraŭ ĉio, kion ni sciis pri tiu horora loko, ni lasis nin konvinki de li. Sed ĉiu eĉ plej malgranda fajrero de espero estis detruita, kiam ni aŭdis la longdaŭran maŝinfusilan pafadon kaj la kriadon de la homoj. La germanoj direktis la maŝinajn pafilojn rekte sur nin. ´Rapide, vi judoj! Senvestiĝu kaj ek al la duŝejo!´ iu oficiro vokis. ´Kion vi aŭdas estas nur la misfunkciantaj kamionaj motoroj´. Sed neniu moviĝis, neniu ŝajnis esti kapabla movi eĉ unu muskolon. La oficiro alproksimiĝis al iu maljunulo, kiu staris en lia proksimeco kaj pafis rekte kontraŭ lian vizaĝon. Lia kapo krevis kaj la cerbo ŝprucis tra la malpuraĵo kiam li falis surteren. Senprokraste ĉiuj senvestiĝis. Kiam vi estas tiel proksima al la morto, ĉiu minuto valoras kvazaŭ la venonta

---

396 En 1962, Tory funkciis kiel atestanto en kontraŭ-nazia proceso en Wiesbaden, kie estis traktataj la kazoj de Schmitz kaj Thornbaum. Kvankam Tory raportis pri la fifaroj de tiuj nazioj en la kovna geto, la proceso kontraŭ Thornbaum estis ĉesigita pro manko de sufiĉaj pruvoj. Schmitz mortis per suicido en la malliberejo antaŭ ol verdikto povis esti prononcita. (Tory 1990, p. 407).

397 Vd. ĉe Wette 2012, p. 119s. Ganor dediĉis ĉap. 8 al tiu tago sur la Demokratų-placo.

398 Detala priskribo ĉe Tory.

399 Pri lia historio, kiun la homoj en la geto ne povis kredi, vd. Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 589.

400 Vd. Beiles 2010.

401 Kopelman memoris, ke en la IXa fortikaĵo la germanoj kaj litovoj pafis kontraŭ la judaron ankoraŭ antaŭ ol ili atingis la amastombon, kie jam kuŝis miloj da kadavroj. Intervjuon kun Solly Ganor vd. sub http://www.pbs.org/wgbh/sugihara/readings/ganor.html. De sia amiko Solly Ganor Kopelman estis priskribita kiel ege talentata ´Wunderkind´-o. Lia patrino Vera Ŝor estis fama violonistino kaj lia patro estis konata ŝakludisto. Kuki mem estis infana ŝakĉampiono, talentata violonisto kaj tre bona frapdancisto. Post la deportado de la kovnaj judoj al Stutthof, Solly kaj Kuki perdis unu la alian. Dum Solly estis pludeportita al Germanio, la sorto de Kuki restis nekonata.

sekundo alportus la kompaton kaj indulgon. Finfine ni ĉiuj staris nudaj kaj kovris nian pubon per la manoj kaj tremblis en la frosto. (…) Sed al ni ne restis multe da tempo. Laŭ ordono de la oficiro la germanoj kaj litovoj krude peladis nin antaŭen. ´Kuru kuru, vi judaj porkoj´ ili kriis kaj batis nin per bastonoj kaj pafilaj kolboj. La hundoj ĵetiĝis sur la malrapidajn homojn kaj elŝiris ilian karnon el la gamboj kaj postaĵoj. En sovaĝa paniko ni komencis kuradi, sekvate de la gardistoj kaj hundoj. Oni povis vidi vapori la korpojn kiam ili pelis nin ĉirkaŭ la muron. Ni ĉirkaŭis iun angulon kaj ekvidis dekojn kaj dekojn da mitraloj, kiuj estis starigitaj ĉirkaŭ la libera kampo. Ili pafadis rekte en la grandegan foson. Mi aŭdis homojn kriadi en ĝi. Mi preskaŭ freneziĝis pro timo. Mi volis halti, forkuri, fuĝi, sed amaso da sovaĝe moviĝantaj nudaj korpoj moleste premegis min kvazaŭ mi troviĝus en korseto. Germanoj kaj litovoj kun kuspitaj manikoj kaj ruĝaj vizaĝoj pafadis kontraŭ la amason. La tuboj de iliaj pafiloj fulmadis flave. Vualo de blua fumo flugis super la kampo. Estis infera sceno. Raŭkaj vokoj, akresona virina kriado, ploregantaj infanoj kaj beboj, hunda bojado. Odoraĉis je ŝvito, pisaĵo kaj kako. Mi vidis barbecan viron stari en la foso kun levitaj pugnoj kontraŭ la ĉielo, kiu kriis: ´Judoj! Dio ne ekzistas! Tie supre sidas la diablo!´ Sango fluis laŭ lia korpo kaj oni senĉese pafis kontraŭ lin, sed li restis staranta kaj kriis kontraŭ la ĉielo. Ni atingis la fosegon. Tie kuŝis miloj da korpoj, unu sur la alia, ili turniĝis kaj kriis kaj petegis la germanojn fari la finon al ili. Estis la infero. La infero. Ni staris rekte antaŭ la mitraloj. Kugloj sibladis kaj ŝuŝadis ĉirkaŭ ni kiel furiozaj abeloj, sed ĉio kion mi sentis estis la premego malantaŭ mi. Mi rimarkis kiel mi falis. (…) Subite mi sentis fali ion pezan sur mian kapon. Tio batis min al indulgema senkonscieco. (…) Mi komprenis, ke mi estis enpremita inter kadavroj. Mia kapo evidente ripozis sur alies brusto, sur la granda, malvarma, morta brusto de iu virino. Denove mi kredis perdi la konscion. Mi luktis kiel sovaĝulo. La korpo super mi moviĝis malrapide kaj subite mia dekstra brako iĝis libera. Mi turnis la kolon kaj klopodis vidi ion en la mallumo. Mi vidis la stelojn. Mi ne kuraĝis fidi miajn sensojn kaj fermis la okulojn. Kiam mi denove malfermis ilin, la steloj en la ĉielo ankoraŭ ekzistis. Tio estis tiel bela, emociiga vidaĵo… Mi kredis ke mi sonĝas. Sed mi devigis min klare pensi. Devis esti pli ol unu korpo super mi, alikaze mi ne sentus tian pezon. Devis esti nokto, ĉar mi povis vidi la stelojn. Do, la foso estis malfermata. Sed kial? Mi rememoris, ke estis preskaŭ vespere, kiam ili mortpafis nin. Verŝajne ili ne plu havis tempon por fermi la tombon antaŭ la komenco de la mallumo. Nova paniko kaptis min. Kial mi transvivis tion sola? Ĉu mi estis elektita por kuŝi ĉi tie kaj atendi ĝis kiam ili entombigos min viva? Kvazaŭ kiel respondo al miaj demandoj mi ekaŭdis bruetojn, kiuj glaciigis mian sangon. Lamentoj de bebo, pli malproksime la krio de viro: ´Murdistoj! Murdistoj! Venu kaj finu vian laboron!´ La bebo ploris, kaj aŭdeblis malklara muĝado. Mia dio, mi pensis, kiom da el ni tiuj bastardoj intencis entombigi vivaj. Subite io moviĝis sub mi kaj mi povis liberigi mian duan brakon. Mi supozis, ke la korpo, kiu enfermis min, ankoraŭ devis esti viva. Ĝi ankoraŭ estis varma. Mi komencis movi ĝin per ĉiu mia forto. ´Ĉu vi vivas?´ mi kriis. ´Ĉu vi povas aŭdi min?´ Finfine li moviĝis. Li muĝis. Mi daŭrigis voki kaj krii ĝis kiam li komencis paroli. ´Kie mi estas? Kio okazis?´ Estis Jablonsky. Li estis rekte malantaŭ mi, kiam ili pelis nin en la foson. Ŝajnas, ke li ŝirmis min de la pafoj. Mi daŭrigis krii al li kaj petegis lin respondi. ´Kuki?´ li respondis. ´Kuki, ĉu estas ci? Kio okazis? Kial ni ankoraŭ vivas?´ ´Sinjoro Jablonsky, ĉu vi povas moviĝi? Vi kuŝas sur mi. Mi ne plu povas spiri. Mi ne estas vundita.´ Mi sentis malgrandan movon. ´Mi ne povas, Kuki´, Jablonsky lamentis, ´mi ne povas moviĝi´. ´Mi petegas vin, sinjoro Jablonsky, granda dio, provu.´ ´Mi diris al ci, ke mi ne povas. Mi ne sukcesas. Dio mia, ili entombigos nin vivaj.´ Paniko estis en lia voĉo. Mi timis, ke li denove perdos la konscion, pro tio mi restis silenta dum momento. Mi aŭdis lin anheli kaj serĉi aeron. Post momento li diris: ´Kuki, se ci ne estas vundita, ci devas forfuĝi. Ci devas reiri kaj rakonti al ili, kion ili faras ĉi tie. Ci devas eskapi de sub mi.´ Mi sentis kiel li streĉis siajn muskolojn, kiel li provis movi sin. Mi puŝis kaj ŝovis lin kiel eble plej bone mi povis. Sed tio estis senutila. Tial mi lasis min denove fali por kolekti novajn fortojn. Ni anhelis ambaŭ. Subite io leviĝis sub ni kvazaŭ la tero mem moviĝis. Ie proksime de ni iu viro kriis. Kaj subite la krio finiĝis. Mi sentis kiel Jablonsky ŝovis sin iomete flanken. Mi palpis en mallumo kaj sentis iun kapon. La vizaĝo estis malvarma kaj frosta. Longaj haroj. La korpo de iu virino. (…) Mi luktis tiel longe ĝis mi povis mem eltiri mian tutan korpon. Post tiu fortostreĉo mi estis komplete elĉerpita. Mi kuŝis super ĉiuj tiuj korpoj kaj serĉis aeron. (…) Denove mi aŭdis la foson muĝi kaj gargari. La amaso da korpoj sube de mi estis sentebla kiel unusola viva sin volvanta estaĵo. Mi kredis, ke mi freneziĝos. Kion mi faris ĉi tie? Kial mi tiel fortostreĉis por liberigi min? Mi sentis la mordan malvarmecon ĉirkaŭ mia nuda haŭto. Kial ne resti kuŝanta kaj frostiĝi kaj lasi ĉion malantaŭ mi? Mi denove aŭdis la voĉon de Jablonsky, kvazaŭ ĝi estis en mia propra kapo. ´Kuki, iru al tiu loko, kie ni senvestiĝis kaj prenu ion varman por vesti cin. Ci devas reiri al la geto kaj averti ilin. Tio estas cia sankta devo. Ci devas iri. Iru, kara infano, kaj atestu tion ĉi tiean.´ Nun li sonis pli malforte. Mi kredis, ke li trompas sin mem. ´Mi neniam sukcesos fari tion´, mi hurlis, ´ili kaptos kaj mortigos min.´ ´Silentu! Ili scias, ke la mortintoj ne promenados de el la

tombo. Vi devas timi nenion. Ili ĉiuj estas en la fortikaĵo, en ebria stato. Kaj kion vi havas por perdi, infano? Se ili kaptos cin, almenaŭ ci mortos rapide.´ Mi ploregis, sed Jablonsky ne lasis min trankvila. ´Ci ankoraŭ devas ion fari. Antaŭ ol ci foriros, ci devos mortigi min. Mi scias, ke estas terure kion mi petas de ci. Tamen, Kuki, mi petas cin, ne lasu ilin entombigi min viva.´ Mi perdis la spiron. Mi petegis lin ne postuli de mi ion tian, sed li daŭre diris al mi: ´Ci devas, Kuki, ci devas.´ ´Sed kiel mi faru tion?´ mi demandis, ´ĉu per nuraj manoj ?´ (…) Dum momento li silentis. Li rekomencis, nun en serioza tono, kvazaŭ temus pri normala, racia konversacio. (…) ´Ŝovu la korpon sur mian vizaĝon. Vi devos forte premi. Tio ne daŭros longe´. Denove li silentis dum momento. Poste li diris: ´Mi estas preta. Adiaŭ, mia kara junulo. Ĉion bonan.´ Estis freneze. Tute trankvile li elpensis planon por la propra morto. Tio estis kontraŭ ĉia mia instinkto, sed kiel mi estus devinta rifuzi ĝin al li ? Finfine mi faris kion li postulis. Estis la korpo de iu infano, per kiu mi sufokis lin. La korpo de infano… Post tio, ĉio estis indiferenta al mi. Mi sukcesis leviĝi el la foso. (…).“ Kaj tiel Kuki Kopelman sukcesis eskapi la inferon kaj forlasi la IXan fortikaĵon, reveni al la geto kaj rakonti al la homoj, kio okazis. La surprizitaj gepatroj de Kuki ne povis kredi kion ilia filo travivis kaj pensis ke temas pri malamuza ŝerco.[402]

Al la „Granda operaco“ de la 28a de oktobro 1941 la restantaj loĝantoj de la geto reagis per kolero, ĉagreno kaj protesto. La laboristoj en la flughaveno de Aleksotas spontane ekstrikis, kio trafis la nervon de la germanaj interesoj. Jordan minacis ilin per la likvido de la tuta geto, se la striko ne estos finita,[403] kaj Rauca promesis, ke la mortigoj estos ĉesigitaj, se la judoj revenos al la laboro. Nur tiam la laboristoj daŭrigis ĝin. Se Rauca kaj Jordan ne sukcesis tuj likvidi ĉiujn judojn, ilian nombron reduktis la malsato. Ĉiuj brigadoj, precipe tiuj de la flughavenaj laboristoj, devis esti reorganizataj, ĉar mankis multaj homoj. La germanaj kaj litovaj gardistoj postulis, ke la planata laboro estu plenumata, sendepende de tio ĉu la judoj mortas aŭ vivas. Pro tio oni plenigis la taĉmentojn per homoj, kiujn oni hazarde kolektis surstrate.[404]

Por la ĝisnuna periodo Jürgen Matthäus kunmetis resume jenajn ciferojn de mortigitaj judoj en Kovno: De la likvido de la intelektuloj estis koncernitaj entute 711 personoj. La 26an de septembro Jäger lasis mortigi 1608 judojn, inter ili 615 virinojn kaj 581 infanojn. Komence de oktobro 1941 estis likviditaj 1845 judoj, de ili 818 infanoj. Fine de oktobro en la IXa fortikaĵo estis mortpafitaj 9200 judoj, la duono estis infanoj. Restis entute 15´000 „laborjudoj“, inkluzive de iliaj familioj, kiuj plu vivis dank´ al la amasa mortado de sovetiaj militkaptitoj, kiuj estis anstataŭigataj per judoj. Sed kiel oni povas legi en lia raporto, Jäger volis likvidi ankaŭ tiujn judojn, sed li estis malhelpata fari tion pro la strikta ordono de Heinrich Müller, ĉefo de la „sekcio (Amt) IV“ en RSHA (kiu estis la ĉefo de Adolf Eichmann, kiu ´laboris´ tiam kiel estro de la „Referato IV D 4“, kiu organizis la deportadon de la judoj el Germanio kaj la okupataj landoj precipe al Aŭŝvico).

Laŭ la statistiko de la Juda Konsilio, en septembro kaj oktobro 1941 pereis 11´665 judoj de la kovna geto, precipe virinoj kaj infanoj, kaj ekde la militeksplodo ĝis tiam estis mortigitaj en Kovno minimume 18´290 judoj, kio signifis 52 procentojn de la juda loĝantaro de Kovno. Ŝajnas, ke la germanoj likvidis la judojn laŭ certa kvoto, kiu devis esti atingita kaj plenumita.

Laŭ la raporto de Stahlecker de la 15a de oktobro 1941 en Litovio estis ĝis nun mortigitaj entute 80´311 judoj – nome en Kovno (urbo kaj distrikto) 31´914, en Šiauliai (distrikto) 41´382 kaj en Vilno (distrikto) 7´015. Atamuk opiniis, ke tiuj ciferoj ne estas realismaj, sed ke ili estis efektive pli altaj.[405] Aliflanke, estas konate, ke Stahlecker kutimis troigi la ciferojn pri likviditaj judoj por fanfaroni kaj impresi.

Post tiuj ampleksaj mortigaj ondoj, kiuj koncernis proksime la duonon de la loĝantaro de la geto kaj kiuj kaŭzis totalajn senesperon, apation kaj deprimon ĉe la judoj, postrestis do ankoraŭ 17´000 judoj, kiujn la germanoj engaĝis kiel laborfortojn por plenumi diversajn militajn taskojn en la metiejoj de la geto kaj en la flughaveno de Aleksotas. Sed ankaŭ tiujn judarojn oni kvante limigis pli kaj pli[406] laŭ la principo: la „senutilaj“ judoj devis esti likviditaj, dum la „laborkapablaj“ rajtis ankoraŭ iomete vivi. Laŭ la indikoj de la Juda Konsilio Jäger raportis, ke komence de 1943 10´000 getaj judoj laboris en 140 diversaj laborejoj en kaj ĉirkaŭ Kovno. Tiel, 60% de la judaj getanoj laboris por la germana militindustrio. La kontraŭdiraj rilatoj inter ´laboro´ kaj ´neniigo´, pri kiu Dieckmann atentigis, iĝas evidentaj. La estro de la rekrutado de

[402] Ganor 2011, p. 117-127.
[403] Pro sia tro sovaĝa konduto („mi persone kutimis mortpafi homojn“) Jordan estis subite eksigita de sia posteno en Kovno kaj sendita al la fronto en Ruslando, kie li pereis.
[404] Ganor 2011, p. 112.
[405] Atamuk 2000, p. 148.
[406] Tory 1990, p. 67.

la juda labor-oficejo de la kovna geto estis iu Pavel Margolis, kiu kondutis kiel diktatoro en la geto, kiel Tory rimarkigis.[407]

La 22an de novembro en Kovno alvenis d-ro Peter Kleist, sekciestro Ostlando en la Regna ministerio por la okupataj orientaj teritorioj, kaj montris sin kontenta pri la murdoperacoj kontraŭ la litovaj judoj. Tri tagojn poste en Litovio komencis alveni kelkmil judoj el okcidenta Eŭropo, precipe Germanio kaj Aŭstrio. Anstataŭ pludirekti ilin al Riga, kio origine estis planita, ili estis senditaj al la IXa fortikaĵo de Kovno, kie ili estis komplete likviditaj.[408] Ĉi tiun kvazaŭ anoniman murdoperacon, en kiu pereis 4934 judoj,[409] oni povus nomi „operacon kontraŭ la eksterlandaj judoj".

En februaro 1942 la germana Sekureca Polico intencis efektivigi ankoraŭ unu finan murdoperacon, sed ŝajnas, ke ĝuste SA-Obersturmgvidanto Gustav Hörmann, kiu gvidis la germanan labor-oficejon en la geto, povis eviti tion. Tio signifis, ke ĝis februaro 1943, kiam en la IXa fortikaĵo pliaj 45 judoj estis mortpafitaj kadre de la **„Stalingrada operaco"**, amasmortigaj agadoj en la kovna geto ne plu okazis.[410] Tamen, en la sama monato februaro 1942 kelkcent judoj el la kovna geto estis deportitaj al Riga por la ´deviga laboro´, kun sorto nekonata sed imagebla.[411]

Sed tio ne signifas, ke unuopaj murdoj ne plu okazis. En februaro 1942 estis mortpafitaj en la geto **Zelig Altman**, estro de la baza lernejo de la geto, **Leah Gilelson**, flughavena laboristo, kaj d-ro **Zerah Gerber**, fizikisto. La ĉi-lasta estis mortpafita de litova policisto. En sia taglibro Avraham Tory menciis la nomojn de multaj aliaj unuopaj viktimoj, kiuj estis mortigitaj de la ´faŝistoj´ kaj ´naciistoj´. Tiel, li notis en sia taglibro kun dato de la 17a de oktobro 1942, ke en tiu tago 13 judoj, inter kiuj kvin infanoj, estis mortigitiaj en la IXa fortikaĵo.

La 25an de marto 1943 aperis Karl Jäger, estro de la Gestapo en Litovio, por inspekti la geton kun d-ro Elkes kaj ordonis evakui tutan kvartalon de 2000 personoj.

Dum la sekvaj 22 monatoj la situacio fakte ´relative stabiliĝis´, ´normaliĝis´ aŭ ´trankviliĝis´, se oni povas tiel diri sub tiaj cirkonstancoj. La germanoj estis interesataj ĉefe pri la ekspluatado de judaj laborfortoj, kaj la Juda Konsilio kredis kaj aplikis la strategion, ke plu vivos tiuj kiuj laboras kaj laboros kaj ke la plua ekzistado de la judaro dependos de la obeema laborado. Pro tio, la Juda Konsilio klopodis krei kiel eble plej multajn ´laborlokojn´ por la judoj, por gajni tempon. Sed kiel Mishell rimarkigis, la „Granda Operaco" detruis tiun miton kune kun la espero pri la pluvivado de la judoj mem.[412]

Fotoj de la 9a fortikaĵo:

https://www.google.de/search?biw=1366&bih=595&tbm=isch&sa=1&ei=Hs91Ws-pHcO3Uc-JkrAB&q=9th+fortress+kaunas+jews&oq=9th+fortress+kaunas+jews&gs_l=psy-ab.3...61276.62751.0.63051.5.5.0.0.0.0.93.417.5.5.0....0...1c.1.64.psy-ab..0.0.0....0.Xl8XyV3yb_g#imgrc=q4EOyqcRVwtUUM:&spf=1517670238268

Fotoj de la kovna geto:

https://www.google.de/search?biw=1366&bih=595&tbm=isch&sa=1&ei=Xs91WsijGsiPU_aXmKgK&q=Kaunas+ghetto&oq=Kaunas+ghetto&gs_l=psy-ab.3..0i19k1.59939.63759.0.64042.15.9.1.4.5.0.160.977.4j5.9.0....0...1c.1.64.psy-ab..1.14.1096...0j0i67k1j0i8i30i19k1j0i30i19k1.0.hxpo5UFexmQ

http://www.holocaustresearchproject.org/ghettos/kovnogallery/index.html

En printempo 1943:

Alvenis en Kovno nova grupego de kelkmil judoj el okcidenta Eŭropo, al kiuj oni diris, ke ili estos evakuitaj al „la Oriento" por labori, sed unue seninfektigitaj en Kovno. Sed anstataŭ labori en la oriento, la nazioj orientigis la bone vestatajn homojn unue en la direkto de la geto en Vilijampolė por rekte

[407] Tory 1990, p. 416; foton vd. sur http://digitalassets.ushmm.org/photoarchives/detail.aspx?id=11933.
[408] Matthäus 1999, p. 108; Kaiser/Holzman 2001, p. 236; Neumann 2003, p. 152.
[409] Gerlach 1998, p. 97.
[410] Dieckmann 1998, p. 448.
[411] Kaiser/Holzman 2001, p. 133.
[412] Legu la koncernan ĉapitron en lia libro pri la unua vintro 1941/42, p. 96s.

marŝigi ilin en la IXa fortikaĵon, kie ĉiuj homoj estis senprokraste lividitaj. Tio estis la „dua amasmurda operaco kontraŭ eksterlandaj judoj“!

Oni mortpafis grupon de ĉirkaŭ 30 judaj viroj, kiuj distanciĝis de siaj labortaĉmentoj por interŝanĝi nutraĵojn ĉe litovoj. Ili estis arestitaj de litovaj policistoj kaj transdonitaj al la Gestapo, de kiu ili estis senditaj kune kun siaj familianoj al la IXa fortikaĵo, kie ili estis mortigitaj.

Regna ministro de Ostlando, Alfred Rosenberg, vizitis Kovnon. Li esprimis sian kontenton pri la situacio, kiun li trovis surloke. Ankaŭ lia Regna komisaro por Ostlando, Hinrich Lohse el Riga, montris sin kontenta, kiam li restadis en la urbo.[413] En julio la laborejojn de la kovna geto vizitis ankaŭ generalo Martin Sandberger, la komandisto de Gestapo en Estonio kaj alia grava protagonisto de la amasmurdo de la judoj en la baltaj landoj, komparebla kun Jäger en Litovio.[414]

Sed la menciitaj operacoj ankoraŭ ne estis ĉio. Iom poste sekvis la „Estonia operaco“ kaj la „Operaco kontraŭ la infanoj“ („germ. „Kinder-Aktion“), (vd. sube).

### 4.2.4. Rezistado en la kovna geto

Sufiĉe multaj informoj estas konservataj pri la estiĝo kaj evoluo de la juda rezista movado en la kovna geto. La organizado de rezistaj grupoj servis unuavice por teni la kontakton inter la homoj en la geto kaj aktivaj grupoj ekster ĝi kaj por eviti, ke la getanoj komplete perdu la esperon. Malgranda grupo de judaj subteraj batalantoj formiĝis ekzemple ankaŭ kun la intenco perforte kontraŭreagi en kazo de nova murdorgio aŭ operaco. Sed multaj judaj partizanoj, kiuj kaŝiĝis en la arbaroj, estis serĉataj kaj trovitaj de la germanoj kaj litovoj, kaj senprokraste likviditaj.

Unuaj konspiraj renkontiĝoj inter rezistemaj judoj okazis jam en la unua duonjaro de la ekzisto de la geto, en kiuj kunvenis esence tri diversaj grupoj: cionistoj, komunistoj kaj senpartiuloj. La plej signifan socipolitikan rolon en la kovna geto ludis la cionistoj (Elkes, Garfunkel kaj Golub/Tory estis konataj cionismaj funkciuloj), dum la „Bund“-istoj ludis neniun rolon en Kovno, kompare kun la geto en Vilno. La plimulto de la cionistoj kredis, ke aktiva armata rezisto estas senutila, ĉar ĝi povas konduki al la neniigo de la geto, do oni preferis agadi favore al la savado de judoj, tamen ekzistis ankaŭ tiaj, kiuj pledis por la aktiva batalo.[415] Ankaŭ la geto-polico estis sub la influo de la cionistoj, kaj Elkes apogis la perfortan subteran reziston kaj eĉ volis transpreni la respondecon por ĝi. La komunistoj, kies grupo ampleksis 180 membrojn. posedis spertojn kiel aktivuloj de la subtera rezista movado el la tempo de la politika sendependeco de Litovio, kiam la komunisma partio estis malpermesata. Elstaran rolon ludis **Ĥaim Jelin**,[416] kiu ĝuis grandan respekton kiel karisma gvidanto de la komunisma juda rezistado en la kovna geto. Inter liaj sukcesoj estas menciindaj lia kapablo trovi ekvilibron inter la komunistoj kaj cionistoj, kiuj kverelis inter si pri ideologiaj kaj strategiaj demandoj. Ĉiuj tiuj rezistaj grupoj ricevis fortan baton kadre de la „Granda operaco“ en oktobro 1941. Post tio formiĝis nova grupo sub la nomo “Irgun Brit Cion“ (IBC), kiu estis gvidata de **Ĥaim Kaĥman Ŝapiro** kaj al kiu aliĝis ĉirkaŭ 100 junuloj, dum la organizaĵo por plenkreskuloj, „Brit Cion“, kunigis 40-50 aktivulojn kaj 30-40 simpatiantojn. IBC organizis prelegojn pri literaturo kaj historio. En marto 1944 ĝi estis likvidita. En aprilo 1942 aperis novaj cirkloj, ekzemple Mazok (cionistoj), en kies renkontiĝoj partoprenis ankaŭ Elĥanan Elkes kaj Leib Garfunkel. Mazok disponis ankaŭ pri kontaktoj kun la getoj en Vilno kaj Šiauliai. La cionismaj grupoj aktivis precipe sur la kultura kampo. Ili organizis klerigajn kursojn, posedis sekretan bibliotekon kaj eldonis bultenojn kaj disaŭdigis informojn tra la interna radio de la geto. Alia grupo nomiĝis AKO („Allgemayne Kamf-Organizatsie“), kiu konsideris sin kiel parton de la sovetiaj partizanoj kaj kiu ideologie celis batali en la

[413] Laŭ: Neumann 2003; Rosenfeld 2003; Hörmann 2003; Matthäus 2011, vol. 2, p. 930-967; Benz/Distel 2008, p. 189-208; Gutman 1998, p. 804-7.

[414] Tory 1990, p. 420; vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Sandberger.

[415] Atamuk 2000, pp. 183, 185

[416] Pri la sorto de Ĥaim Jelin vd. http://www.ushmm.org/research/the-center-for-advanced-holocaust-studies/miles-lerman-center-for-the-study-of-jewish-resistance/medals-of-resistance-award/resistance-in-the-kovno-ghetto. Leginda raporto pri la danĝera vivo kaj heroa agado de la judaj partizanoj estis verkita de Jokubas Jossade kaj publikigita en la *Nigra Libro de la holokaŭsto* de Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 605-18; vd. ĉe Tory 1990, p. 493-500.

spirito de Lenin kaj Stalin kontraŭ la faŝismo ĝis la fina venko de la Ruĝa Armeo. Ĝuste tio ne plaĉis al la nekomunismaj cionistoj, kiuj agis nur en la nomo de la judoj. Oni aŭskultis la radiostaciojn de BBC kaj de Moskva Radio kaj partoprenis en diversaj sabotaj agadoj kontraŭ germanaj instalaĵoj en Kovno. Ĉar estis ekstreme malfacile akiri armilojn, la juda „laboro-ficejo" klopodis dungi judojn en laborlokoj, kiuj troviĝis proksime de germanaj armilaj deponejoj. Tiel oni povis akapari kelkdek fusilojn. La urba subtera movado helpis. Sed tio estis tre danĝera afero: Ekzemple Juozas Vitkauskas estis kaptita de la germanoj kaj mortpafita kune kun sia familio. Alia litova komunisto, la presisto Povilas Malinauskas, estis mortigita, ĉar li estis malkovrita de la Gestapo, kiam li volis renkontiĝi kun judoj el la geto. 68 membroj de la grupo de Malinauskas estis arestitaj kaj ĵetitaj en la prizonon. Ankaŭ la judo Elijahu Ŝmuilov, kiu rilatis kun tiu grupo, estis mortpafita de la nazioj. Tio signifis, ke en printempo 1942 ĉi tiu subtera ĉelo ne plu ekzistis. Kiam en la kovna geto alvenis la polino (aŭ pola judino) Irena Adamoviĉ, ŝi raportis pri la situacio en la aliaj getoj de Litovio kaj Pollando, pro kio la rezistanoj de la kovna geto unuafoje eksciis interesajn informojn de ekstere.[417] Tiel, en junio/julio 1942 la judoj kam sciis pri la ekzisto de la neniigejoj en Bełżec, Sobibór kaj Majdanek en Pollando. En 1943 la subtera movado en la kovna geto ampleksis pli malpli 500 batalantojn el diversaj junularaj cionismaj movadoj kaj de la komunistoj.



Ĥaim Jelin (http://www.infocenters.co.il/gfh/notebook_ext.asp?book=1349&lang=eng&site=gfh, Jad Vashem), Avraham Tory (https://www.librarything.com/author/toryavraham) en 1942
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Fotojn de gvidantoj de la juda rezistado en Kovno vd. sub:
https://www.fold3.com/page/286123943-the-kovno-ghetto-partisans-chaim-yelin
http://www.holocaustresearchproject.org/revolt/gelpernusdiary.html

Post la perdita batalo en Stalingrado la judoj en la getoj komencis esperi pri rapida progreso de la Ruĝa Armeo, sed samtempe ili timis, ke la germanoj povus detrui la geton. Depost aŭtuno 1943 la kovnaj rezistanoj koncentriĝis pri la fuĝado en la arbarojn. Sed pro diversaj kaŭzoj en Kovno tio estis pli malfacila afero ol en Vilno, kie la limo al Belorusio estis pli proksima. Aliaj problemoj en Kovno estis, ke la arbaroj troviĝis malproksime kaj ke ĝia etna ĉirkaŭaĵo estis preskaŭ plene litova. Judaj subteraj ribeluloj de la „Fareinikte Partizaner Organizatsye" (FPO)[418] fuĝis en la arbarojn, kie ili parte estis trovitaj kaj mortigitaj de la germanaj kaj litovaj policistoj aŭ postvivs la holokaŭston en siaj kaŝejoj.[419] Dum Ĥaim Jelin postvivis ĉiujn masakrojn, multaj kovnaj rezistanoj perdis sian vivon pro la fiasko de la t.n. Augustovo-plano en oktobro 1943. En septembro 1944 estis fondita la „Militerishe Tekhnishe Komisie", kies tasko estis gvidi la logistikon por la agado en la arbaroj. Sed baldaŭ tiu komisiono estis anstataŭigita per pli malgranda komitato sub la nomo „Der Shvartser Shtab". Ankaŭ Jelin kaj Elkes kunlaboris kun ĝi. Kontentige funkciis ankaŭ la kunlaborado inter la subtera rezista movado, la Juda Konsilio kaj la Juda Polico. Por konservi la disciplinon eĉ okazis, ke oni kondamnis judojn, kiuj perfidis la subteran movadon,

[417] Ŝia raporto estas publikigita ĉe Tory 1990, p. 105-8.
[418] Informojn vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Fareinikte_Partisaner_Organisatzije (mankas litovlingva versio!). Inter la judaj malliberuloj troviĝis ankaŭ membroj de la „Kontraŭfasisma Batalorganizaĵo" (AKO) el Kovno.
[419] En aŭgusto 1943 Müller klarigis al Tory (p. 456) la forveturon de litovaj kaj germanaj policistoj de la geto pro tio, ke litovaj policistoj tro proksime rilatis kun judoj, ekzemple en la nigra merkato, kaj ke ekzistis kazoj, en kiuj judoj seksumis kun litovaj virinoj.

al la mortpuno. Multaj cionistoj, kiuj ne povis fuĝi en la arbarojn, pereis en la flamoj, kiam la germanoj bruligis la geton. La rezisto estis daŭrigata ankaŭ post la detruado de la kovna geto. En la transformita koncentrejo formiĝis novaj rezistaj ĉeloj, same kiel en la eksteraj koncentrejoj ĉirkaŭ Kovno. La situacio komplete ŝanĝiĝis, kiam la Juda Konsilio kaj la Juda Polico estis likviditaj de SS-anoj. Ĥaim Jelin mortis en la urbo, aliaj pereis dum sia fuĝo el la geto. La transportoj en la arbarojn estis perfiditaj kaj malkaŝitaj. La 150 restintaj judaj rezistanoj estis persekutitaj de la nova „Juda Ordoservo“. Tiel, entute ĉirkaŭ 7000 litoviaj judoj partoprenis en diversaj formiĝoj de la partizana rezisto.[420]

Lige kun la juda rezistado en Kovno indas mencii la sensacian historion de la grupo de 72 malliberuloj de la laborkomando „operaco 1005“, kiuj devis efektivigi la bruligon de la kadavroj en la IXa fortikaĵo. Ekzistas detala raporto pri la labor-kondiĉoj en la grupo kaj koncerne la konsistecon kaj nomaron de la membroj de tiu grupo.[421] Meze de novembro 1943 al ĝi apartenis 34 sovetiaj militkaptitoj, 14 judoj, kiuj estis arestitaj survoje dum sia fuĝo por aliĝi al la partizanoj, 9 judoj el la geto, 8 judoj, kiuj estis arestitaj en Kovno pro diversaj kaŭzoj, 3 rusaj fratoj, kiuj estis kaptitaj dum partizana agado en la ĉirkaŭaĵo de Kovno, 3 judinoj el la geto kaj 1 polino, kiu estis suspektata esti judino. La germana respondeculo de la nova laborgrupo estis SS-Obersturmgvidanto **Franz Radif**, komandisto de la IXa fortikaĵo.[422] La gardistoj de la grupo estis germanoj, kiuj servis ĉe la kovna Orda Polico. En tiu raporto estas detale priskribata ankaŭ la sensacia, ruze aranĝata fuĝado tra mem konstruita tunelo, kiu okazis en la nokto de la 25-26a de decembro 1943 kaj kiu ne estis rimarkita de la germanoj.[423] 64 fuĝintoj sukcesis reveni en la geton, kie judaj partizanoj akceptis ilin kaj plukondukis ilin, sub la gvido de Ĥaim Jelin, en la Rudniki-arbarojn apud Vilno. Por daŭrigi la bruligadon de la kadavroj la mankantaj ´laboristoj´ estis anstataŭigitaj de la germanoj per 50 homoj, kiuj estis plukitaj el diversaj judaj koncentrejoj. Al la taĉmento krome estis aldonitaj judoj el la kovna malliberejo kaj aliaj. Probable neniu el tiuj ´laboristoj´, kiuj estis kunligataj per katenoj, sukcesis fuĝi denove aŭ plu vivi. Kiam la Ruĝa Armeo atingis la IXa fortikaĵon, la sovetianoj renkontis nur amason da ligno, benzinujojn kaj hejtnafton, krom tio restaĵojn de bruliĝintaj homaj ostoj kaj amason da metalbutonoj kaj bukoj. Sur la muroj estis videblaj la engravuroj de centoj da nomoj de homoj, kiuj tie ´laboris´ aŭ pereis. La germanoj forviŝis multajn surskribojn. La litova kontrolisto I. Naudjiunas rakontis post la milito, kion li vidis tie. En la fosoj oni trovis ankaŭ restaĵojn de litovaj partizanoj, kiuj estis mortpafitaj tie en somero 1943 aŭ 1944.[424]

En la Va fortikaĵo iu judo Mejer Lurje eksplodigis la munician deponejon kaj mem pereis en tiu atenco. Pro tiu heroa ago 15 jarojn poste la sovetiaj instancoj atribuis al li postmorte la ordenon de la Ruĝa Flago.[425]

### 4.2.5. Post la geto sekvis la labor-koncentrejo

Kiam en junio 1943 – la germana reĝimo komencis malfortiĝi post la perdita batalo ĉe Stalingrado – Regna gvidanto SS Heinrich Himmler ordonis transformi la getojn de Ostlando en naziajn labor-koncentrejojn, kio signifis, ke jam alvenis ankaŭ la proksima fino de la kovna geto. Sed la transformado de la getoj en labor-koncentrejojn montriĝis ne tiel facila ´operaco´, des pli ke la SA-gvidantoj de la getoj tute ne entuziasmis pri tiu ideo, ĉar ili riskis perdi siajn ´prebendojn´, privilegiojn, avantaĝojn kaj profitojn, kiujn ili havis dank´ al la priŝtelado kaj ekspluatado de la judoj kaj la komercado kun la getanoj. Al ĉiuj tiuj

---

420 Atamuk 2000, p. 197.
421 Grossmann/Ehrenburg/Lustiger 1994. Ankaŭ Tory 1990 raportis pri tio, vd. p. 508-19. La taglibro de Tory finiĝas je la 9a de januaro 1944. Fine de marto, Tory fuĝis el la kovna geto kaj, cetere kun la helpo de litovoj, inter ili unu pastro (Bronius Paukstys), sukcesis kaŝiĝi plurajn monatojn en la vilaĝo Virvigaliai, antaŭ ol povi plufuĝadi tra Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Rumanio, Aŭstrio kaj Italio al Palestino. Ĉi tiun aventurecan ´vojaĝon ´kaj kiel la materialo de la taglibro atingis Palestinon Tory detale rakontis en la epiloga ĉapitro de sia taglibro 1990, p. 523-8. (Pliajn biografiajn detalojn vd. ankaŭ sub http://fr.wikipedia.org/wiki/Avraham_Tory; en Israelo, Tory fariĝis ankaŭ ĝenerala sekretario de la „Internacia Asocio de judaj advokatoj kaj juristoj“.
422 Vd. http://marjorie-wiki.de/wiki/Franz_Radif. Radif estis arestita, sed en februaro 1944 li povis forlasi la malliberejon pro malbona sano.
423 La gvidanto de tiu grupo, kiu konstruis la tunelon, nomiĝis Kolja Vasilenko, rusa judo. Detale vd. ĉe Tory 1990, p. 508-519.
424 Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 590-604. En la IXa fortikaĵo hodiaŭ troviĝas memorialo kun muzeo (vd. http://www.9fortomuziejus.lt). Sur la loko de la iama kovna geto troviĝas simpla memorŝtono (vd. http://jewishphotolibrary.smugmug.com/VIDEOS/JEWISH-LITHUANIA-A-Photo-Essay/i-6p2rX66). Pliajn informojn pri la KZ Kovno vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/KZ_Kauen.
425 Wiehn/Smoliakovas 1992, p. 53.

prebendoj la germanoj alkutimiĝis.[426] Precipe Cramer estis verva subtenanto de la geto, ĉar li multe profitis de ĝi, ĉar la judoj laboris por li, kio garantiis al li vivadon en kondiĉoj de lukso kaj abundo. Do, la geto estis kvazaŭ lia persona reĝlando, en kiu li povis funkcii kiel reĝo, kiel Tory komentis la situacion kun sarkasmo. Pro tio, la transformado de la geto al koncentrejo estis bremsata kaj prokrastata, ĉar la funkciuloj (re)agis nur malrapide kaj iliaj posteuloj ne estis tre spertaj pri tia rekonstruado, krom tio mankis materialoj. Nature, la onidiro pri la transformo de la geto en „armean tendaron“ maltrankviligis la getanojn, kiuj ne povis scii kia peripetio atendos ilin.[427]

Kiam Himmler elpuŝis sian ordonon, en la urbaj getoj de Ostlando vivis ankoraŭ 72´000 judoj, el ili 17´000 en Kovno, pliaj 20´000 en aliaj litovaj getoj, precipe en Vilno kaj Šiauliai,[428] kiuj ankaŭ estis malfonditaj kaj transformitaj en koncentrejojn, iliaj loĝantoj deportataj al aliaj koncentrejoj en Estonio, Pollando kaj Germanio, kie miloj da judoj trovis la morton.

Intertempe, en julio 1943, la okcidentaj aliancanoj invadis Sicilion (operaco „Husky“), kio estis konsiderata en la geto kiel grava kaj esperplena evento.[429] Alia (germana) operaco sub la nomo „Citadelo“ koncernis la batalon ĉe Kursko, sed ĝi estis disbatita de la Ruĝa Armeo per la kontraŭa operaco „Kutuzov“, kiu daŭrigis la enkondukon de la malvenko de la germana armeo en Sovetunio post la Batalo ĉe Stalingrado en januaro/februaro 1943. La 25an de julio ankaŭ Mussolini rezignis pri sia rolo kiel reganto de Italio. Iom da ĝojo kaptis la getanojn, kiam disvastiĝis informoj, ke estos establita sendependa juda ŝtato en Palestino kun prezidanto Ĥaim Weizmann ĉe la pinto.[430]

La 14an de aŭgusto la komandisto de la Sekureca Polico kaj de Gestapo en Kovno malpermesis al individuaj judoj (inkl. de judinoj) moviĝi ekster la limoj de la urbo de Kovno, kaj judaj laboristoj rajtis labori nur en la atribuitaj laborlokoj.[431]

La 20an de aŭgusto anstataŭ Cramer venis **Arnold Lentzen**,[432] kiu ascendis por fariĝi nova reĝo de la geto.[433] Kelkajn tagojn poste ankaŭ Ernst Stütz kaj Schmitz forlasis Kovnon, kune kun ili kelkcent latvaj soldatoj – al Vilno, por organizi novan operacon en la loka juda geto (la 1an de septembro), el kiu kelkmil judoj (fakte 5000) devintus esti selektataj kaj deportataj al Estonio por deviga laboro. Ĉar la judoj defendis sin ĉiurimede kaj kaŝiĝis en la keloj, okazis pafado, kiu kaŭzis centojn da viktimoj. La anoj de la kovna geto timis, ke simila dramo povos ripetiĝi en Kovno. Multaj parencoj de la judoj en la kovna geto troviĝis en la vilna geto. Post sia ´ekskurso´ al Vilno, Stütz revenis al la kovna geto por informiĝi „kiel statas la aferoj en la kovna geto“ kaj ekscii „pri kio la homoj parolas en tiuj tagoj“[434]

Post la detruado de la kovna geto fare de la germanoj, litovaj bandoj sisteme traserĉadis la ruinojn por trovi judajn valoraĵojn.[435]

La kovna koncentrejo estis ´inaŭgurita´ la 1an de novembro 1943. Ĝia teritorio esence kongruis kun la spaco de la plurfoje malgrandigata geto.[436] Per tio ŝanĝiĝis ankaŭ la formalaj strukturoj de la kontrolaj kaj hierarkiaj instancoj kaj kun ili la reguloj de la laborado kaj vivado. Ĉiuspeca kultura vivo estis estingata. La domoj estis numeritaj kaj reorganizataj laŭ 330 blokoj. En ĉiu domo la nombro de la loĝantoj estis kontrolata; se mankis unu persono, ĉiuj respondecis pri la sekvoj.[437] Anstataŭ la SA, kiu kontrolis la civilan administradon de Kovno kaj per tio ankaŭ la antaŭan geton mem, la gvidadon de la kovna koncentrejo transprenis la SS. Konkrete tio signifis, ke la kovna koncentrejo ne plu dependis de la „Ekonomi-Administra Ĉefoficejo“ (WVHA) en Berlino sed de la „SS-Ekonomiisto ĉe la Supera SS- kaj

---

[426] Kvankam laŭ la rasaj leĝoj la medicina esplorado de germanoj fare de judaj kuracistoj estis severe malpermesata, ekzemple Stütz vizitis d-ron Elkes por esti ekzamenata, ĉar li sentis sin malbone, (Tory 1990, p. 425).
[427] Vd. Tory 1990, noto de la 30a de julio 1943, p. 442-8.
[428] La getoj kaj koncentrejoj en ĉi tiuj litovaj urboj havas propran historion, kiu parte similas al tiu en Kovno. Vd. la nacilingvan fakliteraturon. La geto en Šiauliai troviĝis en la kvartaloj Kavkaz kaj Trakai. Ĉe la militeksplodo en Šiauliai vivis 5360 judoj, de kiuj unu milo sukcesis fuĝi en Sovetunion. (Kibelka 1996, p. 275). Pri la situacio en la geto Šiauliai en aŭgusto 1943 vd. Tory 1990, p. 460-2, kaj Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 548-81, laŭ la taglibro de A. Jeruŝalmi, kiu memorfiksis la kruelan traktadon de la judoj fare de sadismaj germanaj nazioj kaj litovaj policistoj kaj la rolon de la Juda Konsilio.
[429] Tory 1990, p. 417.
[430] Certe, tiaj okazaĵoj, kiuj signifis la alproksimiĝon de la militfino, ĝojigis la judojn, sed ili tamen restis trankvilaj, kiel skribis A. Jeruŝalmi en la kazo de la geto en Šiauliai (Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 570), ĉar la judoj scipovis bridi siajn emociojn.
[431] Tory 1990, p. 457.
[432] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Arnold_Lentzen.
[433] Tory 1990, p. 459s.
[434] Tory 1990, p. 462-5.
[435] Birger 2010, p. 71.
[436] Mapon vd. en: Benz/Distel 2008, p. 199.
[437] Kaiser/Holzman 2001, p. 232.

Polica Gvidanto“ (HSSPF Nordo) en Riga sub la gvido de SS-ĉefgvidanto **Eduard Bachl** kaj de la SS-ĉefsturmgvidanto **Wilhelm Schitli**, kiu respondecis pri la judaj laboristoj. La surloka komandisto de la koncentrejo fariĝis SS-Obersturmbanngvidanto **Wilhelm Göcke**, kiu alvenis meze de septembro 1943 ankoraŭ en la tempo de la ekzisto de la kovna geto (antaŭe li gvidis la koncentrejojn de Narvik en Norvegio, Mauthausen en Aŭstrio kaj Varsovio en Pollando).[438] Göcke rekte kunlaboris kun SS-ĉefgvidanto d-ro **Wilhelm Fuchs**, kiu estis la posteulo de SS-standartgvidanto Jäger, kiu estis revokita al Germanio (por poste fariĝi SD-komandisto en Reichenberg, Sudeta Lando). Je lia dispono estis „areto“ da SS-anoj el Neuengamme kaj Wolfsburg-Arbeitsdorf, kaj la reston konsistigis la juda „memadministracio“. La nombro de la SS-gvidantaro de la kovna koncentrejo („KZ Kauen“) estis pli ol 700. Anstataŭ la juda getopolico estis engaĝata la „Juda Ordoservo“ sub la komando de SS-Unterschargvidanto **Josef Pilgram**. La administracio de la koncentrejo estis kontrolata de SS-ĉefsturmgvidanto **Willy Rinck**. La koncentrejo mem estis gardata de germanaj anoj de la Waffen-SS el la hungara Banato, de ukrainaj Vlasov-armeanoj[439] kaj en la plej fina fazo de ĝia ekzisto de la latva (ne litova!) SS. Aliaj SS-anoj el Germanio kaj Aŭstrio kompletigis la gvidadon kiel respondeculoj por aliaj sektoroj de la koncentrejo. La Juda Konsilio de Elĥanan Elkes estis reintegrita en la novan strukturon, kaj baldaŭ abolita. Do, la ŝanĝo de la reĝimo de SA al SS signifis unuavice modifon de la strukturoj kaj hierarkio sed ankaŭ de la etoso kaj ´mentaleco´ aŭ konduto. En la diversaj partoj de la koncentrejo laboris 4-5000 el 8000 judoj, kiuj postrestis en la geto.

Kiel aliaj analogaj ekzemploj de germanaj (kaj aŭstraj) nacisocialistoj, kiuj gvidis naziajn koncentrejojn, ankaŭ Göcke restis en la memoro de la homoj, kiuj ´konatiĝis´ kun li, kiel eksterordinare abomena tipo. Mishell priskribis lin kiel „nepre respektindan lakeon“ kun longa „sperto kiel amasmurdisto“. Lia vizaĝo similis al „masko de mortinto kun elstarantaj vango-ostoj kaj akre rigardantaj okuloj“. Lia agmaniero konformis al la solida kaj radikala germaneca „ĝisfundeco“ kun la fanatika klopodo akiri informojn el ĉiuj eblaj fontoj. Liaj unuaj paŝoj estis ruze aranĝataj. Por gajni la konfidon de la getanoj, Göcke faris al ili diversajn komplezojn, altigis la kvanon de manĝ-porcioj kaj mildigis la reĝimon ĉe la geto-enirejoj por poste des pli brutale trakti la judojn. Liaj ĉefaj taskoj ja estis transformi la geton en koncentrejon, rekrutigi judajn laborfortojn kaj ekspedi nebezonatajn judojn al diversaj neniigejoj.[440]

La diferencojn inter la vivo en la geto kaj la vivo en la koncentrejo Leo Lewinson priskribis jene: „En la geto oni vivis en loĝejoj, en la koncentrejo en barakoj; en la geto oni havis liton kun tolaĵoj, en la koncentrejo nur kuŝlokon kun maldika pajlosako; en la geto oni vivis kune kun la familio, en la koncentrejo viroj kaj virinoj estis separataj laŭ diversaj barakoj; en la geto eblis eviti la okulojn de la kontrolistoj, en la koncentrejo oni estis konstante observata de ili; kaj tiel plu. En la koncentrejo, kie troviĝis centoj da homoj kunpuŝataj, dormi kaj lavi sin estis granda problemo.“[441] Zev Birger aldonis al tio, ke en la geto la homoj malsatis, sed en la koncentrejo ili malsatmortis.[442]

Kvankam en la komenco la reĝimo en la KZ ŝajnis malpli severa, la situacio radikaliĝis iom post iom. Kadre de la t.n. **„Estonia operaco“** (**„Estland-Aktion“**), kiu okazis la 26an de oktobro 1943, ĉirkaŭ 2000 personoj estis deportitaj al Estonio, kie ili estis antaŭvidataj por la laboro en la fifamaj oleoskistaj minejoj, kiujn Himmler ordonis ekspluati, aŭ pereis en la koncentrejoj de Klooga, Lagedi kaj Vaivara.[443] Aliaj 758 homoj, ĉefe infanoj kaj maljunuloj, estis senditaj verŝajne al Aŭŝvico, kie ili estis mortigitaj.[444] Aliaj 4000 eksgetanoj estis senditaj al pli malgrandaj „eksteraj lagroj“ ĉirkaŭ Kovno (vd. pli sube). En la iama kovna geto restis do ĉirkaŭ 8000 personoj, el kiuj 4600 laboris en diversaj metiejoj.

La situacio akriĝis en marto 1944. Fine de ĉi tiu monato ĉirkaŭ 1000 infanoj kaj 300 maljunuloj estis deportitaj verŝajne al Aŭŝvico aŭ Majdanek. Ĉi tiu senekzempla murdagado eniris la historion kiel **„operaco kontraŭ la infanoj“** („germ. **„Kinder-Aktion“**). Ĉiuj anoj de la Juda Polico, kun

[438] Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Göcke.
[439] Ukrainaj gardistoj (Trawniki- kaj Vlasov-anoj) partoprenis en signifa grado ankaŭ en la krimoj kontraŭ la judoj precipe en diversaj neniigejoj (kiel Treblinka, Sobibór, Bełżec k.a.).
[440] Mishell 1988, p. 163s. Laŭ Mishell, p. 269, Göcke celis nek savi judojn nek ilian tujan likvidon, ĉar sen judoj li timis esti sendita al la ruslanda fronto, kion li povis eviti kiel komandisto de juda koncentrejo.
[441] Wiehn/Lewinson 2001, p. 58.
[442] Birger 2010, p. 58.
[443] La trajno kun la deportitaj judoj, kiuj veturis de Kovno al Estonio, trapasis la urbojn Šiauliai kaj Linkaičiai, kie la veturantoj eljetis paperetojn, kiuj enhavis jenan tekston: „Ni estas judoj el la kovna geto, ni ne scias kien ni veturas, separitaj de la virinoj. Unu el Slobodka.“ Laŭ Tory 1990, p. 457, centoj da kovnaj judoj estis mortigitaj en la naziaj KZ-oj de Estonio. Pri la naziaj koncentrejoj en Estonio vd. Birn, R.B.: Die Sicherheitspolizei in Estland 1941-1944. Paderborn 2006; kaj Benz, W.; Distel, B.: Der Ort des Terrors. Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager. Vol. 8. Munkeno 2008.
[444] Dieckmann 1998, p. 455.

la escepto de la membroj de la polica orkestro, estis forkondukitaj al la IXa fortikaĵo, kie oni pridemandis ilin pri la kaŝejoj de la infanoj en la geto. Kelkaj ne eltenis la premon kaj malkaŝis la kaŝejojn. Sekve, 40 policistoj estis mortpafitaj. Mishell memoris, ke iu SS-ulo kriis: „Ihr verfluchten Juden braucht keine Kinder“ (vi damnitaj judoj ne bezonas infanojn).[445]

Pri la „operaco kontraŭ la infanoj“ kortuŝajn raportojn postlasis atestantoj kiel Rosa Simon, Zwi Katz, Raya Kruk, Zev Birger, Leo Lewinson kaj Helene Holzman.

Zev Birger memoris tiun tragedion jene:

„Por detrui nian moralon oni aranĝis en la kovna geto la tiel nomatan ´Kinder´-operacon. Kiam ni troviĝis en niaj laborlokoj kaj nur la maljunuloj kaj patrinoj estis en siaj domoj kun la infanoj, estis publikigita la ordono deponi ĉiujn infanojn ĝis certa aĝo sur certa placo. Ne ĉiuj sekvis la alvokon. Iuj jam delonge aranĝis iujn kaŝlokojn por la infanoj: falsaj plankoj en ŝrankoj, kovraĵoj antaŭ muroj kaj malgrandaj kaŝlokoj en iuj kameroj devintus protekti la etulojn kontraŭ la germanaj kaptiloj. Sed la soldatoj atente traserĉadis la domojn kaj eĉ unu infano ne estis maltrafita de iliaj rigardoj kaj manoj. Patrinoj, kiuj volis akompani siajn infanojn, estis retropuŝitaj, kaj tiuj, kiuj provis savi sian propran vivon, estis devigitaj akompani la infanojn. Ĉi tiu agado daŭris du tagojn, kaj en la nokto inter tiuj du tagoj la homoj panike pripensadis kion ili povus entrepreni por savi la infanojn. Sed ĉio estis vana. (…).“[446]

Leo Lewinson observis la okazaĵojn de la „Kinder“-operaco jene:

„La pordego de la geto estis malfermata. Anoj de Gestapo subite alveturis en nigraj, fermataj aŭtomobiloj, disvastigis sin tra la tuta geto kaj kriis ordonojn tra la laŭtparoliloj: ´Neniu rajtas kaŝiĝi! Kaŝitoj estos tuj mortpafitaj! Ĉiuj pordoj devas resti malfermataj!´ Kaj la sangaj rabistoj, akompanataj de litovaj, rusaj (de la Vlasov-armeo) kaj ukrainaj helpantoj,[447] iris de domo al domo, de pordo al pordo, de ĉambro al ĉambro. Infanoj estis perforte elprenitaj kaj ĵetitaj sur kamionojn kiel lignaj bretoj. La infanoj kaj iliaj patrinoj kriadis. Patrinoj petegis la murdistojn redoni siajn infanojn. Pro senesperiĝo ili pretis mordi la kolon de la murdistoj. Iuj patrinoj elŝiris siajn proprajn harojn, aliaj videble tuj griziĝis aŭ fariĝis senkonsciaj. Unu el la krimuloj ĵetis la infanojn tra la fenestro el la tria etaĝo rekte sur la kamionon. Rusa[448] murdisto ´trankviligis´ alian infanon, kaptante ĝin ĉe la piedoj kaj ĵetante ĝin kontraŭ la muron. Alia krimulo kaptis unu bebon ĉe la piedoj kaj disŝiris ĝin en du pecojn. La patrinoj senkonsciiĝis pro tio. Ankaŭ homoj, kiuj ne havis infanojn, estis terurigitaj kaj rigidiĝis.“

Helene Holzman notis pri tiu terura sceno jenajn observojn:

„La infanoj estis perforte elŝirataj el la litoj kaj estis tute senvestaj. Oni krude ĵetis ilin en la aŭtomobilojn, tiel ke multaj vundiĝis. Ili kriis kompatoveke kaj la pli grandaj infanoj klopodis eskapi. En tiu nepriskribebla lamentado flanke de la aŭtoj eksonis muĝe laŭta radiomuziko. Ankoraŭ neniam la mondo vidis tian perfidan cinikon.“[449]

Post la „Kinder“-operaco, en kiu malaperis 2500 infanoj, kiuj estis verŝajne deportitaj al la krematorioj en iuj neniigejoj, la etoso estis priskribita de Zev Birger jene:

„Post kiam la infanoj estis forportitaj, en la stratoj kaj kortoj de la geto regis fantome timiga trankvileco. Mankis ridado, ludado, bruado, vigleco, ĉio restis malplena. Kadre de la „Kinder“-operaco estis mortigitaj pli ol 2000 infanoj, kiuj signifis la esperon por nova komenco. Per tio nia moralo ricevis novan absolutan krizon.“

Post la operaco kontraŭ la infanoj, en la geto *oficiale* ne plu ekzistis infanoj. Do, la demando kion fari kun la restintaj infanoj fariĝis granda problemo.[450]

Tio ankoraŭ ne estis ĉio, kion Lewinson vidis. Post la „Kinder“-operaco okazis ankoraŭ alia incidento. Unu tagon grandaj aŭtoj alveturis en la geton por halti ĝuste ĉe la malsanulejo. La alveno ne estis anoncita. Oni simple eniris la konstruaĵon ĝis la litoj, en kiuj kuŝis la malsanuloj, kaj portis ilin al la aŭtoj. Post tio oni klarigis al la personaro, ke la maljunaj kaj malsanaj homoj estos alportataj al „speciala

[445] Mishell 1988, p. 208. En tiu ĉi ĉapitro la aŭtoro konfirmis la okazaĵojn dum la kontraŭ-infana operaco, kiu estis gvidita de SS-Sturmbanngvidanto Berger.
[446] Berger 2010, p. 61.
[447] Laŭ Kruk tiuj ukrainoj portis germanajn uniformojn.
[448] Laŭ Holzman *ukrainaj* helpantoj akompanis la germanojn dum la Kinder-operaco, (ofte oni ne faras diferencon inter rusoj kaj ukrainoj).
[449] Kaiser/Holzman 2001, p. 252.
[450] Mishell 1988, p. 232.

malsanulejo“. La komuniko sonis serioze, sed la ciniko de la germanoj estis evidenta. En tiuj tagoj nemalmultaj gepatroj de rabitaj infanoj de la „Kinder“-operaco troviĝis en la malsanulejo por esti ´flegataj´.[451] Tio estis la „operaco kontraŭ la malsanuloj“.

Kvankam la nazioj do pli kaj pli strangolis la koncentrejon, la rezistanoj ankoraŭ sukcesis kontrabandi kelkcent judojn el la koncentrejo eksteren, inter ili ankaŭ 14 malliberulojn de la IXa fortikaĵo. Inter novembro 1943 kaj aprilo 1944 ĉirkaŭ 1500 judoj sukcesis fuĝi el la kovna koncentrejo. En majo 1944 laboris ankoraŭ 3000 judoj por la germana militindustrio. Kiam la germanoj sentis, ke la Ruĝa Armeo alproksimiĝas, la SS-anoj de Göcke komencis, la 8an de julio 1944, peli la restantajn judojn el siaj domoj por deporti ilin sur ŝipoj kaj trajnoj al Germanio kaj detruis la kovnan koncentrejon. Laŭ Holzman, Göcke cinike diris al la deportotaj judoj, ke la germanoj celos „savi ilin de la rusoj“. La restantajn homojn de la geto, inter kiuj troviĝis ankaŭ Elĥanan Elkes kaj Jehoŝua Rosenfeld, oni veturigis al Stutthof, Aŭŝvico kaj Dachau-Kaufering,[452] separite laŭ viroj kaj virinoj, kie ili grandparte pereis.[453] Multaj judoj forpasis ankaŭ dum la fifamaj „mortmarŝadoj“, kiujn ili ankoraŭ devis elteni. La ceteraj homoj, kiuj ne aliĝis al tiuj transportoj, kaŝiĝis en diversaj bunkroj kaj kaŝejoj de la kovna koncentrejo. Sed tiuj kaŝejoj, nomataj „malines“, estis traserĉataj de germanaj kaj latvaj esplorantoj, kiuj venis kun siaj flarhundoj, kaj la trovitoj estis mortigitaj de ili. Multaj viktimoj, ankaŭ kelkdek infanoj, simple forbrulis en siaj kaŝejoj, kiam la nazioj, helpe de la latvoj, flamigis la koncentrejon. Ankoraŭ dum semajnoj oni flaris en la aero super la infero de Kovno, kiun Mishell komparis kun la ´Infero´ de Dante,[454] la odoron de forbrulinta homa karno. La oficiala fino de la kovna koncentrejo, kies teritorio estis bruligita kaj la konstruaĵoj eksplodigitaj, alvenis la 12an de julio 1944. La Ruĝa Armeo renkontis ankoraŭ 90 judojn sur la teritorio de la iamaj geto kaj koncentrejo, kaj maksimume 2000 judojn oni trovis en la urbo mem, kie iuj kaŝiĝis, aŭ en la proksimaj arbaroj.

La 1an de aŭgusto 1945 Kovno estis reokupata de la sovetia armeo. Kiam la rusoj eniris la barakojn de la koncentrejo, ili estis profunde tuŝataj de la aspekto de la priplorindaj figuraĵoj, kiujn ili tie renkontis. Tiuj homoj estis malsanaj, maldikaj, malsataj, malpuraj, frue griziĝintaj. Post kelkaj tagoj aperis rusa armea lazareto, en kiu estis flegataj la grave malsanaj viktimoj. Ne malmultaj personoj estis tiel senfortaj, ke malgraŭ la bona flegado ili baldaŭ forpasis, dum aliaj rapide resaniĝis.[455]




Memorŝtonoj en Kovno: kovna geto kaj iama Lietūkis-garaĝo (fotoj el Vikipedio).
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

[451] Lewinson p. 56s.
[452] Informojn pri ĉi tiu koncentrejo vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Kaufering_concentration_camp. Pri la deportado de kovnaj judoj al Stutthof kaj Dachau-Kaufering raportis en siaj memuaroj precipe Trudi Birger, Zev Birger, Leo Lewinson, Solly Ganor, Raya Kruk, Jehuda Beiles, Balys Sruoga (el nejuda vidpunkto).
[453] La testamenton de Elkes publikigis Tory 1990, p. 503-7. Elkes estis deportita al Landsberg am Lech kaj mortis en Dachau-Kaufering (Bavario) la 17an de oktobro 1944, laŭ alia indiko la 17an de julio 1944.
[454] „Tra mi oni eniras la urbon de la funebro, tra mi oni iras al la eterna doloro, tra mi oni iras al la perdita popolo…“ (surskribo sur la pordego al la infero, tria kanto, versoj 1-3 de la ´Dia Komedio´ de Dante).
[455] Laŭ la raporto de Emma Frenkel en Kaiser/Holzman 2001, p. 271s.



Muzeaj memor-konstruaĵoj en la iama IXa fortikaĵo en Kovno en la jaro 2006 (fotoj el Vikipedio)
(vd. http://www.muziejai.lt/Kaunas/forto_muziejus.en.htm).
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

### 4.3. Aliaj koncentrejoj en la proksimeco de Kovno

En pli ol 200 lokoj de Litovio oni persekutis, engetigis kaj mortigis judojn.[456] Aliaj naziaj koncentrejoj en Litovio ligitaj kun la KZ Kovno situis en:

*Kovno-Aleksotas:* Kiel jam supre menciite, en Aleksotas troviĝis flughaveno, kie unue devis labori centoj aŭ miloj da sovetiaj militkaptitoj. Ekde septembro 1941 tien estis senditaj po 1000 judoj por ĉiu tago el la kovna geto por labori. En septembro 1943 estis eldonita nova ordono konstrui en la kazerno de Aleksotas labor-koncentrejon por 2500 judoj. Sed mankis materialo por realigi la planon. Nur en novembro 1943 alvenis la unuaj 1200 judoj, inter ili ankaŭ virinoj kaj infanoj, en la ´tendaron´ de Aleksotas. Ĝia ĉefo estis SS-Unterschargvidanto **Karl Miehe**, kiu nomis la judojn „pako“ aŭ „porkoj“ kaj ĉikanis ilin laŭ diversaj manieroj. La judoj devis fari diversajn pezajn laborojn sur la flughaveno. Idel Kozłowski raportis pri la ege malfacilaj vivkondiĉoj en tiu koncentrejo, kiu estis ĉirkaŭŝirmata per dratbarilo kaj kontrolata de gardistoj. La ĉefa enirejo de la koncentrejo estis severe kontrolata, kaj la judoj estis konstante batataj. La nutraĵoj konsistis el pano kaj supo. En printempo 1944 la judoj devis porti vestaĵojn de malliberuloj. Kiam en julio 1944 la koncentrejo estis fermita, la prizonanoj estis senditaj al Stutthof. En la tribunala proceso kontraŭ Miehe en 1949 ĉi tiu nazia krimulo ricevis la punon de (nur) tri jaroj da arestado en prizono.

*Kovno-Palemonas:* En septembro 1943 la Juda Konsilio de la kovna geto devis sendi ĉirkaŭ 300 laboristojn en la tegolan fabrikon de la kovna antaŭurbo Palemonas, kie ili estis malliberigataj en nove konstruita koncentrejo. La germanoj planis vastigi ĉi tiun koncentrejon por 500 malliberuloj. La 27an de marto 1944 la infanoj kaj maljunuloj estis forigitaj, ilia sorto ne estas konata. En julio la koncentrejo estis evakuita, kaj la malliberuloj devis piedmarŝi ĝis la stacidomo de Kovno, kie oni puŝis ilin en vagonojn por brutoj, kiuj veturis al Stutthof aŭ Dachau.

*Kovno-Petrašiūnai* (jid./germ. *Petrasun):* Fine de 1943, komence de 1944 tie estis loĝigataj, en du barakoj, 80 personoj. La tasko de la prizonuloj estis ripari militajn kamionojn.

*Kovno-Pravieniškės:* Ĉi tiu koncentrejo ekzistis ekde junio 1941 kaj estis kontrolata de litovaj gardistoj, kiuj eĉ promesis al la malliberuloj pagadon kaj protekton. La litovoj postulis, ke 200 judoj laboru en la torfejo de Pravieniškės. La juda labor-oficejo (jes, ankaŭ tio ekzistis!) konsentis disponigi cent homojn, sed aperis nur 20-40. Kaj Pravieniškės evidentiĝis kaptilo: La judoj estis terure mistraktataj kaj ekspluatataj, multaj pereis.

*Kovno-Šančiai* (jid./germ.: *Kauen-Schanzen):* Laŭ la plano de la germanoj en Šančiai, kie troviĝis artileria kazerno, devis labori 1200 judoj. En decembro 1943 efektive estis sendataj tien 1500 judaj viroj, virinoj kaj infanoj, ĉefe el la kovna geto, kiuj devis loĝaĉi en mizeraj barakoj, separite laŭ seksoj (kiel

[456] Liston de tiuj 239 lokoj vd. ĉe Levinson 2006, p. 501-9.

kutime). Tie ili devis plenumi diversajn laborojn. La 27an de marto 1944 la germanoj selektis ankaŭ en tiu ĉi koncentrejo centon da infanoj kaj maljunuloj, kiujn ili verŝajne alportis en la IXan fortikaĵon, kie ili estis mortpafitaj. Komence de julio la malliberuloj de la KZ Šančiai devis piedmarŝi ĝis la flughaveno de Aleksotas, kie oni plu veturigis ilin al Stutthof kaj Dachau-Kaufering.

*Kazlų Rūda:* Ĉi tiu ekstera koncentrejo troviĝis 35 km sude de Kovno. En la arbaro troviĝis kelkaj barakoj, kie kelkcent judoj devis labori en torfejo. Germanaj kaj ukrainaj gardistoj kontrolis la zonon. La nutraĵoj estis sendataj de la kovna koncentrejo. Post la fermo de la koncentrejo en Kazlų Rūda en julio 1944 la prizonanoj devis piedmarŝi reen al Kovno. Survoje ĉirkaŭ 100 homoj povis fuĝi kune kun kelkaj ukrainaj gardistoj en la arbaron. La resto estis deportita al Stutthof, Aŭŝvico aŭ Dachau.

*Kėdainiai (*jid./germ.: *Keidan):* En majo 1943 al tiu urbo, kiu situas 50 km norde de Kovno, estis sendataj 500 judoj el la kovna geto por labori en la tiea flughaveno. En aŭgusto sekvis pliaj 200, ankaŭ virinoj, kiuj estis separataj de siaj familioj kaj infanoj.[457] En marto 1944 la infanoj estis selektitaj kaj verŝajne alportitaj al Kovno, kie oni likvidis ilin. Same kiel la judoj el aliaj koncentrejoj, post la fermo de la ´tendaro´ en Kėdainiai la judoj estis senditaj al Stutthof.

*Kaišiadorys:* En oktobro 1942 ekekzistis en ĉi tiu urbo, 40 km oriente de Kovno, sur iu kampo labortendaro por judoj. La unuaj 200 laboristoj originis el la kovna geto. En majo 1943 tien estis sendataj pliaj 300 judoj, kaj poste sekvis ilin ankoraŭ unu grupo de judoj el Kovno, tiel ke en julio tie troviĝis 400 personoj.[458] La barakoj estis kontrolataj de germanaj kaj ukrainaj gardistoj. La prizonuloj devis faligi arbojn kaj ŝarĝi trajnvagonojn de la germana armeo. Aliaj devis labori en torfejoj. Ankaŭ en Kaišiadorys la infanoj estis selektitaj laŭ sama maniero kiel aliloke. Komence de aŭgusto tie estis murditaj 4 homoj: civitanoj de Germanio kaj Nederlando, kaj ukrainaj nazioj.[459]

Krom en la menciitaj lokoj apud Kovno ekzistis ankoraŭ aliaj koncentrejoj aŭ ´labortendaroj´ en jenaj lokoj: *Vievis, Žiežmariai, Baptai, Marijampolė, Raudondvaris* kaj *Ežerėlis,* kie troviĝis geto por ciganoj.[460]

*Šiauliai:* La koncentrejo de Šiauliai, kiu ricevis la statuson de „ekstera tendaro" de la kovna KZ, estis gvidata de SS-ĉefsturmgvidanto **Wilhelm Forster** kaj de SS-Oberschargvidanto **Hermann Schleef**. Unue, ĉirkaŭ 1500 „laborkapablaj" viroj kaj virinoj estis distribuataj al tiu ĉi kaj aliaj koncentrejoj apud Šiauliai. Tiel, ĉirkaŭ 2000 homoj laboris en la koncentrejo(j) de Šiauliai, ĉefe en ties leda fabriko sed ankaŭ en la laborejoj de la germana armeo. En julio 1944 komenciĝis la evakuado de la judoj al Stutthof, Aŭŝvico kaj Dachau. La 8an de julio grupo de judoj provis fuĝi, sed kelkaj estis morpafitaj. Ĉirkaŭ 6 km sudoriente de Šiauliai troviĝis la flughaveno. Kelkcent judoj estis sendataj ankaŭ tien por labori; kelkaj sukcesis fuĝi. En novembro 1943 la infanoj kaj maljunuloj estis deportitaj kaj mortigitaj.

*Daugėliai:* En ĉi tiu loko, kiu situas 15 km de Šiauliai, troviĝis tegola fabriko. En septembro 1943 tien estis sendataj ĉirkaŭ 250 judoj kun siaj familianoj. Eliezer Jeruŝalmi, membro de la loka Juda Konsilio, postlasis ateston pri la stato de la kondiĉoj, kiuj devis esti sufiĉe primitivaj. En Daugėliai 246 personoj devis loĝi en barakoj, kiuj havis lokon nur por 60 homoj. Pro manko de sufiĉaj nutraĵoj regis teruraj malsato sed ankaŭ malvarmeco kaj humideco. La ´tendaro´ estis ĉirkaŭŝirmata per dratbariloj kaj gvidata de SS-oficiro, je kies dispono estis gardistoj de la 15a litova polica bataliono. En novembro 1943 la infanoj kaj maljunuloj estis deportataj kaj mortigitaj. Post la fermo de la koncentrejo en julio 1944 la prizonanoj estis senditaj al Stutthof.[461]

---

457 Detale ĉe Tory 1990, p. 448-455.
458 Tory 1990, p. 408.
459 Tory 1990, p. 454.
460 Laŭ http://lt.wikipedia.org/wiki/Ežerėlis.
461 Laŭ Balys Sruoga en „Dievų miškas" (Arbaro de dioj) la litoviaj judinoj alvenis en Stutthof kun sia infanaro kiel neatendita lavango, kio signifis grandan problemon, aŭ plagon por tiu koncentrejo, kiu antaŭe ne konis tian ´publikon´. Oni povas demandi sin, ĉu la ironia tono, de kiu la libro de Sruoga estas ĝenerale trapenetrata, estas adekvata en la du ĉapitroj pri la amasa alveno de la judoj en Stutthof (germane: „Nur das Gold beherrscht uns…" kaj „Jüdinnenschwemme"), kie ili estis brutale traktataj kiel brutoj kaj kiel viktimoj, al kiuj oni rajtis rabi ĉion kion ili posedis. Dum tiu ´proceduro´, ne malmultaj judinoj perdis sian vivon. Post sia alveturigo en brutvagonoj, en Stutthof la fizike kaj psike komplete elĉerpitaj judaj familioj estis kruele disŝirataj laŭ viroj, virinoj kaj infanoj. Dum la virinoj panike klopodis protekti kaj savi siajn infanojn, okazis selektado: la labor-malkapablaj homoj estis disigitaj de la laborkapablaj kaj senditaj al koncentrejoj kun gasĉambroj. Do, kialo por ironie priskribi kio okazis kun la judoj en Stutthof, kiel rakontis diversaj atestantoj, kiuj postvivis la tragedion (legu la koncernajn ĉapitrojn precipe ĉe T. Birger, Ganor, Kruk kaj Mishell), certe ne ekzistas.

*Akmenė:* En ĉi tiu malgranda loko situata 75 km norde de Šiauliaj troviĝis argilaj fosaĵoj kaj kalkfabriko. Tien SS sendis minimume 250 judajn virojn, virinojn kaj infanojn. La ´tendaro´ troviĝis en treege mizera kaj primitiva stato kaj la reĝimo estis ege brutala. La sorto de la viktimoj ne estas konata.[462]

*Linkaičiai:* En septembro 1943 SS alportis minimume 80 judojn en la arbaron de Linkaičiai apud Joniškis, kie ili devis labori en municia kaj pafila fabriko. Ankaŭ la tieaj vivkondiĉoj estis mizeregaj, kiel iuj atestantoj raportis. Post la fermo de la koncentrejo ankaŭ la prizonuloj de Linkaičiai estis deportitaj al Stutthof.

Ankaŭ en *Panevežys* troviĝis labortendaro, kie ĉirkaŭ 700 judoj devis konstrui flughavenon. Same en *Švenčionys*.[463]

Do, sume ĉirkaŭ 5000 judoj laboris en tiuj eksteraj koncentrejoj, plus ĉirkaŭ 1500 sur la teritorio de la urbo Kovno. Dieckmann rimarkigis, ke al tiuj eksteraj koncentrejoj estis sendataj judoj „sen bonaj rilatoj“. Ĉar en tiuj lokoj regis mizeraj kondiĉoj, la homoj protestis, sed la Juda Polico kaj la „laboroficejo“ tamen perforte sendis la homojn tien.

*Vilno kaj Paneriai (Ponar/Ponary):* Ĉar la historio de la holokaŭsto en Vilno kaj Paneriai estas aparta ĉapitro, mi ne traktas ĝin detale ĉi tie. La koncentrejo de Vilno tamen devas esti menciita en la kunteksto de Kovno, ĉar ekde septembro 1943 la vilna geto fariĝis administre „ekstera tendaro“ de la kovna KZ.[464] La 10an de aprilo 1943 Tory rakontis jenan historion: En la kovnan geton devintus esti transportataj ĉ. 5000 judoj, inter ili 2000 el la vilna geto kaj 3000 el najbaraj lokoj. Sed anstataŭ veturi al Kovno, la trajno haltis apud Paneriai, kie la judoj estis forpelataj de la trajnoj. Multaj el ili provis fuĝi, sed la germanaj kaj litovaj policistoj komencis pafadi kontraŭ ilin. Probable 4-5000 judoj pereis en tiu masakro, kiu profunde ŝokis, turmentis kaj panikigis la judojn de la kovna geto, kie tiu tragedio postlasis fortan impreson.[465] En la masakroj de Paneriai pereis entute *70´000* homoj, precipe judoj, kune kun 20´000 poloj kaj 8000 rusoj aŭ sovetianoj.

Krom en Paneriai, en la arbaro de Vidzgiris apud Alytus estis mortpafitaj 60-70´000,[466] en la arbaro de Pajuostė apud Panevežys pli ol 8000, en la arbaro de Pivanija ĉe Ukmergė ĉirkaŭ 6500, en la arbaro de Rašė ĉe Utena pli ol 4000, en la arbaro de Bajorai apud Rokiškis pli ol 3000, en Mažeikiai 4000, en Vilkaviškis pli ol 3000, en Kuziai ĉe Šiauliai 5000, en Marijampolė 10´000 personoj, ĉefe judoj. Ktp.[467]

Bildoj de la maskaroj en Paneriai:

https://www.google.de/search?q=massaker+ponary&source=lnms&tbm=isch&sa=X&ved=0ahUKEwiz3vH1j4rZAhWBuRQKHeepB5EQ_AUICigB&biw=1366&bih=595

### 4.4. Litov-germana kunlaborado

Du antaŭrimarkoj: 1. La decida struktura kondiĉo por la „kunlaborado“ (germanlingve: Kollaboration, franc- kaj anglalingve: collaboration) konsistas en tio, ĉu la okupanto konsideras la okupatojn entute kapablaj al kunlaborado aŭ ne. Dum la unua mondmilito, kiam Germanio okupadis Litovion, starigante la armean administracion kadre de la unuo (aŭ ento) „Ober Ost“, la germanaj administrantoj konsideris la ´indiĝenan´ (aŭ surlokan) loĝantaron, laŭ sia propra difino, kapabla kunlabori nur en limigata mezuro (aŭ grado), ĉar la germanoj profunde malfidis la indiĝenojn (t.e. la litovojn) kaj rilatis ambivalente al la ebleco kunlabori kun ili. [468] Ŝajnas, ke tiu sinteno draste ŝanĝiĝis dum la dua mondmilito. 2. La kunlaborado de la

[462] Vd. ankaŭ http://en.wikipedia.org/wiki/Akmenė. La litova versio silentas pri la koncentrejo (sed fanfaronas pri la unua kolĥozo, kiu tie aperis en 1941).
[463] Pri Švenčionys vd. http://kehilalinks.jewishgen.org/Svencionys/svencionys.html kaj http://kehilalinks.jewishgen.org/Svencionys/birthday_party.htm.
[464] Benz/Distel 2008, p. 209-32. Pluraj aŭtoroj verkis memuarojn pri la vilna geto, ekzemple Mascha Rolnikaitė, kiu menciis ankaŭ d-ron L.L. Zamenhof kiel „litvakon“.
[465] Tory 1990, p. 280-4.
[466] Vd. http://kehilalinks.jewishgen.org/alytus/alite3.html. Kiel oni povas legi sur ĉi tiu retpaĝo, en la arbaro de Alytus mem estis mortigitaj ankaŭ 35´000 homoj, ĉefe sovetiaj militkaptitoj.
[467] Atamuk 2000, p. 172.
[468] V.G. Liulevičius: Das Land Ober Ost im Ersten Weltkrieg. En: Tauber 2006, p. 118-27.

instancoj de iu ´indiĝena´ popolo kun iu (mal)amika okupacia potenco en principo ne estas malpermesita laŭ la internacia juro, ĉar sen minimuma grado de loka kunlaborado la ĉiutaga vivo de la koncernata popolo ne povas esti sekurigata. Sed dum la dua mondmilito la kunlaborado kun la germanoj ricevis apartan signifon, aŭ karakteron, ĉar la sistemaj diskriminaciado, persekutado, deportado kaj mortigado de difinitaj popolaj grupoj, en nia kazo precipe de la judoj, kaj la detruado de la ekzistobazo de la civila popolo estis esencaj partoj de la germana okupacia programo. Pro tio la demando de la kunlaborado de la loka popolo kun la okupaciaj fortoj estas intime ligita kun la demando de la karaktero de tiu kunlaborado rilate la militkrimojn.[469]

La kunlaborado de la lokaj homoj kaj instancoj kun la nazioj okazis ne nur en Litovio sed praktike en ĉiuj okupataj landoj de Eŭropo, eĉ en neŭtralaj landoj (kiel Svislando). La celo de la kunlaborado de la fremdaj okupantoj kun elektitaj grupoj de la koncerna okupata lando estis unuavice eviti rezistadon, kontraŭstaradon, protestojn kaj tumultojn. Tiel, la kunlaborado okazis ne nur kun la faŝismaj movadoj sed ankaŭ kun la surlokaj administracioj, ekonomiaj strukturoj, polico kaj para-armeaj grupiĝoj. Kiel supre klarigite, neniu alia krom la germanoj (t.e. germanaj kaj aŭstraj nazioj) estis la iniciatintoj de la genocido kontraŭ la judoj, kaj la litovoj (t.e. precipe la litovaj naciistoj, dekstruloj, antisemitoj kaj gvidaj katolikaj aktivuloj) fariĝis kvazaŭ iliaj logikaj aŭ naturaj helpantoj kaj komplicoj, kvankam, kiel jam menciite, la unuaranga celo aŭ intenco de la litovoj verŝajne ne estis la mortigo kaj ekstermado de la judoj sed ´nur´ ilia forpuŝado de Litovio aŭ almenaŭ la rompado de ilia ekonomia potenco. La litovoj sekvis proprajn ´naciajn´ interesojn, kiujn klare konsistigis du celdirektoj: Restarigo de etne homogena litova ŝtato sen judoj kaj enkasigo de la juda posedaĵo. Ĉi tiuj distingoj estas esencaj por povi objektive pritaksi la historian rolon de la litovoj en la holokaŭsto. Estas ankaŭ vere, ke sen la helpo de la litovaj murdistoj, la germanoj, kiuj dependis de la litova kunlaborado, ne povintus tiel rapide atingi siajn militajn kaj raspolitikajn celojn en Ostlando. Por atingi tiujn celojn necesis ankaŭ ampleksa logistika preparlaboro, en kiun la litovoj estis esence enplektataj kiel sistemintegra parto. Ĉi tiu fatala duobla celaro de la genocido kontraŭ la judoj en Litovio estas okulfrapa kaj sensacia. Tiel, la litovoj neeviteble falis en la kaptilon de la germanoj, kiuj lasis ilin fari la ´malpuran laboron´, ĉar estis ĉefe litovoj, kiuj murdis, buĉis kaj mortpafis la judojn.

Aldoniĝas ankoraŭ jena momento, kiu estas malmulte konata: En la dua julia duono de 1941 la dekstremismaj litovoj fakte puĉis kun la helpo de Gestapo kontraŭ la malnovaj politikaj strukturoj kaj okupis praktike ĉiujn gravajn poziciojn kaj funkciojn en la litova administracio kaj en la polico. Do, ekde la fino de julio 1941 la litovan administracion dominis malgrandaj sed tre influaj kaj efikaj dekstremismaj litovaj fortoj, kiuj subtenis kaj pravigis la radikalan antisemitisman politikon de la germanoj kaj akcelis la amasmurdon. Komence de 1944 nur ĉirkaŭ 600 germanoj laboris en la civila administracio de Litovio, kompare kun 20´000 litovaj dungitoj. Tio estis nur 3,3% germanoj kompare kun 80-90% litovoj. Tiuj ciferoj montras: La germanoj estis la malplimulto en la civila administracio de Litovio, sed la grandega administra korpo de la litovoj, kiuj malgraŭ sia minora kaj lakea rolo povis decide influi la aferojn en tiu aŭ alia direkto, estas evidenta. Per aliaj vortoj, la litovaj administrantoj povintus ankaŭ alimaniere influi la traktadon de la judoj, nome mildige, sed tion ili evidente ne faris. Cetere, la litovaj administrantoj klopodis ne nur persekuti kaj diskriminacii la judojn sed trovi ankaŭ polajn kaj sovetiajn civilulojn kiel rekrutojn por la deviga laboro en Germanio. En tio la anoj de la litova rezista movado klopodis ne konflikti kun la germanoj. En ambaŭ kazoj, do persekutado de la judoj kaj kaptado de poloj kaj rusoj kiel devigataj laborfortoj por la germanoj, kaj la celo protekti etnajn litovojn por ŝpari iliajn fortojn por venontaj defioj estas klare videblaj. La ĉefa celo de la litova politiko tiam estis teni la damaĝon por la etnaj litovoj malalta kaj la sekvojn minimumaj. La litova politiko, kiu celis etne homogenan litovan ŝtaton por povi plu ekzisti kiel popolo aŭ nacio, do povis okazi nur je la kostoj de la ne-litovoj, ne nur judoj. Sed la germanoj tute ne dankis nek rekompencis al la litovoj tiun kunlaboradon. Male, en printempo 1943 la germanoj ´ĵetis´ kelkdek litovajn politikistojn kaj funkciulojn, kiuj du jarojn antaŭe ankoraŭ helpis al ili engetigi kaj mortigi la judojn en Litovio, en la KZ Stutthof (pri kio rakontis Balys Sruoga). Konklude: La duobla strategio de la litovoj partopreni en la mortigo de judoj kaj partopreni en la kontraŭgermana rezista movado ne signifis kontraŭdiron. La litovoj, kiuj partoprenis en la genocido kontraŭ la judoj, senprobleme povis transiri al la kontraŭgermana rezistado, precipe post kiam la litovoj rimarkis, ke ili ne ricevos la esperatan helpon de la germana flanko por restarigi la etne homogenan litovan ŝtaton.

Due, la enplektiĝo de la litova loĝantaro en la holokaŭston havis esence ekonomian-socian redistribuan dimension aŭ funkcion montriĝis plej imprese precipe kiam temis pri la alproprigo de la juda

[469] Ch. Dieckmann: Kollaboration? Litauische Nationsbildung und deutsche Besatzungsherrschaft im Zweiten Weltkrieg. En: Tauber 2006, p. 129.

posedaĵo. Ĉi tie evidentiĝis alia aspeko de german-litova kunlaborado. Kiel supre montrite, Bronys Raila liveris la ideologian fundamenton por la prirabado de la judoj fare de la litovoj, se li skribis, aŭ diris, ke la „ekonomia litovigo“ konsistas en tio, ke „ĉia movebla posedaĵo, kiu estis akumulata per la judaj ekspluatado kaj trompado, devas esti redonita al la litova nacio tra laŭjuraj (legal, sic) rimedoj kaj juste distribuata (sic) por la litovaj uzado kaj posedo“.[470] La engetigo kaj mortigo de la juda popolo en Litovio tuŝis implicite la demandon kio okazu kun la posedaĵo, do kun la domoj, moveblaj kaj nemoveblaj objektoj, kiuj apartenis al la judoj. Kiu devos kontroli ĝin kaj kiu ricevos ĝin, kiu do estos la nova posedanto? En tio estiĝis jena paradoksa, fakte absurda kaj kruela situacio: Kvankam la germanoj mem klopodis kontroli kaj akapari la judan posedaĵon, ili parte fiaskis, ĉar la litovoj mem sukcesis sekurigi sian parton de tiu posedaĵo. Do, okazis konkurado pri profito; kiu estis pli rapida, tiu verŝajne povis profiti kiel unua. Kiuj rekte partoprenis en la rabado de juda posedaĵo kaj mortigado de judoj, tiuj rekte profitis de sia fiagado. Ekzemple, litovaj policistoj prenis judajn vestaĵojn, konservis aŭ vendis ilin en la nigra merkato. Sed ili ankaŭ konservis ilian monon kaj la valoraĵojn. Ekzistis speciala komisiono por la „likvido de la juda posedaĵo“, kies membroj mem klopodis akapari judajn valoraĵojn. La germanoj probable komprenis, ke estas malfacile eviti la rabadon flanke de la litovoj, tiel ke kun germana permeso grandparto de la juda posedaĵo estis aŭkcie vendata al la loka popolo. La litova administracio okupis judajn loĝejojn, la oficejoj estis ekipitiaj per judaj mebloj, en la publikaj manĝejoj estis uzataj judaj manĝilaroj. Precipe en la provinco preskaŭ nur litovoj estis profitantoj de tiu rabado. Kiel argumentoj por pravigi ĝin servis asertoj, ke „la judoj riĉiĝis koste de la litovoj, tiel ke la juda posedaĵo devas esti redonita al la laŭjuraj posedantoj“, k.s. Ĉi tiu senhonta, senmorala rabado do funkciis kaj efektiviĝis kiel speco de soci-ekonomia redistribuado de posedaĵoj. Ekzemple en la administracio pri nemoveblaĵoj en Vilno, kie 40-46% de ili apartenis al judoj, laboris 13 germanoj kaj 2000 litovoj. Tra tiu administracio do ne malmultaj litovoj povis akiri judajn posedaĵojn. El ĉiuj tiuj praktikaj kazoj de german-litova kunlaboradi eblas konkludi, ke la litovaj grupoj, kiuj partoprenis en ĉiuj tiuj agadoj, ne nur estis ´pasivaj atestantoj, sed ili konscie sekvis siajn interesojn kaj do bone konsciis kion ili faras.[471]

### 4.4.1. Litov-germana kunlaborado en la provinco

Aparte bone dokumentata estas la litov-germana kunlaborado en la regionoj (t.e. provincoj) de Litovio. En multaj kazoj, la litova partopreno estis tiel kerna kaj glata, ke multaj judoj eĉ neniam havis rektan kontakton kun germanoj, ĉar ili estis senpere ´fintraktataj´ de litovoj, kiuj plenumis la laboron, kiun la germanoj devintus mem fari. La ŝoko kaj perplekseco de la traŭmatizataj judoj estis grandegaj, kiam ili devis konstati, ke iliaj najbaroj, kun kiuj ĝis nun amike rilatis, transformiĝis en minacajn malamikojn. Ĉi tiu koŝmara sperto estis esenca, por ke multaj judoj perceptu la litovojn kiel siajn rektajn murdistojn, kio esprimiĝis ekzemple en la komence menciita juda rezolucio de aprilo 1947, en kiu oni donis al vasta parto de la litova popolo la kulpon kaj respondecon por la kontraŭjuda genocido. La fakto, ke tiel multaj litovoj estis rekte aŭ malrekte enplektataj en la holokaŭston, kaŭzis, ke en Litovio nur relative malmultaj judoj povis esti savitaj kaj ke la juda memoro pri litovoj kaj Litovio ricevis finfine negativan konotacion, malgraŭ la memoro pri la ´glora periodo´ de la judoj en Litovio antaŭ 1941/1918.

La litov-germanan kunlaboron en la kontraŭjuda genocido draste ilustras la ekzemplo de la kovna distrikto, kie vivis ĉ. 400 mil homoj[472] kaj kiu estis regata de **Arnold Lentzen** kiel distrikta komisaro de la germana civila administracio, inter aŭgusto 1941 kaj somero 1944. En 1943 li ricevis la rangon de SA-brigadogvidanto. Lentzen estis konata kiel fanatika kontraŭulo de la judoj. En la litovlingva gazeto *Ateitis* (Estonteco), kiu estis eldonata de nazi-proksimaj litovoj sub germana kontrolo, li konsideris, en artikolo sub la titolo „Sklavoj de la judoj“, ke la judoj estas la fonto de ĉio malbona, ke ili kulpas pri la eksplodo de la dua mondmilito, pro kio la germanoj decidis elimini ilin el ĉiuj sferoj de la vivo; li alvokis la litovojn ne esti pli longe la servistoj de la judoj, kio signifis ke ili liberigu sin de ili.[473] En n-ro 154 Lentzen daŭrigis skribi kun jena cinika tono: „Bedaŭrinde, ĝis la hodiaŭa tago en Kovno kaj ties plej proksima ĉirkaŭaĵo troviĝas bestpiedaj spuroj de Israelo. Oni devas nur spekti certajn fenomenojn sur la stratoj, kiam la judaj kolonoj revenas en la geton. Mi mem havis en la lastaj tagoj la okazon observi

---

[470] Sužiedėlis 2006, p. 149.
[471] Dieckmann 206, p. 129-39.
[472] Laŭ Tory 1990, p. 418.
[473] Tory 1990, p. 411.

elegante vestatan litovan damon, kiu alproksimiĝis al tiu kolono kaj salutis unu judon. Nekutime afable ŝi premis lian manon kaj komencis interparoli kun li. Kiajn rilatojn inter ili oni povas supozi kaj kiaj rilatoj probable ekzistus ankoraŭ nun? Mi enmiksiĝis kaj interrompis la konversacion. La judo rapidege forkuris dum la sinjorino embarasiĝis, ektimiĝis kaj klopodis malaperi. Ĉar mi ne scipovas la litovan lingvon, mi ne povis fari al ŝi seriozajn riproĉojn. Sed ŝi komprenis min – tion pruvis la maniero de ŝia konduto. Krom tio, oni povas konstati, ke iuj enloĝantoj de ĉi tiu urbo kaj ties ĉirkaŭajo provizas judojn per nutraĵoj surbaze de rilatoj inter malnovaj konatoj. Kiel povas okazi, ke judo aŭ judino el la laboristaj kolonoj entras la loĝejon de litovoj kaj rilatas kun ili egalmaniere? Anstataŭ elĵeti ilin el la loĝejo, oni babilas kaj eĉ komercadas kun ili. Oni povas nur bedaŭri tiujn homojn, kiuj ne kondutas tiel kiel ili devus kaj kiuj per tio signifas malbonan ekzemplon por sia popolo. Eĉ pli abomeninda estas la komercado de la kamparanoj en la antaŭurboj. Se oni demandas iun kamparanon, ĉu li havas nutraĵojn aŭ legomon, li hezitas doni respondon, sed al la judoj li vendas ilin kun ĝojo. Tio estas stranga amikeco. Diru al mi, kiu estas via amiko, kaj mi diros al vi, kiu estas via valoro. Mi ŝatus proponi al ĉiuj, kiuj intencas ekrilati kun judoj aŭ kiuj volas ilin subteni aŭ kiuj provas resti kun ili en kontakto, surglui al si stelon kun la surskribo ´servisto de judoj´."[474]

Kiel supre skribite en la kazo de la urbo Kovno, la unuaj dekretoj post la germana okupacio koncernis la judan loĝantaron kaj kaŭzis ilian diskriminacion, stigmatizon, senrajtigon kaj humiligon. Judoj ne rajtis utiligi publikajn transportilojn kaj la trotuarojn kaj ili devis iradi en grupoj sur la dekstra stratoflanko, portante flavan davidan stelon sur la brusto kaj la dorso. Post la 20a horo vespere ĝis la sesa matene ili ne plu rajtis esti ekster la domo. Nejudoj ne rajtis labori nek loĝi ĉe ili. Judoj, kiuj fuĝis eksterlanden, ne rajtis reveni en sian patrujon. Ĉiuj liberaj domoj kaj loĝejoj de judoj devis esti registritaj. La judoj ankaŭ ne rajtis posedi propran monon kaj posedaĵon.

La litovaj distriktaj instancoj senprokraste transdonis tiujn ordonojn al la pli subaj instancoj en la provinco, kaj la ordonoj estis senprokraste kaj senkompate efektivigendaj. La litova distriktestro de Kovno, **Vaitiekus Bortkevičius**, ordonis la 6an de aŭgusto 1941 al la pli malaltrangaj distriktestroj registri kaj transpreni la financan kaj nemoveblan propraĵon de la judoj. La postan tagon li sendis al ili detalan instrukcion pri la engetigo de la judoj. Ĝis la 15a de aŭgusto ĉiuj urbetoj kaj distriktoj devis esti tranĉitaj per dratbariloj, por apartigi la judojn. Litovaj „partizanoj" aŭ policistoj devis transpreni la gardadon por eviti la kontakton de judaj kun la ekstera mondo kaj pafi sen averto, se judoj forlasis la geton sen permeso. Aparta juda polico, armata per batiloj, devis esti starigita. La nutraĵoj devis esti pagataj de la judoj mem, kaj ili povis ricevi nur malmultajn kvantojn sen rajto postuli viandon, lakton, grason kaj ovojn. Specialaj listoj kun judaj laboristoj devis esti verkataj. En iuj lokoj, ekzemple en Garliava, la judoj estis retenataj en sinagogoj. En aliaj litovaj lokoj oni disvastigis la panikon, ke la judoj havas iun malsanon. En la instrukcio estis notite, ke la litovaj distriktestroj kaj la polico devas intime kunlabori. Do, la litovaj distrikaj instancoj intime kunlaboris sub germana gvido kaj kun la apogo de la germana kaj litova Sekurecaj Policoj. La efektivigita ordono devis esti tuj konfirmita ĉe la centra kontrolinstanco en Kovno, kie la konfirmoj estis kolektataj de kolonelo Vytautas Reivytis, kiu devis raporti al Hamann. La 15an de aŭgusto do komenciĝis la organizata murdorgio ankaŭ en la kovna kaj vilna distriktoj. Ĝis la komenco de septembro 1941 grandparto de la ´provincaj´ judoj estis mortigitaj. En la kovna distrikto tiu sorto koncernis 3220 judojn, sed inter la 26a de aŭgusto kaj 4a de septembro fakte estis mortigitaj 4200 judoj. Hamann kaj ties fifama „rulkomando" el Kovno gvidis la amaspafadojn kun la partopreno de litovaj policistoj kaj „partizanoj". La masakroj okazis en arbaroj aŭ sur iuj kampoj proksime de la lokoj, kie la judoj devis kolektiĝi. Antaŭ sia mortigo la judoj devis pagi al siaj mortigontoj monon kiel kontribucion, sume entute 298´000 rublojn.[475]

Kiam la 16an de julio 1941 kun la ĉeesto de la litova ministro pri internaj aferoj, Jonas Šepetys, en Alytus okazis konferenco de la lokaj policistoj, la policestro de Alytus, **Antanas Audronis**, ripetis kaj konfirmis, ke la interesoj de la germanoj estas ankaŭ la interesoj de la litovoj kaj ke la malamiko de Germanio estas ankaŭ la malamiko de Litovio. Li remaĉis la ĉi-koncernajn poziciojn de Hitler el lia libro „Mein Kampf" kontraŭ la judoj kaj alvokis la policistojn centprocente plenumi la volon de la germana Gvidanto.[476]

474 Citita laŭ A. Jeruŝalmi en Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 569s.
475 Dieckmann 2011, p. 866-877.
476 Atamuk 2000, p. 165.

#### 4.5. La signifo de la „Raporto de Jäger“ kaj la rolo de Karl Jäger en la holokaŭsto

Pri la murdoperacoj de la Einsatz-komando 3 de Karl Jäger en la diversaj lokoj de Litovio detale informas la „Raporto de Jäger“, kiu jam estis menciita lige kun la likvido de la judoj en Kovno. La „Raporto de Jäger“, kiu estis verkita kiel sekreta dokumento („Geheime Reichssache“) kaj subskribita de SS-standartgvidanto Karl Jäger la 1an de decembro 1941, konsistas el 9 folioj kaj enhavas detalan listigon de la efektivigitaj amasmurdoj ĉe entute 137´346 judoj inter la 4a de julio kaj 25a de decembro 1941 en 71 lokoj de Litovio plus Vilno fare de la Einsatz-komando 3, kiu estis estrata de Jäger.[477] Laŭ tiu raporto, en Kovno okazis 13, en Vilno 15 murdoperacoj por „solvi la judan problemon“. La 9an de februaro 1942 Jäger kompletigis la liston per altigo de la cifero al 138´272. Sed ankaŭ post februaro la murdado ne ĉesis. La Jäger-raporto de la 1a de decembro enhavas ankaŭ indikojn pri la mortigo de malsanuloj en litoviaj psikiatrejoj: Laŭ tio la 22an de aŭgusto 1941 en Aglona estis mortigitaj 544 kaj la 1an de septembro 1941 en Marijampolė estis likviditaj 109 psikmalsanuloj. Al sia ĉefo Stahlecker Jäger verkis detalan raporton pri tiuj murdoj. Neniu alia konata raporto el la Tria Regno tiel detale raportis per ekzaktaj ciferoj pri la kontraŭjudaj ekzekutoj, kiuj estis efektivigitaj en la okupataj teritorioj de Sovetunio. Pro tio en la priholokaŭsta scienco la „Jäger-raporto“ estas konsiderata kiel ŝlosila dokumento, tiel ke por kelkaj historiistoj ĝi signifas la „uverturon“ al la genocido kontraŭ la judoj dum la dua mondmilito.

En sia raporto Jäger proklamis Litovion „libera de judoj“ („judenfrei“), konstatante, ke la celo de la Einsatz-komando 3, „solvi la judan problemon“ en Litovio, estis atingita, kvankam en tiu lando ekzistis ankoraŭ 34´500 „laborjudoj“ kaj ties familioj (en Šiauliai 4500, en Kovno kaj Vilno po 15´000). Ankaŭ tiujn judarojn li intencis likvidi, sed la civila administracio kaj la armeo malpermesis al li fari tion. Laŭ Jäger amasmurdi la judojn estis „unuavice demando de la organizado“. Krom tio, Jäger aldonis la klarigon, ke Litovio povis esti liberigita de la judoj nur dank´ al la „rulkomandoj“ de Hamann, kiu „plene kaj tute adoptis la celojn starigitajn“ de Jäger kaj kiu „scipovis garantii la kunlaboradon kun la litovaj ´partizanoj´-murdkomplicoj kaj la respondecaj civilaj instancoj“. Jäger aldonis la frazon, ke „la decido fari ĉiun distrikton libera de judoj postulis seriozan preparadon por ĉiu unuopa operaco.“ La ciniko de Jäger konis neniun limon. En iu konversacio kun d-ro Elkes li foje klarigis: „Ĉu vi kredas, ke la [likvidaj] operacoj [„Aktionen“] faras nin feliĉaj? Ne, tiuj okazintaj operacoj estis necesa kaj malfacila rimedo. Ni estas kontentaj vidi la homojn labori. Ni persekutas nur tiujn, kiuj sabotas nian politikon. Por ni ne gravas ĉu persono, kiu estas risko por la sekureco, estas judo aŭ litovo.“[478]

Apartan atenton en la raporto de Jäger meritas la urbeto Rokiškis en nordorienta Litovio, kie dank´ al tiu glata german-litova kunlaborado kaj efika funkciado de la rulkomando de Hamann estis mortigitaj 3700 judoj kaj 500 aliaj „malamikoj“, precipe komunistoj, do praktike la duono de la loĝantaro.[479] Ne malpli sensacia kaj samtempe tragika estis la kruela pereo de la tuta judaro en Kėdainiai, urbo en centra Litovio, kie la rulkomando de Hamann neniigis en la 28a de aŭgusto 2076 homojn. Kaj last but not least, la 2an de oktobro 1941 en Zagare 2236 judoj perdis la vivon dank´ al la ´perfekta laboro´ de la rulkomando de Hamann. Sed ankaŭ aliaj litovaj urboj registris altnivelan murdbilancon; tiel en unuopaj tagoj estis mortigitaj ekzemple en Panevežys 7523, Zarasai 2569, Pasvalys 1349, Utena kaj Molėtai 3782, Jonava 1556, Ukmergė 4709, Alytus 1279, Lazdijai 1535, Riešė 1767, Eišiškės 3446, Švenčionys 3726 homoj, ĉefe judoj. En kelkaj tiuj lokoj la judoj ankoraŭ klopodis heroe kontraŭstari sian mortigon sed finfine malsukcesis, ĉar la germanaj fusiloj estis pli fortaj. Jäger ankaŭ fanfaronis, ke provoj fuĝi estis sukcese evitataj dank´ al la ´heroeco´ de liaj komandanoj, kiuj agis „sub propra vivdanĝero“ kaj kiuj en unu kazo mortpafis 38 fuĝantojn. La operacojn („Aktionen“) en Kovno mem Jäger nomis „paradajn pafadojn“ („Paradeschiessen“) malgraŭ la „ofte gigantaj [probable organizaj] malfacilaĵoj, kiuj devis esti alfrontataj“. Jäger ankaŭ konfirmis, ke escepte de unu ĉiuj anoj de lia komando „aktive partoprenis“ en la „grandaj operacoj“ en Kovno. La „judajn operacojn“ de la EK 3 Jäger konsideris esence kiel finitajn, sed povis „imagi, ke la restantaj ´laborjudoj´ kaj judinoj estos urĝe bezonataj post la vintro“. Li opiniis, ke oni

---

[477] La „Raporto de Jäger“ estas publikigita en la interreto sub http://web.archive.org/web/20020206151415/http://www.david-irving.de/jaeger.html aŭ http://web.archive.org/web/20110724012630/http://www.einsatzgruppenarchives.com/jagerimages.html. (skanaĵoj de la originalo). En la germanlingva Vikipedio oni trovas ankaŭ artikolon pri la signifo de la „Raporto de Jäger“ kiel fonto (vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Jäger-Bericht). Karakterize estas ankaŭ en tiu ĉi kazo, ke litovlingva versio ne ekzistas, same kiel en la litovlingva Vikipedio mankas ankaŭ artikolo pri la amasmurdo en Paneriai, kiu kiel murdejo ne estas eksplicite menciita en la Jäger-raporto, kie la plimulto de la vilnaj judoj estis likvidita.

[478] Tory 1990, p. 384 (9a de junio 1943).

[479] Wette 2012, p. 102-6. De tiuj, 981 personoj estis murditaj verŝajne de litovaj ´naciistoj´ laŭ propra kalkulo.

komencos senprokraste sterilizadi la virajn „laborjudojn“ por malhelpi la „plugeneradon“ de la judoj; „se iu judino tamen gravediĝos, ŝi estos tuj likvidenda.“ Fakte, la 24an de julio 1942 Jäger eldonis ankaŭ ĉi-rilatan ordonon pri mortpuno por gravedaj judinoj, sed ĉu ĝi ankaŭ estis sisteme efektivigata ne estas konate.

Jäger furoris en Litovio ĝis aŭgusto 1943. Poste li estis revokita al Berlino.[480]

Ŝajnas, ke la „Raporto de Jäger“ servis kiel referenco por la raporto de Eichmann dum la Wannsee-konferenco okazinta la 20an de januaro 1942, dum kiu estis indikita la cifero de 34´000 ankoraŭ vivantaj judoj en Litovio.

En 1944, la „Raporto de Jäger“ falis en la manojn de la sovetianoj kaj estis transdonita al la germanoj en formo de kopio nur en 1963, dum la originalo restis en Moskvo. En Germanio la raporto estis unuafoje publikigita en 1971, kaj plene transkribita versio estis aperigita nur en 1988. Kune kun alia mallonga raporto, la „Jäger-raporto“ servis kiel pruva materialo por kelkaj juraj procesoj, kiuj okazis en 1963 en Germanio (FRG), Kanado, Usono kaj GDR. En 2000 la raporto estis utiligita kiel dokumento ankaŭ en la proceso kontraŭ David Irving, kiu neis la holokaŭston.

Kiel do pritaksi la agadon kaj kulpon de Karl Jäger? Wette liveris jenan interpreton: Per sia murdbilanco Jäger celis imponi siajn ĉefojn de SS kaj pruvi, ke li kapablis fari perfektan laboron. Kial? Ĉar ekzistis kelkaj duboj pri liaj kapabloj. Unuavice Jäger venis el la soldata medio, aliĝis al SS relative malfrue, estis pli maljuna ol la aliaj SS-anoj kaj ne disponis pri akademia edukado kiel multaj de la ambiciaj SS-uloj. Do, Jäger probable suferis psikan minuskomplekson, kiun li klopodis ekvilibrigi per firmaj agoj kaj efika laboro. Post la milito Ehrlinger klarigis, ke Jäger pedante insistis pri siaj kompetencoj, ĉar li sentis sin plej supera ĉefo surloke. Ĉu Jäger do estis nur ´klasika skribotablo-krimulo´ (Schreibtischtäter) simile kiel Eichmann, kiu propradire nur plenumis la ordonojn de siaj estroj? Laŭ Knut Stang, Jäger estis fanatikulo pri ciferoj. Alia historiisto konsideris lin librotenist-mensa. La historiistoj, kiuj esploris la personaron de la anoj de la EK 3, konkludis, ke Jäger estis intelekte, administre kaj polic-teknike minora tipo, do suferis streĉon (aŭ streson). Interesaj estas la eldiroj, kiujn faris pri Jäger liaj kunlaborantoj mem. Ekzemple Schmitz, homo kun jura klereco, kiu en oktobro 1941 fariĝis la dua ĉefrespondeculo post Jäger, diris en 1960, ke pri Jäger cirkulis diversaj mokoj, ĉar oni konsideris lin maltaŭga kiel estron de la Sekureca Polico, pro kio li fanatike okupiĝis pri ciferoj. Liaj ĉefaj inklinoj estis la pafado kaj soldateca konduto. Laŭ Schmitz, Jäger ofte enuis en sia oficejo, kie li ĉefe okupiĝis pri la akcepto kaj registrado de ciferoj. Kun tiu impreso pri Jäger koincidas la konstato, ke surloke li estis nur malofte videbla dum la selektado aŭ mortpafado mem. Kiuj vidis lin, tiuj ne plu vivas, kiel trafe komentis iu alia postvivinto. La internaj aferoj de la oficejo de Jäger estis gvidataj de aliaj, precipe de Reinhold Porst. Do ne Jäger sed Rauca, kiu ĉefrespondecis pri la judaj aferoj, estis la ĉefa figuro, kiu fizike aperis en tiuj lokoj. Sed la kritika pritakso de la personaj mankoj de Jäger diras malmulte pri la amplekso de liaj krimoj. Konsiderante, ke li estis la gvidanto de EK 3 kaj poste de la Sekureca Polico de Litovio, oni devas agnoski lian ĉefan respondecon por la krimoj efektivigitaj kontraŭ pli ol 138 mil judoj de Litovio, eĉ se Jäger delegis la murdadon al siaj subuloj, kiel tio kutime okazis en la hierarkio de la Tria Regno. Sed kiel iu alia policisto asertis, Jäger persone donis la ordonojn por la likvido de judoj. Ekzemple li ordonis la tujan mortpafadon de la judoj, kiuj venis el aliaj partoj de la Tria Regno al Kovno. Ĉi tiu impreso certe koincidas kun la burokrateca stilo de liaj konkludaj klarigoj en sia raporto. Ankaŭ Gewecke, la komisaro de Šiauliai, diris post la milito, ke Jäger donis al li la ordonon likvidi ĉiujn judojn en Šiauliai. Certe, ĉiuj tiuj nazioj postmilite klopodis senŝarĝi sin kulpigante la aliajn, sed kion ili diris pri la aliaj certe kongruis kun la realeco. Konklude, Jäger gvidis kaj administris la proceson de la murdado de la judoj, tiel ke li povas esti konsiderata kiel la plej efika kaj plej sukcesa ĉefo de la Einsatz-komandoj, kiuj furoris en nordorienta Eŭropo. En naziaj medioj ja ankaŭ validis la principo, ke utile kaj honore por la kariero de tia funkciulo estis konsiderata la persona partopreno en mortpafaj operacoj kontraŭ judoj. Jäger mem postulis de siaj subuloj ke ili ĉeestu ilin persone. Wette montris en sia libro, ke Jäger do ne estis nur griza burokrato aŭ

---

[480] Li postulis ricevi postenon kiel prezidanto de la polico en iu germana urbo. Post periodo de atendado li finfine ricevis tian postenon en Reichenberg en la Sudeta Lando. Kun la alproksimiĝo de la Ruĝa Armeo Jäger fuĝis al okcidenta Germanio. Post la milito Jäger vivis inkognite sed kun la vera nomo ĝis aprilo 1959 en suda Germanio (krom en Waldkirch plej laste apud Heidelberg), kiam li povis esti trovita kaj arestita. Naskita en 1888 en Schaffhauen, Svislando, Jäger mortis en junio 1959 per suicido en la malliberejo Hohenasperg apud Ludwigsburg kaj tiel eskapis la justicon kaj sian antaŭvideblan kondamnon al la mortpuno. Jäger firme neis sian kulpon kaj rifuzis ĉian respondecon por la amasmurdo de la judoj. Simile kiel Adolf Eichmann kaj aliaj nazioj, kiuj povis esti kaptitaj, ankaŭ Jäger senkulpiĝis per la stereotipa aserto, ke li nur obeis la ordonojn de siaj ĉefoj kaj ŝovis la respondecon al aliaj. Ankaŭ en lia urbo Waldkirch la homoj preferis silenti pri li kaj la temo. (Tre legindan libron pri Karl Jäger verkis Wolfram Wette, vd. la bibliografion).

„banala malbonulo“ en la senco de Hannah Arendt, sed ke li estis konvinkita nacisocialisto kaj radikala antisemito.[481]

## 4.6. Fuĝado, helpado kaj savado de judoj

Judoj, kiuj estis vidataj ekster la geto, devis riski severajn punojn, inkluzive de la mortpuno. Ankaŭ kiu kaŝis judojn en sia loĝejo, devis enkalkuli rigoran punon, se la kaŝita judo estis malkovrita. Kiam la patro de Trudi Birger organizis la kaŝadon de cent infanoj en iu domo, li estis trovita kaj deportita kune kun la infanoj al la IXa fortikaĵo, kie ĉiuj estis mortpafitaj.[482] Ekzistis litovoj, kiuj vizitis la geton por teni kontaktojn kun siaj konatoj, alportis nutraĵojn aŭ helpis alimaniere. Se iu nejudo aperis en la stratoj de la geto, li aŭ ŝi estis tuj ĉirkaŭata de multaj judoj, kiuj demandis ĉu li aŭ ŝi havas ion por vendi aŭ pretas iel helpi.

Kiel kelkaj virinoj povis savi siajn infanojn, Birger jene memoris:

„Kelkaj malmultaj patrinoj povis savi siajn infanojn, nokte envolvante siajn bebojn en varmajn tolaĵojn kaj konfidante ilin, kontraŭ pagado de multe da mono, trans la geta muro al iuj litovaj kamparanoj. Sed ankaŭ tio estis necerta afero kaj neniu povis scii kio okazos kun tiuj infanoj. Sed tiel oni povis almenaŭ konservi iomete da espero kaj ne devis transdoni la infanojn al la murdistoj rekte. Tiumaniere, kelkaj infanoj estis savitaj, sed neniu scias kiom da ili ne havis la bonŝancon esti akceptitaj de honestaj personoj.“[483]

Pri kelkaj aliaj kazoj detale raportis Ruth Kibelka en sia konsiderinda kontribuaĵo pri la savado de judoj en Litovio dum la germana okupacio.

Petras Baublys, direktoro de la infana hejmo „Lopselis“ en Vilijampolė, akceptis judajn infanojn, kiujn li provizis per novaj dokumentoj. Tiel, kelkdek judaj infanoj povis esti savitaj. En tio li ricevis la helpon de kelkaj flegistinoj, ekzemple Elena Uborovičienė.

Aliaj patrinoj, kiuj ne povis esti sen siaj infanoj, forlasis la geton kaj ie serĉis kaŝejon. Ekzemple Minna Leibson fuĝis kun sia filo Dovid antaŭ la „Kinder“-operaco en decembro 1943 el la kovna geto. Ambaŭ trovis dume la ŝirmon ĉe iu amikino de la patrino, Zofija Šimkaitienė, kaj poste ili loĝis ĉe la familio Boguslauskas, la gepatroj de Zofija, en iu farmdomo en nordokcidenta Litovio, kie la patrino asertis, ke ŝi estas pola kudristino. Por ne esti malkovrita Dovid devis rapide lerni la litovan lingvon. La pli maljunan fratinon Ada kaŝis la pastro Antanas Zylvys en Raudondvaris, kaj ankaŭ la patro Efraim Leibson postvivis la holokaŭston.

Certe, la ekstera aspekto de iu persono ludis gravan rolon. Por homo kun bluaj okuloj kaj helaj haroj la ŝanco estis pli granda ol por homo, kiu estis tuj rekonebla kiel judo. En la unua kazo estis pli facile ricevi falsitajn dokumentojn, seeble kun litova nomo. Ekzistis pastroj, kiuj provizis judojn per bapto-dokumentoj, dum aliaj rifuzis fari tion. En aliaj kazoj litovoj plu donis la dokumentojn de mortintaj parencoj. Ekzemple Juozas Rutkauskas falsis pasportojn kelkfoje kontraŭ pago, kelkfoje senpage. Se li devis doni tian dokumenton al homo, kiu aspektis kiel litovo kaj parolis la litovan, li skribis „litovo“ aŭ „polo“, se la fiziognomio estis judeca, li skribis „karaimo“.

Multaj judoj ne parolis la litovan nek la polan, aŭ kun akĉento aŭ eraroj. Tio estis serioza problemo. Szmerka Kaczergiński, ĵurnalisto kaj jidlingva poeto, solvis sian problemon tiel, ke li iris kiel ŝajn-mutulo tra la vivo, komunikante per gestoj kaj signoj. Estante sepjara infano, Iochokas Meras povis fuĝi duonvoje al la neniigejo kaj trapasis la militon ĉe iu taglaborista familio, sed li devis klopodi forigi la tipan judan prononcon de la litero r, se li volis, ke la germanoj ne rekonu lin kiel judon.

Unu el la postvivantoj de la kovna geto estas sinjorino Joheved Inčiūrienė-Čartokaitė (nask. 1924), kiu detale rakontis pri siaj spertoj en tiu geto, pri sia fuĝo el ĝi kaj kiel ŝi sukcesis esti kaŝita en Litovio. Inčiūrienė-Čartokaitė postvivis la holokaŭston en Litovio nur pro tio, ke ŝi perfekte scipovis la litovan lingvon kaj disponis pri fidindaj kontaktoj inter kuraĝaj litovaj civitanoj.

Alia cirkonstanco estis eĉ pli interesa ol la ekstera aspekto kaj la lingvo. Multaj judoj povis esti tuj rekonitaj, se ili faris iun geston aŭ riton, kiu estis fremda al la katolikoj. Ekzemple Pola Komaj (Wawer), kiu identigis sin kiel „Zofia Januszkiewicz el Varsovio“ kaj „laboris en Pollando“, rakontis, ke ŝi faris truon en la kukopaston anstataŭ kruco, kiel la katolikoj kutimis fari. Tre embarasan sperton ŝi alfrontis,

[481] Wette 2012, p. 144-152.
[482] Birger 1990, p. 92.
[483] Birger 1990, p. 61.

kiam okaze de Kristnasko ŝi devis kanti kristanajn kantojn, kiujn ŝi tute ne konis kaj ne scipovis. Plej danĝeraj estis la scivolemaj najbaroj, kiuj povis ekscii, ke tie troviĝas judoj.

Ankaŭ vojaĝi per la trajno estis granda risko. En ĉiuj stacidomoj germanoj kontrolis la pasaĝerojn aŭ nazioj kunveturis en la trajno. Do, la judoj aplikis plurajn trukojn por ne esti rekonataj kiel judoj ekster la geto.

Kiel pastroj de diversaj eklezioj engaĝiĝis por savi judojn estis priskribite supre.

Ĝenerale estis pli facile trovi kaŝejon en la kamparo ol en la urbo.

Ekzistis ankaŭ judoj, kiuj rifuzis forlasi la geton kiel en la kazo de la advokato Dovyd Geo el Šiauliai, kiun litovaj juristoj klopodis savi. Aŭ en la kazo de la kuracisto J. Kamber, kiu preferis resti en la labortendaro de Tyruliai, por helpi al la judoj. Liaj edzino kaj filo povis esti savitaj el tiu infero.[484]

Solly Ganor rakontis la aventuron kun la kamparano Kazys, kiu kaŝis lian familion en sia farmdomo, sed kiu perdis la nervojn, kiam en lia domo aperis litovoj kaj germanaj nazioj kaj postulis transdoni aliajn de li kaŝitajn judojn, kiuj estis senkompate mortpafitaj ankoraŭ surloke. Malgraŭ tiu ŝoka incidento, la sama Kazys malvolonte sed tamen pretis transporti la familion de Solly al Kovno, kie ĝi estis malkovrita (ĉar tiuj judoj havis malhelan haŭton) sed tamen dume mirakle savitaj.[485]

Kaj Mishell rakontis ankoraŭ alian teruran historion, en la ĉapitro pri la transiro de la geto al la koncentrejo en Kovno. La germanoj, kiuj celis mortigi la judojn ĝis la plej lasta homo, aplikis aparte perfidan taktikon aŭ metodon: Ili engaĝis litovojn, kiuj devis ludi duoblan rolon: ŝajnigi ke ili volas helpi la judojn fuĝi, logante ilin al laŭdire sekuraj kaŝejoj, kie la judoj estis transdonataj de la litovaj agentoj al la gestapanoj. La kaptitoj estis ekzekutitaj en la IXa fortikaĵo. Aliaj fuĝintaj judoj sukcesis aliĝi al la partizanoj.[486]

Helene Czapski-Holzman notis ankaŭ, ke en Kovno ja ekzistis ne malmultaj homoj, kiuj estis ĉagrenataj pri tiuj okazaĵoj, sed neniu vere kuraĝis akcepti, protekti aŭ kaŝi iujn el tiuj malfeliĉuloj, despli ke la germanoj scipovis timigi la civilulojn, kiuj klopodis savi judojn, per kruelaj punoj. Tamen ekzistis ankaŭ kuraĝaj homoj kiel la litova okulkuracistino d-ino Elena Kutorgienė-Buivydaitė, kiu plurfoje estas menciita en ĉi tiu studo. Senkonsidere al la granda danĝero esti denuncita de malbonfaraj najbaroj kaj malgraŭ la risko ricevi drastan punon de la germanoj, ŝi ne nur alportis manĝaĵojn en la kovnan geton sed ankaŭ kaŝis judojn kiel ´pacientojn´ kaj kolektis monon por akiri armilojn por la partizanoj. Dum semajnoj ŝi kaŝis iun judinon kaj poste sendis la bonŝanculinon al Berlino.[487] D-ino Kutorgienė estis plurfoje minacata de diversaj homoj pro tio, ke ŝi kaŝis judojn en sia loĝejo. Pro la kuraĝa savado de judoj Kutorgienė-Buivydaitė estis premiita de Jad Vaŝem per la ordeno “justuloj inter la popoloj“. Sur la listo troviĝas ankaŭ Sofija Čiurlionienė, la edzino de la fama litova pentristo M.K. Čiurlionys.[488]

Pluraj atestantoj konfirmis, ke litovoj ne pretis kaŝi judojn sen postuli monon. Holzman rakontis jenan epizodon: Apud Jurbarkas/Georgenburg iu d-ro Žakevičius kaŝis 12 judojn, kiuj estis trovitaj post denunco fare de lia dommastrino. La doktoro pretis kaŝi ilin kontraŭ alta monsumo. Eble pro ĵaluzo pri la dubinda kromenspezo ŝi deponis denuncon ĉe la polico. Sekve, la tuta proksimularo de la doktoro estis punmortigita.[489]

Kiel ekzemple Leo Lewinson proprasperte raportis, neniu litovo kompatis lin kaj bonvolis akcepti lin en sia domo, kiam li vagadis en Šančiai por serĉi ŝirmon kaj nutraĵojn ĉe la vilaĝanoj, malgraŭ la ekstrema malvarmeco kaj lia malsato. Ĉie kie li frapis la pordon, oni krude respondis al li, ke li tuj malaperu kaj ke por judoj ne estas loko. Maksimume oni permesis al li kaŝiĝi en iu remizo, kondiĉe ke li nepre foriru de tie frumatene antaŭ la heliĝo.[490]

Kutime, la germanoj reagis histerie kiam ili konstatis, ke judoj fuĝis aŭ provis forlasi la geton. La 15/18an de novembro 1942 okazis en la kovna geto ankoraŭ iu tragika incidento, pri kiu raportis la litova verkisto Jokubas Jossade: En la nokto de la 15a de novembro la judo Meck estis arestita dum la provo fuĝi el la geto por aliĝi al la partizanoj. Li defendis sin ĝis la plej lasta patrono. La 18an li estis pendigita

---

484 Kibelka 1996, p. 273-93. Liston de honoritoj de Jad Vaŝem el Litovio je la 1a de januaro 2014 vd. sub http://www.yadvashem.org/yv/en/righteous/statistics/lithuania.pdf. Nekompletan liston de savitaj infanoj kaj ties (ĉefe litovaj) savintoj vd. ĉe Levinson 2006, p. 311-4.
485 Ganor 2011, ĉap. 4.
486 Mishell 1988, p. 235s.
487 Kaiser/Holzman, p. 92s. Enkondukon kaj ĉerpaĵojn el ŝia taglibro vd. en la *Nigra Libro* de Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 621-73.
488 Pri la helpo al judaj infanoj fare de la familio de Čiurlionys vd. ankaŭ ĉe Lewinson 2006, p. 280-2.
489 Kaiser/Holzman 2001, p. 254.
490 Wiehn/Lewinson 2001, p. 50-54. La cirkonstancojn de la kaŝado de juda infano rakontis ankaŭ Mishell 1988, p. 219-31.

vidalvide de la konstruaĵo de la Juda Konsilio. Dum 24 horoj lia kadavro ne rajtis esti forprenita. Laŭ ordono de Gestapo, liaj patrino kaj fratino estis mortpafitaj en la IXa fortikaĵo.[491]

Pri la rolo de litovoj en la holokaŭsto rilate la savadon de judoj Joheved Inčiūrienė-Čartokaitė skribis: „Sendube, tiuj krimoj estis provokataj de la nazioj, sed ili estis efektivigitaj nemalmultparte de lokaj homoj. Tiel, jam en la unuaj semajnoj de la milito estis registritaj ĉirkaŭ kvar mil murditaj judoj. Ĉiujn tiujn fiagadojn efektivigis la ´baltaraisčiai´ antaŭ la okuloj de la loĝantaro. Kaj la reagoj estis diversaj: Tiuj, kiuj konsentis pri la murdoj, esprimis siajn sentojn pere de ĝojkrioj; aliaj krucumis sin kaj preĝis kaj tenis la okulojn de la infanoj fermitaj, por ke ili ne vidu la kruelaĵojn. Kaj ekzistis tiaj, kiuj klopodis, senkonsidere al la propraj risko kaj danĝero, helpi al la malfeliĉuloj, savi ilin kaj iliajn infanojn. Ilia nombro estis malgranda. Sed al tiuj savantoj oni devas esprimi la plej altan respekton.“[492] Kiel ekstreman ekzemplon de ´savado´ Elena Kutorgienė-Buivydaitė menciis la kazon de litovo, kiu preferis mortigi siajn judan edzinon kaj infanojn por eviti, ke ili estas buĉitaj de la nazioj.[493]

Laŭ Eidintas, litovoj hezitis helpi al la judoj, ĉar ili timis la severajn leĝojn kaj punojn, kiuj estis ligataj kun ili, kaj pro la indoktrinado, laŭ kiu oni instruis al la litovoj, ke ĉiuj judoj estas malamikoj. Do, al multaj litovoj simple ŝajnis, ke savi judojn estas danĝera kaj neebla afero. Laŭ Eidintas, la plimulto de la litovoj forte malaprobis la farojn de tiuj, kiuj helpis al la nazioj mortpafi judojn. La popolo estis terurigata de tiu mortpafado sed timis aperte esprimi proteston.

Atamuk taksis, ke kelkcent litovaj civitanoj helpis diversmaniere al judoj, menciante tutan aron da kazoj kaj nomoj de litovaj helpantoj.[494] La ekzakta nombro de savintoj kaj savitoj ne estas konata sed temas pri nombro de inter kelkcent kaj kelkmil.[495] Laŭ Smoliakovas, ĉirkaŭ 700 judoj estis savitaj, al kio kontribuis ĉirkaŭ 10´000 lokaj helpantoj. Aliflanke, ekzistis ĉirkaŭ 10´000 murdistoj por neniigi la judojn.[496] Ĝis 1996, 179 loĝantoj de Litovio ricevis de Jad Vaŝem la honorigon „justulo de la popoloj“, kaj de tempo al tempo aperas novaj spuroj de similaj biografioj de litovaj homoj, kiuj helpis al judoj dum la milito. Ankaŭ en la „Fotogalerio de la justuloj de la popoloj“ en la „Vilna Ŝtata Juda Muzeo je la nomo de la Gaono“ troviĝas portretoj de savintoj kaj savitoj. Komence de 2001, ĉi tiu muzeo komunikis, ke ĝi registris 3000 judojn, kiuj estis savitaj kun la helpo de 2700 loĝantoj de Litovio.[497] Fakte, ĝis nun Litovion atingas leteroj, precipe de judoj, kiuj estis savitaj kaj hodiaŭ vivas en Israelo.

### Konkludoj, fino, kulpodemando

La okupacio de Litovio fare de la germanoj daŭris dum pli ol tri jaroj, de junio 1941 ĝis aŭtuno 1944, kiam la sovetia armeo rekonkeris tiun landon. Dum tiu tempo Litovion vizitis la diablo, la satano, la demonoj, Lucifero, Belzebubo, kiel oni volas nomi ĝin. La nombro de viktimoj, kiujn tiu germana okupacio kaŭzis, estis giganta, same la materia damaĝo, kiu estis enorma kaj ĉi tie ne povis esti traktata. Pro la germana okupacio en tiu lando, entute ĉirkaŭ 410´000 homoj perdis sian vivon, inter ili inter 200-240´000 judoj. La litovia judaro estis preskaŭ komplete likvidita kaj elsarkita, kun longdaŭra efiko. Nur 8% de la iama loĝantaro de la kovna geto el la jaro 1941 postvivis la germanan okupacion. Pli ol 6000 litoviaj judoj estis deportitaj al Germanio,[498] ĉirkaŭ 2-3000 postvivis la koncentrejojn de Pollando kaj Germanio.[499] De la 40´000 kovnaj judoj nur iom pli ol 3000 povis bonvenigi la liberiĝon en majo 1945. Sed oni ne devas forgesi ankaŭ la ceterajn viktim-grupojn: En deko da lokoj de Litovio ekzistis tendaroj por militkaptitoj, en kiuj pereis entute ĉirkaŭ 170´000 homoj, precipe sovetiaj (ankaŭ inter ili troviĝis ne malmultaj judoj),[500] la plimulto dum la unuaj naŭ monatoj de la germana okupacio ĝis printempo 1942. Plej malmulte konata estas la tria grupo de viktimoj: la sovetiaj civiluloj, kiuj estis devige evakuataj de la germana armeo dum ties retiriĝo. En printempo 1944 tio koncernis minimume 210´000 personojn, kiuj estis disdividataj laŭ diversaj improvizataj tendaroj. Ĉirkaŭ 53´000 litovoj, poloj, blankrusoj kaj rusoj estis devigataj de la germanoj labori en Germanio (nur malgranda parto iris libervole). Se aldoni plian ciferon, 61´000 homoj

[491] Tory 1990, p. 153-5; Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 614.
[492] Inčiūrienė 2003, p. 201-217.
[493] Grossman/Ehrenburg/Lustiger 1994, p. 654.
[494] Atamuk 2000, p. 199-203.
[495] Unu el ili estas Irena Veisaitė, kiu vivis en la kovna geto (vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Irena_Veisaitė).
[496] Wiehn/Smoliakovas 1992, p. 20.
[497] Eidintas 2003, p. 334.
[498] Dieckmann 2011, vol. 2, p. 1287-1303; Benz/Distel 2008, vol. 8, p. 189-208.
[499] Pli detale vd. Dieckmann: Deutsche Besatzungspolitik in Litauen 1941-1944. Göttingen 2011, vol. 2, pp. 1220-1240, 1303.
[500] Por la temo de la sovetiaj militkaptitoj mi jam supre atentigis pri Gerlach 1998.

el Litovio estis devigataj labori en la milita industrio, por la germana armeo kaj la germana civila administrado ene de la okupata sovetia teritorio. La suma nombro de mortviktimoj ne estas konata, sed oni estimas ĉirkaŭ 40´000 homojn. Krom la menciitaj grupoj aldoniĝas proksimume 10´000 ceteraj personoj, kiuj ne postvivis la germanan okupacion. Temas precipe pri nelitoviaj judoj, sovetiaj aktivuloj kaj familianoj de sovetiaj funkciuloj, membroj de diversaj partizanaj grupoj, ciganoj, psikmalsanuloj kaj samseksemuloj – la ĉefaj elsarkindaj celgrupoj.

Laŭ la intencoj de la germana nacisocialisma raspolitiko, la baltaj landoj devis esti purigataj ne nur de judoj sed ankaŭ de ĉiuj „rase malpli valoraj elementoj de la loĝantaro“, kiel la naziaj mastroj kutimis esprimi sin, kaj ili devis esti germanigataj. Koncerne Litovion kaj la german-litovan kunlaboradon, la litovoj devis esti utiligataj por atingi la celojn de la germanoj, kaj inverse, la litovoj provis kaj klopodis gajni la germanojn por siaj naciaj celoj. En tio ekvilibro certe ne ekzistis, des pli ke la germanoj ne helpis al la litovoj atingi ties naciajn celojn krom en la batalo kontraŭ la judoj kaj komunistoj. Ŝajnas ankaŭ, ke la germanoj tro kalkulis pri la entuziasma kunlaboro de la litovoj, sed ili devis konstati kun seniluziiĝo, ke en la litova popolo la preteco murdi la judojn tamen ne estis tiel forta kiel ili supozis aŭ esperis.

Tamen, pli malpli ĉiuj aŭtoroj de la memuara literaturo pentris negativan bildon pri la tiamaj litovoj, kiujn ili konsideris ekstreme antisemitismaj, kun la konataj esceptoj, kiuj estis supre menciitaj; rilate ilian sintenon al la judoj ekzemple Helene Holzman faris en sia libro al la litovoj seriozajn riproĉojn pri indiferenteco, profitemo, ekspluatemo, denuncemo, minacemo, spekulativemo, agresemo kaj kompliceco.[501]

Krom la supre menciitaj aktivaj politikaj medioj en Litovio ekzistis ankaŭ vastaj tavoloj de pli malpli pasivaj spektantoj kaj observantoj-ignorantoj, kiuj parte eĉ aprobis la genocidon kontraŭ la judoj; al tiuj apartenis la antisemitisme orientataj medioj de entreprenistoj, ŝtataj oficistoj, oficiroj, konservemaj-naciismaj intelektuloj kaj studentoj, dum kamparanoj, demokratie orientataj urbanoj kaj liberalismaj intelektuloj ne aprobis la genocidon en si mem. Sed ŝajnas, ke ankaŭ en tiuj tavoloj ĝenerale regis la sento de senhelpeco aŭ indiferenteco. Fakte, tro malmultaj kuraĝaj homoj partoprenis la rezistadon kontraŭ la germanoj. Kelkaj ja ne nur kompatis la judojn sed ankaŭ provis helpi al ili.[502]

Kun Dieckmann eblas konstati, ke komence de la germana okupacio esencaj partoj de la litova popolo konsideris, ke por la estonteco de etne homogena litova ŝtato estas utile agi kontraŭ la judoj kaj kunaboradi kun la germanoj.[503] En ĉi tiu punkto oni revenas al la teorio de Goldhagen, kiu suspektas, ke la ideo ekstermi la judojn konformis al iu nacia plano de la germana popolo; ŝajnas ke laŭ tiu logiko pensis kaj agis ankaŭ la litovoj. Analoge al la kazo de la germanoj restas do solvi la demandon, ĉu ankaŭ en la kazo de la litova popolo eblus paroli pri *kolektiva kulpo,*[504] malgraŭ diferencoj, kiujn ni povis nur aludi en ĉi tiu studo. Dum la holokaŭsto la esenca kristana maksimo „vi ne rajtas mortigi“ krude koliziis kun la malnova kontraŭjuda antisemitismo, kaj en Litovio tiuj du momentoj koincidis kun ´modernaj´ konsideroj kaj aktualaj postuloj de la naciismo (revo pri realiĝo de propra ´homogena´ nacio) kaj ekonomia konkurenco.

Koncerne la „kulpodemandon“ oni certe ne povas ĝenerale akuzi aŭ kondamni la litovan popolon pri (pro) la genocido kontraŭ la judoj de Litovio, kvankam en ĝi regis fortaj antisemitismaj tendencoj. Necesas fokusi la atenton al unuopaj grupoj, kiuj tiam ĉefreprezentis la litovan popolon. Kiel montrite en ĉi tiu studo, granda kulpo trafas precipe la diversajn litovajn organizaĵojn (kiel LAF, diversaj grupoj de „partizanoj“, la Civitana Komitato, la litova Sekureca Polico, la Litova Bataliono TDA) kaj precipe ankaŭ la Provizoran Registaron, kiu aŭtoris sufiĉe drastajn kontraŭ-judajn rezoluciojn kaj leĝojn, kiujn tiu registaro volis apliki. Gravan helpan rolon ludis ankaŭ la litova memadministra sistemo (en la urboj kaj regionoj), kiu diligente kaj efike kunlaboris kun la nazioj por izoli, persekuti, koncentri kaj neniigi la laŭdirajn malamikojn kaj perfidulojn de Litovio, eĉ ankoraŭ en la fazo kiam la retiriĝo kaj malvenko de la germanoj jam estis antaŭvideblaj kaj neeviteblaj. La litovaj instancoj kaj personoj, kiuj kunlaboris kun la germanoj, povis fari tion kun nacia pravigo aŭ en nacia intereso, sekvante la ideon de la kreado de etne homogena litova socio, kies efektiviĝo celis la forpuŝadon de ĉiuj nelitovaj etnaj grupoj, kiuj ĝenis tiun

---

501 Plurajn kazojn ŝi rakontis en sia libro *Dies Kind soll leben!*
502 Atamuk 2000, p. 175.
503 Dieckmann 2006, p. 137.
504 Pri la „kolektiva kulpo“ de la germanoj dum la NS-tempo kaj la holokaŭsto ekzistas debato en la faka literaturo, ekzemple Goldhagen, kiu en *Hitlers willige Vollstrecker* (1996) ŝajne vidis specon de kolektiva kulpo ĉe la germana popolo, kvankam li kontestas eksplicite esti asertinta tion. En *Die Schuldfrage* (1946) Jaspers neis la ekziston de kolektiva kulpo entute. Dum la legado de la faka literaturo pri la holokaŭsto en Litovio mi ne konstatis, ke oni traktis la demandon de la kolektiva kulpo ĉe la litovoj.

nacian planon, precipe la judoj. La partopreno de litovoj en la persekutado kaj mortigado de la judoj estis faciligata kaj akcelata en junio 1941 ankaŭ pro tio, ĉar la litovaj politikaj kaj sociaj instancoj ne nur ´aŭspiciis´ sed ankaŭ transprenis la gvidadon de la litovaj armataj fortoj. La portantoj de tiu centra respondeco de la litovaj politiko kaj socio mem reprezentis volkismajn kaj naziismajn poziciojn, admirante Hitleron, kaj ne estis kontraŭ la efektivigo de la planoj de la germanoj, eĉ per altgrade krimaj metodoj kaj rimedoj. Krom tio, en la popolo estis disvastigata la opinio, ke judoj estas komunistoj kaj inverse.[505] Do, ĉe la kelkmil litovoj, kiuj aktive partoprenis en la persekutado kaj mortigado de la judoj,[506] temis antaŭ ĉio pri politike plej radikalaj elementoj de la litova naci(ism)o, malŝatantoj de judoj aŭ simplaj oportunistoj, utilistoj kaj profitantoj, kiuj tiel perlaboris kaj pergajnis sian monon. Parte temis pri junaj homoj, kiuj verŝajne eĉ ne komprenis aŭ ne konsciis, ke ili partoprenas en genocido. Male, iuj probable eĉ kredis, ke ili faras ion bonan kaj utilan por la litova nacio, se ili helpas likvidi la judojn. Laŭ Elena Kutorgienė-Buivydaitė, al la litovaj partizanoj aliĝis aŭ stultaj junuloj, kiuj lasis sin trompi de la slogano pri la ´sendependa´ Litovio, aŭ temis pri homa abomenaĵo, kiu celis rabi kaj murdi homojn senpune. Ĉu stulteco, abomenaĵo aŭ io alia, laŭ Dieckmann la kombino de moderna kontraŭ-bolŝevismo kaj tradicia kontraŭ-judismo, do de politika kaj religia (plus ekonomia) kontraŭsintenoj formis esencan kaj taŭgan konstelacion, por ke en Litovio la holokaŭsto povu plene prosperi.[507]

Kiel ne nur Atamuk emfazis, en Litovio kiel ankaŭ en la cetera parto de Eŭropo la sorto de la judoj ne estis *decidita* de la lokaj antisemitoj sed de la ĉefnazioj en hitlera Germanio mem. La ĉefaj inspirantoj, instigantoj, organizantoj kaj efektivigantoj de la genocido kontraŭ la judoj estis neniu alia ol la germanaj (kaj aŭstraj[508]) nazioj mem, precipe la SA- kaj SS-oficiroj kaj la anoj de Gestapo, kiuj aranĝis la amasmurdon de la judoj en la okupataj landoj per la helpo de la lokaj civilaj kaj armeaj administraj instancoj kaj infrastrukturoj.

Tiel, Litovio elektis en principo la vojon, kiun iris ankaŭ Slovakio kaj Kroatio, Hungario kaj Rumanio, aliaj modeloj de ekstreme aktivaj antisemitismaj satelitaj ŝtatoj de la germana NS-reĝimo, kiuj volonte kunlaboris en la totala neniigo de la judoj.[509] Hodiaŭ oni ankaŭ scias, ke preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo iel kunlaboris ĉe la persekutado kaj likvido de la judoj, kiam por tio venis la oportuna momento, iuj pli aktive, aliaj pli pasive.[510]

Laŭ Dieckmann, la holokaŭsto en Litovio estus efektiviĝinta ankaŭ sen la partopreno de litovoj sed pli malrapide. En tiu kazo la individuaj ŝancoj por la judoj plu vivi estintus sendube pli grandaj. Ili estus havintaj pli da eblecoj por fuĝi aŭ kaŝiĝi, se la litovoj ne estus kunlaborintaj kun la germanoj, kaj la germanaj instancoj estus havintaj pli da peno persekuti, kapti kaj mortigi la judojn en tiel mallonga tempo. Malgraŭ ĉiuspecaj klopodoj por malgrandigi la rolon kaj signifon de la litova partopreno en la holokaŭsto fare de litovaj politikistoj, propagandistoj kaj historiistoj, laŭ Atamuk ekzistis komuna german-litovaj intereso kaj volo por forviŝi la judojn – ĉi tiu celo ne estu subtaksata kaj oni ankaŭ ne forgesu konscii pri ĝi.

Ankaŭ la litova katolika eklezio certe ne kondutis ´sankte´. Kiel aliaj aŭtoroj akcentis, la perdoj de judaj vivoj povintus esti malpli grandaj, se la respondeculoj de la katolika kaj de aliaj kristanaj eklezioj estus kondamnintaj la hitleran rasan politikon kaj protestintaj kontraŭ la totala neniigo de la judoj. Pri tia

---

505 Dieckmann 2003.

506 En januaro 1999, la „Asocio de Litoviaj Judoj“ indikis, ke proksimume 23´000 litovoj „asistis“ la germanojn dum la murdado de la judoj. (Vd. Sutton, p. 209).

507 Dieckmann 2012 („Jüdischer Bolschewismus“ 1917 bis 1921), p. 63s.

508 Oni ne forgesu emfazi la signifon de la kontribuo de la aŭstraj nazioj en la holokaŭsto, kies rolo kaj dimensio ne estas subtaksendaj. (Vd. ekzemple: Graf, Wolfgang: Österreichische SS-Generäle. Himmlers Verlässliche Vasallen. Klagenfurt 2012.)

509 Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Sendependa_ŝtato_Kroatio kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Slovaka_ŝtato (ĉar la esperantlingvaj artikoloj de Vikipedio estas ege mankohavaj, supraĵaj kaj nekompletaj (ĉu oni intence ne mencias certajn malagrablajn faktojn mi ne scias), mi rekomendas konsulti precipe la anglan kaj germanan versiojn, kiuj estas pli fidindaj). Mi aldonas tiujn ligojn al Vikipedio en miaj artikoloj en principo nur por ebligi la aliron al ĝeneralaj aŭ kompletigaj informoj. El scienca vidpunkto Vikipedio estas dubinda enciklopedio, kvankam en unuopaj kazoj ĝi povas esti utila.

510 Eĉ la neŭtrala Svislando parte montriĝis iusence komplico de la nacisocialisma reĝimo en Berlino, kvankam ĝi ne estis rekte tuŝata de la milito kaj de la holokaŭsto. La svisa popolo mem timis la danĝeron de germana invado kaj do entute konsideris la nacisocialismon kiel minacon. En Svislando tiu malfacila ĉapitro de la historio estis longe neglektata kaj serioze prilaborata nur post la fino de la Malvarma Milito, kiam diversaj detaloj iĝis konataj kaj la premo de (usonaj) judoj kreskis. Koncernataj estis precipe la temoj de la ambivalenta sinteno de la svisa registaro koncerne la judan demandon en Eŭropo kaj la politikan pozicion rilate al la germana registaro, la rifuzado de judoj, kiuj serĉis protekton en Svislando, ĉe la limoj (temis pri ĉirkaŭ 30´000 rifuzitaj personoj), kaj la kunlaboro de svisaj bankoj kaj instancoj kun la germanoj rilate la rabitan judan oron, kiun oni kaŝis en svisaj bankoj. Precipe grandan atenton provokis la skandalo de la juda oro, kiu estis rikoltata parte de oraj dentoj de judoj, kiun oni fandis por produkti orbrikojn. (Informojn vd. sub http://www.uek.ch/de). Do, ankaŭ la svisoj devis lerni kritike okupiĝi pri la negativaj momentoj de sia historio.

hipotezo precipe Daniel Goldhagen, kiu analizis la *moralan kulpon* de la eklezio kaj starigis en siaj libroj tiklajn demandojn por kontribui al la diskuto, estas konvinkita. Kiel Michael Wieck, kiu mem estis germana judo kaj mirakle saviĝis el la milita infero de Königsbergo, en sia leginda memuarlibro „Zeugnis vom Untergang Königsbergs“ (1988, p. 63), rimarkigis: kiam la oficialaj reprezentantoj de la eklezio protestis kontraŭ la forigo de krucoj en klasĉambroj de Germanio kaj kontraŭ la mortigo de psikmalsanuloj, tio impresis la naziojn kaj havis efikan sukceson. Do, Wieck levis la riproĉon al la eklezio, ke ĝi ne utiligis la tempon por protesti ankaŭ kontraŭ la murdado de la judoj. En Danlando, Norvegio kaj Bulgario la landaj eklezioj elpaŝis multe pli kuraĝe kontraŭ la persekutado, deportado kaj mortigo de la judoj.

Gravajn riproĉojn Eidintas, kiu, kiel ŝajnas al mi, serĉis ĉiujn eblajn argumentojn por senŝarĝi la litovojn de la kulpo, direktis precipe al la okcidentaj aliancanoj kaj al la registaro en Moskvo, kiuj praktike faris nenion por savi la judojn dum la holokaŭsto, kvankam ili estis informataj pri la tragedio, kiu atingis la kulminon en 1941/42. Fakte, nur fine de 1942 Londono kaj Vaŝingtono kondamnis la amasmurdon. Sed tiam jam miloj da judoj estis pereintaj en la gasĉambroj de Aŭŝvico,[511] kiu ne estis bombata de la aliancanoj aŭ sovetianoj, ĉar ili ne konsideris la lokon kiel militan objekton. USSR diris, ke la situacio de la judoj povos esti ŝanĝita nur post la fina venko kontraŭ la germanoj. La brita registaro aplikis rigoran enmigran politikon kaj rifuzis konformi la peton ekzemple de Rumanio, kiu petis akcepti en Palestino 70´000 judojn el Transnistrio.[512] Sed la provo de tiu litova historiisto kaj diplomato kulpigi aliajn, precipe la Okcidenton, celas nur deflankigi la atenton pri la propra kulpo, kiu estas ne malgranda.

Per la dua okupacio de Litovio fare de la sovetia armeo en somero 1944, kiu restarigis la sovetian reĝimon de 1940, komenciĝis nova tragika ĉapitro en la historio de la litova popolo, ĉi-foje preskaŭ sen judoj, kies dummilita peripetio estis prisilentata kaj tabuata. Malgraŭ la stalinisma diktaturo, kiu tute ne amike rilatis al judoj, la judoj almenaŭ ne plu troviĝis en morta danĝero kaj ne plu devis vivi en getoj kaj koncentrejoj aŭ kaŝi sin en keloj kaj aliaj malhelaj lokoj, kiel tio estis la kazo dum la nazigermana tempo. En Litovio postrestis nur kelkmil homoj de juda deveno,[513] kaj judaj restaĵoj estas apenaŭ videblaj. Krom kelkaj fotoj kaj raportoj kaj simbola monumento pri la geto kaj koncentrejo en Vilijampolė, ĉiuj judaj spuroj estis forviŝitaj, kvankam la malnovaj stratnomoj estis konservataj, ekzemple la fama Panerių-strato (strato al Paneriai/Ponary!), kiu dividis la malgrandan geton de la granda geto. Ankaŭ la fundamentoj kaj restaĵoj de la fortikaĵoj, en kiuj la judoj estis amase mortigitaj, estas konservataj.[514] Sed la juda vivo en Kovno estis preskaŭ plene detruita kaj estingita kaj praktike ĉesis ekzisti. Fakte, la litovoj atingis sian celon de etne homogena nacia ŝtato. La (de)nova malamiko nun estis la rusoj (sovetianoj), kiuj komencis (aŭ daŭrigis) minaci kaj subfosi la ekziston de la litova kulturo. Malgraŭ la holokaŭsto, la antisemitismo ne malaperis ankaŭ postmilite, ne nur en Sovetunio kaj en Litova SSR sed praktike ĉie en Eŭropo. Nenie judoj estis bonvenaj.[515] Postvivintajn judojn en Litovio oni embarasis per malagrablaj demandoj kaj suspektis ilin, ke ili kunlaboris kun la „hitlerfaŝistoj“, kiel oni kutimis nomi la germanajn nacisocialistojn (ĉar la termino „socialismo“ estis nun okupata de la komunistoj).

En la klopodo serĉi kialojn por la indiferenta kaj pasiva sinteno flanke de grandparto de la litova publiko rilate la sorton de la judoj post la milito, Raya Kruk, kiu postvivis la kovnan geton, skribis: „Konfuza silentado disvastiĝis, kiam la postvivantoj renkontiĝis. Ĝi estis kovrata de ĉiokovra nebulo. Oni prisilentis la dolorajn jarojn, kvazaŭ ili estintus memkulpaj. Tiu reago estas klarigebla per la krueleco de la okazintaĵoj, kiuj faris la memoradon neeltenebla. Rolon ludis ankaŭ la sinteno de la sovetianoj, kiuj konfrontis ĉiun judon, kiu postvivis la germanan okupacion, per la demando: ´Kial vi postvivis´? Tio implicis suspekton pri ebla kunlaborado [kun la malamiko].“[516] Rusoj, misinformataj de la propagando,

---

[511] Pri la t.n. „Aŭŝvicaj protokoloj“, kiujn la usona registaro utiligis por informi la homaron pri la murdo de la judoj en Eŭropo, vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Auschwitz-Protokolle.

[512] Eidintas 2003, p. 330s.

[513] Laŭ la censoj oficiale vivis ankoraŭ 24´700 (1959), 23´000 (1970) judoj (16´500 en Vilno kaj 4000 en Kovno), 14´700 (1979) kaj 12´400 (1989, de tiuj 9147 en Vilno kaj 1378 en Kovno, 710 en Klaipėda, 467 en Šiauliai). Dum la 70-90aj jaroj centoj da judaj familioj forlasis la landon. En 1995 restis nur ĉ. 5000 judoj, inter kiuj la plimulto eĉ ne devenis el Litovio sed ĉefe el Belorusio, Rusio kaj Ukrainio.

[514] En la iama IXa fortikaĵo de Kovno estis instalita muzeo (vd. http://www.muziejai.lt/Kaunas/forto_muziejus.en.htm).

[515] Vd. Lendvai, Paul: Antisemitismus ohne Juden. Entwicklung und Tendenzen in Osteuropa. Wien 1972; Bettelheim, Peter u.a.: Antisemitismus in Osteuropa. Aspekte einer historischen Kontinuität. Wien 1992; Wasserstein, Bernhard: Europa ohne Juden. Das europäische Judentum seit 1945. Köln 1999. Pri antisemitismaj tendencoj en Litovio ĝis la morto de Stalin rakontis Kruk 1999, p. 160-164, kaj poste pri aliaj ĉikanoj flanke de la sovetiaj instancoj en la ĉapitro ´Exodus´. Ŝi estis konsiderata kiel „ekzotulino“, la KGB pridemandadis ŝin kaj ŝi perdis sian laborlokon.

[516] Kruk 1999, S. 13.

estis konvinkitaj, ke la germanoj mortigis *ĉiujn* judojn kaj kredis ankaŭ la version, ke judoj, kiuj ankoraŭ vivas, devis esti kunlaborantoj de la nazioj.“[517]

Kiam jardekojn post la holokaŭsto Raya Kruk vizitis Kovnon kun televida teamo (evidente en 1990), sur la memorŝtono pri la geto la nomo de la judoj estis legebla plej laste en la vico, post la nomo de la rusoj, litovoj, poloj, blankrusoj, latvoj, ukrainoj kaj aliaj naciecoj. Krom tio estis evidente, ke la nomo de la judoj estis aldonita nur antaŭ nelonge, kaj oni rakontis, ke tiu aldono okazis nur post tio, kiam usonaj turistoj postulis ĝin. Ankaŭ en memorlokoj pri la milito en la provincaj urboj de Litovio la neniigo de la judoj trovis nenian mencion.[518] Kiel mi enkonduke notis, la holokaŭsto estis prisilentata kaj reinterpetetata en Sovetunio. Sub la t.n. komunismo estis farataj novaj grandskalaj krimoj kun mondhistoria signifo.[519] La suferado de la juda popolo, kiu iusence transformiĝis al fantoma ekzistado, do ne finiĝis ankaŭ sub la kondiĉoj de relativa libereco. Iom post iom preskaŭ ĉiuj judoj elmigris el Sovetunio kaj el sovetia Litovio en la liberan mondon, precipe al Usono kaj Israelo.

**Dovid Katz** (nask. en 1956), kiu estas usona lingvisto de jud-litova deveno, vivanta kaj laboranta en Litovio kiel libroaŭtoro kaj profesoro ĉe la vilna universitato kaj kiu krome estas politika aktivulo pri homaj rajtoj, konstatis, ke en Litovio ekzistas tendencoj, kiuj „vualas“ aŭ „nebuligas“ la holokaŭston kaj kiuj estas ligataj kun „fruktodona kaj potenca antisemitisma enplankiĝo, kiu ne vivas unuavice ĉe la ĝenerala popolo sed precipe ĉe la elitoj de la registaro kaj kelkaj registaraj organizaĵoj kaj kvazaŭ-akademiaj institucioj“. Katz elpaŝis kiel granda kritikisto de la konvencia prezentado de la historio de la holokaŭsto en la naciaj historiaj rakontado kaj memorado de Litovio, al kiu li riproĉas, ke ĝi klopodas malgrandigi la dimension de la litova partopreno en la kontraŭjuda genocido kun la celo trivialigi kaj vualigi la holokaŭston mem. Lige kun la traktado de la holokaŭsto en Litovio Katz parolis pri organizata kampanjo, kiu utiligas diversajn strategiojn, nome: delegitimado de la kontraŭ-nazia rezistado (ekzemple per jura persekutado de postvivintaj viktimoj de la holokaŭsto, kiuj rezistis la nazian murdadon, per absurdaj suspektoj, riproĉoj kaj akuzoj) kaj antisemitisme motivata provokado kontraŭ surlokaj judoj kaj postvivantaj viktimoj de la holokaŭsto; delegitimado de klopodoj prezenti naziajn militkrimulojn antaŭ la tribunalo; ekstrema troigo de la juda partopreno en la sovetia regado kaj kontraŭ-litova perspekutado; marĝenigo de kuraĝaj lokaj nejudaj protagonistoj, kiuj luktas por trovi la veron; (dubinda) laŭleĝa redifinado de la nocio de la ´genocido´; delegitimado de la Simon-Wiesenthal-centro kaj troa politika apogado de malavare subtenataj komisionoj, -esplorcentroj kaj -muzeoj, kiuj reprezentas la koncepton de la „duobla genocido“.[520] Krom tio, Katz kritikis la Pragan Proklamon de la jaro 2008, kiu celis egale konsideri kaj trakti la krimojn plenumatajn de la t.n. nacisocialismo kaj de la sovetia komunismo/ stalinismo.[521]

Atamuk strikte kaj tute prave rifuzis la dubindan teorion pri la „duobla“, „simetria“ aŭ „alia“ genocido, per kiu la koncernataj litovoj strebis klarigi aŭ eĉ senkulpigi sian partoprenon en la genocido kontraŭ la judoj, kiu laŭ ilia imago okazis kvazaŭ kiel venĝo por la sekvoj al la sovetia reĝimo en 1940/41, kiam judoj laŭdire aktive kunhelpis ĉikani, subpremadi kaj deportadi litovojn.[522] Kiel supre montrite, al tiu teorio la bazo komplete mankas. Joseph Levinson nomis tiun teorion la „mizere maskata klopodo por pravigi la amasmurdon de la judoj“. Ankaŭ Tomas Venclova, litova verkisto kaj aktivulo pri homaj rajtoj, rifuzis la teorion de la duobla genocido kiel „neakcepteblan“, ĉar la genocido kontraŭ la judoj fare de la germanaj nacisocialistoj ne estas komparebla kun la subpremado de la litovoj fare de la stalinistoj kaj ofendas la judojn.[523]

---


517 Wieck 1988, p. 234.
518 Kruk 1999, p. 50, 54.
519 Laŭ la kalkulo de la *Nigra libro de la komunismo*, eldonita en 1997 (vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/La_nigra_libro_de_la_komunismo), sub la komunisma reĝimo en diversaj landoj minimume 100 milionoj da homoj perdis sian vivon pro la perforto, kiun tiu reĝimo aplikis kontraŭ la popoloj, kiujn la komunistoj subpremadis. La reala nombro de mortviktimoj, kiujn la t.n. komunismo rekte aŭ malrekte kaŭzis, estas verŝajne multe pli alta. Ĝis nun en maldekstrulaj medioj ekzistas la tendenco malaltigi kaj prisilenti tiujn faktojn kaj ciferojn, kio estas nek eltenebla nek tolerebla nek akcptebla.
520 Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Dovid_Katz.
521 Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Prague_Declaration_on_European_Conscience_and_Communism. Pri la unikeco de la holokaŭsto (vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Historikerstreit) kaj la komparado kaj kompareblo de la komunismo kun la nacisocialismo kaj inverse (vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Hannah-Arendt-Institut_für_Totalitarismusforschung) ekzistas longa scienca disputado kadre de la esplorado pri totalismaj politikaj sistemoj (fakan artikolon vd. ekz. sub http://www.hait.tu-dresden.de/TDv/TD_02_01_Fritze.pdf).
522 Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Double_Genocide.
523 Levinson 2006, pp. 323, 335. En la gazeto *Lietuvos Jeruzalė* 2/53 majo 1995, T. Venclova klarigis kial la teorio de la „duobla genocido“ ne estas akceptebla (vd. ĉe Levinson p. 331-3). Venclova atentigis, ke en la scienco oni distingas genocidon disde


El jura, morala, homa kaj politika vidpunktoj la judoj ne povas esti kulpigataj pri tio, ke dum la unua sovetia okupacio de Litovio ili estis integrataj en la ŝtatajn strukturojn de la sovetia reĝimo, en kiu ili trovis laborlokojn, profesian kaj ekzistan perspektivojn. La subpremado kaj persekutado de la litovoj ne estis planataj kaj efektivigataj de judoj sed de sovetiaj komunismaj-stalinismaj instancoj mem, en kiuj laboris ĉefe rusoj kaj litovoj kaj nur malmultaj judoj, kiuj eĉ ne povis influi la decidojn. La vero estas, ke sub la stalinisma reĝimo la judoj suferis eĉ multe pli ol aliaj etnoj, ĉar la stalinisma sistemo havis nete antisemitismajn trajtojn (en formo de kontraŭ-cionismaj, kontraŭ-kapitalismaj kaj kontraŭ-religiaj/ateismaj kampanjoj).[524]


Ie en sia libro Eidintas (p. 134) citis iun italan aŭtoron, kiu diris, ke popoloj estas (morale) nek bonaj nek malbonaj kaj ke iliaj agoj, reagoj kaj konduto ofte dependas de la aktualaj historiaj cirkonstancoj, en kiuj tiuj popoloj troviĝas kaj de kiuj ili estas influataj kaj provokataj.


Probable, dum la milito ne ĉiuj litovoj tute konsciis kio vere okazis kun la judoj kaj ne povis imagi la katastrofon, kiu trafis ilin. Kaj ŝajnas, ke la litovoj ankaŭ ne konsciis pri sia kulpo rilate al la judoj. La vero fariĝis konata kaj klara nur post la milito, kiam fariĝis evidente, ke la judoj estis preskaŭ tute malaperigataj de Litovio kaj cetera Eŭropo per amasa industrieca mortigo de tiu gento. Sed tiam jam estis tro malfrue por ripari la damaĝon. Kiel dirite, dum la sovetia tempo la holokaŭsto estis prisilentata, reinterpretata aŭ relativigata, kio kaŭzis novajn problemojn por la perceptado, traktado kaj esplorado de tiu temo. Tiel ne nur la historio ne povis esti objektive prilaborata, sed ankaŭ la morala respondeco kaj jura kulpo de la litovoj, kiuj partoprenis en la amasmurdo de la judoj, neniam povis esti publike diskutata de la socio kaj traktata de la justico, kun fatalaj sekvoj por la psika stato de la litova socio. Liudas Truska avertis, ke la litovoj ne ŝatas tro multe paroli pri la (malbela) pasinteco sed preferas memori nur pri la gloraj kaj heroaj tempoj de sia historio. Kvindek jarojn post la sovetia okupacio ili sentas gravajn psikkompleksojn, ne kapablas esprimi memkritikon kaj konsideras ĉian kritikon de interne aŭ ekstere kontraŭ si kiel provon de misfamigo.[525]


Fine de ĉi tiuj konsideroj restas la demando, ĉu en Litovio (kaj aliaj landoj ekster Germanio) la holokaŭsto estis evitebla aŭ ne. Ŝajnas ke la respondo estas simpla: ne, ĉar tro da faktoroj kontribuis al ĝia nemalhelpebla efektiviĝo, kaj mankis faktoroj por ĝia evito. Nature, oni ne povas sufiĉe ofte ripeti la veron, ke la ideologoj, iniciatoroj kaj efektivigantoj de la genocido kontraŭ la judoj en Litovio kaj aliloke estis neniu alia ol la germanaj (kaj aŭstraj) nazioj mem, kvankam la antisemitismo en la koncernaj landoj de orienta Eŭropo ekzistis jam pli frue kaj favorigis la holokaŭston. Do, la homaro devos plu vivi kun tiu traŭmata ´heredaĵo´, kiu ne estas nuligebla nek forgesenda, ankaŭ ne en Litovio, kie la holokaŭsto vole-nevole fariĝis integra parto de la historio.












etnocido kaj stratocido, kaj laŭ tiu skemo la stalinisma subpremado aŭ persekutado de la litovoj apartenas pli al stratocido aŭ etnocido ol al genocido, en kiu tuta popolo estas radikale elsarkita kiel la judoj dum la dua mondmilito. Kompareblaj kazoj preskaŭ ne ekzistas en la historio de la homaro (eĉ en la kazoj de la persekutado de la armenoj, ĉeĉenoj, tataroj de Krimeo, ukrainoj kaj ciganoj oni hezitas paroli pri genocido sed preferas la nociojn de la etnocido aŭ stratocido. Vd. ankaŭ piednoton 7). Krom tio, Venclova atentigis, ke en la sovetia tempo ne nur la judoj estis infektitaj de la bolŝevismo sed ankaŭ ĉiuj ceteraj popoloj, kiujn trafis la sovetiismo, inkluzive de la litovoj mem. Do, la paradigmo judoj = bolŝevikoj aŭ ĉekistoj ne validas. Multaj tiaj senbazaj asertoj estis faritaj de homoj, kiuj ne konas la historion sed nur kredas la propagandon. (Levinson 2006, p. 336s., laŭ Baltic News Service, *Lietuvos rytas,* 6.6.2000).

[524] Atamuk 2000, p. 155.

[525] Truska ĉe Levinson 2006, p. 373.

## Evoluo en la 1990aj jaroj kaj poste

Ŝajnis ke en Litovio la fantomoj de la antisemitismo ankoraŭ ne estis mortaj kiel montras kelkaj incidentoj, kiuj vekis grandan publikan atenton: la pogromeca etoso aranĝata en decembro 1989 fare de gvidantoj de la litova naciisma movado Sąjūdis, dum kiu la estro de la komerca administracio en Klaipėda, Arkadij Lichtinšainas, evidente judo, estis ofendita kaj lia domo atakita; la gazeto *Respublika,* kiu publikigis iujn kontraŭjudajn kaj kontraŭ-israelajn artikolojn, misfamigante judojn kaj samseksemulojn kiel sekretajn regantojn de la mondo; lezado de judaj tombejoj; furiozaj reagoj en Litovio post kiam la litova prezidento Algirdas Brazauskas pardonpetis en la israela parlamento Knesset por la litova partopreno en la holokaŭsto;[526] iuj artistoj, kiuj skulptis lignajn figuretojn, kies vizaĝoj havas judan fiziognomion; k.a.[527]

La oficialaj politikaj rilatoj evoluis jene: En 1994 Litovion vizitis la prezidanto de Knesset, Shevah Weiss, kiu nomis la litovan kunlaboradon en la holokaŭsto „unika fenomeno“.[528] En 1994 ankaŭ la litova ĉefministro Adolfas (!) Šleževičius vizitis Israelon kaj senkulpiĝis por la „kelkcent litovoj“, kiuj partoprenis en la holokaŭsto. Sed li estis sufiĉe malvarme akceptita de la parlamentestro Dov Ŝilansky, kiu mem naskiĝis en Litovio (Šiauliai) kaj kiu starigis al Šleževičius sufiĉe malagrablajn demandojn. Kiel malbonaj la rilatoj inter Israelo kaj Litovio daŭre estas, montras kelkaj incidentoj kiel la rifuzo de la malfermo de oficejo de la „Centro Simon Wiesenthal“ en Litovio fare de la litova registaro aŭ la bojkotado de iuj konferencoj en Litovio flanke de la israelanoj. Aparte radikalan sintenon adoptis la „Asocio de la litoviaj judoj en Israelo“, kies prezidanto Joseph Melamed kritikis aŭ eĉ rifuzis la senkulpiĝojn de litovaj ŝtatestroj kiel nesufiĉajn, ĉar laŭ lia opinio ili prisilentas gravajn faktojn kaj daŭrigas la politikon de la Provizora Registaro, tolerante antisemitismajn tendencojn kaj evitante la okazigon de juraj procesoj kontraŭ militaj krimuloj el Litovio. Melamed, kiu verkis libron kun la titolo „Litovio: La lando de la sango“, eĉ nomis Litovion „paria ŝtato en la koro de Eŭropo, kiu devas ankaŭ esti traktata kiel tia“. La problemo estas, ke flanke de litovaj politikistoj ĉiam denove troviĝas klopodoj por revalidigi la decidojn de la Provizora Registaro de 1941, kiu laŭ la interpretado de ĝiaj apogantoj luktis kontraŭ la sovetia kaj nazia okupacioj,[529] por proklami iujn dubindajn jardatojn kiel festotagojn kaj por akuzi la judojn, ke ili kulpas pri la tragedio de la litova popolo.[530] Iuj litovaj ĵurnalistoj ankaŭ ne hezitas lanĉi de tempo al tempo antisemitismajn provokojn en siaj gazetoj. Inter la elstaraj tiaj skandalaj provokoj apartenas ankaŭ la konsidero de verŝajnaj partoprenantoj en la kontraŭjuda genocido en Litovio dum la germana okupacio (kiel J. Lukša) kiel naciaj herooj aŭ la prezentado de litovaj antisemitoj de la 19a jarcento sur litovaj bankbiletoj (kiel V. Kudirka k.a., vd. piednoton 45).

Por daŭrigi la malfacilan dialogon kun la judoj, en la jaro 2000 ankaŭ Vytautas Landsbergis, estro de la litova parlamento, vizitis Israelon; laŭ lia opinio nur personoj povas esti respondecigitaj, kiuj partoprenis la barbarajn krimojn, dum nacioj kiel tiaj ne povas esti kulpigitaj pri tiaj krimoj.[531] Ankaŭ aliaj

[526] La anglalingva teksto aperis ĉe Levinson 2003, p. 470-4. Fakte, Brazauskas ne senkulpiĝis en la nomo de la tuta litova popolo sed nur por la litovoj, kiuj murdis judojn. (Vd. Tauber 2010, p. 57).

[527] Donskis 1997, p. 28s.

[528] Aušra Radzevičiūte ĉe Levinson 2006, p. 489, en *Kauno diena*, 1.9.1994.

[529] Kiel en septembro 2000, kiam tia voĉdono kaŭzis seriozan konflikton inter la litovaj parlamento kaj prezidento (vd. Eidintas 2003, p. 433-7).

[530] En 1997, Kazys Bobelis, la ĉefo de la Kristandemokrata Unio kaj membro de la litova parlamento (Sejmo), ripetis en *Respublika varpai* la malnovan aserton, ke en 1940-41 „85% de la persekutantoj kaj turmentantoj de la litovoj estis judoj“. Tio ne estis ĉio: En 1996 kaj 1999 la verkisto Jonas Mikelinskas skribis pri la „detrua rolo de la judoj“ en tiuj jaroj, pri la „eksterordinara aktiveco de la judoj koncerne la ekziladon de la litovoj al Siberio“ kaj pri la „tradicia maldankemo de la judoj, kiuj amas kaj respektas nur la malamikojn de Litovio kaj kaptas la unuan okazon por malrespekti kaj perfidi tiun popolon, kun kiu ili vivis pace kaj sekure dum sescent jaroj“. Lige kun la jura proceso kontraŭ A. Lileikis kaj K. Gimžauskas fine de 1998, tuta vico de litovaj politikistoj kaj inteligentuloj (kiel la vic-prezidanto de la Sejmo, Romualdas Ozolas, la parlamentano Rimantas Smetona, la akademiano kaj eksministro pri edukado kaj scienco Zigmas Zinkevičius, la direktoro de la Instituto pri Litova Historio prof. Antanas Tyla, la fakulo de la Akademio de Sciencoj d-ro Romualdas Grigas, la juristo prof. Mindaugas Maksimaitis kaj la prezidanto de la Kultura Societo ´Vydūnas´ d-ro Vacys Bagdonavičius) eldonis deklaron, en kiu ili ´rememorigis´, ke en la „genocido kontraŭ la litova nacio partoprenis centoj, eble eĉ miloj da judoj“. Truska avertis, ke ĉi tie temas pri misuzo de la historio kaj ke neniu el la seriozaj historiistoj (litovaj kaj judaj) povis trovi indikojn pri speciala rolo aŭ eksterordinara aktiveco de la judoj kontraŭ tiu lando dum la okupacio kaj sovetiigo de Litovio kaj dum la bolŝevisma teroro. (Truska ĉe Levinson 2006, p. 363s.). Aliflanke, ekzistis ankaŭ ne malmultaj litovaj intelektuloj, kiuj jam en marto 1989 subskribis alvokon, kiu devis atentigi pri la „tragediaj“ kaj „sangaj“ „eventoj“ de 1940 kaj 1941-44, por kiuj ili ne povis trovi historian pravigon.

[531] Eidintas 2003, p. 441.

litovaj politikistoj kiel Povilas Gylys, Algirdas Saudargas, Antanas Valionis kaj aliaj ministroj pri eksteraj aferoj klopodis teni konstruajn kontaktojn kun Israelo kaj usonaj judoj.[532]

Nur en la mezo de la 1990aj jaroj la fronto de la prisilentado povis esti trarompita en Litovio. La prilaborado de la historia pasinteco estis ligata kun la kondiĉoj, kiuj estis starigitaj al Litovio, kiu deziris aliĝi al la okcidentaj aliancoj, precipe Eŭropa Unio kaj NATO.[533] Post multaj obstakloj kaj malhelpoj, usonaj, israelaj, germanaj, rusaj kaj litovaj historiistoj kaj juristoj povis fondi komisionon kun la celo esplori la germanajn *kaj* sovetiajn krimojn.[534]

Sed kiu en Litovio krom kelkaj fakuloj pri historio sciis/as tion, konsciis/as kaj interesiĝis/as pri tiuj historiaj faktoj kaj problemoj? Prof. Liudas Truska plendis, ke precipe la ignorado de la holokaŭsto flanke de la litova junularo kaj la ĝenerala publiko estas forta kaj la nekonscio kaj nekono pri ĝi grandaj.[535] Despli ke la holokaŭsto, kiu okazis antaŭ 70 jaroj, estas fora afero kaj ke la litova popolo mem konsideras sin viktimo de la historio. Kaŝata antisemitismo do daŭre ekzistis kaj ekzistas, kompreneble ne nur en Litovio sed praktike en tuta Eŭropo kie vivas kristanoj, kaj povas en ajna momento denove eksplodi. Kvankam en Litovio iuj klopodoj por objektive trakti la holokaŭston sendube estas faritaj kaj iuj libroj de Raul Hilberg kaj Hannah Arendt tradukitaj en la litovan lingvon, Tauber timas, ke tiuj unuopaj klopodoj ne sufiĉos por atingi la vastan publikon, ĉar ankaŭ laŭ lia observo la socia intereso pri tiu ĉi temo estas malforta en Litovio[536] kaj restis pli malpli la afero de kelkaj sciencistoj en la akademia eburturo, kies laboro tute ne estas populara (same en Latvio kaj Estonio[537]).

En recenzo pri la libro de Knut Stang, kiu prilaboris la krimojn de la litovaj TDA-batalionoj, aperinta en 1998 en la ´liberala´ diaspora gazeto *Akiračiaj,* profesoro Saulius Sužiedėlis de la Universitato Millersville en Pensilvanio plendis, ke „en Litovio, la temo de la juda genocido daŭre estas dolora vundo. Sufiĉe ofte la dialogo pri la holokaŭsto provokas neraciajn reagojn, kiuj kelkfoje eĉ odoras je malamo. Ne estas sekreto, ke parto de la litova socio restis alergia al priholokaŭstaj esploroj, kvankam „la temo de la holokaŭsto devus interesi ĉiujn litovojn, des pli ke la masakroj dum somero 1941 estis unika katastrofo en nia historio; neniam en la historio de Litovio tiel multaj homoj estis mortigitaj en tiel mallonga tempo kaj laŭ tiel sistema maniero. Do, finfine la tempo alvenis por ni por pli profunde okupiĝi pri tiuj sangaj paĝoj de la historio, rezignante pri mempravigaj argumentoj pri la teorio de la duobla (simetria) genocido (´judoj mortigis nin, do ni rajtis venĝi nin´) kaj aliaj strebadoj kun la celo deflankigi nian rigardon de la malagrablaj faktoj de la pasinteco.“[538]

La problemo estas, ke en Litovio oni alkutimiĝis al la propra kompreno, laŭ kiu la litovoj estas nur viktimoj kaj ne kulpantoj. Pro tio la litovoj ŝajne malfacile komprenas, ke ne nur ili sed ankaŭ aliaj etnoj spertis senrajtecon, kiel klarigis la kritika historiisto Liudas Truska. Tial ĝis nun inter litovoj (precipe en medioj de la diasporo) popularas la opinio, ke la historio de Litovio konsistas el seninterrompata ĉeno de bataloj kaj suferoj kaj ke pri la tragika sorto de la litova nacio kulpas aliaj, precipe judoj, poloj, rusoj, germanoj, ciganoj (romaoj), komunistoj kaj aliaj.[539] Tiel aperis postmilite hero-masoĥisma kompreno pri la historio, kiu ne toleras konkurentojn apud la litovoj kiel solaj viktimoj.[540]

Kompreneble, neniu kontestas, ignoras aŭ neas, plej malmulte la Okcidento mem, ke la litovoj travivis longajn malfacilajn eraojn, dum kiuj la nacio estis subpremata kaj minacata en sia ekzisto kaj al kiu oni rabis la bazan liberecon. Precipe tragika estas konsiderata la sovetia okupacio de la jaroj inter 1944

532 Eidintas 2003, p. 424-31.
533 Fakte en la 20aj jaroj jam Ligo de Nacioj postulis de Litovio adopti la minoritatajn rajtojn.
534 Ĝi estis establita de la litova prezidento Valdas Adamkus. La ĝisnuna laboro de tiu komisiono estas prezentata kaj dokumentata sub www.komisija.lt. Aliaj litoviaj prijudaj resursoj estas troveblaj sub: http://lt.wikipedia.org/wiki/Lietuvos_žydai, www.zydai.lt kaj www.jmuseum.lt. Pri la kunlaborado kun KGB ekzistas apartaj retujoj sub: www.kgbveikla.lt, www.genocid.lt kaj www.kgbdocuments.eu. En 2001 prezidento Adamkus publike paroladis en Paneriai okaze de la 60a datreveno de la komenco de la genocido kontraŭ la judoj en Litovio, rememorigis la kunlaboradon de litovoj kun la nazioj kaj alvokis apliki homecon, reciprokan fidon kaj pacon (la tekston vd. ĉe Levinson 2006, p. 475s.). Inter la litovaj historiistoj, kiuj kritike okupiĝas pri la historio de Litovio, celante la detruon de malnovaj mitoj (pri LAF k.a.) menciindas precipe V. Brandišauskas, A. Bubnys, L. Truska, N. Maslauskiėne, S. Sužiedėlis kaj la verkisto T. Venclova. Ilia maniero trakti la historion estas pli sincera kaj honesta ol la skribmaniero de tiuj, kiuj ŝajne havas ion por prisilenti aŭ kiuj propagandisme celas defendi sian popolon/etnon kontraŭ kritiko. Interesa observo en la libro de Levinson, Vilno 2006, estas, ke Eidintas estas apenaŭ menciita; ĝi preferas baziĝi sur la laboro de la en ĉi tiu piednoto nomitaj kritikaj aŭtoroj.
535 Levinson 2006, p. 12s. Legindaj estas la du enkondukoj de S. Sužiedėlis.
536 Tauber: Vergangenheitsbewältigung in Litauen. En: Lehmann k.a. 2012, p. 348. (Vd. Levinson 2006, p. 429s.).
537 Pri la analoga situacio en Estonio vd. la kontribuaĵon de Olaf Mertelsmann en: Lehmann u.a. 2012.
538 Sužiedėlis ĉe Levinson 2006, p. 156-9.
539 Vd. ĉe Tauber: Vergangenheitsbewältigung in Litauen. En: Lehmann u.a. 2012, p. 339.
540 Tauber 2010, p. 55.

kaj 1990, kies heredaĵo estas parte sentebla en Litovio ĝis nun, kvankam la lando strebas al normaleco. Al tiu heredaĵo apartenas la cirkonstanco, ke dum la sovetia tempo judaj spuroj estis grandparte forviŝitaj en Litovio. Sed la nacia fiero kaj la propra teorio pri la unika „viktima statuso“ de la litova popolo malhelpis ĝis nun plene agnoski la veron pri la holokaŭsto kaj la evidentan kunkulpon de litovoj en ĝi, eĉ se litovaj politikistoj formale pardonpetis (tro malfrue!) ĉe la judoj.

Sed la disponeblaj aŭtentikaj fontoj parolas klaran lingvon kaj rezistas ĉiujn provojn de la bagateligo, falsado, tordado kaj mensogado flanke de litovoj, rusoj, komunistoj k.a. Precipe dank´al kelkaj malmultaj atestantoj kiel Solly Ganor, Raya Kruk, Dmitrij Gelpernas, Abraŝa Rosenfeld, Jehoŝua Rosenfeld, Ĥaim Jelin, Alex Faitelson, Helene Holzman-Czapski, Joheved Inčiūrienė-Čartokaitė, Sara Ginaitė, Jakob Goldberg, Shrage Kulish, Yitzhak Nemenčik, Avraham Tory, Zwi Katz, David Ben-Dor, Jokubas Jossade, Jitzhak Bloch, Elena Kutorgienė-Buivydaitė, Franja Branzwoska-Jocheles, Boris Steinas, Leiba Lipschitz, Fruma Kučinskienė, Juliane Zarchi, Zvi Grigorijus Smoliakovas, Leo Lewinson, Jehuda Beiles, Trudi Birger, Zev Birger kaj aliaj, kiuj tra- kaj postvivis la inferon de la holokaŭsto en Litovio, oni ankoraŭ povas imagi kaj scii kio tiam okazis kun la judoj en tiu lando, por neniam forgesi la genocidon kontraŭ la judoj, kiu okazis inter 1939 kaj 1945 ne nur en Litovio, sed en tuta Eŭropo.[541] Al ili ĉi tiu studo celis atribui la ĉefan atenton, kaj al ili ĝi estas ankaŭ dediĉata.

Por ekskludi ĉian miskomprenon fare de eblaj kritikantoj, mi mem deziras averti, ke en ĉi tiu studo mi tute ne celis akuzi, kondamni aŭ misfamigi iun konkretan popolon, kiel la litovojn.[542]

* * * * *

Utiligata literaturo vd. sube.

541 Laŭ Benz/Neiss 1999, p. 7-14.

542 Mia principa sinteno en la analizado de problemoj de homaj rajtoj kaj de etnismo estas jena: mi kutimas apogi la interesojn kaj vidpunktojn de subprematoj laŭ la principo ´en kazo de dubo favore al la pli malforta´: Ekzemple se rusoj subpremus aŭ persekutus malgrandajn grupojn aŭ etnojn, mi apogus tiujn malgrandajn etnojn aŭ grupojn, se iuj el tiuj malgrandaj grupoj aŭ etnoj subpremus aliajn malgrandajn grupojn aŭ etnojn, mi apogus la ĉi-lastajn, se ekzemple litovoj subpremus aŭ ĉikanus judojn, mi apogus judojn, se rusoj subpremus litovojn, mi apogus litovojn, se estonoj, latvoj kaj litovoj subpremus rusojn (kion ili evidente ne faras), mi apogus rusojn, se bulgaroj subpremus turkojn kaj ciganojn (kion ili evidente faris), mi apogus turkojn kaj ciganojn, se ĉinoj subpremus tibetanojn (kion ili evidente faras), mi apogus ĉi-lastajn, se en Svislando alemanoj diskriminacius romandojn, se oni ĉikanus aŭ punus ciganojn sen ilia kulpo (kio okazis) aŭ se pro iu stulta malnova leĝo iuj aliaj minoritatoj, ekzemple religiaj, estus diskriminaciataj, mi apogus tiujn minoritatojn, ktp. ktp.

## Utiligata literaturo

(ĉe la ĝenerala literaturo pri la t.n. nacisocialismo temas nur pri elekto de kelkaj gravaj kaj aktualaj verkoj konsultataj de la aŭtoro)


1948:

- Gar, Josef: Umkum fun der jidišer Kowne [Holokaŭsto en la juda Kovno]. Aroisgegebn durchn Farband fun Liţwiše Jidn in der Amerikaner Zone in Daiţsland. München. (Ĉi tiun jidlingvan verkon mi ne utiligis, sed mencias ĝin ĉi tie kiel bazan verkon pri la temo, kiun utiligis Solly Ganor por sia libro. La verko troviĝas en la zurika CB.).

1957:

- Sruoga, Balys: Dievų miškas [germ. Der Wald der Götter]. Germanan tradukon vd. 2007.

1959:

- Garfunke, Leib: *Kovna ha-Yehudit be-Hurbana* [proksimuma traduko: la detruado de la juda Kovno]. Jerusalemo, (Ankaŭ ĉi tiun hebrelingvan verkon mi ne utiligis, sed mencias ĝin ĉi tie kiel bazan dokumenon pri la temo).

1965:

- Kruk, Hermann: Diary of the Vilnius Ghetto. En: YIVO Annual of Jewish Social Science 13, Novjorko.

1966:

- Hellmann, Manfred: Grundzüge der Geschichte Litauens. Eld. WBG, Darmstadt. (3. Aufl. 1986).

1967:

- Rolnikaite, Masche: Ich muss erzählen. Mein Tagebuch 1941-1945. El la jida lingvo de Dorothea Greve. Antaŭparolo de Marianna Butenschön. Eld. Kindler. (En 2002 kaj 2004 aperis kiel Rowohlt-poŝlibro. Ooriginala titolo: Ja dolžna rasskazat'. Unua koncizigita germ. eld., 1967, Berlino, eld. Union VOB).

1980:

- Arad, Yitzhak: *Ghetto in Flames: The Struggle and Destruction of the Jews in Vilna in the Holocaust.* Yad Vashem, Jerusalemo.

1988:

- Klee, Ernst / Dressen, Willi / Riess, Volker: „Schöne Zeiten“. Judenmord aus der Sicht der Täter und Gaffer. Frankfurto/M.
- Mishell Wiliam W.: Kaddish for Kovno: Life and Death in a Lithuanian Ghetto 1941-1945. Chicago.

1990:

- Birger, Trudi und Green, Jeffrey M.: Im Angesicht des Feuers. Wie ich der Hölle des Konzentrations-lagers entkam. El la angla lingvo tradukita de Christian Spiel. Eld. Piper. Munkeno.
- Tory, Avraham: Surviving The Holocaust, The Kovno Ghetto Diary. Eld. Harvard University Press. Cambridge, Massachusetts kaj Londono.

1992:

- Wiehn, Erhard Roy (Hrsg.): Smoliakovas, Grigorijus: Die Nacht die Jahre dauerte. Ein jüdisches Überlebensschicksal in Litauen 1941-1945. Konstanz.

1994:

- Grossman, Wassili; Ehrenburg, Ilja; Lustiger, Arno: Das Schwarzbuch. Rowohl Verlag. Reinbek bei Hamburg. (Enhavo de la litova parto: Das Ghetto von Wilna, Das Tagebuch von A. Jeruschlami, Die Todesforts bei Kaunas; Die Kämpfer des Ghettos von Kaunas; Doktor Elena Kutorgiene-Buivydaite, Da Schicksal der Juden der Stadt Telšiai). S. 582-673.

1995:

- Greenbaum, Masha: The Jews of Lithuania. Jerusalemo / New York. (rete vd. Google Books). (ne konsultita).

1996:

- Kibelka, Ruth: „Litauen: Verfolgung und Rettung unter deutscher Besatzung“. En: Benz, Wolfgang; Wetzel, Juliana (eld.): Solidarität und Hilfe für Juden während der NS-Zeit. Regionalstuiden II. Eld. Metropol, Berlin. [Ĉi tiu kontribuaĵo utiligis plurajn aldonajn fontojn, kiuj estas gravaj por la temo kaj indikitaj en la bibliografio; strange estas kial en ĉi tiu artikolo la erara uzo de la finaĵo „-alte“ anstataŭ „-aitė“ ĉe litovaj inaj nomoj ne estis korektita; krom tio ekzistas kelkaj tiurilataj eraroj ĉe lokaj nomoj, ekzemple „Resanial“ anst. Raseinai, Švenčlonys anst. Švenčionys ktp.].
- Stang, Knut: Kollaboration und Massenmord: die litauische Hilfspolizei, das Rollkomando Hamann und die Ermordung der litauischen Juden. Eld. Peter Lang, Frankfurto/M., Berno ktp.

1997:

- Denns B. (Ed.): United States Holocaust Memorial Museum: Hidden History oft the Kovno Ghetto. Boston. (ne konsultita).
- Kuchenbecker, Antje: Juden und Judenfeindschaft in Litauen. En: Jahrbuch für Antisemitismus- forschung 6, p. 13-20. Berlino.
- Donskis, Leonidas: Antisemitismus in Litauen: Tradition und heutige Erfahrung. En: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 6, p. 21-31. Berlino.
- Zingeris, Markas: Jüdische Identität in einer nichtjüdischen Umwelt nach dem Holocaust. En: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 6, p. 32-43. Berlino

1998:

- Dieckmann, Christoph: Das Ghetto und das Konzentrationslager in Kaunas 1941-1944. In: Herbert, Ulrich; Orth, Karin; Dieckmann, Christoph (Hrsg.): Die nationalsozialistischen Konzentrationslager. Entwicklung und Struktur. Bd. 1. Wallstein-Verlag, Göttingen. S. 439-471.
- Gerlach, Christian: Krieg, Ernährung, Völkermord. Forschungen zur deutschen Vernichtungspolitik im Zweiten Weltkrieg. Hamburger Edition. Hamburg.
- Gutman, Israel (Hrsg.): Enzyklopädie des Holocaust. Bd. 2. Piper Verlag. München/Zürich 1998, S. 804-7.

1999:

- Kruk, Raya: Lautlose Schreie. Berichte aus dunklen Zeiten. Kun fotoj de Zwi Kadushin. [Kun unikaj kaj raraj, sekrete faritaj kaj kaŝitaj fotoj pri la kovna geto]. Herausgegeben und mit einem Vorwort von A.H. Johansen. Fischer Taschenbuch Verlag. Frankfurto/M.
- MacQueen, Michael: Massenvernichtung im Kontext: Täter und Voraussetzungen des Holocaust in Litauen. En: Benz, Wolfgang; Neiss, Marion (Hrsg.): Judenmord in Litauen. Studien und Dokumente.
- Stang, Knut: Das Fussvolk und seine Eliten. Der Beginn der Kollaboration in Litauen 1941. En: Benz/Neiss, p. 69-90.
- Matthäus, Jürgen: Das Ghetto Kaunas und die „Endlösung“ in Litauen. En: Benz/Neiss, Marion, p. 97-112.
- Hörmann, Gustav: Arbeitseinsatzleiter im Ghetto Kaunas. En: Benz/Neiss, Marion, p. 117-132.
- Rosenfeld, Jehoshua: Mordaktion im Ghetto Kaunas. En: Benz/Neiss, p. 133-142.

2000:

- Levin, Dov: The Litvaks. Jerusalemo. 2000.
- Wiehn, Erhard Roy (Hrsg.): Atamuk(as), Salomon(as): Juden in Litauen. Ein geschichtlicher Überblick vom 14. bis 20. Jahrhundert. Aus dem Litauischen von Zwi Grigori Smoliakov. Eld. Hartung-Gorre, Konstanz. (Interreto: http://www.hartung-gorre.de/atamuk.htm).

2001:

- Kaiser, Reinhard; Holzman, Margarete (Hrsg.): „Dies Kind soll leben“. Die Aufzeichnungen der Helene Holzman 1941-1944. Eld. List Taschenbuch, Munkeno.
- Lopata, Raimundas: Die Entstehung des autoritren Regimes in Litauen 1926. Umstände, Legitimation, Konzeption. En: Oberländer, Erwin: Autoritäre Regime in Ostmittel- und Südosteuropa 1919-1944. Eld. Ferdinand Schönigh. Paderborn u.a. p. 95-141.
- Radka, Lainová: Zum Vergleich der Diktaturen in den baltischen Staaten in der Zwischenkriegszeit. En: Timmermann, Heiner, kaj Gruner, Wolf. D. (eld.): Demokratie und Diktatur in Europa. Geschichte und Wechsel der politischen Systeme im 20. Jahrhundert. Eld. Duncker & Humblot. Berlin.
- Wiehn, Erhard Roy (Hrsg.): Lewinson, Leo: Der unvergängliche Schmerz. Zum Leben und Leiden der litauschen Juden. Ein persönlicher Bericht 1920-1945. Eld. Hartung-Gorre, Konstanz.

2003:

- Brandišauskas, Valentinas: Neue Dokumente aus der Zeit der Provisorischen Regierung Litauens. En: Bartusevičius k.a., p. 51-62.

- Bubnis, Arūnas: Die litauische Hilfspolizeibatallione und der Holocaust. En: Bartusevičius k.a., p. 117-131.
- Dieckmann, Christoph: Deutsche und litauische Interessen. Grundlinien der Besatzungspolitik in Litauen 1941 bis 1944. En: Bartusevičius k.a., p. 63-76.
- Eidintas, Alfonsas: Jews, Lithuanians and the Holocaust. Vilnius. (recenzoj:
- http://www.lituanus.org/2001/01_4_05.htm, http://www.questia.com/library/journal/1P3-674435701/jews-lithuanians-and-the-holocaust kaj resumo sub: http://shtetlshkud.com/wp-content/uploads/2011/09/EidintasSummaryFinal.doc).
- Hörmann, Gustav: Arbeitseinsatzleiter im Gheto Kaunas. En: Bartusevičius k.a., p. 117-132.
- Inčiūrienė, Joheved: Rettung Widerstand in Kaunas. En: Bartusevičius k.a. p. 201-217.
- Kohrs, Michael: Die offizielle Darstellung des Holocaust in der Sowjetunion (1945-1990). En: Bartusevičius k.a., p. 248-261.
- MacQueen, Michael: Einheimische Gehilfin der Gestapo. Die litauische Sicherheitspolizei in Vilnius 1941-1944. En: Bartusevičius k.a., p. 103-116.
- Neumann, Alexander: Leben und Sterben im Ghetto Kaunas. En: Bartusevičius k.a., p. 145-155.
- Priemel, Kim C.: Sommer 1941: Die Wehrmacht in Litauen. En: Bartusevičius, Vincas; Tauber Joachim; Wette, Wolfram: Holocaust in Litauen. Krieg, Judenmorde und Kollaboration im Jahre 1941. Eld. Böhlau, Kolonjo, Weimer, Vieno. p. 26-39.
- Rosenfeld, Jehoshua: Mordaktion im Ghetto Kaunas. En: Bartusevičius k.a., p. 133-141.
- Tauber, Joachim: 14 Tage im Juni: Zur kollektiven Erinnerung von Litauern und Juden. En: Bartusevičius k.a., p. 40-50.
- Trusk, Liudas: Litauische Historiographie über den Holocaust in Litauen. En: Bartusevičius k.a., p. 262-276.

2004:

- Arad, Yitzhak: The murder of the Jews in German-Occupied Lithuania (1941-1945). En: Alvydas Nikžentaitis k.a. (eld.): The perished world of Lithuanian Jews. Amsterdam. P. 175-199. (ne legite).

2005:

- Benz, Wolfgang, Distel, Barbara (eld.): Der Ort des Terrors. Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager, Vol. 2. Frühe Lager, Dachau, Emslandlager. C.H. Beck, Munkeno.
- Niendorf, M.: Stationen jüdischen Lebens in Litauen. In A. Engel-Braunschmidt, E. Hübner (eld.): Jüdische Welten in Osteuropa.

2006:

- Aleksandravičius, Egidijus: Lithuanian collaboration with the Nazis and the Soviets. En: Tauber 2006. p. 174-91.
- Birn, Ruth Bettina: Die Sicherheitspolizei in Estland 1941-1944. Eine Studie zur Kollaboration im sten. Eld. Schöningh. Paderborn. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/270595597).
- Dieckmann, Christoph: Kollaboration? Litauische Nationsbildung und deutsche Besatzungsherrschaft im Zweiten Weltkrieg. En: Tauber 2006. p. 128-139.
- Donskis, Leonidas: Loyality, Dissent and Betrayal in the Liberal-Natinalistic Motal Imagination: A Lithuanian Perspective. En: Tauber 2006. p. 101-117.
- Levinson, Joseph: The Shoah (Holocaust) in Lithuania. Vilnius.
- Sužiedėlis, Saulius: Lithuanian Collaboration during the Second World War: Past Realities, Present Perceptions. En: Tauber 2006. p. 140-63.
- Tauber, Joachim (Hrsg.): „Kollaboration“ in Nordosteuropa. Erscheinungsformen und Deutungen im 20. Jahrhundert. Wiesbaden. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/261735616).

2007:

- Benz, Wolfgang, Distel, Barbara (eld.): Der Ort des Terrors. Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager, Vol. 6. Gross-Rosen, Natzweiler, Stutthof. Eld. C.H. Beck, München.
- Sruoga, Balys: Der Wald der Götter [lit. Dievų miškas, 1957]. El la litova lingvo en la germanan lingvon tradukis Markus Roduner. BaltArt, Langenthal. [Pri la koncentrejo Stutthof].

2008:

- Benz, Wolfgang; Distel, Barbara: Der Ort des Terrors. Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager. Vol. 8. Eld. C.H. Beck, Munkeno. S. 189-208. (Elektronika versio en Google Books).
- Eilati, Shalom: Crossing the River. University f Alabama Press. Tuscaloosa. Tradukita el la hebrea de Vern Lenz.
- Sutton, Karen: The massacre of the Jews of Lithuania. Lithuanian collaboration in the final solution. 1941-1944. Jerusalem. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/263686337).

- Toleikis, Vytautas: Verdrängung, Aufarbeitung, Erinnerung. Das jüdische Erbe in Litauen. En: *Osteuropa* (DGO), n-ro 8-10, p. 455-464.

2009:
- Sutzkever, Abraham: Wilnaer Getto 1941-1955. El la jida lingvo de Hubert Witt. Eld. Ammann, Zuriko.
- Weinrib, Laura (Eld.) kaj Weinrib, Estee (trad.): Nitzotz: The Spark of Resistance in Kovno Ghetto & Dachau-Kaufering Concentration Camp. Syracuse University Press. (https://beta.exlibris.ch/de/buecher-buch/english-books/nitzotz-the-spark-of-resistance-in-kovno-ghetto-dachau-kaufer/id/9780815632337).

2010:
- Beiles, Jehuda: Dem Massengrab entkommen. Ein Augenzeuge berichtet über die Schoah in Kaunas und Kaufering 1927-1948. Aus dem Englischen von Momme Schwarz. Eld. Hartung-Gorre, Konstanz. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/030015049).
- Birger, Zev: Kein Zeit für Geduld. Mein Weg von Kaunas nach Jerusalem. Eld. Prospero, Münster.
- Katz, Dovid: Lithuanian Jewish Culture. Vilno.
- Klaus Richter: Der Kult um Antanas Smetona in Litauen (1926-1940). In: Ennker, Benno kaj Hein-Kircher, Heidi (eld.): Der Führer im Europa des 20. Jahrhunderts. Forschungen zu Kult und Herrschaft der Führer-Regime in Mittel-, Ost- und Südosteuropa. Analysen, Konzepte, Vergleiche. Vol. 27. Marburg.
- Tauber, Joachim: „Gespaltene Erinnerung“. Litauen und der Umgang mit Holocaust nach dem Zweiten Weltkrieg. En: Brumlik, Micha (u.a. Hrsg.): Umdeuten, verschweigen, erinnern. Die späte Aufarbeitung des Holocaust in Osteuropa. Frankfurt a.M. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/273553399).
- Wessel, Martin Schulze k.a.: Vilnius. Geschichte und Gedächtnis einer Stadt zwischen den Kulturen. Eld. Campus, Frankfurto/M.

2011:
- Dieckmann, Christoph: Deutsche Besatzungspolitik in Litauen 1941-1944. Bd. 2. Eld. Wallstein, Göttingen. S. 930-967. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/280112408).
- Ganor, Solly: Das andere Leben. Kindheit im Holocaust. Eld. Fischer Taschenbuch, Frankfurto/M.. 5a eld. de1997. (Engl. Originala eld.: „Light One Candle“. A Surviver´s Tale from Lithuania to Jerusalem. Novjorko1995).

2012:
- Cassedy, Ellen: We are here. Memories oft he Lithuanian Holocaust. University of Nebraska Press. (http://www.ellencassedy.com)
- Dieckmann, Christoph: Pogrome in Litauen im Sommer 1941. En: Jahrbuch für Holocaust und Völkermorde. Die Reichweite des Vergleichs. Eld. laŭ taskigo de Fritz Bauer Instituts de Sybille Steinbacher Frankfurt a.M.
- Dieckmann, Christoph: „Jüdischer Bolschewismus“ 1917 bis 1921. En: Holocaust und Völkermorde. Die Reichweite des Vergleichs. Eld. laŭ taskigo de Fritz Bauer Instituts de Sybille Steinbacher Frankfurt a.M.
- Guesnet, François; Staliūnas, Darius: No simple stories. En: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 21. Berlino. S. 18-25.
- Kohrs, Michael H.: Die Litauische Nationale Union. Porträt einer (Staats)Partei. Peter Lang.
- Lehmann, Sebastian u.a.: Reichskommissariat Ostland. Tatort und Erinnerungsobjekt. Eld. Schöningh. Paderborn u.a. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/29557772X)
- Richter, Klaus: Antisemitismus und die litauische Intelligenzija (1900-1914). In: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 21. Berlin. S. 89-114. Berlino.
- Tauber, Joachim: Hitler, Stalin und der Antisemitismus in Litauen 1939-1941. En: Jahrbuch für Antisemitismus 21 (2012), p. 166-169. Berlino.
- Tauber, Joachim: Vergangenheitsbewältigung in Litauen. In Lehmann u.a. 2012.
- Wette, Wolfram: Karl Jäger. Mörder der litauischen Juden. Eld. Fischer Taschenbuch, Frankfurto/M. 3a eld. de 2011. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/125769458).

2013:
- Eidintas, Alfonsas k.a. Geschichte Litauens. Eld. Eugrimas, Vilnius. (Elektronische Version: http://www.ebooksbylanguage.com/de/ebook/40973.geschichte-litauens). (Kvankam en ĉi tiu verko troviĝas mallonga formala ĉaptiro pri la holokaŭsto en Litovio, la ´juda demando´ kaj la problemo de la antisemitismo en Litovio estas apenaŭ traktata.)
- Richter, Klaus: Antisemitismus in Litauen. Christen, Juden und die „Emanzipation“ der Bauern (1889-1914). Eld. Metropol. Berlin. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/122486269)
- Sirutavičius, Valdas: Antisemitism in Inter-war Lithuania. An Analysis of Two Cases. In: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 21. Berlino. S. 133-148.

- Tauber, Joachim: Hitler, Stalin und der Antisemitismus in Litauen 1939-1941. In: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 21. Berlino. S. 166-182.
- Dieckmann, Christoph: Pogrome in Litauen im Sommer 1941. In: Jahrbuch für Antisemitismusforschung 21. Berlino. S. 183-213.

2014:
- Schalkowsky, Samuel (Eld., trad.): Anonymous members oft the Kovno Jewish Ghetto, Samuel D. Kassow: The Clandestine History oft the Kovno Jewish Gheto Police. Indiana University Press. Bloomington and Indianapolis. (https://beta.exlibris.ch/de/buecher-buch/english-books/anonymous-members-of-the-kovno-jewish-gh/the-clandestine-history-of-the-kovno-jewish-ghetto-police/id/9780253012838 kaj https://www.swissbib.ch/Record/329130102. ).

Interreto:
- http://www.yadvashem.org/yv/de/holocaust/insights/christoph_dieckmann.asp
- http://de.wikipedia.org/wiki/Die_Vernichtung_der_europäischen_Juden
- Map of the Lituanian Holocaust: http://dovidkatz.net/dovid/Lithuania/LT-Holocaust-small.html

Rimarko pri la uzado de vikipediaj resursoj: La resursoj de Vikipedio estas utiligataj por provizi la legantojn per bazaj informoj pri certaj temoj kaj personoj, sed ankaŭ por kontroli kaj montri la kvanton kaj kvaliton de tiuj resursoj kaj en kiuj lingvoj ili ekzistas aŭ mankas. En principo, la vikipediaj paĝoj povas esti utilaj kaj valoroj ĉefe en kazoj, en kiuj informoj raras kaj la aliro al ili estas rapide alireblaj rete. Por la serioza enprofundiĝo kompreneble necesas konsulti la seriozan sciencan fakliteraturon. Pro tempomanko mi rezignis esperantigi la biografietojn disponigatajn de Vikipedio. Por kompreni ekzemple la litovan tekston oni povas uzi la guglan tradukilon, kvankam la kvalito de la maŝina traduko estas malbona sed sufiĉa por almenaŭ baze kompreni pri kio la enhavo temas. (Ĉi tiu klarigo estas samtempe kvazaŭ la ´oficiala´ sinteno de la aŭtoro pri Vikipedio kaj la gugla tradukilo.)

## Esenca kroma fakliteraturo (parte konsultata de la aŭtoro)

- *Adam,* Uwe Dierich: Judenpolitik im Dritten Reich. Düsseldorf 2003.
- *Aly,* Götz: „Endlösung“. Völkerverschiebung und der Mord an den europäischen Juden. 1998. Frankfurt am Main. 3a eld. 2005.
- *Arendt,* Hannah: Elemente und Ursprünge totaler Herrschaft. München-Zürich 1986. 12a eld. 2008. (Unue angle NY 1951).
- *Arendt,* Hannah: Eichmann in Jerusalem. Ein Bericht von der Banalität des Bösen. München 1964.
- *Battenberg,* Friedrich: Das Europäische Zeitalter der Juden. 1999. 2 vol. Darmstadt 2000.
- *Benz,* Wolfgang (eld.): Dimensionen des Völkermords. Die Zahl der jüdischen Opfer des Nationalsozialismus. Eld. Oldenbourg, München 1991. München 1996.
- *Benz,* Wofgang u.a. (eld.): Enzyklopädie des Nationalsozialismus. Berlin 1999.
- Benz, Wolfgang (eld.): Handbuch des Antisemitismus. Judenfeindschaft in Geschichte und Gegenwart. Berlin/Boston 2009-.
- *Broszat,* Martin k.a.: Anatomie des SS-Staates. 1967. 6a eld. 1994. München 1969. 14a eld. 1995.
- *Broszat,* Martin: Der Staat Hitlers. Grundlegung und Entwicklung seiner inneren Verfassung. Eld. Dtv München 1969.
- *Browning,* Christopher R.: Ganz normale Männer. Der Reserve-Polizeibataillon 101 und die ´Endlösung´ in Polen. Hamburg 1999.
- *Breitman,* Richard: Der Architekt der „Endlösung“. Himmler und die Vernichtung der europäischen Juden. Paderborn 1996.
- *Browning,* Christopher: The Path to Genocide. Cambridge/Mass. 1992.
- *Browning,* Christopher: Die Entfesselung der „Endlösung“. Nationalsozialistische Judenpolitik 1939-1942. Yad Vashem, Jerusalem. 2003. Eld. Berlin 2006.
- *Burrin,* Philippe: Hitler und die Juden. Die Entscheidung für den Völkermord. Frankfurt/M. 1993.
- *Cesarani,* David: Sdolf Eichmann. Bürokrat und Massenmörder. Berlin 2012.
- *Dubnow,* Simon: Weltgeschichte des jüdischen Volkes. Kurzgefasste Ausgabe in drei Bänden. Komplett. The Jewish Publishing House, Jerusalem 1971. [Baziĝas sur lia Weltgeschichte des jüdischen Volkes in 10 Bänden. Berlin 1925-29].
- *Fest,* Joachim C.: Hitler: Eine Biographie. Nova, 3a eld. de 1973. Eld. Berlin 2002.

- *Friedländer*, Saul: Das Dritte Reich und die Juden. Originaltitel: Nazy Germany and the Jews tradukita de Martin Pfeiffer. 1998. Eldono 2008.
- *Gerwarth,* Robert: Reinhard Heydrich. München 2013.
- *Goldhagen,* Daniel Jonah: Die katholische Kirche und der Holocaust. Eine Untersuchung über Schuld und Sühne. Berlin 2002.
- *Götz,* Aly: Endlösung. Völkerverschiebung und der Mord an den europäischen Juden. Frankfurt/M. 1998.
- *Gutman*, Israel: Enzyklopädie des Holocaust. Berlin 1993.
- *Hasenclever,* Jörn: Wehrmacht und Besatzungspolitik in der Sowjetunion: Die Befehlshaber der rückwärtigen Heeresgebiete 1941-1943. Paderborn 2010.
- *Haumann,* Heiko: Geschichte der Ostjuden. München 1998.
- *Hilberg,* Raul: Die Vernichtung der europäischen Juden. Frankfurt am Main 1961. 9a eld., 3 vol. 1999.
- *Hitler,* Adolf: Mein Kampf. 1a vol. 1924, 2a vol. 1926. Eld. Eher, München 1924/26.
- *Hofer,* Walter (eld.): Der Nationalsozialismus. Dokumente 1933-1945. Frankfurt/M. 157, 1982. 50a eld. 2011.
- *Klee, Ernst:* Was sie taten, was sie wurden. Fischer, Frankfurt/M. 1987.
- *Kogon,* Eugen: Der SS-Staat. Das System der deutschen Konzentrationslager. Eld. Kindler, München 1978. Eld. 2012.
- *Longerich,* Peter : Der ungeschriebene Befehl. Hitler und der Weg zur „Endlösung." München 2001.
- *Longerich,* Peter: Joseph Goebbels. München 2012.
- *Löwe,* Heinz-Dietrich: Antisemitismus und reaktionäre Utopie. Russischer Konservatismus im Kampf gegen den Wandel von Staat und Gesellschaft, 1890-1917. Hamburg 1978.
- *Lukša,* Juozas: Partisanen. [lit. Partizanai už geležinės uždangos]. Chicago 1950. El la litova lingvo en la germanan lingvon tradukis Markus Roduner. BaltArt, Langenthal.
- *Messmer*, Matthias: Die Judenfrage in der Sowjetunion. Ideologische Voraussetzungen und politische Realität. Konstanz 1992.
- *Messmer,* Matthias: Sowjetischer und postkommunistischer Antisemitismus. Entwicklungen in Russland, der Ukraine und Litauen. Konstanz 1997.
- *Mommsen,* Hans: Die Realisierung des Utopischen. Die „Endlösung" der Judenfrage im „Dritten Reich". En: *Mommsen*, Hans: Der Nationalsozialismus und die deutsche Gesellschaft. Reinbek 1991.
- *Piper,* Ernst: Alfred Rosenberg. Hitlers Chefideologe. München 2005.
- *Pohl,* Dieter.: Die Herrschaft der Wehrmacht. Deutsche Militärbesatzung und einheimische Bevölkerung in der Sowjetunion 1941-1944. München 2008.
- *Pohl,* Dieter: Massenmord und schlechtes Gewissen. Die deutsche Bevölkerung, die NS-Führung und der Holocaust. Frankfurt 2008.
- *Poliakov,* Léon: Geschichte des Antisemitismus. 8 volumoj. Worms 1977-88.
- *Slezkine,* Yuri: Das jüdische Jahrhundert. Göttingen 2007.
- *Snyder,* Timothy: Bloodlands. Europa zwischen Hitler und Stalin. 2010. Eld. München 2013.
- *Weiss,* John: Der lange Weg zum Holocaust. Die Geschichte der Judenfeindschaft in Deutschland und Österreich. Hamburg 1997.
- *Wieck, Michael:* Zeugnis vom Untergang Königsbergs. Ein „Geltungsjude" berichtet. Heidelberg 1988.

© Andreas Künzli, www.planlingvoj.ch, publikigita en majo 2015. Kun postaj kompletigetoj. Stato sept. 2015.

La aŭtoro (lic.phil. / M.A.) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91, kun profundaj studoj pri tiuj fakoj ankaŭ poste. En la fako internacia juro li verkis studon pri la jura situacio de la Baltaj Ŝtatoj kun aparta konsidero de la tempo de ilia politika emancipiĝo en la 1980aj jaroj, kiu kondukis al ilia sendependiĝo en 1991. Litovion li unuafoje vizitis en 1988. Li bone konas ankaŭ Estonion kaj Latvion, kiujn li plurfoje vizitis ekde la mezo de la 90aj jaroj, kun pli longaj restadoj en Tallinn en 1995/96 kaj poste.

PS

La ricevo de ĉi tiu studo estis konfirmita kaj dankita de kunlaborantino de la biblioteka direktoro de Jad Vaŝem en Jerusalemo la 10an de junio 2015 per retmesaĝo. El Litovio, kien la teksto estis sendita al diversaj instancoj, neniu reago venis (10.8.). Die Zustellung dieser Studie durch den Autor wurde am 10.6.2015 von einer Mitarbeiterin des Bibliotheksdirektors von Yad Vashem in Jerusalem per E-Mail bestätigt und verdankt. Aus Litauen, wohin der Text an diverse Behörden geschickt wurde, traf bisher (10.8.) keine Reaktion ein. This is a non-commercial projet for educational purposes, such as teaching, scholarship and research. In case of problems with copyright, please contact the author.
Pri la reuzado de bildoj el Vikipedio vd.:
https://de.wikipedia.org/wiki/Wikipedia:Weiternutzung
https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Weiterverwendung